

Vizito al malnova eseo pri interlingvistiko,
parte malaktuala, parte tamen ankoraŭ nun
leginda.

Unua apero en 1977.
Kun revizio kaj kritikaj notoj

Eldonejo "Hans Dubois"
CH-6500 Bellinzona

Nuna publikigo: 2019

Esperanto kaj Interlingua

Faktoj, teorioj, praktiko, opinioj, historio
1950-1977

Tazio Carlevaro (Edo Bernasconi)



Dua eldono de la libro, 2019

Edo Bernasconi: *Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj – Esperanto aŭ Interlingua?*

Eldonita de Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds (Svislando), en novembro 1977.

Aŭtoro: Tazio Carlevaro, sub la pseŭdonomo “Edo Bernasconi”.

Fako: kompara interlingvistiko.

Resumo: La aŭtoro de tiu ĉi verko celas kompari Esperanton kun Interlingua (lingvoprojekto de I.A.L.A.) el lingvofilozofia, lingvotipologia, lingvohistoria kaj lingvopsikologia vidpunktoj. La studo proponas informojn pri la specifaj malsamaj inter ambaŭ lingvoj, kun speciala atento pri Esperanto.

Enhavo

Dankoj (1977)	4
Antaŭparolo (pretigita en la jaro 2019-a).....	5
1. Enkonduko (1977)	7
2. Ĉu oni povas plani lingvon?	9
2.1 La planado-tekniko	9
2.2 La socio-lingvistika vidpunkto	10
2.3. La publika opinio kaj la internacia lingvo	10
3. La planita lingvo	12
3.1 Historio de la planlingvaj projektoj	12
3.2. La selekto-kriterioj por planlingvoj	13
3.3. Ĉu ni povas paroli pri “vivo” de planlingvo?	14
3.4. Ludoviko Lazaro Zamenhof	17
3.5. Esenca afero en lingvo ne estas la vortoj, sed la strukturo	18
3.6. La socioj kaj lingvistikaj bazoj de la Esperanto-movado	19
3.7. La evoluo de Esperanto.....	20
4. La problemo de la perfekta lingvo	21
4.1. Enkonduko	21
4.2. La “filozofia” lingvo	22
4.3. La sciencaj fundamentoj de perfekta lingvo	23
4.4. La esploroj de Silvio Ceccato	25
4.5. Konkludo.....	25
5. Intermezzo.....	27
5.1. “Como Esperanto era petrificate”	27
5.1. La "Fundamento de Esperanto"	28
5.2. La t.n. “Interna Ideo”	29
6. Esperanto.....	31
6.1. Io pri kompetenteco	31
6.2. Por ke lingvo estu universala, ne sufiĉas ĝin nomi tia (Zamenhof).....	32
6.3. La lingvo Esperanto	38
6.4. La efikeco de la Esperanta vort-kunmetsistemo	39
6.5. Por kompara planlingvistiko	40
6.6. Konkludo.....	42
7. Kritikoj pri Esperanto	43
7.1. Enkonduko	43
7.2. La skibsistemo de Esperanto.....	43
7.3. Eŭfonio (belsoneco) kaj planlingvo	44
7.4. La karakterizaj finaĵoj	46
7.5. La “akuzativo”	48
7.6. La plurala morfemo.....	49
7.7. Relativoj.....	50
7.8. La radiko-selekto en Esperanto.....	51
7.9. La redundanco en la internacia lingvo	54
7.10. Kritikoj kontraŭ la “troa” reguleco de Esperanto	55
7.11. La gramatiko de la eraroj	57

8. La literaturo en Esperanto	58
8.1. Enkonduko	58
8.2. La originala literaturo en Esperanto.....	59
8.3. La tradukita literaturo de Esperanto.....	59
8.4. La esprimivo de Esperanto.....	60
9. Neracieco estas ofte lasta tranĉeo	64
10. Novlatinoidismo en planlingvistiko	66
10.1. La ideologiaj fundamentoj de novlatinoidismo	66
10.2. Alexander Gode	69
10.3. Benjamin Lee Whorf kaj Gode-ismo.....	72
10.4. La prototipismo: Platona tekniko de Alexander Gode.....	74
10.5. Lingvistiko kaj novlatinoida planlingvistiko	77
10.6. Interlingua	79
11. La novlatinoidaj lingvoj.....	82
11.1. Enkonduko	82
11.2. Fonologio kaj ortografio	82
11.3. La morfosintakso	83
11.3.1. La artikolo	83
11.3.2. La adjektivo	84
11.3.3. La verbo-konjugacio	84
11.3.4. La personaj pronomoj	85
11.3.5. La substantivo	86
11.3.6. Afikso-derivado en la novlatinoidaj lingvoj kaj en Esperanto.....	88
11.3.7. Historio de la de-verba derivado en la novlatinoidaj planlingvoj.....	91
11.3.8. La afiksoj en la novlatinoidaj lingvoj	93
11.3.9. La alterno de la radik-alomorfoj en la Interlingua-verboj	95
11.3.10 La arkaismoj kaj la sinonimoj.....	98
11.3.11. Transiro de iu gramatika kategorio al alia	98
11.4. Problemoj de semantiko.....	102
11.5. La “eraroj” koncernantaj Interlinguan	103
11.6. La anoj de Interlingua kaj la prototipismaj reguloj.....	104
11.7 La eraro-gramatiko de Interlingua	105
11.8. Konkludo.....	106
12. Planlingvistika fatamorgano	107
12.1. La iluzia “progreso” en planlingvistiko	107
12.2. Ni organizu rondan tablon!	109
13. La kvar “juĝoj” pri Esperanto	110
13.1. La Delegacio por la alpreno de internacia lingvo	110
13.2. La juĝo de la Ligo de la Nacioj (LdN).....	111
Gonzague de Reynold	113
13.3. The International Auxiliary Language Association	114
13.3.1. Antaŭ la kreo de IALA	114
13.3.2. La "scienca" IALA.....	115
13.3.3. La konstruo de Interlingua	117
13.3.4. IALA en Novjorko.....	118

13.3.5. La polemiko Gode-Martinet	119
13.3.6. La naskiĝo de Interlingua.....	119
13.4. La <i>International Standardising Organization</i> (Internacia Normiga Organizajo - ISO)	120
13,4,1, La ĉefverko de Eugen Wüster.....	121
13.4.2. <i>International Standardising Organisation</i> (ISO)	122
14. Esperanto kaj pedagogio	124
14.1. Kiamaniere oni ne argumentu	124
14.2. Esperanto en la lerneja instruado	125
14.3. Eksperimento komisiita [...] far-de IALA.....	126
14.4. Esperanto en la lernejoj.....	127
14.5. La vidpunkto de la psikologo.....	127
14.6. Konkludoj	128
15. La disvastiĝo de Esperanto	130
15.1. La organizita Esperanto-movado	130
15.2. La “oficiala” uzo de Esperanto	130
15.3. Esperanto kiel scienca lingvo.....	131
15.4. La libroj en Esperanto.....	132
15.5. Libroj en Interlingua	132
15.6. La internacia lingvo	133
16. Postparolo	134
17. Terminareto.....	135
18. Listo de mallongigoj	142
19. Bibliografio de konsultitaj verkoj	143
20. Listo de nomoj	148

Dankoj (1977)

Sen la afabla kaj valora kunlaboro de pluraj amikoj, ĉi tiu verko neniam estus povinta aperi. Aparte mi volas danki:

T. Carlevaro (Les Hauts-Geneveys), kiu min konsilis kaj helpis, kaj persone, kaj per pruntodono de grava materialo;

mian Edzinon, kiu kapablis toleri mian karakteron dum la plej tiklaj kaj malfacilaj momentoj de la pretigo je ĉi tiu verko;

C. Gacond, kaj la tutan grupon cirkaŭ *Kultura Centro Esperantista* (La Chaux-de-Fonds), kiu min helpis per konsiloj, kritikoj kaj kuragigoj,

Pierre Hirsch (La Chaux-de-Fonds), kiu min instigis per kritikoj kaj per dokumentoj ĉefe pri Gonzague de Reynold;

E. Leutert (Grand-Lancy), kiu konsentis tajpi la stencilojn de la definitiva manuskripto;

U. Moser (La Ferrière), kiu en plurpaĝa manuskripto montris al mi malklaraĵojn kaj nekompreneblaĵojn;

C. Piron (Coppet), kiu, traleginte la manuskripton, donis al mi multe da informoj pri lingvaj problemoj (ĉefe pri ekstrem-orientaj lingvoj);

O. Tzaut (Mont-Soleil), kiu subtenis min, kaj instigis min al rapida laboro, kaj min konsilis en la plibonigo de mia unua teksto.

La Chaux-de-Fonds 22.7.1975 - 27.5.1976

Antaŭparolo (pretigita en la jaro 2019-a)

Naskiĝo de la projekto (1970-1977)

En tiuj jaroj, en Svislando, naskiĝis Kampanjo Esperanto en la lernejoj. Temis pri kampanjo, kiu celis, kunlabore kun ILEI, pruvi la faktajn avantaĝojn de Esperanto, kiel internacia interlerneja lingvo, kaj kiel taŭga propedeŭtika ilo por plua lingvolernado. Tio vekis kritikojn, Ĉefe fare de ne-esperantistoj, aparte de reprezentantoj de Occidental (jam tiutempe minoritataj), kaj de Interlingua (kiuj reprezentis la plej aktiva grupo)¹. Tiu kampanjo havis kelkajn sekvojn, i.a. en Tiĉino, ankaŭ kunlabore kun ILEI, sed iom post iom ĝi perdiĝis, malgraŭ interesaj rezultoj. La svisa publiko, finfine, ne subtenis ĝin, kaj la esperantistoj ne havis la forton ĝin pludaŭrigi.

Tiu ĉi libro estas iom polemika. Mi republikigas ĝin por dokumenti historian momenton de la vivo de la Esperanto-movado en Svislando. Verdire, la polemikeco estis ja ankaŭ ambaŭflanka.

Kio okazis intertempe (1977-2018)

La falo de la real-komunismaj reĝimoj en la mondo, kaj aparte en Eŭropo, ne favoris Esperanton. La malgranda uzo de la lingvo far-de iuj registaroj subite malaperis. La disvastiĝo de la angla en Eŭropo kaj ĉie en la mondo rapidiĝis. Montriĝis, ke la homoj ja volas internacian lingvon, sed ili deziras *ne fari provojn* per Esperanto. La malfacileco de angla lingvo repaĝiĝas per tuja universala uzo.

Montriĝis, ke la homoj ja deziras internacian lingvon, sed ili ne zorgas, ĉu ĝi estas nacia aŭ planita. Kondiĉe, ke la laboro kaj tempo, investita en la lerno de tiu lingvo, tuj donu rezulton, kaj ne nuran esperon.

Esperanto malaperas el la konscio de la loĝantaro. La nuna problemo en Svislando estas konvinki la svisojn, ke indas ankoraŭ lerni la naciajn lingvojn. Fakte, la uzo de la angla kiel komun-svisa lingvo vastiĝas, kvankam ne-oficiale². La nuna situacio estas certe pli tikla ol tiu, kiun mi priskribis en la jaro 1999-a.

Naskiĝas tradukprogramoj, kiuj fariĝas ĉiam pli bonkvalitaj. Baldaŭ estos utiligebla ankaŭ voĉa tradukprogramo. Kial lerni artefaritan lingvon, kiun utiligas nur homoj, kiuj lernis ĝin, kaj kiu, cetere, aplikiĝas nur sporade, tie kaj tie?

Internacia lingvo artefarita ne plu estas necesa aŭ utila. La ĉefcelo de Esperanto kaj de Interlingua forvapiĝis. La diskuto, ĉu Esperanto aŭ Interlingua, ĝuste pro tio, fariĝis senenhava.

Planlingvistiko malaperis. Aŭ, pli bone dirite, ĝi restas kiel tekniko por plitaŭgigi lingvojn jam ekzistantajn. Plej bedaŭrinde, tamen, malaperis komparaj esploroj pri la lingva uzo de planlingvoj, kun malmultaj (nun ege sporadaj) esceptoj. Multiĝis verkoj pri kulturo kaj literaturo de planlingvoj, aparte de Esperanto. Multiĝis, ankaŭ, elstaraj vortaroj kaj prihistoriaj esploroj. Ĝenerale, kiam lingvo ekmortas, oni konstruas oportunan monumenton, por ĝin memori ankaŭ estonte. Ĝi do estas signo, ke la praktika uzo malgrandiĝis.

¹ Pri la tiutempa agado de Svisa Esperanto-Societo, kaj de la esperantistaj instruistoj, konsultu la gravan libron de Andreas KÜNZLI: “Universalaj lingvoj en Svislando”, La Chaux-de-Fonds, 2006.

² Tazio CARLEVARO: “Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?”, Bellinzona 1999, Hans Dubois.

Se en 1970 pluraj svisoj sciis, kio estas Esperanto, dank al ĵurnaloj kaj radioprelegoj, nun estas dube, ke iu respondus jese: “Mi scias”. Ĉefe se temas pri juna homo. Konscio pri utileco de planlingvo ne plu estas kultura celo. Kial aldoni novan lingvon al la jam ekzistantaj? Ĉu la angla ne sufiĉas?

Unuflanke, la Esperantaj asocioj (naciaj, lokaj kaj fakaj) fariĝas ĉiujare pli malgrandaj. Aliflanke, ekzistas ampleksa Esperanto-uzo en interreto. Sed Esperanto-interretanoj fakte parolas inter si. Same, ekzistas interretanoj, kiuj utiligas Ido aŭ Interlinguan, sed *inter si*. Formiĝas fermitaj grupoj, dediĉitaj al difinita celo, sen konfrontiĝo kaj rilato kun alispecaj grupoj. Ĉiu en propra grupeto, konsistanta el sampensanoj.

Lingvoplanado fariĝis plezuriga sporto

De la tiama diskuto, forpasis pli ol 40 jaroj. Esperanto kaj Interlingua malaperis el la atento de la nuna publiko. Do, la polemikoj kaj la diskutoj fariĝis objekto de la historio. La iama idealo “populariĝis”. De socia kultura celo, ĝi transformiĝis al plezuriga *individua* momento. Tiamaniere, “konstrui lingvon” fariĝas plezuro. “Artefarita” lingvo fariĝis amuza ludilo. Aperas libroj, kiuj instruas konstrui lingvon, por propra plezuro, certe ne por internacia uzo³. La rado de la historio turniĝas relative rapide. De kultura celo, al amuzilo. Ne por ĉiuj, kompreneble, sed certe la spirito de tiu aktivado ne estas idealisma. Ĝi korespondas multe pli al la etoso de nia epoko.

La idealo de internacia planita lingvo

Ne plu estas la epoko de la diskutoj (eble disputoj), ĉu Esperanto, ĉu Interlingua. Tiu ĉi libreto apartenas al la iamaj tempoj. Ĝia temaro estas eksmoda. Ne plu aktuala. Nur emo al la historio pravigas ĝian reaperon.

Dr med. Tazio Carlevaro
Eldonejo “Hans Dubois”
Viale G. Motta 32
CH-6500 Bellinzona
tcarlevaro@bluewin.ch

³ PETERSON D.J., “The Art of Language Invention”. New York, Penguin Books, 2015. Ankaŭ: ROSENFELDER M., “The Language Construction Kit”. Chicago, Yonagu Books, 2000.

1. Enkonduko (1977)

La studo, kiun mi prezentas hodiaŭ, al la bonvola atento de la legantoj, havas historion. Neniam mi decidintus ion ajn publikigi pri Esperanto aŭ pri Interlingua, se ne estus falinta en miajn manojn broŝuro (aperigita far-de *Editiones Interlingua* en Morges, Svisio), kies aŭtoro estis prof. Ric Berger⁴. Mi jam de longe bone konas la jurnalistan kaj polemikistan talenton de prof. Berger, sed tiu broŝureto abunde preterpasis ĉiujn miajn spertojn tiurilatajn. Fakte, ne la argumentoj ŝokis min (oni ja rajtas utiligi la argumentojn, kiujn oni preferas, sendepende de ilia real-konformeco), sed certe la tono. Surprizis min, inter alie, la aserto de la aŭtoro, kiu “miris konstati ke netoleremo - por ne utiligi vorton pli taŭgan: fanatikeco - ŝajnas enkondukiĝinta en interlingvistikon”⁵: li volis per tio signifi ke, laŭ li, disvastigi hodiaŭ Esperanton estas aŭ indico de obtuza sinteno, aŭ de ignorado.

Pro tio mi kaptis kun granda plezuro la proponon de gvidantoj de *Kultura Centro Esperantista* (La Chaux-de-Fonds, Svisio) kaj de Kampanjo “Esperanto en la Lernejojn” (Mont-Soleil, Svisio), pretigi studon pri Esperanto kaj Interlingua. La “konspiro per silento”, pri kiu plendas s-ro Berger koncerne la fakton, ke la esperantistoj ne ofte parolas pri Interlingua⁶, ne ekzistas: ĉi tiu studo, cetere, estas ties pruvo, se io tia estas necesa.

Mi havas tamen malgrandan timon: por s-ro Berger ĉiu esperantisto, kiu defendas sian konvinkigon, iĝas aŭtomate kompatinda fanatikulo, malsana je mistikismo kaj preskaŭreligia entuziasmo. En tiu diagnozo li volonte apogiĝas al la aŭtoritateco de la svisa verkisto Gonzague de Reynold, tre konata ĉampiono de toleremo kaj demokrateco⁷.

Mi estas nek fanatikulo nek mistikulo animita per misiisma pasio. Mi tutsimple malkonsentas kun la tezoj de prof. Berger, kaj mi provas ekspliki mian starpunkton. Mi emus pravigi ĉi tiun studaĵon per la vortoj de granda aŭstria lingvisto de la pasinta jarcento, Hugo Schuchard, kiu, defendante la vivo-raĵton de planlingvo, skribis: “pozicio, kiu ne indas je defendo, estas pozicio, kiu ne indas je konservo. La polemiko estas nemankebla ilo por la progreso de la scienco; ĝi ne devige fontas el persona postofenda venĝodeziro, kaj ĝi ne devige kondukas al malagrablaj postefikoj”⁸.

Firme klasika eduko (kun multe da latina kaj greka lingvoj), longaj laborjaroj en la kampo de natursciencoj, reenlaborigo en la homajn sciencojn, ioma poligloteco, kiu enhavas ekde proksimume dudek jaroj Esperanton kaj Interlinguan, donas al mi minimuman kredindeco.

Mia celo estas triobla: unue mi dezirus prementi la malsamon inter la filozofio de Esperanto kaj tiu de Interlingua, kaj, due, mi klopodos montri, kiaj estas la konsekvencoj je la *lingva* nivelo, se oni konsentas kun la filozofio de Interlingua.

La tria celo estas la jena: mi deziras malvualigi la miton, laŭ kiu la moderna lingvistiko estas amika je Interlingua. La vero estas, ke guste grava parto de la *moderna* lingvistiko preferas Esperanton. Sed malkonfirmo ne sufiĉas: por ke ĝi estu kredebla, mi devis farĉi la tekston per nenombrebla kvanto el citaĵoj, notoj, rimarkoj. Tio igas mian studon malfacile legebla. Sed tio nepre altigos ĝian dokumentan valoron.

⁴ Ric BERGER, "Les écoles de Romandie et la mystique de l'Esperanto" /Morges/, ĉe la aŭtoro, 1975.

⁵ Ric BERGER, "Historia del lingua international" (Tomo II: 1949-1972), Morges, Editiones Interlingua, sen dato, p. 87.

⁶ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 2.

⁷ BERGER: samloke, p. 5.

⁸ Hugo SCHUCHARDT. "Weltsprache und Weltsprachen: An Gustav Meyer", Strassburg, Trübner, 1894, p. 5.

Iusence mi ŝatus klarigi, ke tute ne estas nekompreneble, ke “hodiaŭ ekzistas grupo .../kiu celas/trudi maskeradaĵon⁹ anstataŭ proponi la aŭtentan grek-latinan heredaĵon”^{10 11}.

Kontraŭe, post la lego de ĉi tiuj paĝoj, mi esperas, ke almenaŭ iuj el la legantoj komprenos, ke la vidpunkto de la esperantistoj ne estas stranga, kaj, ke, male, estas kurioze, ke ankoraŭ hodiaŭ ekzistas homoj, kiuj serioze proponas Interlinguan kiel mondlingvon¹².

Miakoncerne, mi elektis, kiel aliaj centmiloj, Esperanton. Min puŝis al ĉi tiu elekto (aŭ selekto) nek nescio, nek ignoro, nek fanatikeco, nek stulteco. Mi ŝatus ree citi Schuchard, kiu, en iu letero al sia amiko, la lingvisto Gustav Meyer, skribis:

“Oni diras, ke mi estas obstinulo. Mi scias, ke mi estas tia, kaj tio eksplikiĝas en la sekvanta maniero: kiam nova fenomeno eniras mian vido-kampon, ĝi ekformiĝas kaj ekkoloriĝas nur iom post iom, mi observas ĝin je la suno kaj je la ombro, mi igas ĝin malaperi kaj reaperi, mi enkadrigas ĝin inter miajn sciaĵojn, aŭ mi ilin korektas surbaze de ĝi; mallonge, vi rimarkas tiel mian remaĉadon kaj nedecidemon pri kiu vi ofte min mokis. Kaj kiam finfine mi decidus surpaperigi ĝin, jen alsurfacas novaj skrupuloj; mi klopodas per ĉiuj miaj fortoj kunigi ĉiujn elementojn, kiuj havas ajnan rilaton kun ĝi, eĉ se mi sentas, ke tio malhelpas mian antaŭeniron [...] grandan valoron havas por mi /konoj/ atingitaj per laboro tiel malfacila.”¹³

⁹ Tiu "maskeradaĵo" estas nenio alia ol Esperanto.

¹⁰ Interlingua, kompreneble!

¹¹ BERGER, “Les écoles...”, 1975, p.5.

¹² Io estu jam nun klara: mi ne opinias, ke tiu propono estas nekomprenebla. Mi nur diras, ke ĝi estas *kurioza*.

¹³ SCHUCHARDT, "Weltsprache... ", 1894, p. 5.

2. Ĉu oni povas plani lingvon?

En ĉi tiu libro mi *ne* intencas paroli pri la babelisma problemo. Ekzistas pri tio pluraj bonaj verkoj en multaj lingvoj, kiujn aperigis kaj esperantistoj kaj interlingua-istoj¹⁴. Lastatempe en Esperanto aperis elstara verko pri tiu temo, kun legindaj paĝoj ĉefe pri la problemo de komuna lingvo en la internaciaj rilatoj¹⁵.

2.1 La planado-tekniko

La estona-sveda lingvisto Valter Tauli, en lastatempe publicita libro, proponis nenombreblajn pruvojn pri la eblo plani kaj konscie direkti en ĝia evoluo nacian lingvon, kaj en la terminologia (scienca kaj ĉiutaga), kaj en la morfologia, kaj en la sintaksa kampoj. La demandon, ĉu oni povas plani tutan lingvon sur la bazo de antaŭe starigitaj principoj (kiujn la aŭtoro nomas “strategio” kaj “taktiko” ellaboritaj sur la bazo de specialaj lingvoplanaj teknikoj), Tauli respondas tute pozitive¹⁶.

Oni scias, ke tiaj planitaj lingvoj, kiuj en la objektivo de siaj aŭtoroj devus servi kiel iloj por internacia komunikado, jam ekzistas. Laŭ la usona lingvisto, Mario Pei, konata kiel specialisto pri latinida lingvisto, kaj kiu ekde deko da jaroj favoras Esperanton, oni devus prikalkuli milon da tiaj¹⁷. Ni ne konsentas. Fakte, la lingvoj prezentitaj ne nur skize, sed kiel projektoj kompletaj kaj uzopretaj, ne superas la dek-kvinon. “Ĝenerale, observas Tazio Carlevaro, la plej granda parto el ili baziĝas sur kelkaj fundamentaj lingvistikaj asertoj: interalie, sur esploroj celantaj atingi la maksimuman komunan denominatoron inter diverslingvaj lingvo-elementoj. La raciigo kaj sistemigo de la formoj tiel ekstraktitaj estos pli aŭ malpli radikalaj, laŭ la celoj de la malsamaj aŭtoroj”¹⁸.

Laŭ Tauli, la provoj konstrui planitan lingvon “devas esti enklasigitaj aŭ en la kategorio ‘aŭtonoma’ aŭ en la kategorio ‘naturalisma’ [...] La interlingvoj konstruitaj laŭ la principoj de aŭtonomeco estas sendependaj el-de la etnaj lingvoj, kaj estas karakterizataj per reguleco, kiel ekz-e Esperanto kaj Ido. La interlingvoj konstruitaj laŭ la naturalismaj principoj estas pli aŭ malpli similaj al la etnaj lingvoj, precipe al la novlatinaj lingvoj”¹⁹.

Tiu eblo planadi lingvon estis jam konata al Schuchard, kaj temas pri scio ne-fremda jam al la ugrofinna lingvistiko. En artikolo el la jaro 1932-a la fama finna lingvisto Emile Setälä, unu el la pioniroj de Esperanto en Finnlando²⁰, asertis ke la hodiaŭa finna lingvo evoluis per volo-dependaj lingvoŝanĝoj el la iama dialekto de Turku (Åbo)²¹.

¹⁴ A. CAUBEL, "La raison contre Babel", Paris, Union Rationaliste, 1961.

Ric BERGER, "La question d'une langue universelle", Paris-Chapelle s/Lausanne, Occidental-Union, 1946.

¹⁵ Ivo LAPENNA, Ulrich LINS, Tazio CARLEVARO, "Esperanto en Perspektivo", London-Rotterdam, Universala Esperanto-Asocio, 1974 (ĉapitroj de LAPENNA: p. 3-27).

¹⁶ Valter TAULI, "Introduction to a Theory of Language Planning", Uppsala, Almqvist & Wiksell, 1968, p. 167.

¹⁷ Mario PEI, "Cercasi una lingua mondiale", en: "L'Esperanto", 1972/178, p. 5 (angla originalo: 1969).

¹⁸ Tazio CARLEVARO, "The naturalist school in interlinguistics", Braunschweig, Linguistische Berichte (Vieweg), 1971, p. 1.

¹⁹ TAULI, "Introduction to a Theory....", 1968, p. 168.

²⁰ Emile SETÄLÄ, "La question de la langue universelle", en: "Journal de la société finno-ougrienne", 1932/43, p. 114.

²¹ SETÄLÄ, "La question...", p. 108.

2.2 La socio-lingvistika vidpunkto

Schuchard, citata en grava verko pri planlingvistiko pretigita de la nederlanda filologo W.J.A. Manders, skribas, ke "la esprimo 'lingvo artefarita' neniel povas signifi kontraŭsencaĵon; fakte, ĝi estas pli certe taŭtologio; ĉar tiu esprimaĵo indikas teknikon lingvistikan konscie ellaboritan, t.e. la idealon de la lingvo"²². Per tio li intencis esprimi, ke la lingva planado estas legitima, ĉar ĝi celas restarigi lingvon regulan kaj esprimivan, sen la inkrustiĝoj, kiujn en la naciaj lingvoj lasis la paso de la jarmiloj, sub formo de neregulaĵoj kaj esceptoj. Cetere, lingvo, ĉar socia instrumento por komunikado sur la bazo de komuna konsento, kaj do neeviteble ido de la koncerna socio mem, estas neeviteble "arte-farita", kaj ne "natura", t.e. "socia" kaj ne "biologia".

Kaj tial la adjektivo "artefarita" apud "lingvo" indikas nur ion, kion la substantivo jam enhavis kaj la esprimo "artefarita lingvo" estas taŭtologio.

Sed ekzistas grava aspekto, kiun ni pritraktos en la venonta ĉapitro: ne sufiĉas ellabori lingvon. Oni devas vivi ĝin. Por studi tiun vivigon ni devas ellabori teorion pri la socio-lingvistiko de la planlingvoj, pri kiu ni parolos pli malfrue. La problemon cetere bone starigis la hodiaŭa germana lingvisto Harry Spitzbart: "La lingvo estas formo kreita far-de la homo sur la bazo de liaj bezonoj materiaj kaj sociaj. Tiu formo evoluas en la socio kaj kun la socio. Pro tio oni devus el generala vidpunkto dubi pri la vivokapablo, pri la efikeco kaj pri la utileco de planlingvo [...] sed kiel lingvisto kaj filologo oni devos atenti antaŭ trofruaj juĝoj, ofte neakordigeblaj kun la faktoj. Por povi esprimi evaluon definitivan ni bezonas striktan interfakan kunlaboron kun la lingvo-teoriistoj, la filozofoj, la historiistoj, la etnologoj kaj la sociologoj, kaj ankaŭ speciale kun reprezentantoj de interlingvistiko kaj de esperantologio."²³

Kial ankaŭ kun esperantologoj? Ĉar la moderna germana lingvistiko ekvidis, ke Esperanto estas ne nur *lingva* fenomeno, sed ankaŭ *socia* fenomeno. Kaj tion ni klopodos evidentigi en la sekvantaj ĉapitroj.

2.3. La publika opinio kaj la internacia lingvo

Kelkaj planlingvanoj plendas, ke la publika opinio ne interesiĝas pri internacia lingvo, Tio ne estas vera. Multenombraj enketoj faritaj laŭ la modernaj usonaj metodoj demonstros, ke la homoj aspiras al internacia lingvo. Ni vidu tion.

En 1950 enketo, efektivigita en Kanado, Francio, Finnlando, Norvegio, Nederlando, Usono, demonstris, ke 76% favoras internacian lingvon. En 1961 la sama enketo estis ripetita, kaj oni rimarkis, ke la procentaĵo de la favorantoj altiĝis je 8%, al 84%. Ĉie la unua lingvo proponata en la preferoj de la pridemanditoj estis aŭ la franca aŭ la angla, sed kiel dua en la procentaĵo de la preferoj ne estis nacia lingvo, sed planita lingvo, Esperanto²⁴. Laŭ kritika ekzameno publikigita de B.D. Emmart²⁵, la interesiĝo ŝajnas ĉeestanta en ĉiuj sociaj medioj, kvankam kelkaj signoj indikas, ke la procentaĵo de la interesiĝantoj kreskas laŭfunkcie kun la studo-jaroj de la pridemanditaj personoj.

²² Citaĵo el SCHUCHARDT, laŭ: W.J.A. MANDERS, "Vijf kunsttalen", Purmerend, Muusses, 1947, p. 52.

²³ Harry SPITZBART, "Weltsprachen und Welthilfssprachen", en: "Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung", 1973/6, p. 634.

²⁴ PEI, "Cercasi...", 1972, p. 5-6.

²⁵ B.D. EMMART, "Attitudes Towards the World Language Problem as ShoWn in Public Opinion Polls", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1971/7.

Laŭ Emmart, ĉiuokaze, tio, kio favorigas aŭ kontraŭigas onin al la ideo de internacia lingvo, estas nek la socio-ekonomika origino nek la instru-nivelo atingita, sed la karaktero-strukturo. Per demandaro pri personeco-karakterizoj el 40 demandoj, li povis evidentigi du tipajn trajtojn: personecoj karakterizataj de la faktoro “espero”, favoraj al internacia lingvo, kaj personecoj karakterizataj per la faktoro “dubo”, kontraŭaj²⁶. Tiu demandaro estis konstruita analoge al la jam ekzistanta personeco-testo *Minnesota Multiphasic Personality Inventory* (MMPI)²⁷.

Niaj amikoj de Interlingua asertas, ke tiu “manko de intereso” de la publiko (kiun ni konsideras esence malvera) dependas de la fakto, ke Esperanto mem forpuŝas eventualajn interesulojn. Se vere estus tiel, tiuj interesuloj venus milope al Interlingua. Sed tio ne okazas, kiel ni montros alipage. En ĉiu scienca pritrakto nur la objektiva konstato, ĝia teoria ellaboro kaj ĝia posta verifiko (aŭ falsifiko) havas pruvan valoron. Bedaŭrinde, ĝis antaŭnelonge, planlingvistiko (kvazaŭ iaspeca Cindrulino de lingvistiko) estis regata de antaŭjuĝoj, de stereotipoj, de eraraj terminologioj, de falsaj analogioj, kaj ĉefe de tiu kurioza pensmaniero (angle: *wishful thinking*; germane: *Wunschdenken*; france: *pensée optative*), kiu konsistas el la fakto, ke oni kredas vera kaj reala ion, kion oni deziras, sed kiu fakte ne (jam) ekzistas. Tiu pensmaniero rilatas tamen kun magio, ne kun scienco.

²⁶ B.D. EMMART, "Attitudes Towards the World Language Problem as Shown by Q-Methodology", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/11.

²⁷ Pri la problemaro koncernanta la testojn analogajn al MMPI: BATTEGAY, RAUCHFLEISCH, "Medizinische Psychologie", Bern, Huber, 1974, p.155.

3. La planita lingvo

3.1 Historio de la planlingvaj projektoj

Estus nun oportune fari mallongan paŭzon por permesi al la leganto orientiĝon en la ĝangalo de planlingvistiko. Ni sekvos prezenton, kiun skribis T. Carlevaro pri la historio de la planlingvaj projektoj²⁸.

Por fokusigi interlingvistikon en historia perspektivo, estas necese, ke ni ekzameni la sinsekvon de la lingvoprojektoj. La unua projekto, kiu havis ioman sukceson, estis *Volapük*, kiun publikigis en 1879 la badena katolika pastro Martin Schleyer. Temis pri tre sinteza lingvo, konstruita sur aglutina skemo, kiu utiligis morfemojn tre deformitajn aŭ eble eĉ inventitajn. Ĝi malaperis ne pro supozitaj lingvaj miskvalitoj, sed pro sociaj kaŭzoj^{29 30}. En 1887 aperis *Esperanto*, kies aŭtoro estis L.L. Zamenhof. Ĝi restis malmulte konata ĝis 1900. En 1893 la Akademio eks-volapüka ellaboris propran projekton de planlingvo, kiun oni nomis *Idiom Neutral*. Ĝi estis tamen tute preta nur en 1902³¹.

En 1903 la itala matematik-profesoro, Giuseppe Peano publikigis projekton, kiu baziĝis sur la latina lingvo, kaj kiu nomiĝis *Latino sine Flexione*. Ĝin adoptis sub la nomo "Interlingua" la Akademio eks-volapüka en 1909, forlasinte sian propran projekton³². En 1908 oni publikigis reformitan Esperanton, nomitan *Ido*, kiu havis kelkajn adeptojn, kvankam ĝi neniam sukcesis atingi la saman disvastigon, kiun jam havis Esperanto³³. Inter 1908 kaj 1920 pluraj interlingvistoj eklaboris por krei vivipovan projekton de "natureca" lingvo, sed nur en 1922 la germanlingva balto Edgar von Wahl sukcesis publikigi sian interesan projekton, *Occidental*³⁴. Ĝi havis nur relative malmulte de anoj, inter kiuj plej granda parto konsistis el eks-idistoj.

En 1928 la dana lingvisto Otto Jespersen publikigis sian propran projekton, *Novial*, kiun li reformis en 1934, por ke ĝi pli simulu al *Occidental*³⁵. Ĝin adoptis tre malmulte da homoj (preskaŭ senescepte eks-idistoj), kaj ĝi ne supervivis la duan mondmiliton. Nur en 1951 aperis *Interlingua* (ne konfuzenda kun la projekto de Peano), kiun ellaboris grupo el usonaj filologoj inter 1947 kaj 1950, sub la gvido de la germandevena filologo Alexander Gode³⁶. Post 1951 ne plu aperis menciindaj projektoj, kun la ebla escepto de *Neo* (de la belg-italo Arturo Alfarandari, 1961), kiu ne havis sukceson.

Jen do resumeto, kiu certe ne povas anstataŭi pli detalajn kaj pli elĉerpajn tiutemajn librojn³⁷. Tamen, ĝi sufiĉas por montri, ke la historio de la planlingvaj projektoj konas nek "modojn" nek "evoluojn": temas pri mitoj, kies originon ni diskutos pli poste.

²⁸ CARLEVARO, "The naturalist...", 1971, p. 3.

²⁹ CARLEVARO, LAPENNA, LINS, "Esperanto...", 1974 (artikolo de CARLEVARO pri *Volapük*, p. 123-124).

³⁰ Ekzemplo de *Volapük*: O fat obas, kel binol in suls, paisalüdomöz nem ola.

³¹ Ekzemplo de *Idiom Neutral*: Nostr patr kel es in sieli, ke votr nom es sanktifiked.

³² Ekzemplo de *Latino sine Flexione*: O domine Deo, possibile que me es stupido?

³³ Ekzemplo de *Ido*: Ho Deo, ka me estas stupida? Ton me nultempe kredus, e ton nulu darfas savar.

³⁴ Ekzemplo de *Occidental*: Domine Deo, esque yo dunc es stult? To yo nequande ha pensat e to nuli hom deve saver.

³⁵ Ekzemplo de *Novial*: Men Deo, ob es posibli ke me es stupid? Tum me ha nulitem opinet, e tum nuli home darfa sava.

³⁶ Ekzemplo de *Interlingua*: Mi Deo, an io es stulte? Isto io nunquam ha supponite, e nemo debe aprender.

³⁷ M. MONNEROT-DUMAINE, "Précis d'interlinguistique générale et spéciale", Paris, Maloine, 1960, kaj: Ernest Karlovič DREZEN, "Historio de la mondlingvo", Oosaka, Pirato, 1967 (4-a eld.).

Hodiaŭ, apud preskaŭ monopoliga Esperanto-movado, ekzistas nur malgranda movado por Interlingua, malgranda movado por Ido (tiun movadon ni povus nomi "rezidua") kaj la baldaŭ likvidiĝontaj restaĵoj de la Occidental-movado (kium, post la dua mondmilito, oni nomis "Interlingue"). Post la falo de la komunisma sistemo, Interlingue retrovis sian iaman nomon: *Occidental*.

3.2. La selekto-kriterioj por planlingvoj

Ne ekzistas firme establitaj kriterioj por juĝi planlingvon. Ĝenerale, tiujn kriteriojn oni ellaboras funkci-depense de la celo de planita lingvo: ĝi ja devas esti facila, sed ne primitiva, ekonomia, sed almenaŭ iom redundanca, por permesi efikan komprenon. Valter Tauli³⁸ proponas tri kriteriojn, kiujn verŝajne akceptus ĉiuj hodiaŭaj (plan)lingvistoj:

1. La ideala planlingvo devas havi *fonologian grafion*: pli-malpli, tiu estas la kazo de Esperanto, dum ke Interlingua havas historian grafion.
2. La ideala planlingvo devas uzi la *latinan skrib-sistemon*. Tiu estas la kazo de Interlingua, kaj, parte, de Esperanto (kaŭze de la supersignoj).
3. La planlingvo ideala devas havi strukturon, kiu garantias la *nevarieblon de la morfemoj*. Tiu estas la kazo de Esperanto, kiu konservas tiun nevarieblon dank-al sia strukturo aglutina kaj parte izola. Interlingua, kontraŭe, prezentas relative rimarkindan varieblon de la morfemoj, ĉar ĝi konservis strukturon analogan al tiu de la novlatinaj (fleksiaj) lingvoj.

Aliaj lingvistoj mencias pluajn *desiderata* (= postulojn). Harry Spitzbart, observinte, ke ideala lingvo por optimaligita komunikado-sistemo povas esti nenio alia ol artefarita lingvo, proponas tri malsamajn kriteriojn³⁹:

1. La signifato de la vortoj devas resti konstanta.
2. La rilatoj inter la vortoj kaj iliaj eksterlingvaj referencaĵoj devas esti renverseblaj kaj malambigue determinitaj.
3. Al ĉiu rilato inter aĵoj en la objektiva (eksterlingva) mondo devas du-rilate (biunivoke) korespondi rilato inter vortoj.

Laŭ Spitzbart, do, ideala lingvo devus esti iaspeca pens-algebro, ia *Characteristica universalis* (= universala difino-krea lingvo), kiujn la homoj ĝis nun sciis ellabori nur en la matematika kaj en la formallogika simbolaroj, kaj, eble parte, ankaŭ en la kemia simbolaro.

Evidente, nek Esperanto nek (pro pli fortaj kaŭzoj) Interlingua estas tia *Ars combinatoria* (kunmet-sistemo): tamen, tiu problemo estas tiel interesa kaj tiel malmulte studata, ke pri ĝi mi parolos en la kvara ĉapitro de ĉi tiu verko. Tre volonte, ĉar ankaŭ Esperanto povus havi rolon en la esploro-laboro por tia kunmet-sistemo.

Ĉiuokaze, unu afero estas klara: neniu moderna lingvisto kredas, ke la senpera komprenebleco estas scienca kriterio. Laŭ la nederlanda specialisto pri matematika lingvistiko, W.A. Verloren van Themaat⁴⁰, "la supereco de Interlingua super Esperanto, se oni prenas kiel kriterion la celon de Interlingua, t.e. la tujan kompreneblecon por poliglotoj, estas triviala. Respondendaj restas do du demandoj:

³⁸ TAULI, "Introduction to...", 1968, p. 131.

³⁹ SPITZBART, "Weltsprachen...", 1973, p. 632-633.

⁴⁰ W.A. VERLOREN VAN THEMAAT, "Whorf-a lingvistika relativismo kaj planlingvoj", Londono, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvoproblemo, sen dato, p. 6.

1. Kiel efika estas Esperanto por sia propra celo?
2. Kiu havas pli da ŝancoj atingi sian celon: Esperanto aŭ Interlingua?⁴¹.”

Estas fakto, ke, kiel tion asertas la germana planlingvisto Detlev Blanke⁴², “la unuavida (senpera) komprenebleco informas nin nek pri ĝia⁴³ lerno-facileco, nek pri ĝia fleksebleco en la kreo de terminoj por novaj konceptoj, nek pri ĝia uzebleco far-de ne-hindeŭropanoj”.

3.3. Ĉu ni povas paroli pri “vivo” de planlingvo?

Ĝenerale oni diras, ke lingvo “vivas”, kiam ĝi estas iel aŭ tiel komunikilo interne de kolektivo, eĉ se tiu kolektivo estas geografie disigita.

Evidente tio, kion ni intencas signifi per la vorto “lingvo-vivo”, estos ĉiufoje alia, laŭ la variado de la socio-ekonomikaj kaj geografiaj kondiĉoj de la kolektivo (latenta aŭ fakta, lingve konscia aŭ lingve nekonscia), kiu ĝin parolas. Tial la “vivo” de lingvo, kia estas la franca, estos sendube malsama ol tiu de la romanĉa, de la jida aŭ de la latina (ankoraŭ “vivanta”, kaj sporade parolata, kvankam baldaŭ malaperonta, en kelkaj medioj de la Katolika Eklezio).

Oni scias, ke Esperanto estas utiligata, far-de geografie disigita (diasporeca) kolektivo (havanta tre fortan lingvan konscion), kiel komunikilo; la metodaro por esplori ĝian “vivon” baziĝas sur la metodoj kutime utiligataj en socio-lingvistiko. Harry Spitzbart⁴⁴ skribas, ke “se ni volas fari al ni klaran kaj sciencan bildon de la /socio-lingvistika/ signifo de moderna planlingvo kia Esperanto, ni ne povos limiĝi je kritika juĝo baziĝanta sur la ĝeneraligoj el la komunikteorio ellaboritaj esplorante la naturajn lingvojn. Kontraŭe, ni devos atente ekzameni ĉefe la spertojn, kiujn ni ricevas el la studo de la teorio kaj praktiko de interlingvistiko kaj esperantologio. Ŝajnas tial neeviteble atente studi la spertojn de la pli ol 80-jaraĝa Esperanto-movado, kaj ellabori ankoraŭ pli bone la rezultojn de interlingvistiko kaj de esperantologio, por povi enkadrigi ilin en la lingvistikan teorion”.

Laŭ Spitzbart, do, tasko de la esperantologoj, kune kun la lingvistoj, estas la ellaboro de aplikita metodologio por la esploro de la socio-lingvistika “vivo” de planlingvo.

Sed ekzistas alia demando tre grava en la socio-lingvistiko de planlingvoj. Kiel tion rimarkigas la sveda filologo Ebbe Vilborg⁴⁵, la transformiĝo de lingvoprojekto al vivanta lingvo estas sufiĉe eksterordinara fenomeno en la lingvistika kampo; tiu projekto povintus trankvile resti seneĥa, kiel cetere okazis al centoj da aliaj projektoj. La demando estas do la jena: kiel povis okazi, ke projekto iĝis vivanta lingvo?

Oni klopodis respondi ĉi tiun demandon diversmaniere. Neniu el tiuj respondoj ŝajnas al mi definitiva. Ĉiuj estas nur flankaj kaj partaj, ĉar mankas ĉionsolva respondo. La demando restas malfermita al la venontaj esploremuloj.

⁴¹ Ni klopodos respondi ambaŭ demandojn en la ĉapitroj 5-a kaj 6-a (koncerne Esperanton), kaj en la ĉapitroj 10-a kaj 11-a (koncerne Interlinguan).

⁴² Detlev BLANKE, "Die alten Sprachen und das Problem einer internationalen Welthilfssprache", en: "Das Altertum", 1973/3, p. 191.

⁴³ t.e. de la koncerna "naturalisma" planlingvo.

⁴⁴ SPITZBART, "Weltsprachen...", 1973, p. 637.

⁴⁵ Ebbe VILBORG, "Esperanto serioze", en: "Fokuso", 1974/12.

La soveta lingvisto E.A. Bokarev provis doni provizoran respondon, evidentigante la fakton, ke Esperanto estis ĉiam pli ofte ilo por utiligo, dum ke la ceteraj projektoj estis konsiderataj prefere kiel celoj en si mem (far-de siaj anoj). “En esperantologia literaturo, li skribas, tiu fakto ordinare estas klarigata per pure sociologiaj kaŭzoj. Jam dekomence Esperanto fariĝis instrumento de praktika interkompreniĝo en pli-malpli granda kolektivo, kaj estis traktata de siaj adeptoj precipe de tiu vidpunkto, sed ne kiel objekto de teoriaj diskutoj. La periodoj de teoriaj diskutoj, kiuj iafaje komenciĝis inter esperantistoj, ĉiam sekvigis malaltigon de ĝia disvastiĝo kaj praktika utiligo. Aliaj lingvo-projektoj, kontraŭe, restis precipe objektoj de teoria studado kaj diskutado. Estas atentinda la fakto, ke idistoj, dum sia pli ol kvindekjara laboro, eldonis sufiĉe multajn librojn, dediĉitajn al la lingvo mem (propaganda, polemika, instrua literaturo), sed relative tre malmultajn librojn pri scienco, belliteraturo ktp., kie Ido estus nur rimedo, sed ne celo”⁴⁶.

Laŭ Bausani⁴⁷, la sekreto de la sukceso de Esperanto kuŝas en la jenaj faktoj:

1. En la obstino de L.L. Zamenhof, iniciinto de Esperanto.
2. En la dediĉiteco de ĝiaj anoj, kiu, laŭ Claude Gacond⁴⁸, dependas minimume parte de la humanisma aspekto de la valoro “interpopola konduto”, grava elemento de la socia praktikado de la esperantistoj.
3. En komercaj interesoj.
4. Kaj en la “rimarkinda ekvilibro kiun /Esperanto/ atingas inter la ekstrema reguleco de sia aglutina strukturo [...] kaj la natureco de siaj radikoj, el kiuj neniu aŭ preskaŭ neniu estis inventita”. Ĉi tiun kvaran punkton Claude Gacond nomas “morfo-sintaksa funkcio”. Li evidentigas, tiukoncerne, ke por Zamenhof gravis ne tiom la vortaro, kiom la gramatiko.

Gacond aldonas, cetere, kvinan punkton: *la funkcion de la kultura tradicio* por la socia firmiĝo de la movado esperantista. Tiu kultura tradicio anstataŭas lingvajn aŭ organizajn “aŭtoritatojn”. Tio signifas, ke unu el la kaŭzoj de la socia firmiĝo de la esperantista movado estis la demokrateco kaj la kultura kunligiteco de la esperanto-parolanta kolektivo.

Ni do konstatis, ke planlingvo povas vivi, do povas manifestiĝi kiel fenomeno socia, kaj ne nur lingva. Multaj planlingvo-spertaj lingvistoj el la tuta mondo konsentas kun tio: ni povus multigi la citaĵojn. Ni do povas aserti, kun Pierre Janton⁴⁹, ke “en la fenomeno de planita lingvo viviĝinta troviĝas amaso de faktoroj, kiuj devus altiri la intereson de psikologoj kaj de sociologoj”. Kaj ĝuste tio okazas ĉiam pli ofte.

Sed ĉu tiu fenomeno sciis altiri la atenton ankaŭ de la Interlingua-anoj?

Ni prilumu komencan problemon. Temas pri la fakto, ke ĉiu projekto havanta anojn, kiuj ĝin utiligas por interkomuniki, havas “vivon”. La socio-lingvistika metodologio utiligota en la esploro de la vivo de Esperanto estos do taŭga por pritrakti ankaŭ la vivon de Interlingua. Nu, kiel oni ĝenerale scias, ankaŭ Interlingua havas grupon de ŝatantoj, kiuj ĝin uzas por interŝanĝi komunikaĵojn, kaj ne nur kiel objekton de teoria diskuto.

⁴⁶ E.A. BOKAREV, "Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof", en: "Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro" (red. Ivo LAPENNA), Londono, Universala Esperanto-Asocio - C.E.D., 1960, p. 31.

⁴⁷ Alessandro BAUSANI, "Le lingue inventate", Roma, Ubaldini, 1974, p. 123 (ekzistas germanlingva traduko: "Geheim- und Universal-Sprachen", ĉe Kohlhammer, Stuttgart, 1970)

⁴⁸ Claude GACOND, "Okdek jaroj de Esperanta vivo 1887-1967", En: "Sennaciulo" (artikolserio aperinta de 1967/4 ĝis 1968/8-9).

⁴⁹ Pierre Janton, "L'Esperanto", Paris, Presses Universitaires de France, 1973, p. 28.

Do ankaŭ Interlingua havas “vivon”. La malsamo inter la vivo de Esperanto kaj tiu de Interlingua estas, finfine, nur kvanta, kaj ne kvalita.

Ni uzis la vorton “kvanta”. Fakte, de tempo al tempo, ni legas, ke, el la mil ĝisnun aperintaj lingvoprojektoj, nur du havas literaturon kaj gravajn an-grupojn. Nome: *Esperanto* (1887) kaj *Interlingua* (1951)⁵⁰. Laŭ mi tiu aserto estas malĝusta. Fakte estas, ke tamen, la kontrasto restas granda, tiom pli, ke Ido, el kultura kaj literatura vidpunkto, estas pli grava ol Interlingua.

Fakte, ni ne forgesu, ke Ido (malgraŭ la alta aĝo de siaj anoj)⁵¹ estas ĉiam vivanta, kaj havas certe literaturon pli imponan ol tiu de Interlingua. Due, mi deziras evidentigi, ke, se en Svisio ekzistas minimume kvincent personoj, kiuj parolas (pli-malpli korekte) Esperanton, nur kvin parolas Interlinguan. Tio, kiel mi montros aĉapitre, la Interlingua-beletro estas tre limigita kvante kaj kvalite.

Se ne ekzistas esenca malsamo inter la vivo de Esperanto kaj tiu de Interlingua, ekzistas tamen malsamo inter iliaj signifoj koncerne socio-lingvistikon, kaj tio, ĉar ekzistas grandega malsamo inter iliaj respektivaj disvastiĝoj.

Pro tio, mi kredas, neniun defendanto de la “natureco novlatinoida” starigis al si la problemon de la vivo de la de li proponata projekto.

La vivo de Interlingua aŭ de Occidental estis/as tiel malforta, tiel sensignifa, ke eĉ ĝiaj partianoj ne rimarkis ĝin.

Pro tio la socio-lingvistiko de planlingvoj restas *terra incognita* (= regiono nekonata) por niaj Interlingua-amikoj. Ili do eksplikas al si kelkajn fenomenojn en mitologia maniero. Jen ekzemplo. La fakto, ke Esperanto progresas nur malrapide, ŝuldiĝas, laŭ ili, al iaspeca kaŝludo, kiun la esperantistoj faras kun la “neŭtrala publiko” por ne montri tiun tro malbelan lingvon⁵². Temas pri kurioza paralogismo. Ni provu disvolvi ĝin. La Interlingua-istoj disponas pri belega lingvo, kiun ili montras libere al la “neŭtrala publiko”. Interlingua do devus havi minimume milionon da adeptoj. Sed ne: ĝia disvastiĝo post 25-jara laboro atingas unu milionon de tiu de Esperanto (kaj tiu proporcio ne ŝajnas pliboniĝi por Interlingua, kontraŭe). Evidente, io ne funkcias en la tuta rezonado.

Eble, tamen, mi estis tro drasta. Fakte, en 1927, finna occidentalisto, A.Z. Ramstedt⁵³, publikigis eseon, kiu, koncerne psikologion kaj sociologion, havis nur la titolon⁵⁴. En tiu “lingvosociologia” kaj “lingvo-psikologia” studaĵo li parolas, jes, pri la “vivo” de artefarita lingvo, sed tiu priparolita lingvo estas Esperanto. La aŭtoro konstatis la ekziston de tiu “vivo”, sed li altnaze kaj malŝate nomis ĝin “pseŭdo-vivo”. Malprava sinteno. Unue, ĉar li fuŝis gravan socio-lingvistikan intuicion; due, ĉar ne estas utile negi faktojn: la historio mem devigos nin al fakto-kongrua rekonsidero. Kaj tio okazis. Tiu faktoro “vivo”, kiun Ramstedt klopodis ridindigi kaj banaligi, montriĝis esenca. Esperanto, ekde 1927, kaj malgraŭ la persekutoj de Hitler kaj Stalin, kaj la ruinoj de la dua mondmilito, povis ne nur konservi siajn poziciojn, sed eĉ firmigi ilin, kaj antaŭeniri. Occidental,

⁵⁰ BERGER, “Les écoles...”, 1975, p. 2.

⁵¹ La Ido-movado estas la tipa movado, kiu ne sciis renovigi siajn kadrojn. Pro tio ĝi estas kondamnita al maljuniĝo, kiu estos misdestina al ĝia pluvivo.

⁵² BERGER, “Les écoles...”, 1975, p. 2.

⁵³ Ano de la latinida lingvoprojekto Occidental.

⁵⁴ Ne konfuzenda kun G.J. Ramstedt, finna lingvisto, unu el la fondintoj de la ugrofinna lingvistiko, kiu estis unu el la pioniroj de Esperanto en Finnlando.

kontraŭe, la lingvo naturalisma kaj novlatinoida kiun Ramstedt defendis, post mallonga floro-periodo (1930-1954), praktike komplete malaperis.

Kun sia tipe usona pragmatikeco, la usona lingvisto Mario A. Pei tiras konkludojn sufiĉe realismajn: “El-inter la artefaritaj lingvoj, la selekto estas hodiaŭ [...] simpla, ĉar nur unu el tiuj lingvoj, Esperanto, reprezentas nombron sufiĉe imponan da personoj, kiuj ĝin parolas, organizaĵon internacian tute developiĝintan, kaj rimarkindan literaturon. La ceteraj planlingvoj ĉi-epoke paroliĝas far-de nombro tro malgranda da personoj, aŭ, kiel oni vidas tion tre ofte, ilin subtenas nur ĝiaj aŭtoroj kaj kelkaj fidelaj amikoj”⁵⁵.

3.4. Ludoviko Lazaro Zamenhof

Ekzistas ia modo en la Interlingua-propagandaj medioj, kompari kun iom da bonvolema ironio la “kompatindan” okulkuraciston judan el Bjalistoko (kiu nur 28-jaraĝa kuraĝis “inventi” planlingvon), kun la seriozaj “specialistoj”, elstaraj lingvistoj kaj filologoj, kiuj, post grandega kvaron-jarcenta laboro, sukcesis sintezi lingvon cent-procente naturan: *Interlingua*. Malprudentulo! “Oni devintus turni sin al specialistoj, al filologoj aŭ al lingvistoj!”⁵⁶.

Du observoj laŭ mi estas komence gravaj. Unue: la profesieco ne estas garantio por bone farita laboro. Tion asertas eĉ unu el la hodiaŭaj ĉampionoj de Interlingua, prof. Ric Berger, en sia biografio pri la aŭtoro de Occidental, Edgar von Wahl, kiu, kiel konate, ne estis lingvisto, sed natursciencisto⁵⁷.

La dua observo estas la jena. Estas tute certe, ke, se L.L. Zamenhof ne sekvintus dum sia junaĝo siajn lingvajn intuiciojn, kaj se li turniĝintus al la tiutempaj “specialistoj” (lingvistoj), Esperanto neniam naskiĝintus. Ni ne forgesu, ke la lingvistoj el la skolo de A. Schleicher forte kontraŭis la ideon plani lingvon (kiu, por ili, estis biologi-simila fenomeno). La lingvistoj el la skolo de la t.n. “nov-gramatikistoj” (i.a. Paul, Brugmann, Leskien, Diels, Meyer, ktp.) estis ankaŭ kontraŭ tio, en la nomo de la “historieco” de la lingva fenomeno. Tre izolaj estis la favoraj voĉoj: Jan Baudouin de Courtenay (Rusa Imperio), Hugo Schuchard (Aŭstria Imperio), Max Müller (Brita Imperio), Antoine Meillet (Francio), kaj versajne ankaŭ Ferdinand de Saussure (Svisio)⁵⁸.

Nur dank-al strukturalismo, planlingvistiko ekiĝis io akceptebla, ĉ. dum la tridekaj jaroj.

Ni ja scias, kiel grava estis por la nov-gramatikismaj lingvistoj la historio kaj la “popol-ligiteco” de lingvo: iliaj analizo-metodoj estis atomigaj, en la senco, ke la lingvisto interesiĝis pri la historio de ĉiu unuopa sono, pri la signif-evoluo de ĉiu unuopa vorto, sed ne konsciis pri la graveco de la sonsistemo en lingvo, aŭ pri la esenca neceso analizi la funkcion de vorto en certa sinsekvo (*sintagmo*), aŭ en certa anstataŭebleco (*paradigmo*), por trovi la veran esencon de la lingvo: la *sistemon*.

Se, hazarde, la juna juda okulisto el Bjalistoko sukcesintus konvinki novgramatikistan lingviston el-labori planlingvon, mi certas, ke tiu lingvo similus multe pli al Interlingua ol al Esperanto, ĉar la aŭtoroj de Interlingua ĝin ellaboris en maniero atomiga, analoga al tiu de la novgramatikistoj, zor-

⁵⁵ A.Z. RAMSTEDT, "Li psicologic e sociologic caractere del lingues", nuntempe legebla en: "Tra li interlinguistica", Cheseaux s/Lausanne, Interlingue-Institute, 1964, p. 3-12

⁵⁶ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 2.

⁵⁷ Ric BERGER, "Edgar de Wahl, autor de Occidental", en: "Cosmoglotta", 1956/130, p.28.

⁵⁸ Komence de 1976 aperis germanlingva libro redaktita de R. Haupenthal ("Plansprachen"), kiu enhavas gravajn eseojn pri la rilatoj inter planlingvistiko kaj lingvistiko de 1860 ĝis nun.

gante tre detale pri etimologio kaj ekzisto (aŭ neekzisto) en la novlatinaj lingvoj, sed tre malmulte pri la kongruanta tuto (la strukturo).

Feliĉe L.L.Zamenhof trovis neniun novgramatikiston sur sia vojo. Tial li povis sekvi sian intuicion. Aŭ, eble, sian geniecon⁵⁹. Bausani skribas, ke “Zamenhof komencis [...] studi la rilatojn inter la vortoj kaj la vort-kunmetantaj elementoj por provi izoli la afiksojn plej gravajn⁶⁰”. Kaj tiu estis la tipa procedo de la moderna strukturalisma lingvistiko *ante litteram* (= antaŭ ĝia manifestiĝo)⁶¹. Tiu procedo estis tiel avangarda, ke nur nun oni ekmalkovras ĝian valoron. Kaj la geniecon de Zamenhof agnoskas eĉ lingvistoj. Tial, en la itala eldono de verko de Uriel Weinreich, fondinto de la moderna dialektologio, *Languages in Contact*, juna itala lingvisto, Giorgio Raimondo Cardona, por situigi Weinreich⁶² en lian socian kaj kulturan medion, krom pri la semitista epigrafiisto Mark Lidzbarski (1868-1928) kaj pri la psikologo-lingvisto Izhaĉ Epstein, parolas ankaŭ pri L. Zamenhof (1859-1917), inventinto de Esperanto⁶³.

Pri la graveco de Zamenhof per la Esperanto-movado mi ne volas paroli: pri lia verko el la homa kaj socia vidpunktoj ekzistas multaj libroj. Ĉi-sube vi trovos kelkajn plej signifajn kaj plej modernajn⁶⁴.

3.5. Esenca afero en lingvo ne estas la vortoj, sed la strukturo

Karakterizo de lingvo ne estas ĝiaj vortoj, sed ĝia strukturo. Lingvo estas malfacila ne pro tio, ke oni devas lerni vortojn, sed pro tio, ke la lerno kaj la utiligo de ĝiaj morfo-sintaksaj kategorioj povas prezenti problemojn.

Kelkaj el niaj amikoj Interlingua-istoj restis fiksigitaj al la lingvistiko de la XIX-a jarcento, por kiu la vortoj estis feliĉo. Ili do kredas, ke la esenco de lingvo troviĝas en ĝiaj vortoj. Pro tio, laŭ ili, lingvo, por esti konsiderata “orienta”, devas havi vortojn prenitajn el orientaj lingvoj.

Tial ili starigas tre klerajn listojn el vortoj japanaj, arabaj, ĉinaj, malajaj, ktp., kiun oni retrovas cetere ankaŭ en la franca, kiel: *admiral*, *tarif*, *ciphra*, *sinus*, ktp., kaj listojn el okcidentaj vortoj, kiuj penetris en orientajn lingvojn (kiel la japana *hoteru* el la franca *hôtel* /hotelo/). Ili opinias, ke, per tio, ili povas pruvi ke Interlingua ne estas malpli orienta ol Esperanto⁶⁵.

Vi ekzameni nun, kion diras la lingvistoj.

Laŭ Bausani “la problemo estas: krei lingvon internacian kiel eble plej universalan en ĝiaj strukturoj, eĉ se ne necese tia en ĝia leksiko. Tiurilate ne estas dubo ebla, ke inter la hodiaŭaj internaciaj helplingvoj, tiu, kiu kontentigas la menciitajn postulojn, estas ĝuste Esperanto”⁶⁶.

⁵⁹ La faktoro "aĝo" estas preskaŭ sensenca: Einstein publikigis siajn esplorojn pri la speciala relativeco en 1905: 27-jaraĝa. Ankaŭ li, feliĉe, ne sekvis la rekomendojn de la reprezentantoj de la tiama fiziko.

⁶⁰ BAUSANI, “Le lingue inventate...”, 1974 (1970), p. 121.

⁶¹ L.L. ZAMENHOF, “Letero al Borovko”, en: “Originala Verkaro”, Leipzig, Hirt, 1929, p. 471.

⁶² Uriel WEINREICH, “Lingue in contatto”, Torino, Boringhieri, 1974. (originalo anglalingva 1963); enkonduko de G.R. CARDONA.

⁶³ Ankaŭ la antaŭa generacio de italaj lingvistoj havis Esperanto-amikojn. I.a. la granda lingvisto Bruno Migliorini, mortinta en 1975.

⁶⁴ Legu la verkojn pri Zamenhof pretigitajn de Privat (ankaŭ en angla kaj portugala), de Boulton (ankaŭ en angla), de Ziołkowska (ankaŭ pola kaj franca), de Drezén.

⁶⁵ Ric BERGER, “Esperanto o Interlingua”, Morges, Editions Interlingua, 1972, p. 37.

⁶⁶ Alessandro BAUSANI, “Che cos'è l'interlinguistica”, en: “Fenarete”, 1973/142, p. 12.

Bausani aldonas, ke, laŭ li, la motivado de lia opinio kuŝas en la fakto, ke Zamenhof *intence* konstruis baze aglutinan lingvon, sed kun izolaj trajtoj (ekz-e la sendependeco de la afiksaro). En sia fundamenta strukturo, Esperanto proksimiĝas do al la turka, japana, finna (ktp.) lingvoj. Per tiuj izolaj trajtoj, ĝi proksimiĝas ankaŭ al lingvoj kiel la ĉina kaj la vjetnama.

Tial Esperanto estas hindeŭropa nur supraĵe: en Esperanto oni povas diri *Esperanto estas lernenda kaj lerninda*, sed ankaŭ *Esperanto lernendas kaj lernindas* (sintagmo tipa de la uralo-altajaj lingvoj); oni povas diri *Tie estas domo*, sed ankaŭ: *Tie ĝi domas* (aŭ: *Domo tieas*), procedoj tipaj de amerik-indianaj lingvoj⁶⁷.

Tial, skribas Bausani, la aglutina-izola sistemo de Esperanto “permesas ankaŭ al tiuj, kiuj apartenas al lingvaj kulturoj komplete malsamaj je la okcidenta lingva kulturo, lerni relative facile la lingvon, kiu estas novlatina aŭ novlatinoida fakte nur en sia leksiko”⁶⁸.

L.L. Zamenhof sciis tre bone ĉion tion. Li mem parolas al ni pri tio en tre grava artikolo, *Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia*⁶⁹.

3.6. La socioj kaj lingvistikaj bazoj de la Esperanto-movado

Por ke oni komprenu unuj la aliajn, estas necesa certa homogeneco en la lingvo-sistemo. Tiu komuna fundamento devas esti garantiata de mekanismo, kiu, en kazo de malobeo, kondukas unue al lingvaj riproĉoj, poste eventuale al ekskludo el la koncerna lingva kolektivo (“ekskludo” ĉi-sence signifas *nekompreneo*, ĉar ni ja parolas pri lingva kolektivo). Por niaj amikoj de Interlingua tiu ekskludo-mekanismo estas pure lingva: se iu parolas Interlinguan utiligante mem-inventitajn vortojn, la ne-natureco mem de tiuj vortoj ekskludigos lin el la Interlingua-kolektivo⁷⁰.

Por la Esperantistoj, la afero estas iom pli komplika, kaj, cetere, ne komplete klara. Laŭ ili la unueco de la lingvosistemo estas garantiata de komuna lingva fundamento konscie akceptata far-de ĉiuj esperanto-parolantoj, ne de ia simileco de la vortoj al la vortoj de tiu aŭ alia lingvogrupo. Ili opinias, ke ekzistas ankaŭ faktoroj sociologiaj. Kiel precize ili funkcias, ne estas klare.

La Esperanto-movado, fakte, estas finfine norm-orientita movado, almenaŭ en sia sinprezento al la ne-esperantista publiko, kvankam ĝia origino kaj la aligo-motivoj al ĝi estas sendube valor-orientitaj. Simpligante, ni povas diri, ke la esperantista movado havas racian celon (aliigo de certa malracia situacio en nia socio per akcepto de Esperanto), sed ke la fortoj, kiuj garantias ĝian nedisfalon, ne estas nur la intelekta intereso, sed ankaŭ homaj, afektivaj fortoj⁷¹. Multaj planlingvaj movadoj, kiuj konscie rifuzis la orientigon laŭ la valoroj, devis malaperi.

Ĝuste sur la bazo de la malkovroj de Lapenna⁷² kaj Forster pri la naturo de la socia “portanto” de Esperanto (portanto nur latent aŭ jam fakta), kaj de Carlevaro, kiu evidentigis la striktan ligon inter

⁶⁷ Bausani, “Che cos’è...”, 1973, p. 1.

⁶⁸ BAUSANI, “Le lingue inventate...”, 1974(1970).

⁶⁹ L.L. ZAMENHOF, “Originala Verkaro”, Leipzig, Hirt, 1929, p. 276-312.

⁷⁰ Ric BERGER, “La construction d’une langue internationale moderne”, Morges, ĉe l’ aŭtoro, 1967.

⁷¹ Peter G. FORSTER, “Esperanto as a Social and Linguistic Movement”, en: “Pensiero e linguaggio in operazioni”, 1971/7-8 (samnumere: ekzistas ankaŭ itallingva traduko).

⁷² LAPENNA, en: LAPENNA, LINS, CARLEVARO, “Esperanto...”, 1974, p. 41-42.

la du orientiĝoj en la faktoroj, kiuj permesis la firmiĝon de la Esperanta kulturo⁷³, estos eble estonte starigi ĝeneralan teorion de la sociologio de Esperanto-movado.

3.7. La evoluo de Esperanto

Se ekzistas esperanto-parolanta kolektivo, se Esperanto havas “vivon”, estas klare, ke ĝi povas evolui. Tion antaŭdiris jam Ferdinand de Saussure⁷⁴. Skribante en sia *Cours* pri la neeblo haltigi la evoluon de lingvo, li skribas:

“Tio estas tiel vera, ke tiu principo devas efektiviĝi ankaŭ koncerne la artefaritajn lingvojn. Tiu, kiu kreis unu el ili, tenas ĝin en sia mano dum kiam ĝi ne cirkulas; sed ekde kiam ĝi plenumas sian mision kaj fariĝas publika, la kontrolo forfuĝas. Esperanto estas tiuspeca provo. Se ĝi sukcesos, ĉu ĝi povos eskapi el la fatala leĝo? Post la unua momento, la lingvo eniros tre verŝajne en sian semiologian vivon; ĝi estos transdonata per leĝoj, kiuj havas nenion komunan kun tiuj de la konscia kreo, kaj oni ne plu povos retroveni.”

Kaj tio okazis.

Lakone konstatas tion la franca lingvisto Pierre Janton: “La lingvo Esperanto evoluas laŭ propre specifa determineco”⁷⁵. Tion ni ekzamenos el pli proksima vidpunkto en ĉapitro, kiu baldaŭ sekvos.

⁷³ CARLEVARO, en: "Esperanto...", p. 45-64.

⁷⁴ Ferdinand de SAUSSURE, "Cours de linguistique générale", Paris-Lausanne, Payot, 1916, p. 113.

⁷⁵ JANTON, "L'Esperanto", 1973, p. 6.

4. La problemo de la perfekta lingvo

4.1. Enkonduko

Kelkfoje sciencistoj aŭ kleruloj, parolante pri Esperanto aŭ pri Interlingua, esprimas la tezon, ke tiuj lingvoj estas ja interesaj, sed “nesufiĉaj”, ĉar ili ne estas perfektaj. Sed kio estas “perfekteco” en planlingvistiko? Por tiuj kleruloj, perfekteco en planlingvistiko estas la kreo de lingvo, en kiu al ĉiu vorto korespondas, en rilato biunivoka, unu semantika koncepto kaj unu eksterlingva referaĵo. Ekz-e, al la vorto /sonsinsekvo/ *ĉevalo* devus korespondi unusola enmensa koncepto “ĉevalo” kaj unusola eksterlingva referaĵo, nome la specio “ĉevalo”).

Sed tio ne sufiĉas: la vortoj de tiu lingvo, per sia konsisto mem, devus eksplicite la konsiston de la vorto. Ekz-e, la vorto signifanta la koncepton “ĉevalo” devus esti konstruata en maniero, ke la fonemo-sinsekvo komprenigu al la lingvo-uzanto, ke tiu vorto indikas mezgrandan kvarpiedan mambeston, uzatan en milito, ter-kultivo, sporto, ktp. Iusence, do, la vorto mem (la formo de la koncepto) devus esti konstruata laŭ la semantika konsisto de la koncepto, per reguloj bazigitaj sur la ĝeneralaj pens- kaj natur-leĝoj. Ekzistus, do, tiamaniere, biunivoka rilato inter formo de vorto, strukturo de koncepto, kaj ekstera referaĵo. Io tia jam (parte) ekzistas en kemio. Ekz-e, kemiisto uzas la esprimon *Ho-du-O*, kiu korespondas al la koncepto “akvo”, kaj al la eksterlingva realaĵo “akvo”. Sed la konstruo de la vorto *Ho-du-O* informas nin pri la naturo (strukturo) de la koncepto “akvo” kaj pri ĝia fakta konsisto en la eksterlingva mondo: *Ho-du-O* (H₂O), t.e. “konsistanta el unu atomo de oksigeno (bivalenta) ligita al du atomoj de hidrogeno (ambaŭ monovalentaj)”.

Sed perfekta lingvo devus havi ankaŭ perfektan sintakson: al ĉiu sintaksa funkcio devus korespondi mensa operacio kaj eksterlingva (natura aŭ logika) evento aŭ operacio. Ĝis nun (parta) realigo de tiu perfekta sintakso eblis nur en matematiko kaj en simbola logiko⁷⁶.

Ni vidas do, ke “perfekta” lingvo devus esti vera algebro de la penso: ĝia utiligo permesos senpere rekoni distinge tion, kio estas vera (logika, reala), el-de tio, kio estas malvera. Lastanalize, kiel rimarkigas la itala lingvisto Paolo Rossi, tiaspeca lingvo, kvankam, neeviteble, altgrade artefarita (t.e. simila al neniuekzistanta lingvo), estus samtempe tamen ankaŭ “natura”, ĉar tra kaj en tiu lingvo respeguliĝus senpere la homa naturo, aŭ, eble prefere, la strukturo de la homa menso kaj ĝiaj rilatoj kun la realo⁷⁷.

Ĉu estas eble konstrui tian lingvon? *Nemo est propheta in patria* (= neniue estas profeto pri propra laborkampo), kaj mi certe ne estas profeto pri planlingvistiko. Malgraŭ tio, mi deziras proponi al la atento de la leganto kelkajn demandojn litigitajn al la problemo de perfekta lingvo. Unue mi mallonge parolos pri la unuaj provoj inter 1400 kaj 1700, poste mi parolos pri la laboroj de la etologoj, de la psikologoj kaj de la epistemologoj. Fine ni parolos pri la provoj faritaj de la skolo ĉirkaŭ la itala lingvisto, filozofo kaj kibernetikisto Silvio Ceccato.

⁷⁶ SPITZBART, “Weltsprachen...”, 1973, p.632-633.

⁷⁷ Paolo ROSSI, “Clavis universalis: Arti mnemoniche e logica combinatoria da Lullo a Leibniz”, Milano-Napoli, Ricciardi, 1960, p. 209.

4.2. La “filozofia” lingvo

La unuaj provoj de “filozofia” lingvo datumas el la viv-epoko de Raymond Lull. La tiamaj aŭtoroj, cetere, malofte uzis la terminon “filozofia lingvo”. Ili preferis uzi la esprimojn “kunmet-tekniko” (*ars combinatoria*), aŭ “ĝenerala scienca karakterizilo” (*characteristica universalis*).

Ni ne kredu, ke Lull revis pri internacia lingvo: por tiu celo ankoraŭ plene sufiĉis la latina. Li, kontraŭe, serĉis ĝeneralan teknikon por retrovi la *veron*, t.e. universalsciencan karakterizilon, kiu estu izomorfa al la pens-konceptoj (kiuj tiutempe senkritike estis kredataj senpere izomorfaj al la eksterlingvaj referaĵoj)⁷⁸. Tiu provo de Lull estis strikte ligita al la problemo de la “artefarita memorkapablo”, t.e. al la artefarita grandegigo de la memorkapablo per la oportuna dismeto de la memorendaĵoj (engramoj) en la “memorlokoj”, por ke ili estu pli facile eligeblaj. La verkoj de Lull estis pristudataj ankoraŭ longe post la morto de la aŭtoro: ofte tiu legado okazis sub la influo de mistikismo kaj de kabalismaj interesoj, kiuj atribuis specialajn spiritajn kvalitojn al tiu memortekniko. Ili estis legataj ankoraŭ en la epoko de Bruno kaj Leibniz, pri kiu ni parolos ankoraŭ.

La neceso de ĝeneralsciencan karakterizilo estis tre sentata ekde kiam la nova logiko de Des Rameaux enkrizigis la malnovan dialektikan logikon de la skolastikistoj. Ĝi fariĝis eĉ pli urĝa kiam ekfloris la empiria penso, kiun iniciatis en Anglio unue Francis Bacon, poste la tuta *Royal Society*⁷⁹.

Ne mankis religiaj radikoj al tiu bezono: laŭ la tradiciaj kredoj, multaj verkistoj demandis sin, ĉu eble la vero estas kaŝata al la homoj, ĉar ankaŭ la lingvoj, konsekvence de la Adama peko, koruptiĝis. La lingvo primitiva (praa), tiu, kiun parolis Adamo, estis sendube perfekta, ĉar ĝi estis Dio-donaco. Kelkaj splitoj de tiu lingvo restis en niaj modernaj lingvoj: necesas ĝin rekonstrui⁸⁰.

Kiel mi diris, la florado de la empiria penso multe influis la lingvo-esplorojn. Francis Bacon estis la unua sciencista klerulo, kiu klare vidis la neceson de “lingva reformo” radikala, por ke la scienco povu antaŭeniri⁸¹.

Post la lingvaj teorioj de Bacon floris unue en Anglio, poste ankaŭ en tuta Eŭropo, renoviĝo de lingvistiko. Tiu movado havis spiritan patron kaj veran animon: ĝin liveris la ideologia influo de la humanisma irenismo de la religio-reformisto kaj pedagogo Jan Amos Komenský (latine: Comenius), kiu venis al Anglio kun siaj projektoj de universala lingvo, ĝuste kiam la grundo estis preta.

Unue, ni vidas la naskiĝon de multnombraj projektoj de “universala lingvo” kun klasifikeca karaktero⁸², kiuj estis utiligataj pli malfrue, sen sia baza skemeco, kiel modeloj de klasifiko fare de Linné, unuflanke, kaj fare de aliaj kleruloj por la ellaboro de multnombraj enciklopedioj, kiujn oni ekprilaboris kelkajn jarojn pli malfrue.

La serĉo de “adama” lingvo puŝis la homojn al la esploro de la vivantaj lingvoj, kaj, pli poste, al ilia priskribo. Tiamaniere naskiĝis ne nur la nova lingvistiko, sed ankaŭ la nova gramatikscienco. Kelkaj esploremuloj interesiĝis ĉefe pri la “sintaksa” aspekto de perfekta lingvo: tio naskis multajn

⁷⁸ Joaquin CARRERAS Y ARTAU, "De Ramon Lull a los modernos ensayos de formación de una lengua universal", Barcelona, Consejo superior de investigaciones científicas, 1946, p. 11-19.

⁷⁹ Lia FORMIGARI, "Linguistica ed empirismo nel seicento inglese", Bari, Laterza, 1970.

⁸⁰ Formigari, "Linguistica, ed...", 1970, samloke.

⁸¹ Paolo ROSSI, "Francesco Bacone", Torino, dua eld. 1974; (ekzistas usona traduko: Novjorko 1967).

⁸² Otto FUNKE, "Zum Weltsprachenproblem in England im 17. Jahrhundert", Heidelberg, Carl Winter, 1929.

provojn, kaj, fine per tio oni atingis la ellaboron de la nova logiko kaj de la nova formala matematiko.

Kelkaj aŭtoroj dubis pri la ebleco de universala karakterizilo. Descartes, malgraŭ la ĉi-koncerne kontraŭa opinio de multaj esperantistoj kaj interlingua-istoj, estis tre skeptika. En sia fama letero al religiulo Mersenne (el kiu oni mencias ĝenerale nur la unuan parton) li glorigas, jes, la bonfarojn de estonta universala lingvo, sed li esprimas la penson, ke la konstruo de “perfekta” lingvo ne estos ebla, ĉar tia entrepreno dependas de la ekzisto de la “vera filozofio”, kiu ne ekzistas⁸³.

Iom pli malfrue estis la momento de Leibniz. Temis ja pri la epoko, kiam oni povis antaŭvidi relative facile malprogreson de la latina, kiun anstataŭis, en la internaciaj rilatoj kaj parte en la scienca komunikado, la modernaj lingvoj, inter kiuj, ĉefe, la franca⁸⁴. En 1666 Leibniz, 20-jaraga (do pli juna ol Zamenhof) publikigis sian *Dissertatio de arte combinatoria*, provo de alfabeto de la homa penso, konsistanta el kategorioj kaj el iliaj kunmetoj, inspirita de la karteza metodologio. La celo: konstrui universalan semantikon⁸⁵.

La dua projekto de Leibniz naskiĝis en 1673. Temas pri ideografia sistemo, kiun li en 1678 transformis al lingvo parolebla (*Lingua generalis*)⁸⁶.

La tria projekto de Leibniz estas samjara (1678): *De grammatica rationali kaj Analysis linguarum*. Ĝi jam klare evidencigas la influon de la nova lingvistiko. En tiuj provoj, Leibniz direktas sian atenton ne nur al la vortaro, sed ankaŭ al la morfosintakso. Koncerne ĉi-lastan, li proponas la empirian pristudon de la morfosintakso de la etnaj lingvoj, antaŭ ol komenci la ellaboron de la nova lingvo. Kiel lingvon komunan provizoran, tra kiu oni devintus ellabori la novan lingvon, li proponis specon de tre simpligita latino, kiu iel similas al Esperanto.

Leibniz konis la dubojn de Descartes pri la ebleco ellabori tian lingvon, sed li malkonsentis kun li, ĉar Leibniz opiniis, ke por ekkonstrui tiun lingvon, ne estas necese jam koni la veran filozofion. Sufiĉus, laŭ Leibniz, unue enlingvigi la aĵojn, kiuj estas jam preterdube certaj, kaj ĉio cetera progresos iom post iom, kun la progreso de la vera filozofio. Lastanalize, tiu lingvo devintus simili al algebra kalkulo. Se oni deiras de veraj (eksterlingvaj) premisoj, la konkludoj estos *veraj*, kaj se oni deiras de malveraj premisoj, la konkludoj estos necese *malveraj* (sensencaj, aŭ neekzistantaj). Li rimarkigis, ke, por ellabori sistemon de matematika kalkulo, ne estas necese ke oni jam konu la tutan teorion de matematiko: sufiĉas krei bazajn postulatojn verajn (ne kontradiciajn), kaj ĉio cetera sekvos en dialektika rilato inter matematikaj estaĵoj kaj formo (la kalkulo mem)⁸⁷.

4.3. La sciencaj fundamentoj de perfekta lingvo

La ideo ellabori perfektan lingvon neniam ĉesis interesigi la intelekton de la homoj. Senkonsidere pri la fakto, ĉu tiaspeca celo estas praktike atingebla aŭ ne, do pure teoriece, ni devas konsideri la rezultojn de la naturaj, lingvistikaj kaj psikologiaj sciencoj de nia epoko.

⁸³ Luigi ROSIELLO, "Linguistica illuminista", Bologna, Il Mulino, 1967.

⁸⁴ BLANKE, "Die alten Sprachen...", 1973, p. 185.

⁸⁵ CARRERAS, "De Ramon Lull...", 1946, p. 20-26.

⁸⁶ CARRERAS, "De Ramon Lull...", 1946, p. 34.

⁸⁷ CARRERAS, "De Ramon Lull...", 1946, p. 38.

Laŭ *etologio*, la parolkapablo estas specife homa mekanismo, heredaĵo (biologia) el malspecialiĝo de la homa specio⁸⁸, do estiĝinta pro iompostioma neoteniĝo de la homspecio. Ĝia anatomia kunrilataĵo estas la volum-grandigo de la cerbo. Laŭ Lorenz, ni devas distingi inter lingvokapablo kaj inteligenteco: ĉi tiu lasta estas, laŭ li, probable, la rezulto de la “internigo” (en-psik-igo) de la “ekstermensa sceno”, grandparte sendependa de la lingvo. Estas konate, ke la grandaj pongidaj simioj povas abstrakte pensi, tio signifas, ke ili havas (limigitan) kapablon simboligi. Ili do povus esprimi sin per lingvo: lastatempaj eksperimentoj pruvis, ke ili povas relative facile lerni surdmutulan simbol-lingvon⁸⁹. Kontraŭe, ili ne povas lerni parolan lingvon, kiu funkcias sur la bazo de la Martinet-a “duobla artikulacio”⁹⁰. Cetere, ili ne povus entute *paroli* lingvon, ĉar ili ne havas parol-strukturojn en siaj gorĝoj.

Laŭ Lorenz, la homa ekskluziveco paroli lingvon bazitan sur la duobla artikulacio dependas strikte de la ekzisto en la homa cerbo, de strukturo mankanta en ne-homaj cerboj: la *gyrus supramarginalis* de la maldekstra hemisferio⁹¹. Le plej modernaj neŭrofiziologiaj esploroj⁹² evidentigas la gravecon de la studo de la kortekso-strukturoj en la esploro de la parol-kapablo de la homoj: aparte interesaj estas la rilatoj anatomiaj kaj neŭrofiziologiaj inter la neŭraj projekcio-vojoj de la ekstero al la kortekso (ekz-e la sent-nervoj), la asociigaj inter-areaj vojoj, kaj la el-korteksaj (eferentaj) vojoj, en la determino de la rilatoj inter percepto, intelekto, penso kaj lingvokapablo.

Ĉiuj tiuj studoj atingas komunan rezulton, kiu estas elstare grava por ĉiu interesiĝanto pri planlingvistiko: ĉar la evolu-mekanismoj, kiuj generis la homon kaj lian psikan vivon, estas elstare malsimplaj, estas praktike neeble, ke du aŭ pluaj pra-pongidaj specioj povintus evolui tiurilate konverĝe. Devas do ekzisti origina unueco de la hodiaŭa homa specio, preter ĉiuj kulturaj malsimiloj.

Al ĉi tiu sama rezulto alvenas lastatempe ankaŭ la *esplorlaboroj de paleontologoj*, laŭ kiuj, ekz-e, la “neandertala homo” estis nur unu el la flankaj evolu-formoj de la homa specio, kiuj diverĝis el la prahoma filono al la direkto de pli granda specialiĝo - kio lastanalize kaŭzis ĝian malaperon⁹³.

Tiun rezulton atingas sendepende ankaŭ pluraj studoj pri la formiĝo de la *infan-lingvo*⁹⁴. Laŭ pluraj aŭtoroj oni rimarkis, ke la unuaj stadioj de la lingvo-lerno de la familia lingvo estas signife similaj por ĉiuj lingvoj: tiuj spertoj estis faritaj kun infanoj angla-, rusa- kaj japana-lingvaj⁹⁵.

Pro tio oni ĉiam pli konvinkiĝas (male al la iamaj tezoj de la usonaj komportementistoj), ke ekzistas fiksitaj biologiaj mekanismoj, kiujn ni utiligas por generi frazojn en la diversaj lingvoj, kaj ke estas eble, ekzamenante la mekanismojn specifajn, kiuj en difinita lingvo generas ĉiujn eblajn (sencohavajn) frazojn, ellabori la universalan regulojn de la homa frazo-genero, eĉ se ilia formulado estos iom alia ol tiu, kiun nun proponas la skolo de transforma kaj genera gramatiko cirkaŭ Chomsky⁹⁶.

Estos oportune ankaŭ konsideri la rezultojn de aliaj sciencoj. Unualoke eble la *analizan psikologion*, kiu studas la rilatojn inter la lingvolerno kaj la patrino-infano-simbiozo, la primaran narcismon kaj la lingvon (kun la problemaro de la lingvo kiel esprimilo de la magia pensmaniero), la libidan investon de la lingvo (kaj de la parolo), la oralecon kaj la lingvon, la analecon kaj la

⁸⁸ Konrad LORENZ, "Trois essais sur le comportement animal et humain", Paris, du Seuil, 1970 (germanaj originaiaĵoj el la jaroj 1937, 1950, 1954, p. 209-221).

⁸⁹ R. A. HINDE, "La comunicazione non-verbale", Bari, Laterza, 1974 (originalo usona, 1972).

⁹⁰ André MARTINET, "Grundzüge der allgemeinen Sprachwissenschaft", Stuttgart, Kohlhammer, 1963 (franca originalo: 1960).

⁹¹ LORENZ, "Trois essais sur...", 1970, p. 223.

⁹² Eric H. LENNEBERG, "Fondamenti biologici del linguaggio", Torino, Boringhieri, 1971 (originalo usona, 1967).

⁹³ Leander TELL, "Estiĝo de la tero kaj de la homo", La Laguna, Régulo, 1969.

⁹⁴ David McNEILL, "L'acquisizione del linguaggio", Roma, Ubaldini-Astrolabio, 1973 (orig. usona, 1970).

⁹⁵ Dan I. SLOBIN, "Einführung in die Psycholinguistik", Kronberg/Ts., Scriptor, 1974 (orig. usona).

⁹⁶ Tre konata kaj tre ampleksa estas la bibliografio de-pri Noam Chomsky.

lingvon (la plezuron krei kaj/aŭ manipuli lingvon), la edipan situacion en la kadro de la lingvolerno, la reago- formiĝojn bazigantajn sur la lingvo, la defendo-mekanismojn de la egoo je la lingvo-nivelo, ktp.⁹⁷.

Antaŭ ol fini, mi volus mencii la laborojn efektivigitajn far-de la *Piaget-skolo* pri la t.n. genetica psikologio, kaj la genetica epistemologio. Tiuj studoj evidentigas la rilatojn inter la maturiĝo iompostioma de la neŭraj strukturoj kaj la laŭfaza konstruiĝo de la percepto-kapabloj, de la pens-operacioj, ĉiam pli abstraktaj, kiuj iom post iom permesas la internigon de la t.n. “eksterpsika sceno”, unue en formo de sento-movaj skemoj, poste en formoj ĉiam pli kompleksaj kaj hierarkie organizitaj. La Piaget-skolo montras, ke la simboligo-kapablo ne dependas de ia komenca disvolviĝo de la lingvo-kapablo, kiu, kontraŭe, ŝajnas esti iaspeca konsekvenco, kiu, pli malfrue, permesos la pluan progreson de la pens-kapablo mem⁹⁸.

Tiuj observoj pri la esenca unueco de la homa specio estas tre gravaj, kaj montrigos utilaj, kiam ni pritraktos la teoriojn de B.L. Whorf (ĉapitro 10.3).

4.4. La esploroj de Silvio Ceccato

Unu el la plej konataj italaj lingvistoj, la filozofo kaj kibernetikisto Silvio Ceccato, lastatempe proponis al la tut-monda klerularo kune entrepreni la ellaboron de lingvoprojekto bazita sur la plej modernaj atingiĝoj de la nuntempa scienco. Pri tio li skribis artikolojn, libron⁹⁹ kaj eldonis revuon¹⁰⁰. Ĉirkaŭ li formiĝis grupoj el junaj lingvistoj, kibernetikistoj, logikistoj, fonologoj, ktp., kiuj komencis labori tiudirekten.

Evidente ne temas pri tio, ke jam nun oni kreu lingvon: nuntempe oni devas, male, ellabori la jam ekzistantan materialon kaj ĉiukampe studi la problemojn, kie unuanimeco ne ekzistas. Tiu estas giganta laboro: mi estas certa, ke eliros elstaraj studoj pri teoria lingvistiko kaj pri semantiko, sed mi estas malpli certa, ke iam lingvo povos aperi. Ĉiuokaze, la iniciatinto mem scias, ke li ne povos ĝisvivi la aperon de sia lingvo. Li opinias, ke la kunmeto de la materialo necesa en la ellaboro de lia perfekta lingvo ne daŭros malpli ol 200 jarojn. Por tiu periodo, ĉar li konscias, ke la bezono de lingvo internacia estas urĝa, li proponas, ke oni alprenu Esperanton, kiu, eĉ post la apero de la perfekta lingvo, povos ankoraŭ pluvivi apud tiu lingvo mem.

4.5. Konkludo

La demando de “perfekta” lingvo estas pli filozofia ol lingvistika. Tial, tia ĉapitro mankas en multaj traktatoj pri planlingvo. Kaj tamen, la problemo de perfekta lingvo estas problemo fakta, historie grava, teorie stimula, kaj signifa.

Kaj, tamen, ne malmultaj esperantistoj, aŭ interlingua-istoj, aŭ eĉ lingvistoj malŝate kaj supraĵe pritraktas ĝin, senscie pri la profundaj historiaj kaj kulturaj implicoj kun nia pasintaĵo. Kurioza sinteno, malracia.

⁹⁷ (Rimarko de 2018) En tiu epoko ankoraŭ oni kredis, ke psikoanalizo, en iu ajn formo (Freŭda, Junga, alispeca) estas scienco. Montriĝis, ke ĝi *ne* utiligas sciencajn instrumentojn. Ĝi ankoraŭ nun plaĉas al kelkaj filozofoj, kaj ĉefe al artistoj kaj poetoj. Sed la iamaj sciencaj pretendoj forvaporiĝis. Ankaŭ sur la interlingvistika tereno.

⁹⁸ Ankaŭ la bibliografio de/pri Jean PIAGET estas tre konata kaj tre ampleksa.

⁹⁹ Silvio CECCATO, "La terza cibernetica", Milano, Feltrinelli 1974.

¹⁰⁰ "Pensiero e linguaggio in operazioni", Milano.

Koncerne *la idealon de perfekta lingvo*, kvankam mi opinias, ke el pure teoria vidpunkto ĝi estas imagebla, mi tamen ne opinias, ke la hodiaŭa nivelo de la sciencaj konoj donas al ni sufiĉe da materialo por ĝin konstrui.

Lastanalize, tia lingvo ne estas nur imagebla, sed ankaŭ esperinda: tamen, antaŭ ol ĝin povi uzi, devus pasi intertempe ankoraŭ 200 aŭ eĉ 300 jaroj. La esperantistoj, do, ne rezignas proponi Esperanton, ĉar la problemo de internacia lingvo estas jam hodiaŭ urĝa, kvankam ili bone scias, ke Esperanto ne estas ĝeneralscienca karakterizilo, penso-algebro, aŭ kunmeta tekniko.

Tiom pli, kiel bone diras prof. Ceccato, ke la solvo “perfekta lingvo” ne forigas la bezonon de lingvo kreita laŭ *mimesis creativa* (laŭ la interesa termino de Ceccato mem: “kreiva natur-imito”), kiel estas Esperanto, eĉ tiam, kiam jam estos uzebla la lingvo perfekta.

5. Intermezzo

5.1. “Como Esperanto era petrificate”¹⁰¹, la reformo de 1894¹⁰²

Esperanto, kiel ni vidis, aperis en 1887. Tuj poste, kiel cetere oni povintus ekspekti, ek-atingis Zamenhof-on la unuaj plibonigo-proponoj.

Estas tre probable, ke Zamenhof ilin akceptintus, se ili ne estus reciproke kontraŭdiraj. Kelkaj postulis la kompletan latinigon de la vortaro, aliaj deziris aldoni al ĝi aron da vortoj prenitaj el la slavaj kaj ĝermanaj lingvoj; aliaj volis aboli la distingon inter adjektivo kaj adverbo; aliaj proponis tion konservi, sed esperis pri abolo de la artikolo. Iuj volis senigi Esperanton je la objekto-signa finaĵo -n, dum ke aliaj proponis veran deklinacion, kiel jam havis la greka kaj la latina ... Resume: temis pri kaosa proponaro.

En tiu epoko, kaj ĝis 1889, la eldona aktivo de Zamenhof estis tre intensa. Ĝi iĝis ankoraŭ pli intensa, kiam ekaperis la unua periodaĵo en Esperanto, *La Esperantisto*, kiun Zamenhof financis preskaŭ tute sola. Tio estis multekosta, kompreneble. Kaj ĝuste en tiu periodo grava labor-akcidento okazis al la patro de Zamenhof, Markus, kiu laboris kiel cara cenzuristo. Gazet-artikolo, kiu cetere estis absolute senkulpa, estis konsiderata, post la apero, kiel ofenda por la digno de la monarko, kaj Markus Zamenhof riskis perdi sian postenon, se L.L. Zamenhof ne estus interveninta per alta bakŝiŝo, kiu permesis al lia patro konservi sian laborlokon.

Tiel Markus Zamenhof povis daŭrigi sian laboron, sed la iniciatinto de Esperanto ruiniĝis¹⁰³. *La Esperantisto* malaperis. Ĝuste tiam germana ter-mezuristo, Wilhelm Heinrich Trompeter, proponis mem pagi la publikigon de la revueto, tamen kondiĉe ke Zamenhof reformu sian lingvon¹⁰⁴.

Do pro tio ekde 1894 aperis en pluraj sinsekvoj en *La Esperantisto* projekto de reformo de Esperanto: estas klare, ke, sen la premo de Trompeter, li neniam estus publikiginta ion tian. Zamenhof sciis, ke Esperanto, kiel ĉiu. homa verko, havas difektojn, sed jam antaŭ 1894 - kaj eĉ pli en pli posta tempo - li montriĝis tre skeptika pri “reformoj” kiujn oni kutime nomis “plibonigoj”, kiuj, post atenta pristudo, neniam montriĝis pli taŭgaj ol la formoj kritikataj.

En la Interlingua-medioj oni ofte renkontas la kredon, ke tiu, kiu fiaskigis la reformprovon de 1894 estis iu markizo Louis De Beaufront. Fakte, la aferoj okazis en maniero multe malpli romaneca. L.L. Zamenhof, kiun Trompeter devigis prezenti reformproponon, informis siajn korespondantojn, ke li intime malkonsentas kun ili. Cetere, tiuj reformoj, el la lingva vidpunkto, estis objekte tre maloportunaj, ĉar malkoheraj: pro tio estis malmulte da ŝanco, ke la tiamaj esperantistoj ilin akceptu. Ni ekzameni ilin¹⁰⁵.

Forigo de la supersignitaj literoj kun transformo de la Esperanta fonologio en la direkto de la rusa kaj de la germana lingvoj; forigo de la akuzativa signo; forigo de la adjektiva finaĵo -a (kiu estu samforma kiel la adverba -e) ĉi tiu estis punkto enkondukita por “plaĉi” al la germanoj; forigo de la determina artikolo (trajto kiu devintus “plaĉi” al la slavoj); forigo de ĉiuj ne-latinidaj vortoj, kiujn anstataŭos nov-latinaj radikoj (eble por plaĉi al la “latinidoj”).

¹⁰¹ “Kiel oni ŝtonigis Esperanton”.

¹⁰² BERGER, “Les écoles...”, 1975, p. 4 kaj 14.

¹⁰³ Marjorie BOULTON, “Zamenhof”, La Laguna, Régulo, 1962.

¹⁰⁴ Adolf HOLZHAUS, “Wilhelm Heinrich Trompeter”, Essen, Schroter, dua eld. 1973.

¹⁰⁵ Louis COURTINAT, “Historio de Esperanto, unua volumo: 1887-1913”, Bellerive-sur-Allier, eld. de l’ aŭtoro, 1964, p. 49-76.

Vere, tio estis tro: homo, kiu volas plaĉi al ĉiu, finfine plaĉas al neniu. Tion Zamenhof sciis, ĉar ne estas eble, ke li kunmetis tiom da nekongruaj proponoj, sen konscii pri tiu nekongrueco. Tial, dank-al Zamenhof-mem, la reformprojekto estis rifuzita.

L.L. Zamenhof organizis voĉdonon inter la legantoj de revuo *La Esperantisto*, kaj li ricevis 264 respondojn:

- 157 estis kontraŭ ĉiu ajn reformpropono;
- 93 proponis ŝanĝojn, sed aliajn ol la projekto antaŭvidis;
- 14 estis favoraj al la reformpropono.

Trompeter, seniluziigita, rifuzis plusubteni *La Esperantisto*-n, kiu tamen povis daŭrigi sian vivon ankoraŭ iom da tempo dank-al mecenaj intertempe interesiĝintaj al Esperanto.

Tiuj estas la faktoj, facile kontroleblaj. Unu aferon mi ne sukcesas kompreni. Niaj amikoj Interlingua-istaj ofte ŝajnas bedaŭri, ke la reform-propono de 1894 fiaskis. Kaj tamen, ĝi estis objektivaj pli maltaŭga, pli artefarita, malpli homogena ol la nuna Esperanto. Se la Interlingua-istoj jam kontraŭas Esperanton, kun pli da energio ili certe kontraŭus la iaman projekton de 1894 (se ĝi sukcesintus vivi). Kial do tiu emo bedaŭri la elmondiĝon de tiu nekompleta projekto?

5.1. La "Fundamento de Esperanto"

La lingva bazo de Esperanto (kiun oni nomas tradicie "Fundamento") apartenas al la mitorepertuaro de niaj Interlingua-amikoj.

Kaj tamen, temas pri sufiĉe racia problemo. Post la voĉdono de 1894, la reformemuloj forlasis Esperanton, kaj tiuj, kiuj restis, aliĝis sen kaŝpensoj al la Zamenhofa formo de la lingvo. Tiu aliĝo okazis spontane, sen ajna persona premo: tute certe tiam jam ekfunkciis la unuaj sociologiaj mekanismoj, kiuj garantias la unuecon kaj la pludaŭron de la Esperantlingva kolektivo. Koncerne la lingvon – t.e. koncerne la komunan kodon de la formiĝanta esperanto-parolanta kolektivo – ekzistis konsenta akordo, nepriparolita, sed tre efika.

Post 1900 Esperanto ekeliris sian getton: post disvastiĝo en la iama Rusa Imperio, ĝi penetris en Svedion, kaj post Svedio ĝi havis floradon impetan kaj profundan en Francio. Kaj ĝuste en Francio, en Boulogne-sur-Mer, en la jaro 1905-a, okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto.

Ĝi estis la kronado - kaj la sankciigo - de tiuj idealoj, kiuj vivigis (kaj ankoraŭ nun parte vivigas) la esperantistojn. Estis do tute nature, ke ankaŭ la lingva fundamento de tiu internacia kolektivo estu oficialigita, ankaŭ ĉar ĝi jam ekzistis - kaj estis elprovita - en formo de nepriparolita konvencio ekde sufiĉe longa tempo (18 jaroj).

La *Fundamento de Esperanto* estas eta libro, kiun la esperantistoj konsideras "oficiala", t.e. kiel la lingvan pakton, kiu garantias la lingvan homogenecon de la kolektivo, kaj do garantias la efikecon de la lingva komunikado interne de la kolektivo mem. Ĝi konsistas el 11-paĝa enkonduko, 16-regula gramatiketo en 5 lingvoj (rusa, franca, angla, germana, pola), malgranda ekzercaro el 42 paragrafoj, kaj baza 2900-radika vortaro.

Niaj Interlingua-amikoj kredas, ke la lingva fundamento de Esperanto malhelpas la evoluon de Esperanto. Temas pri parta superstiĉo. La Fundamento fiksigas nur 16 regulojn kaj 2500 radikojn: ĉio cetera estas libera. Kaj kio estas, la cetero? Unue, la riĉigo de la vortaro; due, la tuta frazeologio; trie, la ellaboro de novaj gramatik-elementoj, kaj fine, la impona laboro malkovri ĉiujn latentajn gramatikaĵojn, sintaksaĵojn kaj frazeologiaĵojn de la lingvo.

La lingva unueco estas do garantiata dank-al la *Fundamento*, kiu, siavice, neniel estas bremsa al la lingva evoluo. Tio estas tiel vera, ke oni povas facile distingi tekston skribitan en Esperanto ĉ. la jaron 1894, aŭ dum la t.n. "franca periodo" (1905-1914), aŭ post 1945, ekzamenante la uzojn, kiuj intertempe aliĝis. Temas nature pri aliĝoj, kiu ne tuŝas la kernon de la lingvo, kiu devas resti neŝanĝebla kaj komuna al ĉiuj Esperanto-parolantoj, kvankam oni konsideris tiun kernon el diversaj vidpunktoj, variantaj laŭ la epoko¹⁰⁶.

Komuna *lingva fundamento* estas necesa: tiu estas fakto bone konata en lingvistiko kaj en planlingvistiko. Tio estas tiel klara, ke prof. Ric Berger, eminenta Interlingua-isto, lastatempe aperigis anglalingvan verkon de Alexander Gode (aŭtoro de Interlingua) ĝuste sub la titolo "Fundamento de Interlingua"¹⁰⁷.

5.2. La t.n. "Interna Ideo"

La Interlingua-istoj ofte bruemas pri iaspeca mistera kaj mistika Esperanto-religio, nomata "interna ideo". Ni bone scias, ke tiu "interna ideo" estas mallongiga esprimo por la valoroj homecaj kaj humanismaj, kiujn la Esperanto-movado proklamas. Niaj amikoj eĉ ne konscias, ke ankaŭ ili laboras surbaze de analogaj valoroj: ĉiu movado interlingvistika, kiel ni jam vidis, apud orientiĝo laŭ konkretaj celoj (la "normoj"), bezonas ankaŭ orientiĝon laŭ "valoroj", kiuj solaj havigas al ĝi animon, kaj kiuj solaj permesas ĝian pluvivon.

Aŭ ĉu oni pretendas, ke la Interlingua-istoj tute ne havas proponablajn valorojn, sed nur lingvon? Mi scias, ke ne. Pro tio mi ĉiam miris pro la energio, per kiu kelkaj Interlingua-amikoj mencias ofte la opinion kontraŭesperantan de la svisa verkisto Gonzague de Reynold: tiu kontraŭesperanta opinio, fakte, naskiĝas el-de la kontraŭhumanisma kaj kontraŭhomeca (t.e. faŝista) ideologio de tiu aŭtoro. La Esperanto-movado ne estas religio, tion asertas jam en 1905 *Deklaracio pri la Esperantismo*, kiu aperis en la *Fundamento*¹⁰⁸:

"La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu ne estrante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas."

Hodiaŭ la granda disvastiĝo de Esperanto postulas cetere distingon inter Esperanto-parolantoj (homoj, kiuj utiligas Esperanton por siaj privataj celoj), kaj esperantistoj, kiuj, krome, akceptas la sociajn kaj idealajn motivojn de esperantismo.

Estas do tre supraĵe kaj certe rekte erare paroli pri la ekzisto de mistera zamenhofa religio, al kiu oni devus aliĝi por esti esperantisto. Ke Zamenhof estis religia homo, tio estas certa¹⁰⁹. Sed Esperanto koncernas liajn ideojn kaj liajn homecajn idealojn, kaj ne lian religion.

¹⁰⁶ L.L. ZAMENHOF, "Fundamento de Esperanto", red. ALBAULT, Marmande, Esperantaj-Francaj Eldonoj, 9~a eld. 1963.

¹⁰⁷ Alexander GODE, "Fundamento de Interlingua", Morges, eld. Berger, sen dato.

¹⁰⁸ ZAMENHOF, "Fundamento..", 1963, p. 33.

¹⁰⁹ Gaston WARINGHIEN, "Zamenhof", en: "Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro" (red. LAPENNA), 1960, p. 23-26.

Unu el la plej seriozaj kaj profundaj studoj pri la humanismo de Zamenhof estis publikigita antaŭnelonge far-de Pierre Janton, franca lingvisto, ĉe Presses Universitaires de France¹¹⁰ Lin ni volas sekvi ĉi-koncerne.

Janton rimarkas unue, ke Zamenhof vidadis en la Esperanto-movado la sociologiajn kaj psikologiajn trajtojn de tipa diasporo¹¹¹. Tiu diasporo devis havi celon socian kaj idealan: pro tio “esperantismo ne devis do esti nura lingvoteorio, sed ankaŭ doktrino pri sia celo, kiu estas formo de humanismo”¹¹². La celo de Zamenhof estis, kiel ni vidis, la repacigo inter la homoj. “Tiu seninterrompa pensofadeno, kiu trairas la tutan agadon de Zamenhof, eliras de egalisma konsidero pri la homaro¹¹³”. Zamenhof estas eble la unua, kiu komprenis, ke la utiligo de tia lingvo kiel internacia lingvo implicas la demokratiigon de la kulturo kaj de la komunikado¹¹⁴.

Sed Zamenhof estis nek entuziasmulo nek naivulo. Li sciis, ke “tiu last-definitiva celo estas alirebla nur [...] je la finiĝo de transformiĝa procezo de la institucioj kaj de la moroj, procezo por kiu, per sia ekzisto mem, Esperanto engaĝiĝas, sed kiun ĝi, tute sola, ne povas plenumi¹¹⁵”.

La celo de internacia planlingvo estas resume principe io soci-politika: “permesi al la homamasoj la komunikon inter ili sen la perado de la elitoj: finfine, doni al ili la ilon por liberiĝi, minimume sur la lingva nivelo, el-de ilia dependo de la privilegiuloj¹¹⁶”.

Jen do kio estas esperantismo sen la maskigoj kelkfoje misvolaj, kelkfoje primitivaj, kiujn kelkaj Esperanto-kritikemuloj emas trudi al ĝi. Tiu mistera “religio” senvualiĝas kiel projekto de socia praktikado, kiu havas, kiel finan celon, la kunlaboron por la liberiĝo de la homaro.

¹¹⁰ JANTON, L'Esperanto...”, 1973.

¹¹¹ Janton, samloke, p. 45.

¹¹² Janton, samloke, p. 6.

¹¹³ Janton, samloke, p. 35.

¹¹⁴ Janton, samloke, p. 36.

¹¹⁵ Janton, samloke, p. 41.

¹¹⁶ Janton, samloke, p. 37.

6. Esperanto

6.1. Io pri kompetenteco

En la jaro 1950-a Interlingua ne jam ekzistis. La defendantoj de la nov-latinoidaj tezoj en planlingvistiko¹¹⁷ grupiĝis preskaŭ senescepte cirkaŭ la projekto nomita unue *Occidental*, kiun oni pli poste alinomis al *Interlingue* por eviti, postmilite, la politikajn konsekvencojn de la nomo "Occidental". *Cosmoglotta* estis ties oficiala revuo.

En la januara numero de *Cosmoglotta* de la jaro 1950-a aperis artikolo, kiu min mirigis. La aŭtoro estis la bone konata lingvisto Aurélien Sauvageot, specialisto pri ugrofinna lingvistiko en Parizo¹¹⁸. En tiu artikolo, Sauvageot asertis, ke, "kiel mi elĉerpiĝas ripetante ekde tridek jaroj, Esperanto estas nur arkaa provo. La elirpunkto de ĝia aŭtoro ne estis scienca koncepto pri la lingvo, sed obsoleta (malmoderna) doktrino pri la principoj de ĝenerala gramatiko. Li ankoraŭ opiniis, ke la lingvo tipo nomata *fleksia* estas la perfekta tipo. La elirpunkto de Esperanto estis do fiasko, kaj la esperantistoj povas amuziĝi parolante aŭ skribante en Esperanto, sed ne estas tiel, ke ili alportos kontentigan solvon al la problemo de lingvo internacia".

Iom pli malfrue, en 1954, la sama aŭtoro publikigis en serioza franca revuo pri lingvistiko analogan artikolon. En ĉi tiu artikolo prof. A. Sauvageot ree kritikis Esperanton kiel obsoletan eksperimenton, kiel fleksian lingvon arkaan kaj senvaloran. Kiel lingvon internacian, li proponas novlatinoidan lingvon kiel Interlingua, cetere konsciante, ke tiu lingvo estas ja ĝuste fleksia lingvo okcidento-tipa. Li fakte skribas, ke "temus ja pri lingvo facile uzebla, ĉefe far-de homo, kiu parolas la anglan, la novlatinajn lingvojn, eble ankaŭ unu el la ĝermanaj lingvoj, kondiĉe tamen ke li ricevis sufiĉe profundan latinisman kulturon. La nova idiomo proponita de IALA estas fakte nenio alia ol reenkarigi de la novlatinaj lingvoj, kun forta latinigo. Ĝi estos facile alirebla nur al tiuj, kiuj estas jam familiaraj kun tiu latina fono. Por finno, ĝi estos tiel malfacile lernebla kiel la franca aŭ iu ajn alia novlatina lingvo, aŭ ol la angla".¹¹⁹

Ni observos tri faktojn:

Prof. Sauvageot subtenas en interlingvistiko elitecan, aristokratan kaj eŭropo-centran koncepton. Tiu estas lia rajto. La esperantistoj defendas popularajn tezojn, demokratajn kaj specife ne-eŭropo-centrajn. Mi opinias, ke tiu estas ilia rajto. Unu afero gravas: oni devas havi la kuraĝon tiri la lingvajn konkludojn, kiujn ĉi tiu elekto trudas. Aurélien Sauvageot kuraĝis tion fari: li senhezite montras, kia devas esti lingvo, kiu kongruas kun liaj konceptoj. Tiurilate, niaj Interlingua-amikoj estas malpli kuraĝaj: ili neas, ke la lingvaj konsekvencoj de iliaj tezoj estas tiaj. Nu: unu el la celoj de ĉi tiu verko estas pruvi, ke la konkludoj de Prof. Sauvageot estas korektaj, en la senco, ke ili estas neeviteblaj.

Principe, ni devas tamen observi, ke la tuta argumentado kontraŭ-esperanta de Prof. Sauvageot estas sinkontraŭdira. Li asertas, ke Esperanto baziĝas sur obsoleta teorio de gramatiko, laŭ kiu la plej taŭga lingvo devus esti fleksia, kaj, konklude, li rekomendas Interlinguan, kiu estas lingvo vere tipe fleksia (el la grupo de novlatinaj lingvoj). Ie mankas konsekvencemo ĉe Prof. Sauvageot. Pro kiu

¹¹⁷ Tradicie oni utiligas la terminon "naturalisma" por indiki la plan-lingvojn similajn al la novlatinaj lingvoj, kaj la terminon "skema" por indiki la aŭtonomajn planlingvojn. Ilin enkondukis Couturat kaj Leau (1903). Sed por multaj lingvistoj, lingvoj kiel Interlingua estas same "artefaritaj" kiel Esperanto, kaj ni scias, ke Esperanto ne estas "malpli natura" ol Interlingua, sed simple pli regula. Pro tio, ekde ĉi tie, mi utiligos la jenajn terminojn: *lingvo novlatinoida* estas lingvo imitanta la novlatinajn lingvojn, kiel Interlingua. *Lingvo aŭtonoma* estas ekz-e Esperanto.

¹¹⁸ Aurélien SAUVAGEOT, "Lettre à J. Roux", en: "Cosmoglotta", januaro 1950.

¹¹⁹ Aurélien SAUVAGEOT, "Une langue universelle et laquelle", en: "Vie et langages", oktobro 1954.

mistera kaŭzo? Ni ni ne scias la kaŭzon. Supozeble, li ne okupiĝis sufiĉe profunde pri planlingvistiko. Ni ekzamenu tion en nia tria observo.

Prof. Sauvageot ne konsentas pri la popularaj, demokrataj kaj ne-eŭropocentraĵoj de la esperantistoj. Pro tio, tute certe, li neniam interesiĝis pri ilia lingvo. Pro tio, surbaze de antaŭjuĝoj kaj/aŭ eraraj informoj, li povis aserti, ke la aŭtoro de Esperanto deiris de ekstermoda koncepto pri ĝenerala gramatiko, senkonsidere pri la historia fakto, ke Zamenhof deiris ĝuste de la inverso: li deiris de la segmentigo de la enuncoj laŭ la modernaj metodoj (kvankam laŭ pionira tekniko). Pro tio li povas aserti, ke Esperanto estas “fleksia lingvo”, kvankam la hodiaŭa juĝo de ĉiu kompetentulo atentigas nin, ke Esperanto estas fakte lingvo modere aglutina, kun kelkaj izolaj trajtoj.

Ne povas esti, ke Sauvageot ne scias la diferon inter fleksiaj kaj aglutinaj lingvoj: li estas ja profesoro pri ugrofinna lingvistiko, kaj do specialisto ĝuste pri aglutinaj lingvoj.

Supozeble, la solvo kuŝas aliloke. Sauvageot probable scias tre malmulton pri Interlingua (sed li tuj kapablis percepti la ĉefajn strukturajn trajtojn de tiu lingvo), kaj absolute nenion pri Esperanto, pri kiu li parolas nur surbaze de nerektaj informoj. Pro tio ĉio, kion li asertas pri Esperanto, estas simpla nescienca antaŭjuĝo.

Tio devigas nin paroli pri la demando koncernanta la prilingvan kompetentecon. Povas esprimiĝi pri planlingvistiko nur homoj, kiuj havas faktajn spertojn pri ĝi. Mi esprimas tion iom krude, sed estas malfacile nei tiun ĉi principon.

Evidente, artikoloj plenaj de miskomprenoj, antaŭjuĝoj kaj internaj sinkontraŭdiroj ne povas esti konsiderataj sciencaj. Estas do psikologia kaj strategia eraro la insistado de niaj Interlingua-amikoj pri la tezoj de Sauvageot. Per tio ili subfosas sian propran pozicion, demonstrante ties internan malforton.

6.2. Por ke lingvo estu universala, ne sufiĉas ĝin nomi tia (Zamenhof)

Tute vere: *nomo* ne sufiĉas. Estas necese trovi la ŝlosilon de internacieco “Zamenhof, skribis Claude Gacond, konsciis esti avangardulo en la lingvistikaj konoj de sia epoko. Li sciis, ke iam la lingvistoj malkovros, ke li pravis, serĉante la internaciecon je la nivelo de la gramatikaj strukturoj, kaj ke ĉiuj aliaj, kiuj kontentiĝis ĝin serĉi je la nivelo de la vortaro, engaĝiĝis en senlirejon”¹²⁰. Antaŭ Zamenhof, J.M. Schleyer, la aŭtoro de Volapük, konstruis tipe aglutinan lingvon, kiu plaĉas minimume al unu hodiaŭa lingvisto¹²¹. Zamenhof faris pli ol Schleyer: li klopodis konstrui novan lingvon, kiu kunmetas la avantaĝojn de lingvo modere aglutina, kun la avantaĝoj de lingvo modere izola.

Aglutina lingvo estas lingvo, kies formalaj elementoj (morfemoj) estas neŝanĝiĝeblaj, kaj “algluiĝas” unuj post la aliaj, konservante sian semantikan kaj formalan individuecon. *Izola* lingvo estas lingvo, en kiu la morfemoj estas ne nur neŝanĝiĝeblaj kaj kunmeteblaj kun simpla senco-limo, sed ankaŭ aŭtonomaj. En tia lingvo ne ekzistas veraj afiksoj, sed nur vortoj.

Kontraŭe, la *fleksiaj* lingvoj estas lingvoj, en kiuj la morfemoj ŝanĝiĝas laŭforme en la sama vortofamilio. Ekzemplo tipa estas la franca, en kiu la verbo *far-i* (*faire*) havas plurajn radikojn:

¹²⁰ Claude GACOND, "Du Volapük à l'Esperanto", en: "La pensée bahà'ie", 1973/43, p. 19.

¹²¹ Heinz F. WENDT (red.), "Sprachen", München, Fischer, 1961, p. 358.

Radikoj	Verbo-formo	Prononco	Ekzemplo	Signifo en Eo
/fè/	Fais	/fè/	Je fais	mi faras
/Fèr/	Faire	/fè:r/	Faire	fari
/fö/	Ferons	/fö:ö/	Nous ferons	ni faros
/föz/	Faisais	/fözè/	Je faisais	mi faradis
/fi/	Fit	/fi/	Il fit	li faris
/fas/	fasse	/fas/	Que je fasse	ke mi faru

Rimarku: /è/ estas nia esperanta “e”, kun kun larĝigita buŝo, kiel franca *air* /èèr/ (aero), itala (florencan) *bène* (bone), germana *gern* /gèrn/ (volonte).

Krome: /ö/ estas sono kiel "e", sed prononcata kun rondigitaj lipoj. Ekzemploj: franca: *feu* (fajro); milana: *foeuch* (fajro); germana: *Störung* (perturbo).

Analogajn ekzemplojn ni trovas en la germana, kie ekz-e la koncepto “kant” estas reprezentata per la jenaj radikoj:

Radiko	Vorto en la germana	Traduko
/sing/	singen	kanti
/sang/	wir sangen	ni kantis
/sung/	gesungen	kantita
/sèng/	Gesänge /gesènge/	kantoj

Ankaŭ Interlingua estas lingvo fleksia: la koncepto “vid”, en Interlingua, estas reprezentata per la jenaj radikoj:

/vid/, kiel en: vider (vidi)
 /viz/, kiel en: visive (vida)
 /vist/ kiel en: vista (vido).

Ni povas facile konstati, ke la hindeŭropaj lingvoj estas grandparte fleksiaj lingvoj, dum ke la ugro-finnaj lingvoj (finna, hungara) kaj la lingvoj uralo-altajaj (turka, japana) estas relative klare aglutinaj.

La ĉin-tibetaj lingvoj kaj la monĥmeraj lingvoj (vjetnama) estas lingvoj izolaj.

Ni bone scias, ke tiu lingvotipologio estas malnova, kaj ke ĝin aplikas preskaŭ plu neniu lingvisto. Tamen, ĝi havas heŭristikan valoron, kaj por nia celo ĝi estas sufiĉa.

En aplikita lingvistiko oni rimarkas, ke la novlatinoidaj lingvoj (Interlingua, Occidental) apartenas al la fleksia grupo, dum ke la lingvoj nomataj “aŭtonomaj” apartenas al la aglutina grupo, kiel Ido kaj Volapük. Nur Esperanto troviĝas mezvoje inter la aglutinaj kaj la izolaj lingvoj.

Cetere ne forgesendas, ke en 1875 aperis lingvoprojekto de franca intelektulo, Courtonne, sub la nomo de *Internacia Novlatina Lingvo*, kiu, koncerne strukturon, tre similas al Esperanto. Sed ni ne scias, ĉu Zamenhof konis ĝin, kaj cetere tiu projekto ne povis havi sukceson, ĉar ĝi estis fonologie kaj gramatike tro riĉa kaj komplika pro manko de karakterizaj finaĵoj (kiel niaj -o, -a, ktp.).

Mi opinias, ke la demando pri formriĉeco estas sufiĉe grava: Zamenhof selektis, okaze de la prezento de Esperanto, el-inter ĉiuj eblaj formoj (latentaj) de sia lingvo nur tiujn, unuamomente, kiuj plej malmulte ŝokis la lingvajn kutimojn de lia publiko (hindeŭrop-lingva). Multaj eblaĵoj restis

tial latentaj: ilin ni malkovras nun iom post iom, surbaze de tendenco malhindeŭropiĝanta en la plej lastatempa Esperanta stilo.

Tion plej bone klarigas Claude Gacond: “Por Zamenhof la internacieco de planlingvo ne konsistas en la vortaro, sed en la lingvostrukturo. Dum jaroj Zamenhof komparis la gramatikajn strukturojn de la lingvoj, kiujn li havis la privilegion scipovi: la germana, la angla, la franca, la greka, la hebrea, la latina, la litova, la pola, la rusa kaj la jida. Li recenzis la malsamajn manierojn esprimi saman gramatikan funkcion. Poste, li enkondukis en la lingvon, kiun li planis, la komunon (la ensemblon) de tiuj strukturoj”¹²².

La tipa ekzemplo de tiu procedo estas la Esperanta “akuzativo”. Zamenhof povintus certe doni la funkcion marki la *rektan komplementon* de transitiva verbo tutsimple al la frazostrukturo. Li ne faris tion, ĉar li sciis, ke tio neeviteble transformintus lian lingvon al kodo rigida kaj malpreciza. Li preferis enkonduki formalan elementon (la finalan morfemon -n), kiu tre similas al la hindeŭropa akuzativo-finalo de la deklinacio (kvankam fakte la finaĵo -n ne estas deklinacio), kaj, alternative kun -n, li proponis enkonduki la prepozicion *je*, kies uzo similas al la “akuzativa” prepozicio de la hispana lingvo (a), de la hebrea (‘eth), de la afrikansa, kaj de aliaj lingvoj.

Nur lastatempe oni ekinteresiĝis pri la teoriaj demandoj de la tipologia enkatalogigo de Esperanto. La observoj ĝisnun faritaj, kvankam ankoraŭ sporadaj kaj nesistemaj, estas tamen jam tre interesaj.

Claude Piron, en brila artikolo, kiun ni citos plurfoje, evidentigas la similon inter Esperanto kaj la kreolaj lingvoj. “La latinida karaktero de Esperanto estas tutsimple iluzio, li skribas. Neniu lingvisto povas listigi Esperanton inter la hindeŭropajn lingvojn. En la kreolaj lingvoj troviĝas pli da latinidaj vortoj ol en Esperanto, sed la lingvistoj interkonsentas: la kreolaj ne apartenas al la hindeŭropa lingvofamilio. En la unua kiel en la dua kazo, la spirito de la lingvo estas tre fora el-de la specifaj karakterizoj de la latinaj lingvoj. Sendube pro tio tiom da intelektuloj el Okcidenta Eŭropo, supraĵe legante Esperantan lernolibron, havas tipan unuamomentan reagon: Tio estas sabiro. Ĝi neniel povas havi kulturalan valoron”¹²³.

Fakte en Esperanto, kiel en la kreolaj aŭ en la sabiroj, ne ekzistas vera fleksio, sed nur kungluiĝo de nevariantaj lingvoelementoj. Tio efikas gravan konsekvencon (kiun cetere Zamenhof antaŭvidis kaj volis).

Se vi scias dividi la Esperantajn vortojn laŭ iliaj kunmetantaj elementoj, t.e., se vi scias segmentigi laŭ iliaj plej malgrandaj elementoj la enuncaĵo-sintagmojn de la lingvo (kaj tio ne estas speciale malfacila, ĉar la inventaro estas tre limigita), vi povas serĉi kaj trovi ĉion, elementon post elemento, en la vortaro. La sumo de la signifoj de ĉiu elemento estas la fakta signifo de la enuncaĵo mem. Iusence, kaj el tiu vidpunkto, Esperanto funkcias kiel kodo. Por kompreni enuncaĵon generitan laŭ kodo, sufiĉas koni la kodo-ŝlosilon (la bazan inventaron de morfemoj kaj la kunmet-regulojn), kaj kapabli rekoni en la teksto de la enuncaĵo la fundamentajn elementojn jam konatajn. Elstaran eseon pri tiu fakto skribis prof. G. Waringhien¹²⁴.

Tio igas Esperanton senpere komprenebla al ĉiu, kondiĉe ke li posedu Esperantan vortaron (kie troviĝas la morfem-inventaro). Tiu certe ne estas la kazo de lingvoj kiel la germana, la itala, la franca aŭ Interlingua. Ni vidu tiukoncerne kelkajn ekzemplojn.

Konsideru la jenajn tri Esperantajn frazojn:

¹²² GACOND, "Du Volapük à... ", 1973/43, p. 17.

¹²³ Claude PIRON, "(Lettre ouverte)", Mont-Soleil, Campagne 'L'Esperanto à l'école', 1975, p. 5.

¹²⁴ Gaston WARINGHIEN, "Lingvo kaj vivo", La Laguna, Régulo, 1959, p. 102-149.

Li vol-as regul-ad-i la nov-a-j-n sistem-o-j-n.

Mi ne sci-as, kie mi las-is mi-a-n baston-o-n.

Vi est-as inter la hom-o-j, kiu-j-n mi renkont-as plej oft-e.

En tiuj tri frazoj mi separis (disigis) la bazajn elementojn de la inventaro per horizontalaj streketoj (-) Vi povas facile konvinkiĝi, ke *ĉiu baza elemento* (morfemo) *trovigas en la vortaro* (se temas pri bone farita vortaro, ĉar ekzistas ankaŭ netaŭgaj). Se nun vi kunmetas la vortetojn kaj la indikilojn de la sintaksaj funkcioj, vi povas facile traduki la frazon ali-lingven. Ni provu traduki la *unuan* frazon en la italan:

Li (=egli),
vol (=radiko de la verbo “voli”: *volere*),
as (=finaĵo indikanta la prezencon de indikativo),
regul (=radiko de la vorto “regulo” *regola*),
ad (=sufikso indikanta agadon),
i (=finaĵo indikanta la infinitivon de verbo),
la (=determina artikolo: *il, lo, la, i, gli, le, l’*)
nov (=radiko de la adjektivo “nova”: *nuovo*),
a (=finaĵo indikanta adjektivan funkcion),
j (=finaĵo indikanta la pluralon),
n (=finaĵo indikanta la funkcion de rekta komplemento post transitiva verbo),
sistem (=radiko de la vorto “sistemo”: *sistema*),
o (=finaĵo indikanta substantivan funkcion),
j (*konata*),
n (*konata*).

Do:

Esperanto	Vortara klarigo	Traduko
li	Pronomo unuapersona: egli	egli
vol-as	Koncepto “vol” (<i>volere</i>) + as-tenso	vuole
regul-ad-i	Koncepto “regul” (<i>regola</i>) + koncepto “daŭro” + funkcio verba infinitiva (-are)	regolare
la	Artikolo determinanta	i
nov-a-j-n	Koncepto “nov” (<i>nuovo</i>) + funkcio a (adjektivo) + funkcio plurala (j) + funkcio n (objekto de aktiva verbo)	nuovi
sistem-o-j-n	Koncepto “sistem” (<i>sistema</i>) + funkcio o (substantivo) + funkcio j (pluralo) + funkcio n (objekto del aktiva verbo)	sistemi

La samon ni *ne* povas fari per Interlingua, aŭ la germana, aŭ la itala. Jen tri ekzemploj:

Interlingua

Ille vole regular le nove systemas.

Li volas reguligi la novajn sistemojn.

Germana

Ich weiss nicht, wo ich meinen Stock gelassen habe.

Mi ne scias, kie mi forgesis mian bastonon.

Itala

Tu sei fra gli uomini che incontro più spesso.

Vi estas unu el la homoj, kiujn mi plej ofte renkontas.

Se vi serĉus la bazajn elementojn (morfemojn), respektive, en Interlingua, germana aŭ itala vortaroj, vi trovos la jenon:

Interlingua-frazo

ille	vole	regular	le	nove	sistemas
li, tiu, ĉi-tiu,	?	regula	la	nova, naŭ	sistemo?

Germana frazo

ich	weiss	nicht	wo	ich	meinen	stock	gelassen	habe
mi	blanka	ne	kie	mi	opinii	etaĝo	trankvila	posedo?

Itala frazo

tu	sei	fra	gli	uomini	che	incontro	più	spesso
ci	ses	inter, monaĥo	la	Homo?	kiu, kiun, ke	Renkont- iĝo	pli, plu, plej	dika, ofta, ofte

Ni do rimarkas, ke tia “kodeca” struktura trajto de Esperanto estas tipe nehindeŭropa. Ĉi-rilate mi mencias rimarkon, kiu laŭ mi estas sufiĉe grava.

La angla lingvisto Collinson, unu el la eksdirektoroj de IALA, membro de la Akademio de Esperanto, opinias, ke “Esperanto havas vortaron baze latinan, sed ke ĝia strukturo similas al tiuj de la lingvoj de orienta kaj centra Eŭropo.”¹²⁵ Pro tio li proponas ĝuste Esperanton, kaj ne Idon aŭ Occidental, por servi kiel ponto inter la du ŝtatblokoj. Kelkajn jarojn pli malfrue, lia jugo aliiĝas iomete: li asertas, ke Esperanto havas kelkajn fleksiajn trajtojn, kelkajn izolajn trajtojn, sed ke ĝi havas ĉefe aglutinajn trajtojn. Pro tio, li aldonas, Esperanto estas esence hindeŭropa¹²⁶. Tiu konkludo unuavide ŝajnas iom surpriza. Tamen rimarko de la nederlanda lingvisto W.A. Verloren van Themaat helpas nin pli bone kompreni.

Li skribas, ke la malsamo inter Esperanto kaj Interlingua estas esence *malsamo inter iliaj simpligo-niveleoj*. La deir-punkto de ambaŭ estas la eŭropaj lingvoj, sed en Interlingua oni limigis sin je la simpligo kaj normigo de la morfologio, dum ke en Esperanto oni procedis pli profunden, simpligante kaj la morfologion kaj la sistemon de vortkunmeto¹²⁷. Tio lastanalize signifas, ke Esperanto tute ne estas pli “artefarita” (aŭ malpli “natura”) ol Interlingua, sed ke ĝi estas tutsimple pli normigita. Interlingua estas (minimume parte) sendependa el-de la eŭropaj lingvoj koncerne morfologion, dum ke la vortfara sistemo restas tipe latineca. Esperanto iris pli malproksimen, kaj ĝi iĝis sendependa ankaŭ en tiu kampo, ĉar ĝi posedas aŭtonoman vortfaran sistemon.

Nun ni povas kompreni la rimarkon de Collinson: Interlingua estas novlatinoida lingvo pli aŭ malpli simpligita, dum ke Esperanto estas lingvo hindeŭropa simpligita kaj kohere sistemigita ĝis la nivelo,

¹²⁵ W.E. COLLINSON, citita en: MANDERS, “Vijf Kunsttalen”, 1947, p. 379.

¹²⁶ W. E. COLLINSON, “Klasado de lingvoj laŭ strukturo kaj la loko de Esperanto inter ili”, en “Elektitaj prelegoj”, Purmerend, Muusses, 1955, p. 14.

¹²⁷ W.A. VERLOREN VAN THEMAAT, “Whorfa lingvistika...”, sen dato, p. 8.

je kiu ĝi perdis la tipan trajton de la hindeŭropa fleksiĉo, troviĝante tial je la kuniĝo-punkto inter fleksia, aglutina kaj izola strukturoj.

La strukturo de Esperanto estas do vere internacia.

Ni aldonu ĉi tie, ke Interlingua havas evidente ankaŭ aglutinajn trajtojn (kiel ankaŭ la itala kaj la germana), sed ĝia bazo estas strikte fleksia. Rimarkindas la fakto, tamen, ke eĉ tiuj aglutinaj trajtoj ne estas aŭtonomaj, sed ke ilia uzo dependas de la paralelecoj en la novlatinaj lingvoj.

En Interlingua, do, multaj morfemoj havos ne nur unu neŝangeblan formon, sed havos du, tri, kvar, aŭ pli da alomorfoj (formoj alternativaj, kiuj aperas en certaj kunteksto gramatikaj aŭ sintaksaj). Ne nur: unu sola kategorio (gramatika, aŭ, pli ofte, semantika) povos esti esprimata en pluraj alternativaj (kuntekstigitaj) manieroj.

Granda parto el mia pritrakto pri Interlingua koncernos precize ĉi tiujn aspektojn de la lingvo. Nun mi limiĝas al kelkaj mallongaj aludoj.

Por ruso (aŭ slavo) estas sufiĉe malfacile, kompreni kiamaniere oni uzas la lingvan kategorion nomatan “determina artikolo”. Ruso estos do tre kontenta, (se jam li devis lerni la uzon de tiu kategorio). ke la fakta apliko de la kategorio ne estas komplika. Tial, li preferos lingvon kiel la angla, kie tiu kategorio esprimigas per unusola morfemo (*the*) ol lingvon kiel la itala, kie li devos selekti inter la kuntekst-devigaj alomorfoj *il, lo, la, i, gli, le, l’*.

Laŭ W.A. Verloren van Themaat, lastanalize, la afero estas simpla: “ĉu ni devu utiligi unu solan sufikson por formi abstraktajn substantivojn el-de la adjektivoj (kiel en Esperanto), aŭ kvin-ses sufiksojn (kiel en Interlingua)?”, Li konkludas, ke “se oni lernas Esperanton, la kategorioj (konceptoj) povas esti malfacilaj, sed la formoj estas facilaj, kiam finfine oni komprenis la koncepton. Se, kontraŭe, oni lernas Interlinguan, la kategorioj (konceptoj) estas pli-malpli same malfacilaj kiel en Esperanto, sed krome oni renkontas la malfacilon, kiun kaŭzas la kaoso de la formoj”, inter kiuj oni povas elŝteliĝi nur se oni jam scipovas novlatinan lingvon¹²⁸.

La strukturo de Esperanto estas grava instrumento en la manoj de homoj parolantaj hindeŭropan lingvon, ĉar ĝi permesas malfermi la okulojn sur aliaj lingvosistemoj. Kiel skribas Claude Piron, en Esperanto nur la vestaĵoj estas (relative) okcidentaj, “dum ke la profunda strukturo absolute ne estas tia, kaj [...] ja estas la profunda strukturo, kiu determinas la spurlason (*impact*) sur la psiko. Dank-al sia strukturo, Esperanto estas multe pli proksima al la for-orientaj lingvoj: ĝi konsistas, precize kiel la ĉina, el nevariantaj elementoj, kiuj kunmetiĝas inter si”¹²⁹.

Mario Andrew Pei, profesoro pri romanida lingvistiko ĉe la Columbia University (USA), kiu ekde minimume dudeko da jaroj interesiĝas pri planlingvistiko, estis longtempe favora al “akademio” (aŭ laborgrupo) el lingvistoj kaj filologoj¹³⁰, kiuj devus ellabori novan lingvon.

Antaŭ kelkaj jaroj, post serioza studo pri Esperanto, li atingis interesan konkludon, kiu respiegulas cetere ankaŭ la pragmatikan sintenon de la usonaj lingvistoj. Li skribas, ke “se por internacia uzo oni deziras konsideri artefaritan lingvon, Esperanto meritas seriozan pritrakton. Ĝi kunigas je supera kvalit-nivelo la kvar ecojn, kiuj igas la planlingvojn superaj al la etnaj lingvoj: la neŭtraleco, la reguleco, la fonematikeco de la skribsistemo kaj la simpleco de la gramatika strukturo kaj de la vortformado. La aliaj planlingvoj posedas tiujn samajn ecojn laŭ malsamaj gradoj, sed neniu el ili alproksimiĝas al Esperanto en sia sintezo el ĉiuj kvar. [...] Elspezante multe da tempo kaj grandan

¹²⁸ W.A. Verloren van Themaat, , "Whorfa lingvistika...", sen dato, p. 9.

¹²⁹ PIRON, “(Lettre ouverte)”, 1975, p. 1.

¹³⁰ Mario A. PEI, "One language for the world", New York, Biblo and Tannen, 1968 (represaĵo el 1958).

laboron oni povus nature ellabori ion same valoran, sed la provoj ĝisnun efektivigitaj ne sukcesis, eĉ kiam rimarkinda nombro da lingvistoj el ĉiuj landoj kunlaboris dum pluraj jaroj je la konstruo de tia lingvo, kiel ni konstatis en la kazo de Interlingua”¹³¹.

6.3. La lingvo Esperanto

Ĉi tiun eseon legos esperantistoj. Do, ĉi tie, prezento de la lingvo superfluas.

Sufiĉu rimarki, ke la granda *Plena Gramatiko* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien¹³², siatempe verko epok-fara, ne plu povas reprezenti la hodiaŭan nivelon de la internacia lingvistiko. Lingvistike valora estas la priskribo de la strukturo de Esperanto, kiu aperis en franclingva verko de la profesia lingvisto P. Janton¹³³. Lastatempe alia profesia lingvisto, István Szerdahelyi, proponis kelkajn kritikojn al la terminologio utiligita far-de Janton¹³⁴.

Mankas tamen ampleksaj verkoj, kiuj pritraktas Esperanton el la vidpunkto de la strukturisma kaj de la gener-transforma lingvistikoj, por kiuj, fakte, Esperanto estus elstara eksperimenta lingvo.

Pro tio, ke kohera studo pri Esperanto-fonologio mankas, mankas ankaŭ la priskribo de la variantoj (alofonoj) poziciaj kaj geografiaj de la Esperantaj fonemoj: cetere, ankaŭ la nombro de la Esperantaj fonemoj estas malcerta.

Koncerne morfologion, ni observu, kun la lingvisto R.P. Nogueira¹³⁵, ke “Esperanto naskiĝis kvazaŭ orientiĝo: ĝi reprezentas, iel, anticipon je la modernaj strukturismaj lingvistikaj tendencoj. Tiuj tendencoj estas artefaritismaj, ĉar ili konceptas la lingvon kultura artefaritaĵo [...] kiu estas esence rekonstruebla por modelaj esploroj. Esperanto estas produktaĵo de *mimesis creativa* (kreiva imito), kiu, modele imitante la strukturon de la naturaj lingvoj, kondukas al la pli profunda kompreno de la lingvaj fenomenoj, kaj faciligas rimarkinde la komunikadon”.

Ni jam vidis, ke Zamenhof, por atingi tiun celon, konstruis intence kod-funkcian lingvon. Tiel li priskribas sian labormetodon: “Mi aranĝis plenan dismjembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas ĉiam kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj ktp. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformiĝis tiun ĉi dismjembrigon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon [...] li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo [...] En tia maniero la dismjembrigo de la lingvo neniom embarasas la lernanton; li eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto.”¹³⁶.

¹³¹ PEI, “Cercasi...”, 1972/178, p. 9-10.

¹³² 3-a eld., Milano, 1958-1964.

¹³³ JANTON, “L’Esperanto...”, 1973.

¹³⁴ En: “Literatura Foiro” 33/1975.

¹³⁵ R.P. NOGUEIRA, “Características estructurais do esperanto”, en: “La Monda Lingvoproblemo”, 1970/4.

¹³⁶ L.L. ZAMENHOF, “Fundamenta Krestomatio”, Londono, The Esperanto Publishing Co., 17-a eld.

Elstare klara teksto: P. Janton rememorigas nin, ke la procedo de Zamenhof similas al pli postaj lingvistikaj metodologioj, aparte al tiu, kiun evoluigis glosematiko.

La morfemoj (la “vortoj” de Zamenhof) kunmetas sin libere: la limo estas semantika. Tamen inter la diversaj morfemoj ekzistas kategorioj. Nogueira observas, ke la limo inter leksikaj kaj gramatikaj morfemoj ne estas tre klara: li rimarkas, ke ekzistas tendenco al ĉiam pli ofta transiro al la kategorio de liberaj formoj.

Janton montras klare, ke estas sencece paroli pri “kripligitaj” aŭ “artefaritaj” leksemoj (“vortar-elementoj”), kvankam, nature, la gramatikeroj plej ofte estis elpensitaj. Laŭ li¹³⁷, ekzistas du leksem-traĵtoj (el la etimologia vidpunkto):

- a) La Esperanto-leksemoj estas monomorfaj, t.e. la radikoj, kiuj etimologie apartenas al la sama etimologia familio, en Esperanto estas konsiderendaj kiel apartaj, izolaj morfemoj. Ekz-e, el la latina /ag/ (*agere, actum*, ktp.) venas i.a. la jenaj morfemoj: *akt-*, *ag-*, *akci-*, kiuj, fakte, en Esperanto estas tute sendependaj radikoj.
- b) La Esperanto-leksemoj estas etimologie integraj. Tamen ekzistas la jenaj esceptoj:
 - a. se necesas eviti homonimecon, kiel: *ordo / ordeno / ordono*;
 - b. se necesas eviti konfuzon inter leksemo kaj morfemo (gramatika): *cigaredo*, anst. *cigareto*, pro la ekzistanta “cigar-eto”;
 - c. se necesas eviti polisemion (plursencecon) malagrablan: *akordi / agordi; paso / paŝo; pesi / pezi*, ktp.;
 - d. se per “adapto” eblas trovi formon “averaĝan” pli internacian: “lavango”, el itala *valanga* kaj germana *Lawine*; “gliti”, el germana *gleiten*, kaj franca *glisser*.

Ni vidas, do, ke la diferencigaj rimedoj estas tre limigitaj:

vokalo povas ŝanĝiĝi:	rikolti	(anst. *rekolti);
konsonanto povas ŝanĝiĝi:	cigaredo	(anst. *cigareto);
fonemo forfalas:	sprito	(anst. *esprito, aŭ *spirito);
mallongigoj eblas:	prokrasti	(anst. *prokrastini).

6.4. La efikeco de la Esperanta vort-kunmetsistemo

Mario Pei asertas, ke “la vort-kunmetsistemo per prefiksoj kaj sufiksoj [...] ne nur estas tre praktika en la grandigo de la vort-provizo, sed estas ankaŭ karakteriza de la lingvo-familio uralo-altaja (finna, hungara, turka, japana). Tiu genia kaj perfekte logika sistemo ne nur faciligas la senliman grandigon de la vortaro (permesante tiel la esprimon de la plej subtilaj literaturaj nuancoj), sed ankaŭ la antaŭvidon, far-de la lernanto, de la formo, kiun koncepto havas [en la lingvo], kaj la analizon de vorto antaŭe neniam renkontita, deduktante tiel ĝian precizan kaj korektan signifon.”¹³⁸

Tio, alivorte, signifas, ke la vortformada sistemo de Esperanto estas tre produktiva. Ĉu tio veras?

Laŭ la germana specialisto pri komputora lingvistiko H.D. Maas, en Esperanta teksto el 25’500 vortoj, oni trovas average 2’800 malsamajn radikojn. Tio signifas, ke ĉiu radikoj “produktas” average 12,6 derivaĵojn¹³⁹.

¹³⁷ JANTON, cit., 1973, p. 49-81.

¹³⁸ PEI, “Cercasi...”, 1972/178, p. 11.

¹³⁹ H.D. MAAS, “Kvanta karakterizo de vortara riĉeco de tekstoj”, en: “Scienca Revuo”, 1973/2-3.

El alia vidpunkto studis tion la finna planlingvisto Vilho Setälä¹⁴⁰. Li ellaboris statistikon, en kiu li ekzamenis la kvanton da vortojn, kiujn oni devas scii en la angla kaj en Esperanto, se oni volas legi kaj kompreri tekston averaĝe malfacilan en ambaŭ lingvoj.

Jen la tabelo

Lernitaj anglaj radikoj		Lernitaj Esperantaj radikoj		Procentaĵo de nekonataj radikoj trovotaj en la teksto
1400		550		16% kompreno neebla
2350		790		10% kompreno malfacila
3000		965		7% kompreno ebla, sed pena
4700		1400		3,2% kompreno averaĝa
7000		2000		1,0% bona kompreno
10000		2800		0,25% tre bona kompreno
-?-		3000		0.15% elstara kompreno

Tio signifas, ke, ekzemple, se lernanto volas legi averaĝe malfacilan tekston en la angla sen troa peno (do serĉante en la vortaro nur 2-3 vortojn el 1000), li devas koni 10'000 malsamajn vortojn en la angla. Se li volas atingi la saman rezulton en Esperanto, sufiĉos al li la scio de 2'800 vortoj malsamaj.

Ni rimarku ĉi tie, ke ĉiu unuopa "malsama" angla vorto estis konsiderata kiel unuo: t.e. oni ne atentis pri la fakto, ĉu la koncerna vorto havas nur unu aŭ plurajn sencojn, kaj oni ne atentis pri la anglaj idiomatismoj.

Ni do klare konstatas, ke Esperanto estas multe pli efika per malpli da klopodo ol la angla: ĝi do estas multe pli ekonomia ol la angla mem.

Bedaŭrinde, analogaj studoj pri Interlingua komplete mankas.

6.5. Por kompara planlingvistiko

Orientgermana lingvisto, Viktor Falkenhahn, lastatempe proponis metodon per kvantigi la lingvokomparon. Tiu metodo estas aplikebla al etnaj kaj al artefaritaj lingvoj¹⁴¹. Laŭ Falkenhahn, oni povas dividi la lernendan materialon de lingvo en unuoj, kiujn li nomas "lern-unuoj" (*Lerneinheiten*) Tiuj unuoj estas pure formalaj: kvankam kalkulataj kiel unuopaj unuoj, ili povas esti pli aŭ malpli facilaj. Konkrete: la lernunuoj necesaj por lerni la germanan estas la samaj por italo aŭ por nederlandano, sed tute certe tiuj samaj lernunuoj estas pli facile lerneblaj far-de nederlandano ol far-de italo, ĉar la nederlanda sufiĉe similas al la germana.

¹⁴⁰ Vilho SETÄLÄ, "La genio de Zamenhof: efekta lingvo", en: "Memorlibro", cit., p. 43.

¹⁴¹ Viktor FALKENHAHN, "Zur Frage einer Welthilfssprache: Ein Vergleich der Lerneinheiten im Deutschen und im Esperanto", en: "Der Esperantist", 1973/59-60.

Falkenhahn povis demonstri, ke tiu segmentado en lernunuoj estas kvantigebla rilate la fonetikajn, fonologiajn, ortografiajn, fleksiajn kaj sintaksajn unuojn. Nekvantigeblaj, kontraŭe, restas la vortaro, kaj granda parto el sintagmatiko.

Li proponas, kiel ekzemplon, la lern-unuojn, kiuj koncernas la fonetikon de la germana lingvo. Ili estas 25:

1. En la vortoj plej ofte oni akcentas la radikosilabon, kiu plej ofte estas la unua (*Väter*).
2. En kelkaj vortoj, la dua radiksilabo estas akcentata (*Hornisse*).
3. En kelkaj malmultaj vortoj, ne la radiksilabo, sed la prefikso estas akcentata (*ābschreiben*).
4. Ekzistas, ĉe vokaloj, tri longoj: longaj, mallongaj kaj tre-mallongaj, ofte nur murmurataj vokaloj (*wert, Berg, gelobt*).
5. Longaj vokaloj estas fermitaj; mallongaj estas malfermitaj; ĉe murmurataj vokaloj, la tonkvalito estas praktike ne konstatabla.

ktp. (laŭ la teksto), ĝis 5 unuoj.

Koncerne Esperanton, la lern-unuoj estas nur kvar:

1. En la vortoj, akcentata estas ĉiam la antaŭlasta silabo.
2. La vokaloj estas mezlongaj.
3. La vokaloj estas duone malfermitaj.
4. Sonoraj konsonantoj restas sonoraj, ankaŭ se ĉe vortmallongigoj ili troviĝas ĉe vortofino (birdo – bird’).

Per analoga tekniko, Falkenhahn provis starigi komparan tabelon:

	Lernunuo en germana llingvo	Lernunuo en Esperanto
Fonetiko kaj ortografio	25	4
Deklinacio (adjektivo kaj substantivo)	89	12
Konjugacio (sen la participoj)	44 (sen la malregulaj verboj)	9 (nekonsiderinte la finaĵon -os)
Verbdevenaj substantivoj	Nenombrebale multaj	-i iĝas aŭ -ado, en ĉiu kazo
Sintagmo-kunmeto	Dependas de la vortaro, do: senlima	Principe sen apartaj problemoj

Falkenhahn evidencigas la fakton, ke estas neeble kvantigi la sintagmo-formadon al limigita kvanto da lernunuoj. Tion kaŭzas la ekzisto (en la germana lingvo) de sennombraj idiotismoj, kiuj mankas en Esperanto.

Tiel, en germana oni devas diri:

Abschied nehmen, kaj ne *bewirken*, aŭ *machen* (adiaŭi);
Liebe erweisen, kaj ne *machen*, aŭ *antun* (montri amon);
Leid tun (aŭ: *antun*), kaj ne *machen*, *erweisen* (dolorigi);
ktp., nekalkuleble.

Ni ne scias, kiel kondukus Interlingua, en tia komparo. Estas tamen kurioze: prof. Falkenhahn ellaboris metodologion por kvantigi komparojn interlingvajn, kaj en tiu metodologio ĝuste la granda sinlaŭdo de Interlingua, la vortaro, montrigas nekvantigebla.

6.6. Konkludo

Ni povas konkludi kun prof. Spitzbart¹⁴², ke la studo de Esperanto instruas al ni du aferojn:

1. Kiamaniere internacia lingvo konscie kreita ekzistas de post jaroj en la praktiko: tiu lingvo, Esperanto, respondas al la postulatoj plej gravaj, kiujn oni proponas al la internacilingva komunikado.
2. Due, oni konstatas, ke planlingvo povas disvolviĝi, se ĝian uzon postulas sociaj kaŭzoj (faktoroj).

Tial, aldonas Spitzbart, la origina projekto de d-ro Esperanto iĝis planlingvo evolukapabla, esprimriĉa kaj tre fleksebla¹⁴³.

¹⁴² SPITZBART, "Weltsprachen... ", 1973/6, p. 638.

¹⁴³ SPITZBART, "Weltsprachen... ", 1973/6, p. 636-637.

7. Kritikoj pri Esperanto

7.1. Enkonduko

Probable ekzistas en Esperanto neniuj morfemoj, neniuj reguloj, kiuj kritikoj ne tuŝis. Verŝajne pro tio, ke Esperanto estas la plej malnova el la uzataj lingvoprojektoj, kaj ke ĝi estas la planlingvo plej larĝe disvastiĝinta. Certe, ne ĉiuj kritikoj havas la saman valoron. Laŭ mia opinio, kritiko pri lingvoprojekto devas esti farita interne de la limoj starigitaj far-de la konstru-principoj de la planintoj mem. Mi klarigas mian penson.

Formala kritiko pri Esperanto efektivigita far-de novlatinoidista planlingvisto sur la bazo de la novlatinoidismaj tezoj mem estas, laŭ mia opinio, senvalora. La kaŭzo estas facile divenebla: Esperanto estis konstruita tute certe ne laŭ la principoj de novlatinoidismo, do estas klare, ke ĝi ne respektas ilin. Laŭ mi, la procedo estas alispeca: unue, estas necese, ke la novlatinoidisma kritikemulo kritiku la principojn de ĝenerala lingvo-filozofio kaj lingvopolitiko, kiujn adoptis la aŭtonomlingvaj planlingvistoj, kaj la konsekvencajn planado-strategiojn kaj -taktikon, klopodante demonstri, ke tiuj ĝeneralaj principoj, kaj iliaj konsekvencoj, estas neadekvataj kaj nerealistaj. Poste, sed nur poste, li povos kritiki la lingvon mem, montrante, kien kondukas principoj eraraj (kondiĉe, ke oni povis ilin demonstri tiaj), kaj eventuale montrante la ekziston de planada malkohero (t.e. planada malkongruo kun la bazaj principoj).

Tiun kritiko-metodologion kelkaj kritikistoj de Esperanto ne respektas. Ili komparas trankvile Esperanton kaj Interlinguan, kvazaŭ Zamenhof havintus la samajn celojn kiel la aŭtoro de Interlingua, Alexander Gode. Ili forgesas, kion skribis la konata soveta lingvisto Grigoriev¹⁴⁴:

“La kritiko pri Esperanto estas unu el la taskoj plej gravaj de interlingvistiko, sed ĝi devas konsideri ankaŭ la realajn faktojn kaj la originon de artefarita lingvo”.

Alia aspekto grava, pri kiu la Esperanto-kritikistoj devus atenti, estas la jena (cetere ligita al la supra): en Esperanto, la selekto de morfemoj estas sekundara (dependa) je la lingva strukturo. Tio signifas, ke, por esperantisto, la selekto de difinita radiko por nova koncepto dependas jes - sed ne nur - de ĝia internacieco. Aliaj kriterioj de lingvostruktura nivelo estas plue priatendaj, i.a. la lukto kontraŭ homofonoj, la neceso klare distingi inter paronimoj, la graveco de la fakto, ke nov-enkondukita morfemo glate integriĝu en la Esperanto- strukturo, kie “ĉio kunligiĝas”, ktp.

Lasta observo: ĉi tiu studo konceptiĝis kiel kritiko pri la filozofio de Interlingua, unue; due, kiel kritiko pri la lingvoprojekto mem. La celo prezenti Esperanton estas nur flanko. Sed ĉar niaj amikoj de Interlingua tre insistas pri kritiko je Esperanto, estos oportune, ke ankaŭ mi ĝin pritraktu¹⁴⁵.

7.2. La skibsistemo de Esperanto

Unu el la plej karakterizaj trajtoj de Esperanto estas ĝiaj supersignitaj literoj: ĉ/c, ĝ/g, ĥ/h, ĵ/j, ŝ/s, ŭ/u. Estas vere, ke pluraj presejoj ne posedas tiujn kromliterojn, kaj pro tio Zamenhof mem, en la Fundamento, proponis relative praktikan sistemon por ilin anstataŭi (per postmetita h, escepte ĉe ŭ, kiu restas senĉapela: ch, gh, hh, jh, sh, u)¹⁴⁶.

Povas esti, ke tiu rimedo ne plaĉas. Tiam, aliaj rimedoj estas neoficiale uzebblaj. Ekzemple la komputoroj, en kiuj la uzo de “h” en du funkcioj estas ĝena, uzas du malsamajn sistemojn: aŭ

¹⁴⁴ V.P. GRIGORIEV, "Alcuni problemi d'interlinguistica", en: "Pensiero e linguaggio in operazioni", 1971/5 (kun apuda anglalingva traduko).

¹⁴⁵ BERGER, "Esperanto o Interlingua", 1972, p. 1-7.

¹⁴⁶ ZAMENHOF, "Fundamento". 9-a eld. 1963, p. 51.

punkton post la koncerna litero (c., g., h., j., s., u.), aŭ la literon x (kiu en Esperanto ne ekzistas, kaj do estas uzebla sondistinge): cx ĉ, gx ĝ, hx ĥ, jx ĵ, sx ŝ, ux ŭ). Aliaj sistemoj estis ellaboritaj, kaj kelkaj montriĝis pli taŭgaj ol la iama Zamenhofa propono.

Sed pri tiuj sistemoj neniu Interlingua-isto parolas. kelkaj el ili asertas, ke dum 60 jaroj ili nenie sukcesis trovi tekston en Esperanto en la ĵurnalaro, ke la Zamenhofa sistemo povas prezenti nur malkompletan Esperanton (kio estas malvera, sendepende de la fakto, ĉu tiu sistemo plaĉas aŭ ne), ke la fakturo de tiuj, kiuj volas ion presi en Esperanto kreskas ekstermezure, kaj ke, fine, tiu idiomo kaŝludas kun sia publiko pro nepresebleco¹⁴⁷.

Probable, la situacio estas fakte multe malpli drameca, ol kelkaj Interlingua-amikoj imagas. Unue, la circonfleksaj (supersignitaj) literoj estas tre komfortaj kaj utilaj: ekz-e, ili permesas la rekonon de vorto kaj skribe kaj voĉe. Tiel, *ĉasta* estas rekonebla prò la formo al italo (kiu skribas: *casta* /kasta/), kaj pro la sono al franco (kiu diras: *chaste* /ŝast/). Estas vere, ke tiuj literoj havigas al Esperanto iom slavan aspekton, sed kial ne, se tio montriĝas utila, kondiĉe ke oni ne suferas pro danĝera malsano: kronika antislavismo. La novaj pres-sistemoj permesas utiligi trankvile la supersignitajn literojn: la IBM-Composer havas ilin, ofseto permesas ilin facile reprodukti.

Antaŭ 70 jaroj, kiam oni lanĉis la unuajn simbolojn de *Internacia Fonetika Asocio* (API), ne ĉiuj tipografioj posedis tiujn signojn. Nun ili iĝis tiel gravaj, ke preskaŭ ĉiu presejo en la mondo - se ĝi estas specialigita - ilin posedas. Kaj eĉ se ili mankas: oni povas tre bone anstataŭi ilin valide kaj klare, kiel oni faras por Esperanto.

Temas pri disvastiĝo-problemo: se Esperanto populariĝos pli ol nun, la utiligo de ĝia skribsistemo iĝos ĉiam pli vasta, kaj la posedo far-de presejoj je supersignitaj literoj iĝos utila kaj rento-produktanta.

Ni vere ne komprenas, kial la ŝtato devus okupiĝi pri la kostoj aĉeti supersignitajn literojn. Fakte, la studmaterialo por Esperanto jam ekzistas. Tiu certe ne estas la kazo de Interlingua. Se oni ekz-e volus enkonduki Interlinguan en la lernejojn, oni devus krei la tutan didaktikan materialon *ex novo* (el nenio). Kaj tiam ĝuste la ŝtato devus ĉion pagi¹⁴⁸!

7.3. Eŭfonio (belsoneco) kaj planlingvo

La belsoneco de lingvo estas afero ege subjektiva. Ekz-e, la alemana (svisgermana) dialekto aspektas mis-sone je la oreloj de tiĉinanoj, kiuj, siavice, tute ne konscias pri la fakto, ke ĝuste ilia dialekto sonas mise je la oreloj de (i.a.) toskanoj. Tamen estas certe, ke la ripeto de kelkaj sonoj aŭ songrupoj povas esti sentata kiel malagrabra fare-de homoj, kiuj ne jam kutimiĝis al la koncerna lingvo.

Estas ja fakto konata, ke, se ni kutimiĝis al unu lingvo, alia lingvo, ĝistiam neniam aŭdita, povas sone aspekti “malagrabra”, ĉar ĝi ŝokas niajn aŭd-kutimojn. Tiu estas tre ĝenerala psikologia sinteno, kiu i.a. kredigas al ni, “ke nia lingvo estas la sola eŭfonia, dum ke la ceteraj ‘fremdaj’ lingvoj havas la jenan aŭ la alian difekton”.

Dua rimarko: lingvo misprononcata estas ĉiam malbela. Esperanto misprononcata estas same malbela, kiel misprononcata Interlingua.

¹⁴⁷ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 2.

¹⁴⁸ Berger, samloke, p. 4.

Tria rimarko: estas konate, ke skribantoj povas skribi tekstojn, kiuj je la lego montrigas missonajn. Tio dependas, evidente, de la skribanto mem, ne de la lingvo: *Quandoquidem dormitat Homerus euphonicus* (= Jen kaj jen dormadetas la eŭfoniema Homero, kaj faras erarojn j), ĉu ne ?

Du akuzojn faras la Interlingua-istoj al la belsoneco de Esperanto: la unua, estas la diftongo-riĉo; la dua, estas ĝiaj “pezaj” formoj.

A

Ĉu vere en Esperanto ekzistas tro multe da diftongoj? Sed ja, la defendantoj de la sanktega greka-latina heredaĵo plendas pro la fakto, ke Esperanto similas ĝuste al la helena (antikva-greka lingvo). Jen fragmento hazarde prenita el verko de Ksenofonto¹⁴⁹ en iom simpligita transskribo per Esperanta aboco. La nigregrasaj vokaloj surhavas la tonikan akcenton. Kelkaj vortoj ne havas akcenton, ĉar ili apogiĝas al la sekvanta vorto. /th/ korespondas al la angla digrafo /th/.

Ej de tines Sokrates nomizoŭsin, hojs enioj grafoŭsi te kaj legoŭsi peri aŭtoŭ tekmaĵromenoj, protrepsasthaj men anthropoŭs ep' areten kratiston gegonenaj, proagagejn d'ep' aŭten oŭh hikanon, skepsamenoj me monon ha ekejnolasterioŭ heneka toŭs pant' ojomenoŭs ejdenaj eroton elenĥen, alla kaj ha legon sunemereŭe tojs sundiatribouŭsi, dokimazonton ej hikanos en beltioŭs pojejn toŭs sunontas.

Esperanta traduko:

Se, tamen kelkaj (homoj) pri Sokrato opinias, kredante al tio, kion iuj pri li skribas kaj diras, (tio estas), ke li certe kapablis konduki la homojn laŭ la vojo de la virto, sed nekapablis konduki sin mem laŭ ĝi, ili bonvolu ne nur prikonsideri la jenon, nome: kiel li korektis tiujn, kiuj kredis sin ĉionsciaj, kaj kiel tion li faris per siaj konvinkaj prinescio-demandoj, sed ankaŭ, kion li ĉiutage preparolis kun siaj amikoj; tiam ili bonvolu prijuĝi, ĉu li kapablis igi siajn amikojn pli bonaj.

Greka originalo: 34 diftongoj. Esperanta traduko: nur 21.
Pluaj komentoj superfluas.

B

Ĉu vere Esperanto utiligas frazkonstruojn tro “pezajn” (malelegantajn)? Certe, se oni utiligas mizeran stilon. Multaj skribas peze kaj malelegante, en ĉiuj lingvoj. Estus eraro atribui tion malelegantecon al la lingvo mem. Temas ja pri stilo, ne pri lingvo. Krome, oni ja povas *konstrui intence* malelegantan frazon. Jen ekzemplo: frazo de Interlingua-isto Ric Berger, inter la multaj, kiujn li skribis en Esperanto.

“Bonan tagon, karaj amikoj kaj amikinoj, ĉu vi estas bone ricevintaj niaj grandajn kaj ĝentilajn leterojn, kiujn ni estis skribintaj al vi?”¹⁵⁰

Certe, ĉi tiu propozicio estas vere peza. Sed neniu iom lingvo-sperta esperantisto aŭdacus skribi ion tian. “Normala” esperantisto esprimus sin tiel: “Bonan tagon, karaj geamikoj, ĉu vi bone ricevis niajn grandajn kaj afablajn leterojn, kiujn ni skribis al vi?”.

Oni tuj havas suspekton: ke tiaj “frazoj” estas fakte artefaritaj konstruaĵoj *ad hoc* (intence konstruitaj por certa celo antaŭfiksita). Ili do nenion pravas: temas ja pri ludeto ripetebla por iu ajn alia lingvo.

¹⁴⁹ Xenophon, "Erinnerungen an Sokrates", München, Heimeran, 1962, p. 54 (dulingva eldono).

¹⁵⁰ Cetere, *ĝentila*, ĉi tie, nome en tiu ĉi kunteksto, estas sudlatina idiomatismo, neuzata en Esperanto.

Jen mallonga aĉaĵo en franca lingvo:

Six cents chasseurs sachant chasser sans chien chômeur.
/sisã ŝasoe:r saŝã sasé sã ŝje ŝo:m/
Sescent ĉasistoj sciantaj ĉasi senhunde senlaboras.

Aŭ jen io en la germana:

Ein feines kleines Fräulein weint auf einem Beil.
/ajn fajnes klajnes frojlajn vajnt aŭf ajnem bajl/
Fajna fraŭlineto ploras sur hakilo.

Kaj eĉ en Interlingua tiu ludeto estas ebla:

Mi filio haveva essite ancora parve, mais jam haveva vadite a multe locos, ubi ille haveva potite vider cosas interesante e haveva audite linguas extranee.
(pezaj kunmetitaj verboformoj : haveva ...)

Mia filo estis ankoraŭ eta, sed jam iris al multaj lokoj, kie li povis vidi interesajn aĵojn, kaj aŭdi fremdajn lingvojn.

Aŭ jen la missonaĵo:

Sisyphos sasiva sex setasos qui jammais esseva in su possession.
/sizifos saziva seks setasos kŭi ĵamajs eseva in su posesjon/
Sizifo kaptis ses kribriilojn, kiuj neniam estis lia posedaĵo.

Aŭ jen alispeca:

Io commenta, que, si on labora contra le vento, on absolument non pote augmentar le rendimento, sin un crecimiento de alimentos.
(troa abundo de nazaj kunmetaĵo, kiel -ent-)

Mi komentas, ke, se oni laboras kontraŭ la vento, oni tute certe ne povas pliigi la laborkapablon, se oni ne pliigas la nutraĵojn.

Bone: nun, post kvinminuta malstreĉiĝo per preskaŭ infanaj ludoj, ni transiru al pli interesaj aferoj.

7.4. La karakterizaj finaĵoj

Ni scias, ke en Esperanto ekzistas specialaj *karakterizaj finaĵoj*, kiuj indikas la apartenon de vorto al difinita gramatika kategorio (do indikas ĝian gramatikan rolon) interne de propozicio. La ekzistokialo de tiuj finaĵoj estas la malnova demando pri strukturo-ekonomio en lingvo. Ni vidu.

La gramatikaj kategorioj ekzistantaj en Esperanto (substantivo, adjektivo, verbo, adverbo, ktp.) ekzistas ankaŭ en Interlingua. Se iu lernas Esperanton aŭ Interlinguan, elirante el lingvo, kie tiuj kategorioj estas nekonataj, tiu havos precize samajn malfacilaĵojn kompreni, pri kio temas (t.e. kompreni, kiu estas la funkcio de tiuj kategorioj en la ekonomio de lingvo).

Sed la analogeco haltas ĉi tie: dum ke Esperanto “markas” ĉi tiujn kategoriojn per speciale karakteriza finaĵo, starigante tiel senpere konstateblan rilaton inter koncepto (funkcio) kaj formo

(morfemo), en Interlingua, kiel cetere ankaŭ en la franca, sama funkcio (sama gramatika kategorio) povas ricevi nenombreblajn finaĵojn, kiuj do neniel estas karakterizaj.

Ekzemple, la markilo Esperanta de la de-verba substantivo (ekz-e: la substantivo *invento* el-de la verbo *inventi*) estas -o. En Interlingua ni havas pli ol unu:

-ita	(ridita),	rido
-ata	(pensata),	penso
-ation	(renovation),	renovigo
-ition	(reddition),	redono
-ition	(propension),	emo
-ion	(invention),	invento
-age	(acierage),	ŝtalizo
-eria	(braveria),	defio
-amento	(abandonamento),	forlaso
-ura	(pictura),	pentro
-a	(responsa),	respondo

La markilo de la substantiv-devena adjektivo, en Esperanto, estas -a. En Interlingua, inter la multaj, kiujn ni vidos detale pli poste, ni konas la jenajn:

-al	(national),	nacia
-il	(civil),	civila
-il	(mobile),	movaa
-ose	(mysteriose),	mistera
-ic	(systematic),	sistema
-in	(marin),	mara
-ian	(parisian),	pariza
-ante	(interessante),	interesa
-ual	(sexual),	sexa
-estre	(terrestre),	tera
-erne	(fraterne),	frata

Io estu klara: la selekto el ĉi tiuj afiksoj, kiuj ĉiuj havas la saman gramatikan funkcion, ne estas arbitra, sed dependas de la formoj jam ekzistantaj en la novlatinaj lingvoj.

Jen demando: kial oni devas trudi al internacia lingvo ne nur la ĉeeston de malfacilaj kategorioj gramatikaj, sed ankaŭ la devigon utiligi multnombrajn finaĵojn (markilojn), kiuj signifas finfine ĉiuj samon, kaj kies uzo dependas ne de la rezono aŭ de la senco, sed de la lingvaj kutimoj de Okcidenta Eŭropo?

Povas esti, ke tiuj markiloj ne ekzistas an aliaj etnaj lingvoj. Sed kial la homo ne havas la rajton simpligi tion, kio estas malfacila, raciigi tion, kio ne estas tia, kaj, lastanalize, korekti la naturon pere de la ĝeneraligo de la procedoj, kiujn la naturo mem disponigas al li?

La sistemo de Esperanto estas tiel simpla, racia kaj ekonomia kaj klara, ke ĝin adoptis L. Tesnière en sia priskribo de la struktura sintakso de la franca lingvo¹⁵¹. Tesnière mem klarigas en sia verko, ke li elektis la Esperantajn finaĵojn (-o, -a, -i, -e), pro ilia celkonformeco, kaj difinas Esperanton “la pli-malplia averaĝo de la malsamaj eŭropaj lingvoj”.

Ankaŭ ĉi tie ni rimarkas do, ke Esperanto, finfine, estas la kvintesenco de la eŭropaj lingvoj, kiu atingis nivelon de taŭgigo kaj normigo, kiu kontaktigas kaj rilatigas ĝin al la ne-eŭropaj (aglutinaj, izolaj) lingvoj.

Kial do malakcepti tiel racian kaj tiel internacian strukturon, ĝin anstataŭante per malfacila sistemo, kiu krome estas malekonomia, netrasidebla, ofte malkohera, kopiita el la latinida sistemo (kaj pro tio ne malpli arbitra ol tiu de Esperanto - laŭ la De-Saussure-a senco)?

7.5. La “akuzativo”

Oni scias, ke Esperanto markas en la propozicio la funkcion “rekta komplemento de transitiva verbo” per la morfemo -n. La amikoj de Interlingua opinias, ke tio estas neutila¹⁵².

En tia verko, mi ne volas insisti pri la graveco de markilo akuzativ-indika (markilo, kiu opoziciigas la objekton al la subjekto): la lingvistikan signifon de tia ilo substrekis elstare Gaston Waringhien en eseo, kiu meritas tradukon nacilingvan¹⁵³.

Se mankas tia ilo povas esti grava. Mi insistas pri la fakto, ke temas pri *ilo*: efektive, la “rekta komplemento de transitiva verbo” neeviteble ekzistas ankaŭ en Interlingua. Ĝia perdo estas grava:

1. La lingvo iĝas rigida, la propozicio estas praktike neniam renversebla, stilefektoj maloftiĝas.
2. La “rekta” ordo en la frazo (subjekto-verbo-objekto) estas deviga. Sed, ĉar ĝi ne estas ĉiuokaze konservebla, tamen mentriĝas necese krei alispecajn akuzativo-indikilojn. Vi povas provi forĉasi la naturon per forko, ĝis tamen tiam, kiam ĝi retrovenos). Ni vidu kiel:

A

Kelkaj vortoj estos reprezentataj per du malsamaj morfemoj: unu estos la “varianteo” por la subjekta formo, la alia por la objekto. Tio evidentiĝas, ke ankaŭ la lernanto de Interlingua devas koni la kategorion “objekto” (do estas propaganda eraro aserti, ke en Interlingua *ne* ekzistas la akuzativo). Ekzemple:

io	(mi)	/	me	(min);
tu	(ci)	/	te	(cin); ...
qui	(kiu)	/	que	(kiun); ktp...

Bedaŭrinde, en Interlingua ĉe la personaj pronomoj ne-subjektaj oni konfuzis la funkcion “objekto” kun la funkcio “al-komplemento” (dativo):

Se “io” signifas “mi”, “me” signifas kaj “min” kaj “al mi” (latine, respektive: “me” kaj “mihi”),

¹⁵¹ Lucien TESNIÈRE, "Elements de syntaxe structurale", Paris, Klincksiek, 2-a eld. 1969, p. 64.

¹⁵² BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 2.

¹⁵³ WARINGHIEN, "Lingvo kaj vivo", 1959, p. 150-164.

Ekz-e:

Ille “te” (latine: te) invia a tu patre.

Li “cin” sendas al cia patro.

Aliflanke:

Ille “te” (latine: tibi) invia un epistola.

Li “al ci” sendas leteron.

Ni konstatas, ke la klara kaj ne miskomprenebla heredaĵo greka-latina, ĉi tie, estis anstataŭata per novlatinida konfuzo. Kaj, ĉi-loke, ĝuste Esperanto konservis tiun klareco- kaj kohero-heredaĵon.

B

En aliaj kazoj, la anoj de Interlingua tutsimple lingve demisias, kaj proponas al ni “solvojn”, kiuj estas nuraj parolataĵoj (*flatus vocis*). Demandu al Interlingua-isto, kiel ni distingu en Interlingua la du jenajn Esperantajn propoziciojn:

Mi trovis la vinon bonan (“bona” estas atribua adjektivo)

Mi trovis la vinon bona (“bona” estas apozicia adjektivo).

Li simple respondos, ke estas oportune “sekvi la uzon de la franca lingvo”. Mi vere volus vidi japanon aŭ ĉinon elkotiĝi per tia konsilo. Ĉar ĉi tiu “konsilo” enkondukas en planlingvon tre komplikajn konsekvencojn je la sintaksa nivelo kaj je la nivelo de la rilatoj inter substantivo kaj adjektivo: por multaj popoloj, fakte, tiuj rilatoj estas jam sufiĉe komplikaj en la relative simpla formo, en kiu ili prezentiĝas en Esperanto.

Oni ne povas ne suspekti, ke la homoj, kiuj donas tiajn “konsilojn”, estas latinidlingvaj unulingvuloj.

7.6. La plurala morfemo

Niaj Interlingua-amikoj¹⁵⁴ ne ŝatas la pluralan morfemon de Esperanto (-j). Kurioze: la sinproklamintaj defendantoj de la greka-latina heredaĵo ŝajnas ne scii, ke la plej utiligataj pluralfinaĵoj de la greka lingvo estis *-oj* kaj *-aj* (*-ojs* kaj *-ajs* en la dativo, kaj *-ojn* kaj *-ajn* en la oblikvaj kazoj de dualo).

Laŭ kelkaj Interlingua-istoj¹⁵⁵ la finaĵo *-j* ne havas ekzistokialon, ĉar la finaĵo *-s* (uzata en Interlingua) estas familiara al tridek civilizitaj nacioj.

Mi varme esperas, ke oni ne intencas per tio aserti, ke la “nacioj”, kiuj ne utiligas la morfemon *-s* por indiki la pluralon, ne estas civilizitaj. Ĉar en tia kazo la parolata franca lingvo estus lingvo de necivilizita popolo, cetere, kune kun la itala, la hispana de Sudameriko kaj de partoj de Hispanio (kie oni prononcas /h/ anstataŭ /s/), la germana, la skandinavaj lingvoj, la rusa, la ĉina, la japana, ktp.

La finaĵo *-s* estas fakte tipa nur por la *skriba* franca lingvo. La parolata franca lingvo, por formi la pluralon, utiligas aliajn rimedojn. Ĝenerale, temas pri transformiĝo de la artikoloj: la singularaj /l^o/ kaj /la/ iĝas /le/ (aŭ: /lez/), kaj /uⁿ/ kaj /iⁿ/ iĝas /de/ (aŭ /dez/). Kelkfoje, la pluraligata vorto mem transformiĝas, kiel /animal/ (animal: besto), kiu iĝas /anim^o/ (animaux: bestoj), /urs/ (ours:

¹⁵⁴ BERGER, "L'esperanto...", 1975, p. 2.

¹⁵⁵ BERGER, samloke, p. 2.

urso) kaj /ur/ (ours: ursoj), k.a. Kelkfoje intervenas sandhi-fenomenoj: nome, en kazo de pluralo, oni aldonas -z-sonon inter du sinsekvaj vortoj. Ekz-e:

L'appareil automatique (/1 aparej otomatik/, la aŭtomata aparato)
iĝas

Les appareils automatiques (/le-z-aparej-z-otomatik/, la aŭtomataj aparatoj).

Laŭ mi, la problemo estas ĉiam la sama. La malfacilo de gramatika kategorio estas la kompreno pri ĝia uzo: se iu lernas Esperanton aŭ Interlinguan elirante el lingvo, kiu ne konas la kategorion “pluralo”, li havos malfacilaĵojn. Sed ekde kiam li estos kompreninta ĝin, li fajfos pri tio, ĉu la finaĵo estas -j aŭ -s. Probable li estos kontenta, ke al la malfacile lernita kategorio korespondas *nur unu morfemo* (-j aŭ -s), kaj ne pluraj, kiel en la itala: *morfemo nul* (virtù = virtoj), *-i* (nazioni = nacioj), *-e* (case = domoj), *-a* (dita = fingroj), la verbfinaĵoj en la plurala formo, la neregulaj pluraloj.

7.7. Relativoj

Oni scias, ke Zamenhof, laŭ la ekzemplo de pluraj naturaj lingvoj (i.a. de la rusa kaj de la helena), grupigis iujn vortojn (pronomojn, adjektivojn, adverbojn), montriĝantaj sufiĉe ofte en la enuncaĵoj, en tabelon, kie tiuj vortoj estas troveblaj kun formaj similaĵoj, al kiuj korespondas analogaj signifaj similaĵoj.

Temas do pri “mikrosistemo” interne de la lingvo (“makrosistemo”), kiu naskas 45 malsamajn “memeksplikajn” vortojn, Ilin multaj divers-skolaj planlingvistoj kritikis.

Iuj asertis, ke tiuj vortoj – kiel tiaj - ekzistas en neniu lingvo. Tio estas vera: *ties*, *nenial*, ktp. estas sistem-interne motivitaj (memeksplikaj), kaj ne tra etimologia esploro.

Iuj asertas, ke la sistemo mem, t.e. la tabelo, estas apriora, ĉar neekzistanta en naturaj lingvoj. Tio estas malvera: amikoj de la grek-latineco povas trankvile ignori, ke tia sistemo ekzistas ankaŭ en la rusa, sed ili devas scii, ke ĝi ekzistis ankaŭ en la antikva-greka, kie ĝi naskis multe pli ol nur 45 vortojn, kiel en Esperanto. Kial Zamenhof ne rajtis adopti tiun grekan sistemon (kiu neniel ekzistas en Interlingua), igante ĝin iom pli sistema?

Sed la tria kritiko estas pli “scienca” en tio, ke ĝi estas verifikebla - aŭ falsifikebla. Oni ja agnoskas, ke tia sistemo ekzistas en la rusa, en la helena, kaj en aliaj lingvoj, sed oni ĝin rifuzas en planlingvo, ĉar la tiel memeksplikaj vortetoj estas tro malfacile memoreblaj (do rekoneblaj kaj praktike utiligeblaj).

Ĉu tio veras ? Ni vidu.

En 1933 aperis en Usono la rezulto de studo organizita fare de IALA mem (la asocio, kiu pli malfrue naskis Interlinguan) ĉe la Columbia-Universitato pri la korelativoj¹⁵⁶. Jen eltiraĵoj.

“Dudek studentoj de la Universitato, kiuj antaŭe aparte sciis nek Esperanton nek Idon (lingvo en kiu la korelativotabelo estis anstataŭata de latinecaj vortetoj sen formala rilato, kiel ankaŭ en Interlingua), lernis la 45 korelativojn de Esperanto kaj la korespondantajn vortojn de Ido dum 90 minutoj por ĉiu lingvo. Dek lernis la Ido-vortojn la 4-an de januaro, kaj la Esperanto-vortojn la 5-an. La 6-an de januaro okazis ekzameno: la averaĝo de ĝustaj vortoj el la 45 proponitaj en la planlingvoj por

¹⁵⁶ "Language Learning, Summary of a Report to the IALA in the US, Incorporated by Division of Psychology Institute of Educational Research Teachers College", Columbia University, New York, 1933, p. 12-13 kaj 17.

angligo estis 44 por Esperanto kaj 43 por Ido; sed la averaĝo de planlingvaj vortoj memoritaj surbaze de 45 anglaj korelativoj estis 32 por Esperanto kaj 15½ por Ido.”

La aŭtoroj konkludas tre interese: “La sistemo de Esperantaj korelativoj estis kritikita kiel artefarita, tro sistemeca kaj malfacila. Nia pritrakto kaj niaj personaj spertoj puŝis nin al ioma simpatio por tiuj kritikoj, sed pli detalaj eksperimentoj kondukis nin al dubo pri ilia valideco”.

Permesu lastan observon: laŭdire, Interlingua estas ido de la IALA-laboroj Do, se montriĝis, ke la korelativa sistemo de Esperanto estas pli taŭga ol alispeca, ĝi certe devus ĝin posedi. Sed ne: la korelativoj de Interlingua estas senrilataj unuj kun la aliaj. Tiu estas unu el la multaj pruvoj, ke Interlingua fakte nenion profitis de la sciencaj IALA-laboroj, ĉar ĝi estas ido ne de IALA-sciencistoj, sed de unu sola el ili: Alexander Gode.

7.8. La radiko-selekto en Esperanto

Du kritikojn oni kutimas fari al Esperanto. Unuflanke, koncerne la radiko-selekton en la vortaro de Esperanto, kelkaj supraĵaj kritikistoj, kiuj malmulton scias pri ĝia strukturo, asertas, ke la Internacia Lingvo estas tro “okcidenta”: tio signifas, ke, laŭ ili, la radiko-selekto efektiviĝis surbaze de tro limigita lingvo-nombro. Tiu certe ne estas la kritiko de niaj Interlingua-amikoj, kompreneble.

Ili, kontraŭe, kritikis la fakton, ke Esperanto ne estas sufiĉe “latineca”. Ili skribas “internacia”, sed ili komprenas per tiu vorto ion tute alian. Laŭ la esperantistoj, oni devas atente distingi inter “internacieco” kaj “latineco” de lingvo: Esperanto, en sia vortaro, estas lingvo tre internacia, kvankam (ĉi tie niaj Interlingua-amikoj pravas) ne tre latineca.

Laŭ studo de Claude Piron¹⁵⁷, la vortaro de Esperanto estas esence hindeŭropa. Kontraŭe, la vortaro de Interlingua estas esence okcidenta¹⁵⁸, ĉar en la starigo de la vortaro de Interlingua oni intence ne priatentis la slavajn lingvojn.

Certe, en tiu hindeŭropa vortaro la parto plej internacia estas grandparte okcidentdevena: latinidaj vortoj trovigas nuntempe en la araba, en la ĉina, en la japana: proksimume en ĉiu lingvo, kies parolantoj ekkontaktis, iel aŭ tiel, la okcidentan mondon. Tiu estas fakto, kiun oni povas nei¹⁵⁹. Sed se ali-lingvuloj adoptis unuopajn vortojn, ili tamen neniam adoptis la tipajn strukturojn de la okcidentaj lingvoj. La plej evidenta ekzemplo estas la piĝina (*pisin*) lingvo kun kreol-malezia strukturo, sed kun vortaro preskaŭ tute angla, kiu iĝis lastatempe la oficiala lingvo de la nova stato Njuginio (Novgvineo)¹⁶⁰.

Cetere, ankaŭ, interesa estas la hazardaj form-koincidoj de vortoj. Cetere, ne ĉiam temas pri hazardaĵoj: Zamenhof ilin antaŭvidis, kaj ilin utiligis en la konstruo de sia lingvo. Tiamaniere, ekzemple, Esperanta *kelka* venas de la franca *quelque* (pr.: /kelk/), sed koincidas kun la pola *kilka*. Esperanto *domo* povus veni de la latina *domus*, kaj tial esti malpli internacia ol la itala *casa* (ankaŭ hispana), sed tio estas malvera: en la rusa oni ja diras *dom*, kaj en la ĉeĥa *dum*¹⁶¹.

¹⁵⁷ PIRON, "(Lettre ouverte)", 1975, p.2.

¹⁵⁸ BERGER, "L'esperanto...", 1975. p.2.

¹⁵⁹ Jean-Louis CALVET, "Linguistique et colonialisme. Petit traité de glottophagie", Paris, Payot, 1974.

¹⁶⁰ Kenneth G. LINTON, "Kanakano el Kanakam", Rickmansworth, The Esperanto Publishing Co., 1960.

¹⁶¹ BERGER, "L'esperanto...", 1975. p.2.

Prof. Berger, elstara reprezentanto de Interlingua, subtenas la opinion, ke en Esperanto unu triono de la vortoj estas inventita, unu triono deformita (kripligita) kaj nur unu triono estas “natura” (t.e. novlatinida)¹⁶².

Unue ni rimarku, ke eĉ inventitaj vortoj povas vivi: ekz-e, *gazo*, *radaro*, *ĵipo*, ktp¹⁶³. Due, kelkfoje “kripligo” povas esti utila. Tiel, ekz-e, la vorto *mieno* estas “kripligo” de la franca vorto *mine*, laŭ la ekzemplo, kiun donas la grafia aspekto de la samsignifa germana vorto *Miene*, por eviti homofonon (samsonan sed malsamsignifan vorton) kun *mino*. Sed tiu “kripligo” estas avantaĝa, ĉar ĝi kondukas la vorton proksimen al la ĉina *mijen*, kiu estas samsenca¹⁶⁴.

Sed la tuta kritiko sur la bazo de “trionoj” estas science ne subtenebla, Faktaj esploroj proponas tute malsamajn rezultojn.

Ebbe Vilborg¹⁶⁵ starigis statistikon pri la 700 plej oftaj Esperantaj vortoj el la listo de Leo Blaas¹⁶⁶. El tiuj, 82% estas latin- kaj latinid-devenaj (inkluzive de la internaciaj vortoj), 11% estas german-devenaj (anglaj, germanaj), 2% estas grekdevenaj, 1% slavdevenaj kaj 4% estas korelativoj.

Tiu statistiko estas grava, koncerne etimologion. Sed ankaŭ pasivan kompreneblecon oni ekzamenis.

D.B. Gregor¹⁶⁷ analizis la Esperantan vortaron inter 1893 kaj 1950, kaj malkovris ke:

la novlatinparolantoj povas potencie kompreni	79,33%	de la vortoj,
la germanparolantoj povas potencie kompreni	62,05%	de la vortoj,
la slavparolantoj povas potencie kompreni	26,29%	de la vortoj.

Tre interese objekciis André Schild¹⁶⁸. Li rimarkigis, ke, kaŭze de la speciale “kripligita” formo de radiko, en kelkaj derivaĵoj Esperanto estas devigita adopti novan, specialan radikon. Laŭ li, tiu fenomeno estas plej ofta en la scienca idiomato, kie, i.a., oni diras:

lipo (ekstera parto de la buso), sed *labialo* (lipe prononcataj konsonantoj). La vera radiko devus do esti ne *lipo*, sed *labio*.

krimo (danĝera eksterleĝa ago), sed *kriminala* (prikrima). Laŭ li, la vera radiko devus esti ne *krimo*, sed *krimino*.

tempio (flanka apudvizaĝa parto de la kranio), sed *temporalo* (tempio-osto). Laŭ li, la vera radiko devus do esti ne *tempio*, sed *temporalo*, ktp.

Schild pravas: laŭ mi, tiu fenomeno estas multe pli disvastiĝinta ol li mem eble imagas. Sed estas kaŭzo.

Ni vidis, ke Esperanto estas lingvo, en kiu oni “konstruas” la vortojn, kiujn oni bezonas por novaj konceptoj (sciencaj aŭ ne). Tiu tendenco ĉion konstrui per malmultaj bazaj elementoj estas nomebla “tendenco al baza Esperanto”, kaj ĝi korespondas al la ĝenerala nivelo de la stilo, la nivelo de la

¹⁶² Ric BERGER, en: "Revista de Interlingua", 1972/69.

¹⁶³ CAUBEL, "La raison...", 1961, p. 205.

¹⁶⁴ PIRON, "(Lettre ouverte)", 1975, p.2.

¹⁶⁵ Ebbe VILBORG, "Nesuperebla mensogo?", en: "Fokuso", 1973/11

¹⁶⁶ Leo BLAAS, "Listo de 50.000 tekstvortoj", en: "Esperantologio" 1950/2.

¹⁶⁷ D.B. GREGOR, "La fontoj de Esperanto", en: "Scienca Revuo", 1958/9.

¹⁶⁸ Ric BERGER, "Pourquoi l'Interlingua?", Morges, Editions Interlingua, 1971, p. 49: ĉi tie troveblas la citita artikolo de Andre SCHILD.

nespecialiĝintoj. Sed ekzistas alia nivelo, kiu ne celas la ekonomion de la lingvaj rimedoj, sed la efikecon. Temas pri la ellaborita stilo, ekz-e tiu de beletro aŭ scienco. En la speciala kazo de la scienca stilo (ne de la beletra stilo), la internacieco de la selektitaj radikoj estas tre grava kiel rimedo por atingi pli grandan efikecon. Tiamaniere, en tiu stilo, oni emos anstataŭi multajn “ekonomiajn” kunmetajojn de la populara lingvo per “sciencistaj” vortoj nekunmetitaj (“nememeksplikaj”), sed internaciaj¹⁶⁹.

Le ekzemplo de la germana lingvo demonstras, ke tio estas neevitebla.

En la germana, oni povas paroli pri medicino per memeksplikaj (kunmetitaj, “popularaj”) vortoj, kaj tiel oni estas komprenata far-de ĉiuj, aŭ paroli en la tipa kuracista ĵargono, farĉita per latindevenaj terminoj. Sed, dum ke la unua lingvo havas la valoron de la senperio, la dua havas la avantaĝon de la precizeco, de la efikeco kaj de la internacieco.

Se vi iras ĉe la kuracisto, kaj vi diras al li, ke vi havas “kapdoloron”, la diagnozo ne povos esti simple “kapdoloro” (aŭ “cefaleo”), sed *vazomova cefaleo, migreno, Horton-sindromo, endokrania hipertensio, arteria hipertensio, hipotensio, sendeprima deprimiĝo, epilepsia ekvivalento, konversio-simptomo, muskoltensia kapdoloro (tension headache), trigemela neŭrito, sinusito, postkomocia sindromo, histamin-cefaleo, virusa meningito, cervika artrozo, cervika neŭrito, astigmatenco, miopeco, dent-absceso*, ktp.

Certe, oni povas paroli pri ĉio ĉi per mem-eksplikaj (“motivitaj”) popularaj terminoj (kiel oni faras en la germana kaj en Esperanto), sed evidentaj kaŭzoj puŝas kuracistojn uzi la menciitan ĵargonon.

Ni vidu kelkajn ekzemplojn, rilatantaj Esperanton:

En la populara lingvo la verbo *bleki* signifas “elbuŝigi la karakterizan krion de besto”. Do, ĉiu besto povas *bleki*: kato-bleki, hundo-bleki, koko-bleki, kokino-bleki, kaj eĉ ĝiraf-bleki.

Sed tio povis sufiĉi nek al poetoj nek al zoologoj. Unu el la plej unuaj “efikaj” (sed “malekonomiaj”) verboj enpenetrintaj en Esperanton estis *boji* (= “hundo+bleki”), kiu komplete anstataŭis la “regulan” *hundo-bleki*, kiu tamen restas kiel esenca parto de Esperanto.

Pli poste aliaj besto-blekoj ricevis specifan nomon nekunmetitan, laŭ la necesoj kaj laŭ la postuloj de la scienco aŭ de la beletro. Hodiaŭ ni havas i.a.: miaŭi, heni, ĉirpi, ululi, hurli, kriĉi, iai, muĝi, meki, jelpi, kluki, kikeriki, kvaki, grunti, kviki, pepi, kviviki, kveri ...

Alia ekzemplo:

Ni konsideru la vorton *popolo*. El ĝi venas la adjektivo *popola*. Sed se per tiu adjektivo ni volas signifigi “ligita kun la popolo”, “venanta el la animo de la popolo”, tiam *popola* ne plu sufiĉas. En la populara stilo oni povos sin esprimi per *popoleca*. Sed etnologo certe preferos la internaciismajon *populara*.

Sed kiel oni distingas en Interlingua ĉi tiujn du kromsignifojn, tiujn du nuancojn? Neniel: oni devas diri ambaŭsence *popular*.

Kaj tamen, la germana tre bone distingas inter ambaŭ: *Volks-* = *popola* (*Volks-sprache*: *popola lingvo*); *volkstümlich* (*populara*), kaj eĉ *völkisch*.

¹⁶⁹ Mia interpreto pri la du niveloj ne koincidas kun tiu de Baldur RAGNARSSON (“La du kodoj de Esperanto”, en: “Internacia pedagogia revuo”, novembro 1973).

Ion analogan vi trovos en la jena ekzemplo:


Vi konas la vorton *krimo*. *Krima* estas ĝia adjektivo. Kiel ni tradukos la francan terminon *police criminelle* (germana: *Kriminalpolizei*)? Tio ja ne signifas, ke la polico estas krima, ĉu ne? En la popularstila Esperanto oni parolos pri *kontraŭkrima* aŭ *prikrima polico*, dum ke en Esperanto sciencostila oni parolos pri *kriminala polico*. Ankaŭ la germana tre bone distingas inter *kriminelle Polizei* (krima polico) kaj *Kriminalpolizei* (kriminala polico). Interlingua ne distingas. En Interlingua, oni esprimas ambaŭ nuancojn per la sama vorto: *criminal*. Kaj tamen, tiu nuanco estas grava: se mi estas kulpa, mi timus *kriminalan* policon, sed se mi estas senkulpa, mi multe timus *kriman* policon.

Tiuj duoblaĵoj, ekzistantaj pro la neceso esprimi specialajn nuancojn, estas fakte relative malmultaj ankaŭ en specialigitaj stiloj. Ili sufiĉas tamen por demonstri la ĉeeston de tensio inter lingvo-formala *ekonomio* kaj signifo-praktika *efikeco*. Tiu tensio estas reala, ĉar ĝiaj radikoj suĉas la nutraĵon en la socio-ekonomika humuso de nia socio, kiun la esperantistoj ne povas aliigi. Ni rimarkas tamen, ke la strukturo de Esperanto permesas la konsciiĝon pri tiu tensio, kaj pro tio ĝi faciligas la praktikadon al ties superado.

Lasta rimarko: niaj Interlingua-amikoj fieras (tute prave) pri sia derivio-sistemo, kiu permesas la eksplikon de la latinaj vorto-familioj, eĉ se ĝi estas ne-aŭtonoma. Nu: ĉu la leganto scias, ke io tia ekzistas ankaŭ por Esperanto? La filologo C.A. ten Seldam ellaboris (neaŭtonoman) sistemon pere de kiu oni povas ekspliki la etimologion de la latinidaj vortoj en Esperanto¹⁷⁰.

7.9. La redundanco en la internacia lingvo

Kiam ni parolas, ni eligas signalojn, kiuj konsistigas *komunikon*. Ekzistas do elsendanto, kiu eligas enkodigitajn *signalojn* (kies sinsekvo nomiĝas *mesaĝo*), ekzistas *transport-kanalo* (ekz-e la aero) kaj *ricevanto*, kiu elkodigas la mesaĝon. Jen la skemo:



Ni scias, ke la kanaloj estas ĉiam ĝenataj far-de la bruoj: estas do necese, por ke oni povu kempreni, ke la mesaĝo enhavu plurfoje la saman informon, por ke minimume unufoje ĝi estu ricevata kaj elkodigita. Tiu krominformo, kiu aldonas nenion novan al la mesaĝo mem, sed kiu estas necesa pro la menciitaj "bruoj", estas nomata "redundanco". Oni povas ĝin kalkuli matematike en ortografio, fonetiko, fonologio, gramatiko, ktp.

¹⁷⁰ C.A. TEN SELDAM, "Klopodo pri starigo de sistemo de kvazaŭ-afiksoj en Esperanto", en: "Esperantologio", 1955/4.

Esperanto kaj ĉiuj aliaj planlingvoj estas ĝenerale malpli redundancaj ol la etnaj lingvoj. Wolfgang Dressler kalkulis, ke la uzo de la 25 grafemoj de Esperanto havas la redundancon de 0,1151, do malpli ol la ortografia redundanco de la germana lingvo (0,15)¹⁷¹.

Pro tio la esperantistoj opinias, ke la akordo de la adjektivo kun la koncerna substantivo en “kazo” kaj “nombro” ne superfluas, kiel emas kredi la amikoj de Interlingua.

Fakte, el la modernaj lingvistoj nur Yuen Ren Chao opinias, ke redundanco estas negativa faktoro en la signifado-procedo¹⁷². Kontraŭe, laŭ Manfred Mayrhofer, la akordo inter la adjektivo kaj la substantivo estis lerta elpenaĵo de Zamenhof, kiu permesis al li altigi la redundancon en lia lingvo (malgraŭ la fakto, ke redundanco konfliktas kun ekonomio), altigante tiel la funkciivon de la lingvo mem¹⁷³.

Tamen, pli detalaj studoj pri la problemo mankas. Ni do ne daŭrigos ĉi tiun pritrakton.

Sed, laŭ mi, ioma redundanco estas necesa, ĉefe ĉar planlingvo estas *dua lingvo* por la plej granda parto de siaj uzantoj. Do la danĝero, kiun reprezentas la “bruoj” en la “kanalo”, estas nesubtaksendaj. La menciita gramatika akordo estas ekzemplo: ĝi estas nek malfacila nek erara: en la plej malbona okazo, ĝi estas tutsimple neutila. Tio, kio estas malfacila, ne estas la duobla apliko de morfemo, sed la kategorio, kiun tiu morfemo reprezentas (ekz-e la pluralo kaj/aŭ la kategorio “rekta komplemento de transitiva verbo”).

7.10. Kritikoj kontraŭ la “troa” reguleco de Esperanto

La aglutina karakterizado de Esperanto plaĉas al multaj lingvistoj: ni tion vidis, kaj tion ni vidos ankoraŭ pli poste. Ĝi plaĉas iom malpli al la filologoj, kutimiĝintaj al la malregulaĵoj de la klasikaj lingvoj.

Franca lingvisto, aprobinte Esperanton, aldonis etan “sed”on. Jen la opinio de A. Caubel¹⁷⁴.

“Eĉ Meillet¹⁷⁵, kiu ĝin aprobis /t.e. Esperanton/, opiniis oportune, sinpente, en la dua eldono de la verko, troigi la esprimrolon de la malregulaĵoj de lingvo: 'Lingvo absolute regula kiel Esperanto aŭ Ido ŝokas la intiman senton de ĉiuj parolantoj de hindeŭropa lingvo. Ekzistas ja regulaj lingvoj, la finna aŭ la turka, ekzemple. Sed en la hindeŭropaj lingvoj restas ĉie grand-nombraj eksterregulaĵoj dank-al kiuj ĉiu vorto estas grava, ĉiu kutima dirmaniero havas sian propran individuecon, sian propran reeĥon'. Tiuj eksterregulaĵoj, tiu gango, fakte estas nenio alia ol mallarĝa kadro, balasto neutila; ĝuste ili igas ĉiun lingvon, kiun oni eklernas, rezista malamiko.”, skribas Caubel.

Caubel plue evidentigas la fakton, ke la “reeĥo” ne estas lingva, sed sociopsikologia fenomeno, kaj do ĝi ne dependas esence de la lingvo aŭ de la unuopaj vortoj (do certe ne de la neregulaĵoj), sed de la socia kaj spirita vivo de la parolantoj de la koncerna lingvo. La pruvo estas ja la ekzisto de grava kaj valora beletra literaturo ankaŭ en tiuj “tro regulaj” lingvoj, kiel la finna, la turka, la hungara, Esperanto.

Ni povas aldoni du malgrandajn rimarkojn. La unua estas la jena: kiu diris, ke Esperanto estas hindeŭropa lingvo? Tion oni eble kredis en 1918, sed nuntempe la klasigo aliiĝis.

¹⁷¹ Wolfgang DRESSLER, "Zur plansprachlichen Redundanz", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/10.

¹⁷² Yuen Ren CHAO, "Langage et systèmes symboliques", Paris, Payot, 1970 (originalo usona: 1968), p. 83.

¹⁷³ Manfred MAYRHOFER, "Zur Problematik der Plansprachen", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/10.

¹⁷⁴ CAUBEL, "La raison...", 1961, p. 200-201.

¹⁷⁵ Antoine MEILLET, "Les Langues dans l'Europe nouvelle", 1918, p. 282.

La dua rimarko estas la jena: studinte la suban tabelon, kiu evidentigas transiron de malreguleco al reguleco, oni vere demandas sin: “Kial do malreguleco estas preferinda al reguleco?”. Se vere temus pri esprim-kialoj, tiam la franca estus multe pli esprimiva ol la hispana aŭ la turka (aŭ Esperanto), sed tion povis demonstri ĝisnun, eĉ ne la plej arda franca ŝovinisto.

Tiun ĉi tabelon starigis Gaston Waringhien¹⁷⁶.

Baza vorto	Derivaĵo	Baza vorto	Derivaĵo
FRANCA		ANGLA	
pain	boulangier	bread	baker
livre	libraire	book	bookseller
fiacre	cocher	cab	cabman
dent	dentiste	tooth	dentist
porte	concierge	door	doorkeeper
soulier	cordonnier	shoe	cobber
service	domestique	service	servant
barque	batelier	boat	boatman
GERMANA		RUSA	
brot	backer	ĥljev	buloĉnik
buch	buchhandler	kniga	knigoprodavec
droschke	kutscher	droĵki	izvoŝĉik
zahn	zahnarzt	zub	dantist
tür	pfortner	dver'	dvornik
schuh	schuster	baŝmak	sapoĵnik
bedienung	diener	sluĵba	sluga
boot	schiffer	lodka	lodoĉnik
HISPANA ¹⁷⁷		TURKA	
pan	panadero	ekmek	ekmekĉi
libro	librero	kitab	kitabĉi
coche	cochero	araba	arabĉi
diente	dentista	diŝ	diŝĉi
puerta	portero	kapu	kapuĉi
zapato	zapatero	kondura	konduraĉi
servicio	servidor	hizmet	hizmetĉi
barca	barquero	kaik	kaikĉi
ESPERANTO		INTERLINGUA	
pano	panisto	pan	panetero
libro	libristo	libro	librero
fiakro	fiakristo	fiacre	fiacrero (?)
dento	dentisto	dente	dentista
pordo	pordisto	porta	portero
ŝuo	ŝuisto	calceo	scarperero
servo	servisto	servicio	servitor
boato	boatisto	barca	barchero

¹⁷⁶ WARINGHIEN, "Lingvo kaj vivo", 1959, p. 112-114. Tiu tabelo rilatas la kreon de profesi-vortojn en pluraj lingvoj.

¹⁷⁷ La franca, la angla, la germana kaj la angla estas tre neregulaj. La hispana estas pli regula, kaj la turka vere tre regula. Esperanto estas regula kiel la turka, dum Interlingua estas malpli regula ol la hispana.

7.11. La gramatiko de la eraroj

Tre ofte etsciencaj planlingvistoj parolas pri “malfacilaĵo” de planlingvo, sed ili forgesas prezenti al ni la parametrojn de “facileco” de lingvo.

Du estas la lerno-niveleoj de lingvo. Ilin ni povas tamen distingi nur teorie, ĉar, en la praktiko, ili estas strikte reciproke plektitaj.

La unua nivelo estas tiu de la formalaj lingvaj *kategorioj*. Estas klare, ke, se ni transiras al lingvo (nova), en kiu ekzistas la samaj kategorioj, kiel en nia devenlingvo, ni havos relative malmulte da malfacilaĵoj. Male, se du lingvoj estas tre malsamaj rilate kategoriojn, estos relative malfacile transiri de unu al la alia.

Laŭ mi, koncerne kategoriojn, mi opinias, ke Esperanto kaj Interlingua esence samas. Por japano aŭ por hungaro, ambaŭ lingvoj prezentas do la samajn malfacilaĵojn. Sed ekzistas alia nivelo, tiu de la aktualigo de tiuj kategorioj en la konkreta lingvosistemo per formalaj rimedoj (morfemoj kaj tagmemoj). Ĉi tie, Esperanto kaj Interlingua ne estas plu similaj.

Dum ke Esperanto prezentas sistemon koheran kaj ekonomian, Interlingua prezentas formo-kaoson, ĉar ĝi tutsimple alproprigis al si la (histori-devenan) kaoson, kiu regas en la novlatinaj lingvoj. Al la kategorioj de Esperanto korespondas, en la konkreta lingva sistemo, tre malmulte da morfemoj aŭ tagmemoj. En Interlingua, male, al la samaj kategorioj povas korespondi multege da morfemoj kaj, inverse, unusola morfemo povas jen kaj jen reprezenti multajn kategoriojn.

En tia kaoso suferas la ekonomio de lingvo. Kaj ĝuste tiu ekonomio devas reprezenti la forton de internacia helplingvo. Se oni ĝin detruas, oni ne plu komprenas, kial ne proponi la anglan aŭ la francan, kiuj, ĉiukaze, estas multe pli “naturaj” ol Interlingua.

Post tiu premiso, ni malkovras, ke unu el la plej urĝaj taskoj de la moderna interlingvistiko (ĉu lingvoaŭtonoma, cu novlatinoida) estas la ellaboro de *sistemeca eraro-gramatiko* por la plej granda kvanto da lingvoj. Tio signifas, ke oni devas rilatigi la strukturon de la deirilingvoj (angla, rusa, franca, japana, ktp.) kun la tipaj eraroj de la anglaj, rusaj, francaj, japanaj, ktp-aj esperantistoj. Povas esti, ke oni devos aldoni ne-lingvajn variantojn, kiel la aĝo aŭ la klerconivelo (fakte, se iu malklerulo uzas erarplene jam facilan strukturon, oni povas sin demandi, kion li farus je pli komplika lingvostrukturo).

Sur tiuj bazoj oni povos ellabori komparajn gramatikojn inter Esperanto kaj la etnaj lingvoj: ili estos tre utilaj en la preparo de didaktika materialo plej diversa-speca.

Provon tiudirektan faris W.J.A. Manders¹⁷⁸, sed neniu sekvis lian ekzemplon. Li komparis la erarojn (trovitajn en 1000 leteroj de ĉiulandaj esperantistoj) en la uzo de Esperantaj gramatikaj kaj semantikaj kategorioj, kaj li rimarkis, ke i.a. inter la plej malfacilaj elementoj de Esperanto estas la uzo de la *pluralo* kaj de la *n-morfemo*, same kiel la distingo inter *-igi* kaj *-iĝi*, kaj inter *-ec-* kaj *-aĝ-*.

Li ne povis ellabori analogan erarogramatikon por aliaj planlingvoj, ĉar ilia malgranda disvastiĝo ne permesis kolekton de taŭga materialo.

¹⁷⁸ MANDERS, "Vijf kunsttalen", 1947.

8. La literaturo en Esperanto

8.1. Enkonduko

En la antaŭaj ĉapitroj mi preparolis la strukturon kaj la sociologian vivon de Esperanto. El tiu pritrakto demonstriĝas klare, kiel asertas la nederlanda lingvisto-matematikisto W.A. Verloren van Themaat¹⁷⁹, ke neniu lingva kaj neniu socia faktoro malhelpas, ke Esperanto havu beletro-valoran literaturan produktadon.

“Literatura lingvo, skribas la konata esperantlingva brita poeto kaj literaturkritikisto William Auld, estas lingvo en kiu estis kreitaj verkoj kun literatura valoro. Tiu estas fakto simpla, evidenta, nediskutebla [...] Praktike ekzistas nivelo ĝenerale agnoskata kaj agnoskebla, kiun verko devas atingi por esti literatura [...] Ĉar tiaj verkoj en Esperanto estis kreitaj - kaj tion ĉiu povas facile kontroli mem - sekvas, ke Esperanto estas literatura lingvo”¹⁸⁰. Se multaj homoj ne konscias pri tio, la kaŭzo estas, ke “tro ofte la kulturaj efektivigoj en la lingvo estas nekonataj [...] precipe pro tio, ĉar la koncerna lingvo estas ete disvastiĝinta”¹⁸¹: Pli granda disvastiĝo de Esperanto kontribuos ankaŭ al pli profunda kono de la literaturaj valoroj, kiujn oni kreis en ĝi.

Auld scias tre bone, ke la formiĝo de literaturo en difinita lingvo dependas esence de ĝia “vivo” (de ĝia sociologia situacio) kaj ne de ĝia strukturo. Li skribas: “Ĉiuokaze, la aserto, ke iu lingvo ne taŭgas por literaturo, estas sensecaĵo [...], ĉar ĉiu lingvo havas ĝuste tiom da literatura kapablo, kiom havas tiuj, kiuj utiligas ĝin [...] Unuavide, tia aserto ŝajnas eble troa al iuj, kiuj konvinkiĝis, ke ekzistas “primitivaj” lingvoj de primitivaj popoloj, kies barbareco kaj limigita vortaro strikte malpermesas la literaturan kreon”¹⁸². Auld absolute malkonsentas kun ĉi tiu tezo. Kaj li troviĝas en la bona kuneco de ĉiuj modernaj etnologoj.

Ni do konstatas, ke nenio malhelpas, el la teoria vidpunkto, ke ankaŭ en Esperanto ekzistu literaturo. Ni facile povas konstati, ke, fakte, tiu literaturo ekzistas.

Tamen tiu literaturo prezentiĝas malsamstruktura, kompare kun la naciaj literaturoj. La lingvisto kaj filologo hispana Juan Régulo-Pérez skribas: “Kiam diversaj naciaj lingvoj titolas sin *internaciaj*, kaj montras al sia literaturo, ili sofisme preterglitas la fakton, ke tiu literaturo estas *nacia*, sed ne internacia: ĝi estas, nome, kontribuo preskaŭ senescepte de indiĝenoj¹⁸³, kaj la internacia literaturo de tiuj lingvoj fakte ne ekzistas. Dume, en Esperanto, ni havas la [...] fenomenon de tutmonda literaturo demokrate kreita kaj kreata de suverenaj verkistoj de ĉiuj landoj, el kiuj sin anoncas la talento”¹⁸⁴.

La literaturo de Esperanto esprimas do la bazan unuecon de la homaro, do valoron, kiu estas tipa de la sociologia “diaspore” lingvokonscia, kiu adoptis Esperanton kiel demokratian kaj liberigan komunikilon.

¹⁷⁹ W.A. VERLOREN VAN THEMAAT, "Literature in a Constructed Language", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/12.

¹⁸⁰ William AULD, "L'Esperanto langue littéraire", Londres, CED, 1962 (originalo en Esperanto, samjara), p. 1.

¹⁸¹ Auld, samloke, p. 2.

¹⁸² Auld, samloke, p.4.

¹⁸³ Hodiaŭ (2018) ne plu estas vere: la franca literaturo, kaj ĉefe la angla literaturo, nuntempe proponas aŭtorojn francajn anglalingvajn el landoj nur dugrade anglalingvaj.

¹⁸⁴ Juan REGULO-PEREZ, "Lando de libereco, egaleco kaj frateco", en: "Memorlibro", cit., p. 70.

La literaturo de Esperanto havas do duoblan celon: unuflanke, kiel esprimo de la vivo de tiu lingva kolektivo, ĝi esprimas ĝian spiritan kaj materian vivon, kaj do estas ilo de kohero kaj unuiĝo; aliflanke, sur praktika vidpunkto, ĝi proponas la valorojn de la esperantismo al tiuj, kiuj ne konas ilin, kaj peras la semantikan vivon de la Esperantaj vortoj en la fortikigo de la literatura tradicio¹⁸⁵.

Eĉ deklariĝintaj malamikoj de Esperanto, kiel la skota poeto Hugh Mc Diarmid, estas devigitaj agnoski la gravecon de la Esperanta literaturo. Kritikante en iu poemo la sintenon pri Esperanto de kelkaj anoj de la nun mortinta projekto *Basic English*, li skribis:

“... kvankam ili (t.e. la anoj de *Basic English*) asertegas,
ke ili konas ĉiujn provojn
de neŭtrala helplingvo,
ili kaŝas zorge siajn sciojn
kaj eĉ ne spuron sentigas de sia sinteno
pri la ampleksa demonstro
kiun Esperanto reprezentas
jam ekde duona jarcento ...”¹⁸⁶.

8.2. La originala literaturo en Esperanto

En Esperanto ekzistas pluraj literaturaj momentoj, grupoj kaj epokoj. La aŭtoroj verkis pri poezio, prozo kaj teatro, ne forgesante la ese-arton, la mallongan novelon kaj la sciencajn prozon.

Sed ne ĉi tiu estas la loko, kie oni parolu pri tio detale.

Gravan verkon pri tiu temo skribis la hungaro Kálmán Kalocsay kaj la sviso Henri Vatré¹⁸⁷. El la dokumenta (ne el la kritika) vidpunkto, probable, la plej ampleksa tiukoncerna verko estas la ĉapitroj pri Esperanta literaturo aperintaj en *Esperanto en Perspektivo*. Ilia aŭtoro, Tazio Carlevaro¹⁸⁸, proponas en ili ne nur la plej gravajn informojn pri la originala literaturo, sed ankaŭ tre ampleksan bibliografion pri la tradukita literaturo, pri la scienca prozo, pri la sciencaj terminaroj kaj pri la historio de la esperantista ĵurnalismo. Ankaŭ valora estas angla-lingva verko de Margaret Hagler¹⁸⁹.

Sed ja, la modernuloj¹⁹⁰ pretigis ampleksan kaj kritike valoran verkon. Ĝi iusence kronas la transformiĝon de Esperanto, ekde planita lingvo, al kulture uzata lingvo. Bedaŭrinde, ĝuste kiam ĝi estas ja utiligata je internacia nivelo, sed far-de grupo, kiu memvole lernis ĝin. La vera “internacia” lingvo, hodiaŭ, estas alia lingvo. Tiu konstato certe ne malgrandigas la gravecon de la kulturon, kiun oni daŭre kreas en Esperanto

8.3. La tradukita literaturo de Esperanto

¹⁸⁵ AULD, "L'Espéranto...", 1962, p. 8.

¹⁸⁶ Hugh McDIARMID, "In memoriam James Joyce", 1955, p.61-62. Fakte, la angla iĝis intertempe la fakta internacia lingvo en la mondo. Sed certe ne pro la kaŭzoj, eble iom ironie, indikitaj far-de la aŭtoro (noto de 2018).

¹⁸⁷ Kolomano KALOCSAY, Henri VATRÉ, en: "Gvidlibro por supera ekzameno, dua parto", red. A. PECHAN, Budapest, Hungara Esperanto- Asocio, 1966.

¹⁸⁸ CARLEVARO, en: "Esperanto en Perspektivo", cit., p. 113-310.

¹⁸⁹ Margaret HAGLER, "The Esperanto Language as a Literary Medium", Ann Arbor, University Microfilms (Xerox), 1970.

¹⁹⁰ Temas pri "Historio de la Esperanta literaturo", de Carlo MINNAJA kaj de Giorgio SILFER, LF-Koop, La Chaux-de-Fonds, 2015, 748 paĝoj (noto de 2018).

La eldona aktivo en Esperanto estas relative vigla. Bedaŭrinde, la merkato povas aspekti malvasta, ĉar tro multe da eldonejoj funkcias, fakte, sur nivelo amatora. Ĉiuokaze, inter 1961 kaj 1969 aperis 416 verkoj (el kiuj 75 nur en 1969), el kiuj 109 estas originalaĵoj. Sume, aperis 38.518 paĝoj¹⁹¹. Carlevaro nin informas, ke inter 1887 kaj 1972 aperis libroforme (do ni ĉi tie preteratentas ĉiujn tradukaĵojn aperintajn en revuoj, eĉ se ili estis elstare gravaj) tradukaĵoj el la jenaj lingvoj: angla, antikva-greka, araba, armena, bulgara, ĉeĥa, slovaka, ĉerkesa, ĉina, dana, estone, finna, flandra, franca, frisa, germana, hebrea, hindia, hispana, hungara. indianaj lingvoj, indonezia, islanda, itala, japana, jida, slovena, kroata, serba, kartvela, kataluna, kelta, kirgiza, laosa, latina, litova, latva, nederlanda, malta, norvega, persa, pola, portugala, provenca, retoromanĉa, rumana, rusa, sveda, ukrainia, uzbeka kaj vjetnama¹⁹².

Estas evidente, ke la Esperanto-tradukinto (se kompetenta kaj bone trejniĝinta) povas pretigi elstarajn tradukojn, ĉar li estas dulingvulo: lia familia lingvo estas la lingvo de la originalaĵo, kaj li tradukas al lingvo (Esperanto), kiu estas la sola lingvo, lernebla ĝisfunde kvazaŭ propra familia lingvo¹⁹³. Evidente en ĉiu traduko io perdiĝas: sed probable en Esperanta traduko oni perdas malpli ol en traduko en nacia lingvo, unue pro tiu baza dulingvismo de la Esperanta tradukisto, kaj, due, pro la fleksebleco kaj efikeco de la lingvo mem.

Akurataj studoj pri tradukoj al pluraj lingvoj (inkl. de Esperanto) konklude pruvis la specialajn kapablojn de Esperanto kiel traduklingvo^{194 195}.

Kaj ĉio, kio perdiĝas en traduko esperantlingva, rememorigas al ni la germana lingvisto Falkenhahn, ĉiuokaze perdiĝas en iu ajn traduko en alian lingvon¹⁹⁶.

8.4. La esprimivo de Esperanto

Ĝenerale ni rimarkas, ke “la vortaro de Esperanto, krom tio, ke ĝi estas rimriĉa, disponas pri nekredablaj rimedoj por ĉiuj, kiuj ŝatas la vortojn, ilin manipuli, ilin krei, ilin vicigi laŭ frapa kaj signifa ordo”¹⁹⁷.

Tio veras: en ĉi tiu ĉapitro ni sekvos la spurojn de didaktike speciale valora artikolo de Vaitilavičius, litova lingvisto, pri tiu temo¹⁹⁸.

A

La konsisto de la vortaro de la lingvo

Esperanto nur hazarde havas homonimojn, kiuj fakte estas utiligataj nur en kalemburoj, kaj kiuj do el komunika vidpunkto ne prezentas riĉecon por la lingvo. En tio, Esperanto similas nek al la rusa, nek al la angla, kaj ĉefe ne al la franca, kie homonimoj svarmas. Ekz-e, la fonema sinsekvo

/seⁿ/ (“naza” /e/) povas signifi:

sein (sino, brusto), *saint* (sankta), *ceint* (cirkaŭita), kaj, en kelkaj kuntekstoj, ankaŭ *cinq* (kvin), elparole /seⁿk/).

¹⁹¹ CARLEVARO, en "Esperanto en perspektivo", cit., p. 47.

¹⁹² CARLEVARO, samloke, p. 113-310.

¹⁹³ William AULD, "Pri la traduko de poezio", London, CED, 1965, p. 6.

¹⁹⁴ William AULD, "La Internacia lingvo kiel belarta tradukilo", en: "Memorlibro", cit., 1960, p. 54.

¹⁹⁵ HAGLER, "The Esperanto...", 1970, cit.

¹⁹⁶ FALKENHAHN, "Zur Frage...", 1973/59-60.

¹⁹⁷ D.B. GREGOR, "La kultura valoro de Esperanto", Londono, CED, 1967, p.3.

¹⁹⁸ A. VAITILAVICIUS, "Riĉeco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj", en: "Der esperantist", en la jenaj numeroj: 1972/53, /54, /55-56, 1973/57-58.

Koncerne sinonimojn, en Esperanto ili estas relative malmultaj, kaj estas konsiderataj kun favoro, kondiĉe ke inter ili ekzistas minimume nuanca signifo-malsamo. Certe, ne ĉiuj nuanc-distingaj sinonimoj estas fakte necesaj: multaj el ili estas facile esprimeblaj ankaŭ per kunmetitaj vortoj¹⁹⁹.

Ekz-e:

asekuri: protekti, sekurigi, certigi, sendanĝerigi, gardi, ŝirmi, subteni.

aspekti: ŝajni, vidiĝi, vidigi, aperi, montriĝi, elrigardi, mieni.

admoni: averti, malkonsili, dekonduki, antaŭsciigi, atentigi, avizi.

B

La idiomatismoj

En la naciaj lingvoj ekzistas idiomatismoj nekompreneblaj al ali-lingvano. Ilin Esperanto ne povas adopti. Ekzemple: la germana *Die Beine unter die Arme nehmen* (= Preni la kruojn sub la brakojn), kiu korespondas al la itala *Mettere le gambe in spalla* (= Meti la kruojn sur la sultrojn), ambaŭ uzataj en la senco “rapide fuĝi”.

Sed ekzistas aliaj “internaciaj” idiomatismoj, ĝenerale metaforaj, do relative bone kompreneblaj. Ilin Esperanto povas adopti. En ĉi tiu lingvo ili estos eĉ multe pli frapaj, ĉar en ĝi mankas la kliŝoj, kaj pro la esprima elasteco ili estas multe pli impresaj²⁰⁰. Ekzemple, oni facile povas esperantigi la francan idiomatismon *Avoir un pied dans le cercueil* (= Havi piedon en la ĉerko), kiu signifas proksimume “Esti mortonta”, kaj la italan *Stare sulle proprie gambe* (= Stari sur propraj kruoj), kiu signifas “Esti sendependa”.

Tre valoran studon pri idiomatismoj faris la belga tradukisto Theodore Gutmans²⁰¹.

C

La formriĉo

Laŭ Vaitilavičius, Esperanto estas karakterizata de esprimivo-riĉo, kiun limigas nur la senco. Kontraŭe, en la naciaj lingvoj (kaj ankaŭ en Interlingua, ni devas ci tie aldoni), tiu riĉo havas neharmonian disvolviĝon, kvazaŭ ĝi okazus hazarde kaj nesisteme.

Laŭ W. Auld²⁰², tiu riĉo dependas de pluraj faktoroj:

- a) En Esperanto ekzistas akordiĝo inter substantivo kaj adjektivo en la pluralo kaj en la t.n. “akuzativo”.
- b) En Esperanto eblas senpera transiro de unu al la alia gramatika kategorio (t.e. substantivo povas senpere iĝi verbo, ktp.). Tio permesas unikan koncizon, kiel la jena propozicio: *Patro patru, filo filu*.
- c) La afiksoj, uzeblaj ankaŭ kiel plenrajtaj radikoj, multon alportas al la esprimivo de la lingvo, ĉefe koncerne nuancojn.
- d) La lingvo estas, el la semantika vidpunkto, tre riĉa: la *Plena Vortaro*, grava verko publikigita antaŭ la dua mondmilito, proponis 7.866 “radikojn”. La lastatempe aperinta *Plena Ilustrita Vortaro* havas pli ol 15'000 “radikojn”.

¹⁹⁹ JANTON, "L'Esperanto", 1973, p. 86-90.

²⁰⁰ AULD, "L'Espéranto langue littéraire", 1962, p. 14-17.

²⁰¹ Theodore GUTMANS, "Some Ideas about Idioms in Esperanto", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1971/6.

²⁰² AULD, cit., 1962, p. 14-17.

- e) Esperanto estas lingvo tre riĉa de plej variaj rimoj kaj asonancoj. Nur 5 vortoj el ĝia vortaro ne havas rimantan partneron. Tio faciligas la poezian esprimiĝon per belsonaj kaj elvokivaj versoj, kia estas la konata verso de la latva poeto Nikolaj Kurzens “Kaj ftize grize glitas for la viv”.
- f) La konstruo de kunmetitaj vortoj utiligas la naturan flekseblecon de Esperanto, kaj rezultigas grandan koncizecon kaj esprim-denson.

Tiu lasta punkto estas priekzemplenda. En Esperanto ekzistas vortoj kunmeteblaj senfine: limojn, kiel ni jam diris, starigas nur la senco. Ekzemple la franca *compatriote* tradukiĝas en Esperanto per la kunmetaĵo *sam-land-an-o*. Sed dum ke en la franca la kunmetaĵo *compatriote* restas esceptaĵo, kaj neimitebla por la konstruo de aliaj analogaj vortoj, en Esperanto oni povas konstrui *sam-klas-ano*, *sam-aĝ-ulo*, *sam-lingv-ano*, *sam-ide-ano*. Tiu forma riĉeco, kiu estas fakte ankaŭ forma libero, ekzistas en relative malmultaj okcidenteŭropaj lingvoj: parte en la germana, hodiaŭ, kaj, iam, precize en la antikva greka. En Interlingua, kiu estas lingvo tre simila al la modelo de la novlatinaj lingvoj, tia riĉeco kaj tia libero estas neimageblaj.

Jen alia ekzemplo. En la franca lingvo oni povas diri *embarquer* kaj *débarquer*, kiuj korespondas, resp., al la esperantaj *en-sip-iĝi*, kaj *el-sip-iĝi*. Sed por la ago “eliri el vagono” aŭ “el aŭtomobilo” ne ekzistas vortoj konstrueblaj laŭ la ekzemploj de *débarquer*. En Esperanto tiuj vortoj estas, kontraŭe, facile kaj laŭbezone konstrueblaj. Ni povas do diri *en-vagon-iĝi* / *el-vagon-iĝi*, *en-aŭt-iĝi* / *el-aŭt-iĝi*, ktp.

Dank-al tiu elasteco, Esperanto povas esprimi tre ofte konceptojn per unusola vorto kunmetita. Ĝenerale, la novlatinaj lingvoj devas alfronti tiun demandon per perifrazoj (frazkonstruoj).

Ekzemple:

Franca esprimo	Esperanta ekvivalento
Mettre dans le dictionnaire	En-vortar-igi
Sortir du dictionnaire	El-vortar-igi
Se mettre au lit (s'alliter)	En-lit-iĝi
Sortir du lit	El-lit-iĝi
Mettre sur la table (en la itala: intavolare)	Sur-tabl-igi
Passer la nuit (itale: pernottare)	Tra-nokti
Passer un examen	Ekzamen-iĝi
Commencer à travailler dans une place	En-posten-iĝi
Prendre sa retraite	Emerit-iĝi

Ktp, senlime.

Esperanta lingvokategorio speciale fleksebla kaj esprimiva estas la adverbo. Per la adverbo, D.B. Gregor²⁰³ malkovris minimume 8 malsamajn signifo-funkciojn.

Adverbaj funkcioj	Klarigoj
<i>Kaŭzo-funkcio</i>	
Akvomanke ĝi mortis.	= Pro akvo-manko ĝi mortis
<i>Tempo-funkcio</i>	
Geknabe ni vidis.	= Dum nia geknaba tempo, ni vidis...

²⁰³ D.B. GREGOR, "La funkcio de la derivita adverbo en Esperanto", en: "Esperantologio", 1961/2.

Adverbaj funkcioj	Klarigoj
<i>Grado-funkcio</i>	
Pretertere dikaj	= Dikaj preter tera mezuro
<i>Cel- aŭ rezulto-funkcio</i>	
Sange bati	= Bati ĝis sango venas
<i>Il-funkcio</i>	
Pafite mortigas	= Mortigas per pafilo
<i>Loko-funkcio</i>	
Ĝardene sidas	= Sidas en la ĝardeno
<i>Manier-funkcio</i>	
Ridegis plormiene	= Ridegis kun mieno plor-aspekta.
<i>Kompar-funkcio</i>	
Gazele belus	= Belus kvazaŭ gazelo

Estu nun permesata lasta rimarko.

Tiu fleksebleco, kaj do tiu esprimkapablo tiel densa kaj tiel frapa, mankas complete (aŭ preskaŭ) al Interlingua, kiel ni jam parte vidis, kaj kiel ni vidos detale pli poste. Laŭvere, tiu ne estas “difekto” de Interlingua: temas nur pri *kosto*, kiun oni devas pagi, se oni decidas konstrui lingvon, kiu imitas la novlatinajn lingvojn. Fine: en interlingvistiko, ĉiu ajn elekto estas pravigebla. Tamen ni esperantistoj iomete bedaŭras, ke niaj Interlingua-amikoj forlasis la senkomparan riĉecon de Esperanto por postkuri relative malriĉan kaj neflekseblan kimeron: la “naturecon” novlatinoidan.

9. Neracieco estas ofte lasta tranĉeo

Ĉi tiu ĉapitro estas la *stupidarium* (= stultaĵaro) de Esperanto. Evidente, ni ne povas ĉi tie celi ian ajn kompletecon: oni ja diris tion da stultaĵoj pri Esperanto! En tiuj paĝoj vi ankaŭ ne trovos diskuton pri tiuj stultaĵoj: se vi sekvis min ĝis ĉi tie, vi certe scias konkludi mem pri tiaj esprimaĵoj.

A

En malgranda libro de Pierre Burney²⁰⁴, cetere tre interesa kaj mult-rilate valora, estas pluraj tiaj amuzaĵoj. La aŭtoro, citante la aŭtoritatecon de Gonzague de Reynold (pri li, poste!) proponas la profundan saĝaĵon, laŭ kiu en Esperanton oni povas ĉion traduki, sed nenion esprimi! Evidente por G. de Reynold “traduki” havas nenion komunan kun la koncepto “kompreni”. Post tiu profundega tezo, jen alia, kiun la aŭtoro ĉerpis en la artikoloj de d-ro Bakonyi (konata ano de Interlingua), kiun ni renkontos ankoraŭfoje pli malfrue. Laŭ li, Esperanto estus pli preciza ol la penso! Probable d-ro Bakonyi konis tre malbone aŭ matematikon (kiu siaflanke ankaŭ ne estas pli preciza ol la penso, ĉar tiuokaze oni ne povus pensi ĝin, do ĝi tutsimple ne povus ekzisti ...) aŭ Esperanton.

Tria tezo estas de M. Loewenthal: “Kiel oni povus traduki *Les Copains* de Jules Romains en Esperanton?” Jes, ja. Kaj kiel oni povus traduki tiun verkon en la italan, en la germanan, en la hispanan? Kaj kiel oni povus traduki francen la verkojn de la itala romanisto kaj novelisto Carlo Emilio Gadda? Mi supozas, ke la rezulto ne estus pli bona ol paralela traduko en Esperanton. Kaj mi volus defii al la kontraŭo: kiel oni povus traduki taŭge kaj senperde la ĉefajn verkojn de la originala poeto kaj novelisto esperantista Raymond Schwartz en nacian lingvon?

B

Gonzague De Reynold skribis ankaŭ aliajn nekredblaĵojn: en fama raporto, pri kiu ni ankoraŭfoje parolos, li skribas interalie, ke Esperanto estas kaŭzo kaj efekto de intelekta dekadenco. Kurioze: niaj Interlingua-amikoj ĵetiĝis avide sur tiun juĝon, kaj ĝin ripetas je ĉiu oportuna aŭ maloportuna momento. Ne ekzameninte la kulturan matricon de De Reynold. Oni ja bone scias, ke por li ĉio, kio venis post la Franca Revolucio (aŭ eble post la Mezepoko) estis “dekadencan”: do certe ankaŭ Esperanto (kaj Interlingua). Ke Esperanto (kaj Interlingua), el la eliteca, aristokrata kaj reakcia perspektivo de De Reynold, estas ne nur *efekto*, sed ankaŭ povas esti *kaŭzo* de intelekta dekadenco, tio estas certe vera. Esperanto, sur la bazo de sia ideologio kaj de siaj praktikaj demokrataj celoj, povas esti danĝera liberigo-faktoro, kiu agas, en longa perspektivo, kontraŭ la sociaj kaj moralaj valoroj, kiujn defendis De Reynold.

C

Ĝis nun ni vidis akuzojn kaj kritikojn nekoherajn, banalajn, senbazajn. Nun ni vidas la kritikojn surrealismajn. Estas la kazo de la skota poeto Hugh Mc Diarmid:

Mi rememoras, kiel vi diable ridis, plengorĝe,
kiam mi legis al vi laŭtvoce, eltirajon el *La*
Politiko de la Arja Vojo de Pope: “La angla lingvo
estas destinita iĝi la Universala Lingvo”.
La vibrefiko de la angla lingvo korekte parolata
(kies tonalteco estas iom naza)
je la pineala glando estas unika,
ĝi estas faktoro necesa al la homa evoluo.
Ĝis nun mi ne trovis efekton
kreivan en esperanto aŭ en ido,

²⁰⁴ Pierre BURNEY, "Les langues internationales", Paris, Presses Universitaires de France, 1962, p 94.

La kreiva efekto de la eŭropaj lingvoj
povas montriĝi en la fakto, ke la vibroj
produktitaj en la elparolo de tiuj lingvoj
ĉiuj senescepte - havas direkton.
Mi trovas nenian vibrodirekton en esperanto.
Impulso sen direkto estas ĥaoso.²⁰⁵

Ni estas en plena abstrakteco, en la groteska uzo de vortoj sen esploro por esprimo de io konkreta.
Kaj tamen, por esti poeto, ne estas necese misrezoni²⁰⁶.

²⁰⁵ Hugh McDIARMID, "In memoriam...", 1955, p. 21.

²⁰⁶ (Noto de 2018): La angla fariĝis fakta internacia lingvo, sed pro tute aliaj kaŭzoj. Supozeble, en tiu poemo la aŭtoro proponis iom da ironio.

10. Novlatinoidismo en planlingvistiko

10.1. La ideologiaj fundamentoj de novlatinoidismo

La novlatinoidisma skolo en planlingvistiko asertas, ke la ĉefa ilo de civilizo estas la lingvo. La plej disvastiĝinta civilizo de nia epoko estas la okcidenta civilizo. Tiu civilizo estas rase ligita: “Tiu kulturo, asertas grava reprezentanto de novlatinoidismo, estas sentata kiel tipa esprimo de la kulturo de la blankaj rasoj”. Laŭ la sama aŭtoro, tiu civilizo, iĝante ciam pli uniforma, ĉiam pli bezonas komunan lingvon, kiu taŭgu al ĝia naturo. “Hodiaŭ, li asertas, ĉar nia kulturo baziĝas sur la historiaj fundamentoj de Romo, estas klare, ke la bazoj de la (internacia) lingvo devas esti la samaj latinaj fundamentoj”²⁰⁷. Tial, laŭ la reprezentantoj de la novlatinoidisma skolo, “moderna interlingvistiko estas aplikata scienco (kiu) prilaboras elementojn, kiujn oni ne povas laŭplaĉe ŝanĝi, ĉar oni utiligas ilin ekde jarcentoj; tio signifas, ke tiu scienco devas uzi la vortojn de la internacia kultura vortaro, kiuj estas komunaj al ĉiuj kulturaj lingvoj”²⁰⁸. La eldiraĵon tre konatan de la fama dana lingvisto Otto Jespersen, laŭ kiu “la plej bona internacia lingvo estas la lingvo plej facila por la plej granda nombro da homoj” oni devas interpreti laŭ tio, kion asertis ĝia aŭtoro mem, en la senco, ke ĝi koncernas nur la eŭropanojn, aŭ la loĝantojn de aliaj partoj de la terglobo, kiuj aŭ ankaŭ estas eŭropdevenaj, aŭ posedas civilizon bazitan sur la eŭropa civilizo mem²⁰⁹.

Pro tiu kaŭzo, la strukturo de planlingvo devas baziĝi sur la strukturo de la okcidenteŭropaj lingvoj, kaj rajtas enhavi nenion inventitan²¹⁰.

Estas klare, ke tia lingvo devas do esti komprenebla al ĉiu eŭropa klerulo sen antaŭa lerno²¹¹, kaj ke ĝi havos aspekton “natureco”, kvazaŭ temus pri novlatina lingvo. En tiu natureco mem oni retrovus la kulturajn, sciencajn, pedagogiajn kaj komunikajn valorojn de tia projekto, almenaŭ laŭ la asertoj de la anoj de Interlingua.

Interesan kvankam ne konkludigan eksperimenton organizis tamen lastatempe la usona kuracisto E. James Lieberman²¹².

Laŭ tiu aŭtoro, 24 anglalingvaj usonaj kuracistoj eksperimente tradukis en la anglan resumojn de medicinaj artikoloj verkitaĵojn en Interlingua. Pluraj bone tradukis, sed pli ol la duono el ili miskomprenis lingvo-vortetojn aŭ verbojn, ofte miskomprenante tiel la sencon de la tuta teksto. Kaj tamen temis pri tasko relative facila: la temo estis faka, kaj ĉiu ekzamenita kuracisto lernis dum sia lerneja tempo iomete da hispana, aŭ da franca, aŭ da latina lingvoj.

Al tiu artikolo respondis Interlingua-ista psikologo, Stanley A. Mulaik²¹³. Li asertis (tute prave), ke la eksperimento de d-ro Lieberman estis tro limigita por esti sendube akceptenda. Fakte, laŭ li, estus necesa eksperimento je pli ampleksa nivelo. Li tamen miris pri la generala malsukceso, kaj proponis

²⁰⁷ Julian PROROK (pseŭdonomo de E. VON WAHL), "Kultureller und erzieherischer Wert des Occidentals", en: "Occidental die Weltsprache" (red. PIGAL), Stuttgart, Franckhe, tria eldono 1930, p. 60-61.

²⁰⁸ Engelbert PIGAL, "Vorwort", en "Occidental...", cit., p. 9.

²⁰⁹ Otto JESPERSEN, "Eine internationale Sprache", Heidelberg, Winter, 1928, p. 35.

²¹⁰ Ju malpli arbitraj kaj pli raciaj la elementoj (de la Internacia Lingvo) estos, des pli stabila ĝi estos". Citaĵo el: Jespersen, "Eine Internationale Sprache", p. 34.

²¹¹ Cetere ni devas ĉi tie rimarkigi, ke neniam okazis studoj pri la problemoj de senpera komprenebleco de la novlatinoidaj lingvoj.

²¹² J. LIEBERMAN, "Esperanto, Interlingua, and Emperor's New Clothes", en "The International Language Reporter" 1962/29.

²¹³ S.A. Mulaik, "Interlanguages Need Rigorous Testing", kiu aperis en "The International Language Reporter", 1962/30.

interesan eksplikon: la senpera legado (kaj kompreno) de Interlingua estas pli probable funkcio de la unuopaj individuaj lingvokapabloj, ol de la ecoj de Interlingua mem. Per tio, li tamen neniigas la tutan teorion konstruon de siaj samcelanoj.

Laŭ mia limigita sperto, mi emas opinii, ke Mulaik pravas, sed mi deziras atentigi pri kurioza konstato: homoj, kiuj ne povas legi Interlinguan unuavide, malgraŭ kono de unu aŭ du novlatinaj lingvoj, iĝas subite kapablaj tion fari, post la lerno de Esperanto.

Du estas la vojoj por konstrui tian planlingvon: laŭ la unua, oni devas serĉi *en la latina lingvo* la fleksiajn, leksikajn kaj frazeologiajn elementojn, kiujn oni ankoraŭ retrovas en la novlatinaj lingvoj, kaj kiuj do ankoraŭ “vivas” Per ili oni povas konstrui tutan lingvon. Tiun skolon oni povus nomi “prototipisma”, ĉar ĝia bazlingvo (prototipa lingvo) estas la latina. Interlinguan kreis sciencisto, kiu apartenis al ĉi tiu skolo.

La alia vojo eliras de la analizo de la *modernaj okcidenteŭropaj lingvoj*. El ili oni tiras ĉiujn komunajn elementojn sur la leksika, gramatika kaj sintaksa niveloj, kaj oni per ili planas lingvon. Oni povus konvencie nomi ĉi tiun skolon “modernlingva”, ĉar ĝi havas nenion apartan prototipan lingvon, kaj ĝi ĉerpas sian materialon el la modernaj lingvoj de Okcidenta Eŭropo. Ambaŭ skoloj estas samaĝaj. La unuaj projektoj de la dua skolo datumas de la fino de la lasta jarcento (ekz-e *Kosmo*, de Eugen Lauda, 1888; *Mundolingue*, de Julius Lott, 1890; *Idiom Neutral*, 1902). Kaj preskaŭ samtempa estas la prototipisma skolo, kun la *Langue catholique* de Liptay (1890), kaj *Latino sine Flexione*, de Giuseppe Peano, 1902²¹⁴.

Nun ni jam povas ekkompreni la pensmanieron de la anoj de la Interlingua-istoj. Por ili ekzistas okcidenteŭropa lingva unueco) kiun oni tamen devus retrovi kaj rekonstrui, kaj poste trudi al ĉiuj aliaj popoloj pro la supereco de la okcidenta civilizo. Ni rimarkas, do, unue, politikan elekton, kiu konkretiĝas en eŭropocentra mondpercepto, kaj efektiviĝas en la ellaboro de metodologie taŭga por konstrui “okcidentan” lingvon.

Dum ke la moderna lingvistiko, etnologio, psikologio, psikiatrio, ktp., iĝas ĉiam pli interesataj al faktoj nomataj “transkulturaj”, la novlatinoidistoj fermiĝas ĉiam pli en sia ebura turo en Okcidenteŭropo.

Estas pro tio klare, kial la planlingva metodologio de tiu skolo nenion ŝuldas al la modernaj lingvistikaj metodoj. Ili multe pli similas al la iamaj klasikaj filologiaj metodoj, ellaboritaj en la pasinta jarcento.

Du estas la danĝeroj: unuflanke, ke oni limiĝu en la serĉo de *Ursprache* (= pralingvo) novlatina, kaj ĉion subordonu al tiu serĉo. Tio okazis al la aŭtoro de Interlingua, Alexander Gode. Aliflanke, ni rimarkas la danĝeron fali en la lingva kaj kultura imperialismo, kiu ombras la valorojn de la “aliuloj” kaj fini sian karieron en rasismo, kiu en la faktoj neas la valorojn intrinsikajn de internacia planlingvo.

La perspektivo de Gode, ni diris, centriĝas sur la problemo de la trovo de pralingvo, kiel simbolo de la unueco de la latinida mondo: “En ĉiu individua ekzemplo, la lingvovariantoj (t.e. la etimologie ligitaj vortoj en la malsamaj novlatinaj lingvoj) iĝis por mi kvazaŭ simboloj de la kulturaj variantoj interne de la Okcidenta mondo; la fina internacia termino estis la simbolo de la homogeneco de la latina mondo - aŭ, se ni preferas - de la romiana-ĝermana mondo”²¹⁵.

²¹⁴ Tiuj faktoj kontraŭdiras la neniam pruvitan aserton de Pierre Burney en *Les Langues internationales*, Parizo, Presses Universitaires de France, 1962, laŭ kiu ekzistus “tendenco ĉiam pli forta, kiu pelas la artefaritajn lingvojn al natureco” (p.96).

²¹⁵ Alexander GODE, citita en: Ric BERGER, "Le problema de un lingua international", Morges, Editiones Interlingua, sen dato, p. 15.

Tio estas certe tre poetika, sed riskas taŭgi al katastrofaj banaligoj. Ekzemple, por kelkaj Interlingua-amikoj “Nia civilizo okcidenta estas dufoje miljara heredaĵo de la greka-roma antikvaĝo. Esperanto estas nura maskerado de tiu heredaĵo, dum ke Interlingua proponas al ni ĉion, kio meritis saviĝi el tiu heredaĵo”²¹⁶.

Por tiu aŭtoro, do, la valoroj de civilizo estas aŭtomate lingvaj, kaj, *eo ipso* (= per tio mem) ligitaj al bone difinita ortografio. Se tio verus, oni povus ankaŭ aserti, ke la itala “perfidas” la grekan-latinan heredaĵon, pro sia simpligita ortografio, aŭ ke la franca “perfidas” ĝin, ĉar oni skribas *agression* (agreso) anstataŭ la ortografio pli korektan **aggression*, *poids* (pezo) anst. **pois*, *rythme* (ritmo) anst. **rhythme*, *caractère*, (karaktero) anst. **characterè*, kiuj ĉiuj estus korektaj el la etimologia kaj ortografia vidpunktoj.

Tio estas, jam unuavide, absurda. La valoroj de la greka-latina mondo estas socie bazitaj: ili neniel povas identiĝi kun unu el la funkcioj (t.e. la lingvo) de la portantoj de tiu socio. Kaj se vere oni volas paroli pri lingvaj valoroj, tiam ni parolu pri stilo densa kaj ofte komplika, riĉa je paralelaĵoj, ekzemploj el la mitologio, alvokoj al la konscienco de la aŭskultantoj. Kaj, nature, ni parolu pri eliteco de tiuj valoroj, neevitebla en socio, kies ekonomio funkciis sur la bazo de sklavismo. Elitaj valoroj, do, por kultura kaj ekonomia elito. Kiel ajn, por ni neniam la “lingvaj valoroj” de la greka-latina civilizo povas esti la vortoj mem, ilia ekstera formo, eĉ ilia ortografio. Puraj formoj neniam povas altiĝi al la nivelo de fundamentaj valoroj. Ni ne dubas, ke “Interlingua [...] estas multe pli simpatia ol Esperanto ĉefe al la klerula elito”²¹⁷. Mi ŝatus aldoni: Interlingua plaĉas ĉefe al tiu elito, kiu kredas esti klera, al tiu elito, kiu fakte ne scias rigardi trans kaj preter la formoj.

La termino mem “greka-latina civilizo”, cetere, ne multe taŭgas. Fakte, ĝenerale oni kutimas paroli pri “juda-greka-latina civilizo”. kie restas la judoj en la perspektivo de la amikoj de Interlingua? Certe, kiam oni vidas nenion alian ol formojn, oni forgesas la gravaĵojn, nome, la enhavon.

Sed, fine, kio estas tiu “okcidenta” civilizo? Laŭ niaj Interlingua-amikoj, temas pri kultura unuo (kun kelkaj malgrandaj lokaj malsamajoj), al kiu korespondas minimume potenciala lingva unuo. Sed tio estas erara: al la “okcidenta civilizo” apartenas, jes, la italoj, la francoj, la angloj, kaj eĉ la germanoj kaj la rusoj (malgraŭ tio, ke ili parolas ne novlatinan lingvon, sed “nur” hindeŭropan idiomon), sed ankaŭ la maltanoj, la finnoj kaj la hungaroj, kaj la baskoj, kiuj parolas nehindeŭropajn lingvojn. Kontraŭe, la lingvoj irana, hindia, urdua, bengala apartenas al la hindeŭropa lingvogrupo, sed la popoloj, kiuj parolas ilin, certe ne apartenas al la t.n. “okcidenta” civilizo.

Saman fenomenon ni konstatas en la civilizo ĉina-korea-japana, kiun oni povas konsideri kiel tuton (minimume en historia perspektivo), sed kies tri lingvoj (al kiuj oni devus aldoni i.a. ankaŭ la vjetnaman) estas komplete malsamaj.

Estas do evidente, ke hipostazo (personigo) inter civilizo kaj lingvo (aŭ lingvofamilio) estas nur kruda banaligo de io alia, t.e. de la fakto, ke interne de civilizo ekzistas (socie determinitaj) komunaj konceptoj. Konceptoj, do, enhavoj, kaj ne vortoj, t.e. puraj formoj.

Laŭ Alphonse Matejka, kiun citas Alessandro Bausani²¹⁸, la internacia helplingvo devus esti fenomeno kaj idealo de “superaj civilizoj”, kiujn la aŭtoro kontraŭstarigas al la “malsuperaj”. La okcidenta civilizo estus do “supera”. Ĉi tie tro ofte oni forgesas, ke ne ekzistas parametroj por juĝi

²¹⁶ BERGER, “Les Écoles...”, 1975, p. 5.

²¹⁷ Berger, “Les Écoles...”, 1975, p. 5.

²¹⁸ BAUSANI, “Le lingue inventate”, 1974 (1970).

la civilizojn laŭ “supereco”-niveleoj. Ĉar ne ekzistas lingva supereco, ne ekzistas kultura supereco. Etnocentrismo estas danĝera (kaj naiva) sinteno.

Pli klara estas la imperialisma faktoro implicita ekz-e en la jena citaĵo el artikolo de d-ro Stefano Bakonyi, kiu estis ankaŭ entuziasma ano de la Morala Rearmiĝo: “La nova interlingvo estos la determina faktoro de la ne nur kultura sed ankaŭ ekonomia kaj politika integriĝo de la popoloj, kiuj apartenas al tio, kion ni nomas hodiaŭ la okcidenta civilizo, kiun ni konsideras kiel la plej dinamika”²¹⁹.

Pli klara ankoraŭ, kaj certe pli brutala, estas la pioniro de Occidental A.Z. Ramstedt²²⁰. Li skribas: “Helplingvo internacia por la kulturaj nacioj de la Okcidento ne povas esti io alia ol lingvo, kiu respegulas ilian kulturon [...] Determinaj estos la bezonoj kaj la kutimoj de la Okcidentaj nacioj: de tiuj lastaj, do, kaj ne tiuj de la ceteraj civilizoj, ĉu antikvaj aŭ orientaj, de negroj aŭ papuoj [...]” Li daŭrigas sian pritrakton tiel: “La oriento okcidentiĝas ĉiutage plimulte. Se naciistoj en Nagasaki protestas kontraŭ ĉi tiu evoluo, tio gravas ne pli multe ol birdopepo dum ŝtormo. Nuntempe ĝuste la okcidenta civilizo estas tutmonda [...] La orientaj popoloj havas nek propran sciencon, nek propran teknikon. Tiuj ĉi lastaj estas okcidentaj, kaj lingvo, kiu celas esti utila al ili, povas esti nur okcidenta”.

La politika opini-elekto, kiu estas je la bazo de iuj anoj de novlatinoidismo, montriĝas plej klare en tiu citaĵo el E. von Wahl, el verko aperinta en 1922, do kiam Sovetunio ankoraŭ estis la mita espero por la mizeruloj kaj proletoj de la tuta mondo. Li skribis: “Por mi, estas klare: aŭ venkos la bolŝevikismo, kaj kun ĝi venkos la nova kulturo de Esperanto; aŭ la bolŝevikismo ne venkos, kaj tiam triumfos la komplikaj novlatinoidaj lingvoj, kiuj konservas la elementojn de la dumiljara eŭropa kulturo”²²¹.

10.2. Alexander Gode

Aleksander Gode estis duone pragmatika, duone poeziema personeco. Kiel filologo ĉe IALA, li estis la ĉefa aŭtoro de Interlingua (kvankam pluraj Interlingua-istoj ne agnoskas tion): samtempe li estis ĝia ĉefa ideologo. Lia personeco estis tre kompleksa, sed esence li estis simpatia kaj sincera: liaj ideoj ne povas ne interesi homon kun planlingvaj intereso.

Kiel Mario Andrew Pei rimarkigas, “oni povas difini Interlinguan kiel lingvon tutromanidan [...] Oni ĝenerale ne konsideras ĝin lingvo universala parolata, sed lingvo precipe por skribaj uzoj okaze de internaciaj sciencaj renkontiĝoj”²²². La fakto, ke usona lingvisto subtenas tian tezon, dependas de tio, ke Gode mem pritraktis el teoria kaj praktika vidpunktoj la problemon de internacia helplingvo en maniero sufiĉe malsama de tiu de siaj epigonoj en Eŭropo, kaj ke tiu maniero pravigas la vidpunkton de lingvistoj kiel Pei.

La sinteno de Gode estas tiu, kiun ĝenerale agnoskas ĉiuj novlatinoidemaj planlingvanoj kiel ĝusta. Tre bonan resumon prezentas al ni la pioniro de novlatinoidismo, la belga filologo J. Meysmans, en teksto iom malnova (1931)²²³ sed tre aktuala: “Ni komencas per la konstato, li skribas, ke la kleruloj de ĉiuj nacioj konas minimume unu el la grandaj kulturaj lingvoj (angla, franca, germana, hispana, itala). Eĉ en Ĉinio kaj en Japanio la scio de la eŭropaj lingvoj disvastiĝas ĉiam pli vaste en la

²¹⁹ Stefano BAKONYI, citita en: BERGER, “Pourquoi l’Interlingua?”, 1971, p. 32.

²²⁰ RAMSTEDT, “Li psicologic...”, 1964.

²²¹ E. DE WAHL, citita en: BLANKE, “Pri la historio de internaciaj planlingvoj”, en: “Paco”, 1975/7-8.

²²² PEI, “Cercasi...”, 1972/178, p. 9.

²²³ Laŭ J. Meysmans, citita en: Ric BERGER, “Historia del lingua international”, dua volumo, Morges, Editiones Interlingua, sen dato, p. 18.

kulturhavaj klasoj [...] Dum sufiĉe longa tempo /la internacia lingvo/ estos praktikata fare-de /tiu/ elito, ĉefe en sciencaj laboroj kaj en la korespondado de la granda komerco”.

Tiu opinio tre bone resumas ankaŭ la vidpunkton de A. Gode, kiu asertas, ke la karakteriza trajto de Interlingua estas, ke ĝi estas ĝenerale kaj en ĉiu detalo “lingvo por homoj kiuj konas la francan, la hispanan, la italan, la anglan aŭ la latinan (aŭ la sciencajn terminologiojn) - krom havi ioman nivelon en teknikaj sciigoj”.²²⁴

Sed Gode esprimas sin plej bone en la parolado, kiun li legis okaze de la tria internacia kongreso de Interlingua en Tours (Francio: 1-6.8.1959), kaj kiu aperis en *Novas de Interlingua*. Tiu teksto, kies titolo estas *Manifesto de Interlingua*, estas lia interlingvistika testamento²²⁵.

En tiu *Manifesto* Alexander Gode promesas simplan diskuton pri la bazoj kaj la rolo de Interlingua. Tio estas necesa, li skribas, ĉar “mi rimarkas ofte kun granda alarmiĝo, ke la plej granda parto el la kritikantoj de Interlingua (kaj ofte eĉ el ĝiaj amikoj kaj anoj) juĝas ĝin sur la bazo de elementoj, kiuj fakte ĝin neniel koncernas”. Laŭ Gode, tio koncernus ĉefe la Esperantistojn, kiuj “kritikas kaj juĝas Interlinguan sur la bazo de premiso - tute nedubbla laŭ ili (sed malgraŭ tio tute erara) - ke la pretendo de Interlingua estas enuziĝi ekzakte por la samaj funkcioj, al kiuj Esperanto klopodas enuziĝi, t.e., ke la celo de Interlingua estas konkuri kun Esperanto dank-al la forto de ĝiaj superesperantistaj kvalitoj. Je tiuj premisoj evidente estas facile pruvi la absurdan megalomanion de Interlingua, ĉar fakte malmultaj karakterizaĵoj de Interlingua estas superaj al tiuj de Esperanto, se la difino de ‘supereco’ estas *pli esperanteca ol Esperanto*”.

Tio estas vera kaj tre racia. Alexander Gode pravas, kaj mi skribis ĉi tiun eseon klopodante eviti la kaptilon, al kiu li aludis. Nur la eŭropaj epigonoj de Gode tion forgesis. “Mi ne povas klarigi kaj defendi la strukturon de Interlingua sur la bazo de premisoj, kiuj ne estas parto de la fundamento de Interlingua”, skribas Gode. Male, liaj eŭropaj epigonoj trankvile komparas Esperanton kaj Interlinguan, kvazaŭ Gode mem nenion dirintus.

“Mi klopodis plurfoje karakterizi Interlinguan en diferenciga maniero, nomante ĝin *moderna latino* aŭ *averaĝa lingvistika normo de Eŭropo*. La kaŭzo de tiu difino kuŝas en la fakto, ke universala lingvo laŭ la kompreno de Zamenhof estas nenio alia ol nebla revo”. Gode, tre pragmatika, antaŭvidas la rolon de Interlingua tre modeste kaj tre humile. Li skribas: “Laŭ la fundamenta filozofio de Interlingua, estas neeble konstrui lingvon por la antaŭfiksita celo simpligi la internacian komunikadon, sed estas, kontraŭe, eble labori por la enutiligo de internacia komunikilo sur la bazo de la observo, ke tia ilo jam ekzistas, kvankam nur latente [...] Kiam Zamenhof konstruis sian lingvon, li celis sistemon simplan, logikan, skeman (= aŭtonoman) kaj universalan. En la kazo de Interlingua, neniu elektoprincipo estas fakte ebla, ĉar ne temis pri konstruo, sed pri ellaboro de lingvo. La grado de simpleco kaj de skemigo dependis de ĝia esenca naturo, kaj ne de postulitaj (kaj eksteraj) principoj [...] Tiu grado estas nenio alia ol karakterizo de la spirito de la lingvo mem”.

Gode tre bone komprenas la malsamajn kondiĉojn de la vivo de Interlingua kaj de Esperanto: Esperanto estis unue projekto, kaj ĝia historio respiegulas la neceson ekipi ĝin per kolektivo, kiu parolas ĝin. Male, laŭ Gode, la ekzisto de la kolektivo, kiu parolas, aŭ ankaŭ nur latente povas paroli planlingvon, devas ekzisti *antaŭ* la kreo de la lingvo mem. La praktika utiligado, laste, venas nur en tria pozicio.

La ambicio de Interlingua estas do funkcii kiel komuna lingvo de la Okcidenta kolektivo, sed el speciala perspektivo.

²²⁴ Laŭ A. GODE, citita en: BERGER, “Historia...”, unua parto, sen dato, p. 16.

²²⁵ Alexander GODE, “Manifesto de Interlingua”, en: “Novas de Interlingua”, 1959/3-4.

“La plej efika maniero formuli ĉi tiun koncepton estis, ĝis nun, la provo identigi Interlinguan kun tio, kion la usona filologo Benjamin Lee Whorf nomis la *Averaĝa Normigita Eŭroplingvo* (Standard Average European: SAE) [...] Interlingua prezentiĝas kiel la produkto de la klopodo distili el-de la malsamaj /eŭropaj/ dialektoj la en ĉiuj implicitan normon, kaj efektiviĝi ĉi tiun distilon sen iu ajn aldono aŭ subjektiva perforto [...] Ekzistas ĉi-koncerne paraleleco kun la maniero laŭ kiu Goethe vidadis en la multeco de la kreskaĵoj tion, kion li nomis *Urpflanze* (= prakreskaĵo). Interlingua estus do la pralingvo (*Ursprache*) de Eŭropo [...] Mi volas kaj volis ĉiam insisti pri tio, ke Interlingua estas historia realaĵo, palpebla kaj rigardebla kiel la prakreskaĵo de Goethe”.

La ekzisto de komuna substrato al ĉiuj novlatinidaj lingvoj estas scienca fakto. Kaj ĉar ĝi ekzistas, oni povas ĝin ekstrakti. Sed ke tiu ekstrakto devus konduki al internacia lingvo, kaj ke ĝi devus okazi tiel, ke ĝi pli simulu al “retrovo”, kaj ke pro tio oni ne havas la rajton ion aldoni - aŭ ion forpreni - tio multe pensigas min al mita sinteno pri lingvaj realaĵoj: kvazaŭ tia ekstrakto iel rilatus kun la *platonaj mitoj*. En la obskura platona kaverno, ni klopodas ekstrakti el la individuaj formoj de la novlatinaj lingvoj la eternajn esencojn, kiuj fakte ekzistas sentempe en la mondo de la esencoj. Tiamaniere, vere, la ellaboro de Interlingua povas simili al filozofia entrepreno, kaj ne al scienca problemo pri metodologio: oni ne aplikas teknikojn, sed oni simple “re-malkovras” la esencon de la lingvo, kaj lerni Interlinguan ne plu estus “akiri ion novan”, sed rememori jam konatan esencon, kiel rezultas el la platona kognitiva teorio.

Tio certe estas tre filozofia, iom poezia - oni konas tre bone la gravecon de la Platona filozofio en la verkaro de Goethe - sed neniel scienca.

Ekzistas neniu kialo, kiu devigas nin haltigi nian sciencan praktikadon precize tiam, kiam ĝi preterpasas la limojn antaŭfiksitaĵajn fare-de Platono.

La ununuraj limoj de nia scienca praktikado estas moral- kaj kognitiv-rilataj. Aliaj limigoj estas arbitraj kaj kripligaj. Planlingvistiko inspiriĝanta je Platono estus tre malriĉa, same kiel, cetere, platoneca medicino, aŭ elektrologio platonisma.

La esperantistoj opinias, ke la limoj en planlingvistiko estas aŭ sociologiaj aŭ teknikaj, sed neniam platon-diktitaj. Tio signifas, ke, laŭ ili, kiam oni estas retrovintaj la *Ursprache* (= la pralingvon), oni povas tre bone de ĝi ion neutilan amputi - aŭ oni povas al ĝi aldoni elementojn, kondiĉe ke tiu scienca aldono aŭ “kripligo” estu pravigebla sur la bazo de la ĝenerale homa celo de planlingvo, kaj ke ĝi estu efektivegebla sur la bazo de la adoptita baza lingvostrukturo.

Sed, fine, kiu estus tiu kolektivo, el kiu oni volus ekstrakti la platonan planlingvon? “Provizora respondo, skribas Gode mem, estas la jena: La lingva kolektivo ekzistanta en la teritorio nomata fare-de iuj filologoj *Romania* [...] Interlingua estas /do/ la komuna lingvo de Romania”.

]

Kaj interne de tiu *Romania* Gode proponas preferencan regnon de Interlingua, nome la sciencan kampon, ĉar tie, dank-al homogena terminologio, la planlingvo montriĝas plej efikeca.

En ĉi tiu ĉapitro ni intencas ekzameni detale la filozofian bazon de Interlingua, por ke estu klare, ke el ĝi fontas preciza koncepto pri planada tekniko. Mi opinias, ke post la lego de la kelkaj citaĵoj el la *Manifesto* de Gode, ni kapablas kompreni pli klare la kialon de la teknikoj, kiujn ni pritrakto en la sekvantaj ĉapitroj.

Ĉar la lingvo-aŭtonoma kaj la novlatinoida skoloj malsamas ĝuste ĉi tie, ni volas ĉi-sube resumi la malkonkordo-punktojn:

Aŭtonomisma skolo	Novlatinoidismaj skoloj (protitipisma kaj modernlingva)	
Esperanto, Ido	Prototipisma skolo Ekz-e: Interlingua-istoj Tezoj de A. Gode	Modernlingva skolo Ekz-e: Occidentalistoj Kaj kelkaj epigonoj de Gode
La okcidenta kulturo		
Ni bezonas lingvon, kiu laŭpove estu strukture neŭtrala inter la malsamaj kulturoj.	La okcidenta kulturo estas la patrino de la scienco. I.L. devas do esti okcident-aspekta.	La okcidenta kulturo estas supera. Blankuloj troviĝas ĉie.
Lingvo kaj kulturo		
Ne ekzistas strikta kunligo inter lingvo kaj kulturo.	Ekzistas tre strikta ligo inter kulturo kaj lingvo: la lingvaj strukturoj determinas “mond-percepton”. Kelkaj epigonoj kredas, ke parto de la kultura heredaĵo konsistas el vortoj.	
Universala lingvo		
Principe ĝi eblas, kun internacia plej simpla strukturo.	Ne ebla.	Principe ebla, sed nur kun novlatina strukturo (“ĉar la scienco estas okcidenta”).
Planiga-metodologio		
Racia sistemigo de plej ofte troveblaj lingvo-strukturoj.	Platoneca “prototipa” metodo.	Simpla racia kunmeto de ekzistantaj novlatinaj lingvo-strukturoj.

Ĉi tie konvenas rimarkigi, ke la vorto “epigonoj” indikas kaj la disĉiplojn de Gode ĉefe en Eŭropo, kaj aliajn epigonojn de pli malnovaj novlatinoidaj skoloj. En Eŭropo, Gode havis malmulte da veraj disĉiploj. La unuaj skoloj formiĝis en 1902 cirkaŭ *Idiom Neutral*. Alia skolo, parte derivita de tiu *Idiom Neutral*, formiĝis pli malfrue, en 1909, cirkaŭ Giuseppe Peano, aŭtoro de *Interlingua* (ankaŭ nomata *Latino sine Flexione*, ne konfuzenda kun Interlingua-IALA, al kiu estas dediĉita ĉi tiu teksto). Alia skolo, tre grava, estas tiu de *Occidental*, kiun fondis Edgar von Wahl, al kiu aliĝis cetere ankaŭ multaj idistoj. Parto el la partianoj de tiuj malsamaj skoloj aliĝis, inter 1951 kaj 1958, al la IALA-ido, *Interlingua*, sed nur eta grupo ĝuste komprenis la tezojn de Gode: la plejparto ankoraŭ konsentas kun la bazaj tezoj de la iamaj skoloj (kiujn ni prezentas en la tria kolono dekstre), de kiuj ili do estas laŭvere “epigonoj”. Alia grupeto ŝajne multe miskomprenis la majstron: ili sincere kredas reprezenti la puran personon de Gode, sed fakte misformas kaj kripligas ĝin.

10.3. Benjamin Lee Whorf kaj Gode-ismo

Edward Sapir, unu el la plej grandaj lingvistoj de Usono post Franz Boas, estis unu el la unuaj, kiuj rimarkigis al siaj samtempoj (kaj samlandanoj) la rilatojn ekzistantaj inter lingvo kaj kulturo²²⁶. Unu el liaj disĉiploj, la lingvisto Benjamin Lee Whorf, sur la bazo de siaj studoj pri la uson-indianaj lingvoj, kredis, ke li sukcesis demonstri, ke ĉiuj kulturoj sufiĉe strikte dependas de la strukturoj de la en ili parolataj lingvoj. Tio signifas, ke la homaj kognitivaj kaj perceptaj kapabloj strikte dependas de la lingvaj strukturoj. Pro tio li neis la ekziston de universalaj nocioj: laŭ li, ĉiuspeca nocio lastanalize dependas de lingva strukturo. Eĉ la scienco kaj la tekniko ne povas esti esceptoj.

²²⁶ Edward SAPIR, "Le langage", Paris, Payot, 1967 (originalo usona: 1921).

Tiun tezon oni nomis “hipotezo pri lingva relativismo de Sapir-Whorf”, kaj oni retrovis profetajn antaŭdirojn en la verkoj de la germana lingvisto von Humboldt.

Evidente, se oni konsentas kun tiu hipotezo, internacia lingvo estas fakta kaj teoria neblaĵo. Neniu homo, fakte, povus eliri el la propra “lingva rigardo-punkto”. Lingvo *average facila* por ĉino, japano kaj eŭropano ne ekzistas kaj ne povas ekzisti, ĉar la pensmanieroj de tiuj malsamaj homoj (pensmanieroj dependantaj de la lingva malsameco), ne koincidas inter ili. Ĉiuj konceptoj, do, estus relativaj, kaj ilia signifo aŭ uzo (ilia valoro) estus funkcio de la lingvostrukturoj.

La maksimumo farebla, laŭ Whorf, estas la planado de speco de *average eŭropa lingvo normigita* (Standard Average European: SAE)²²⁷.

Hodiaŭ la tezo de Whorf, en sia tuta ekstremismo, estas akceptata nur far-de kelkaj planlingvistoj. Eĉ ĝiaj lingvistaj defendantoj devis malkonfesi ĝin post akurataj studoj. I.a. tre interesan materialon pri reendimensiigo de tiu tezo ni trovas en verko de la Whorf-a disĉiplo kaj specialisto pri uson-indiana lingvistiko, la germano Helmut Gipper²²⁸.

Aliflanke, estas oportune observi, ke nek von Humboldt, nek Sapir havas ion ajn komunan kun tiu lingvistika ekstremismo. Oni scias, ke von Humboldt multe ŝatis artefaritan lingvon de la pasinta jarcento, nomatan *Solresol*, kiu estis komplete apriora²²⁹. Sapir estis ankaŭ amiko de internacia lingvo, kaj de Esperanto en speciala maniero. En artikolo aperinta en 1931²³⁰, Sapir implice esprimas dubojn pri la novlatinoidaj lingvoprojektoj: “La moderna spirito ne kontentiĝos per internacia lingvo, kiu nur etendas la neperfektaĵojn kaj la idiotismojn de unu lingvo, kontraŭ la kutimoj de ĉiuj ceteraj”. Tio, kion la mondo bezonas “estas lingvo, kiu estu la plej simpla, la plej regula, la plej logika, la plej riĉa kaj la plej kreopova el ĉiuj eblaj lingvoj”. Li aldonas, ke “la fundamentoj de formo vere taŭga kiel internacia lingvo estis jam starigitaj en Esperanto kaj en aliaj internaciaj helplingvoj”, kvankam li dubas, ĉu tiuj lingvoj estas vere sufiĉe perfektaj. Laŭ Sapir, la triumfo de internacia planlingvo ŝuldiĝos grandparte al la bezonoj de Ĉinio kaj Hindio, ne interesataj al la eŭropaj lingvoj kiel tiaj.

Estas do erare paroli pri “hipotezo Sapir-Whorf”, tiom pli ke Sapir mem kredas je la teoria kaj praktika eblo de internacia planlingvo, ĉar “ekzistas kreskanta ekipaĵo el komunaj spertoj kaj sentoj, kiuj devos trovi esprimilon en internacia lingvo”. Li estas fakte je la antipodoj de Whorf.

Gode estis seduktita de la Whorfa tezo: laŭ li la tezoj de la esperantistoj, do, estas eraraj, ĉar ili respegulas la kredon en la ekzisto de universalaj logikaj nocioj²³¹. Kaj, sur la bazo de la Whorfa hipotezo, tiaj universalaj lingvoj ne povas ekzisti.

Bedaŭrinde montrigis, ke la “pruvoj” de Whorf ne estas sufiĉaj, kaj ke lia ekstremismo kondukis lin al scienca senelirejo (i.a. nei la eblon de traduko - anstataŭ ĝin ekspliki). Montriĝis do erare adopti la Whorfan hipotezon kiel pravigon de Interlingua - kaj kiel negilo de la internacieco de Esperanto. Tiurilate, mi citos nur du gravajn laborojn. En 1969 la aŭstralia lingvisto A. Capell demonstris en artikolo, ke ne ekzistas neebleco transiri de unu lingva kodo al alia rilate malsamojn de voĉotono, de sonsistemo, gramatikaj strukturoj, de kognitivaj strukturoj de la malsamaj lingvoj²³². La problemoj estas tutsimple teknika. En samjara artikolo, la nederlanda lingvisto W.A. Verloren van

²²⁷ Benjamin Lee WHORF, "Sprache Denken Wirklichkeit", Reinbek, Rowohlt, 1963 (originalo: usona).

²²⁸ Helmut GIPPER, "Gibt es ein sprachliches Relativitätsprinzip?", Frankfurt (Main), Fischer, 1972.

²²⁹ PEI, "Cercasi...", 1972/178, p. 9.

²³⁰ Edward SAPIR, "Cultura, linguaggio e personalità", Torino, Einaudi, 1972 (usona originalo 1957). La artikolo estas: "The Function of an International Auxiliary Language", aperinta pli frue, en 1931.

²³¹ Laŭ GODE, citita en: W.A. VERLOREN VAN THEMAAT, "Whorf-a lingvistika relativismo kaj planlingvoj", London, CED, sen dato, p. 4.

²³² A. CAPELL, "The limits of Second Language Learning", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1969/I

Themaat demonstris, ke la scienco ne havas specialan ligon kun la bazaj gramatiko kaj vortaro de la eŭropaj lingvoj²³³.

Estas fakto, ke la lastaj “ĝisostaj” whorfanoj estas la Interlingua-istoj: per tiu obsoleta kaj reinterpretenda hipotezo ili “pravigas” la neekzisteblecon de Esperanto, kaj “pruvas”, ke la sola ebla lingvo por la scienco estas Interlingua. Sed dum ke kelkaj anoj de Interlingua bone komprenis kaj bone utiligis propracele tiun hipotezon (i.a. A. Gode, Stanley A. Mulaik, Adolf M. Fritzsche, k.a.)²³⁴, aliaj ĝin banaligis miskomprenite. Ekzemple, Stefano Bakonyi²³⁵ kredis, ke per Interlingua oni povas ne nur ekstrakti la lingvoformojn de SAE, sed ankaŭ ĝiajn “kulturajn ŝarĝojn”, kiujn li kredis ligitaj al la vortoj mem²³⁶: tio estas evidente plej tipa leksika fetiĉismo.


Estas nedubeble, ke la tuta problemo de la rilatoj inter kulturo, penso kaj lingvo estis neracie relativigita. La tezo de Whorf estas jam principe erara, ĉar ĝi ne konsentas pri la naturscienca fakto, ke ĉiuj homoj havas la saman biologian strukturon, kaj konsekvence la samajn kognitivajn kaj lingvajn ilojn, kiel cetere ni jam rimarkis.

10.4. La prototipismo: Platona tekniko de Alexander Gode

En ĉi tiu ĉapitro ni ekzamenos la prototipismajn regulojn de A. Gode. Se oni akceptas la socio-politikajn tezojn de la novlatinoidistoj, se oni konsentas kun ilia koncepto de whorfa SAE, kaj se oni akceptas la platonisman koncepton prilingvan de Gode (t.e., ke al la planlingvo oni rajtas nenion aldoni kaj nenion forpreni), la etimologia tekniko de Gode estas logika sekvo.

La Standard Average European (SAE)

Koncerne okcidenton kaj lingvon, niaj Interlingua-amikoj vidas la situacion jene²³⁷. Rimarku, ke la *tutmonda radiado* rilatas kaj formojn (vortojn), kaj enhavojn de tiuj formoj.



²³³ W.A. VERLOREN VAN THEMAAT, "Is science bound to the Western languages?", en: "La monda lingvoproblemo", 1969/3.

²³⁴ Stanley A. MULAJK, "Naturalismo, cultura e le hypothese de Whorf", en: "The International Language Review", 1957/8.

²³⁵ Stefano BAKONYI, "Problems of International Languages in the Light of Psychology", en: "The International Language Review", 1956/3 kaj 4.

²³⁶ Laŭ artikolo de St. BAKONYI citita en MONNEROT-DUMAINE, "Précis...", 1960, p.155.

²³⁷ Alexander GODE (red.), "Interlingua-English, a Dictionary of the International Language", New York, Storm, 1951, p. xxii-xxiii.

La tradicio de SAE estas la greka-latina tradicio: sed ĉar hodiaŭ Grekio malaperis el la listo de la kulturportantaj nacioj (?), tiu tradicio en nia epoko enkarniĝas, je la lingva vidpunkto, en la angla-latinida lingvogrupo, kun eblaj kontribuajtoj venantaj de la slavaj kaj de la ĝermanaj lingvoj.

Mi supozas, ke la angla estas pritraktata nur pro sia latinida vortar-provizo: ĝia strukturo, kaj la “vianta” kaj populara provizo de ĝia vortaro estas fakte tipe ĝermanaj.

Ni vidis, ke la aŭtoroj de la novlatinoidaj lingvoprojektoj el la “modern-lingva” skolo ekstraktis sian vortaron el la modernaj lingvoj, akceptante la radikojn aŭ en maniero pli-malpli integra (ekz-e *manuscript*, kaj eĉ *lingu*), aŭ kun neŭtrala finala vokalo (ekz-e *lingue*). Kelkfoje malsamaj vokaloj estas utiligataj radikoj-fine por distingi plurajn sencojn de la sama radikoj. En Occidental, ekz-e, oni distingas *porta-* (prefikso: "portanto", "portilo"), *porta* (portas), *porte* (afranko), *portu* (haveno), *porta* (pordo). Male, la projektoj venantaj el la prototipisma skolo tiras sian vortaron rekte el la latina, kaj ĝenerale nenion ŝanĝas al la finalaj vokaloj de la latina prototipo.

La prototipismaj teknikoj estis detale ellaboritaj fare-de IALA-filologoj²³⁸. Laŭ la-bone konata interlingvisto Stanley A. Mulaik²³⁹, la prototipisma tekniko estas utiligata por “konstrui normigitan vortaron el la variantoj de la modernaj lingvoj. Tiu tekniko postulas minimume ekziston de tri modernlingvaj variantoj en la lingvoj selektitaj kiel ‘kontrol-lingvoj’ (angla, franca, itala, hispana-portugala), por ke oni povu determini la formon de la prototipo, aŭ la strukturon de la formo, kiu etimologie antaŭis tiujn variantojn”. En la (nemalofita) okazo, ke oni trovas malpli ol tri variantojn, oni devas utiligi help-teknikojn:

1. Oni akceptas la latinan formon (de kiu devas tamen ekzisti, en *minimуме unu* kontrollingvo, unu derivitaĵo). Ekz-e, oni akceptos la verbon *occider* (mortigi) el la latina *occidere*, malgraŭ la franca *tuer* kaj la hispana *matar*, pro la itala *uccidere*.
2. Oni akceptas la latinan formon, se oni trovas derivitan formon en germana aŭ rusa. Ekz-e, oni akceptas *cellario* (kelo), pro franca *cellier*, germana *Keller* kaj angla *cellar*. Sed ĉiukaze tiuj vortoj devas esti relatinigitaj, kiel ekz-e *haringo* (cetere, kial ne *haringa*, paralela al la itala *aringa*?).
3. Memeksplikantaj vortoj (ekz-e kunmetitaj vortoj) povas esti enkondukitaj, kondiĉe ke paralela formo estu utiligata en minimume unu el la kontrollingvoj. Ekz-e: oni akceptas *flammifero* (almedo), el *flamma* (flamo) kaj *-ifero* (portanto), konstruaĵo ekzistanta ankaŭ en la itala *fiammifero*.
4. Se ĉiuj ĉi teknikoj fiaskas, oni devas selekti la latinan formon, kiel en la kazo de *ab* (el), *ad* (al), *aut* (aŭ), *etiam* (ankaŭ), *nam* (ĉar), *nimis* (tro), *domo* (domo), *emer* (aĉeti), ktp. Laŭ Mulaik, ĉi tiu kriterio montriĝis plej maltaŭga. Fakte, montriĝis, ke en Interlingua fortiĝas ĉiarn pli la emoj *anque* (anst. *etiam*), *troppo* (anst. *nimis*), *casa* (anst. *domo*), *comprar* (anst. *emer*), ktp. Tio signifas, ke nova kriterio ekformiĝas, laŭ kiu, se la plisupre priskribitaj teknikoj fiaskas, oni povas elekti kiel vorton de Interlingua la etimologian prototipon de *Sud-Romania* (itala kaj hispana-portugala lingvoj).

Oni ĉi tie rimarku, ke en la Interlingua-skolo povas esti konsiderataj nur la prototipa kaj la suplementaj teknikoj. Tiel planita lingvo povas do esti nenio alia ol la objektiva normigo de la latinidaj lingvoj. Kaj ni do rapide malkovras tipan trajton de la filozofio de novlatinoidismo. Ĝi estas tre skema, tre abstrakta, apriora, kaj preskaŭ eksterhistoria. Krome, ĝi estas mekanika, kaj, lastanalize, ideologieca (kontraste al “sciencecaj” pretendoj de siaj anoj).

²³⁸ GODE, “Interlingua-English...”, 1951, p. viii-lxi.

²³⁹ Stanley A. MULAİK, en: “Le Foro”, 1961/1

Sed niaj Interlingua-amikoj kredas je ĝi preskaŭ religie. kaj tiu kredo puŝis Gode al la deklaro, ke se iam oni faros ŝanĝojn al Interlingua, ili povos okazi nur sur la bazo de novpritrakto de la lingvistikaj bazoj de *Romania*²⁴⁰.

Sed kion li difinas (lingva) "Romania"?

Laŭ li, *Romania* konsistas el la franca, la itala, la angla, kaj la hispana-portugala (kiujn li konsideras arbitre kiel unuon). La latino restas ekstere (ĉar ĝi estas la patrino lingvo). Ekstere restas ankaŭ aliaj novlatinaj lingvoj: la rumana, la retoromanĉa, la ladina, la sardinia, la provenca, la okcitana kaj la kataluna.

Oni ne komprenas, kial la angla estas enkalkulata: tiu lingvo ja ha strukturon (spiriton) tipe ĝermanan: nur kelkaj popularaj vortoj venas de la antikva normanda dialekto (aŭ de la latina, per "klerula prunto") Se oni enkalkulas la anglan, oni devus samrajte enkalkuli ankaŭ la maltan, tipe araban lingvon, kiu tamen havas tiom multe da italaj vortoj, ke iu ajn, kiu scias la italan, povas legi kaj senstude kompreni maltlingvan ĵurnalon.

Mi ne pedantumas malagrade: rimarku, ke estas apriorie limigi Romanian al iuj lingvaj regionoj. Kaj la aliaj? Due, rimarku, ke la rezultoj de lingvo-planado (la platona pralingvo) ŝanĝiĝas laŭ la difino de la regionoj, kiuj konsistigas Romanian mem. Se, ekzemple, ni difinas mallarĝe (laŭ la difino de Gode), la persona pronomo *mi* tiel normigita estas *io*, sed se ni konsideras la tutan, faktan Romanian, kia ĝi estas en la realo, tiam la normigita formo devas esti *eu*.

Finfine, mallarĝdifinita Romania ne permesas facilan ekstrakton de la pralingvo. Tiu komuna bazo, laŭ Gode mem, ne permesas konstrui faktan lingvon. "Lastanalize, li skribas, la internaciaj vortoj ne estas vera lingvo, sed grava vortogrupo (ĝenerale koncernanta sciencon), kiu konsistigas la kernon de Interlingua"²⁴¹. Pro tio, kiel ni vidos poste, li devis ekipi Interlinguan per etimologiaj reguloj utiligotaj en la kazo, kiam Romania ne havas ekstraktablajn komunajn formojn.

Kaj la rezulto de tiu ekstraktado platonisma? "Temas pri lingvo, kies artefaritaj trajtoj estas nenio pli ol la simpligo kaj reguligo pli aŭ malpli profundaj de la gramatiko"²⁴². Tio veras: la gramatiko ne estis normigita por ekstrakti el ĝi ia *Urgrammatik* (= Pragmatikon). Kial? Mistero. Gode ĉirilate restis en la arbitreco, do en la artefariteco.

Ni nur ekzameni la etimologio-regulojn, kiujn Gode utiligis por konstrui la vortaron de Interlingua²⁴³.

La teknikoj mem, kiel ni rimarkis, estas etimologie objektivaj: i.a. en ili neniel rolas praktikaj konsideroj. Pro tio tia projekto povas alpreni (aŭ rifuzi) neniun radikon, afikson, finaĵon aŭ sintaksan aŭ morfologian regulon sur la bazo de pripensoj koncernantaj "facilon", "regulecon", "belsonecon", "klaron", "estetikon", ktp. [...] "La aŭtoritateco decidi pri uzokorekteco troviĝas nek en persono, nek en grupo. Ĝi trovigas ekskluzive en la faktoj de la eŭropaj lingvoj, kiel ili estis ellaboritaj far-de la etimologiaj sciencoj, kaj kiel ili estis normigitaj sur la bazo de la ĵusprezentitaj reguloj"²⁴⁴.

Evidente, tio ne signifas, ke por normigi la internacian vortaron al "internacia" (fakte: intersudromana) lingvo oni devas rekonstrui la praromanidan lingvon. Sufiĉas fakte uzi bazajn donitaĵojn pri la lingvo-historio, donitaĵojn koncernantaj la rilatojn inter la iumomente disiĝintaj

²⁴⁰ GODE, "Interlingua-English...", 1951, cit.

²⁴¹ GODE, "Interlingua-English...", p. xxvi.

²⁴² BAUSANI, "Le lingue inventate", 1974/1970), p. 136.

²⁴³ Tazio CARLEVARO, "The naturalist...", 1971, p. 8~10.

²⁴⁴ Stanley A. MULAİK, en: "Le Foro", 1962/5.

eŭropaj lingvoformoj, por tiamaniere konstrui objektivan teknikon taŭgan por produkti normigitajn formojn²⁴⁵.

Ni rimarkas nun, ke tiuj teknikoj permesas al ni la normigon ne de “pli bona” lingvo, sed nur de lingvo, kiu estas la ekzakta katalogo de la komunaj normigitaj formoj de nia lingva kaj kultura heredaĵo. Kaj la kunmeto de tiuj formoj kvazaŭ lingvo produktas normigitan idiomon, enhavanta ĉiujn strukturojn komunajn al la okcidenteŭropaj lingvoj (aŭ, kiel alivorte, sed samsence asertas la esperantistoj, enhavanta ĉiujn strukturojn komunajn al la sudromanaj lingvoj).

10.5. Lingvistiko kaj novlatinoida planlingvistiko

La novlatinoidaj skoloj eliras do el la postulaĵo, ke internacia lingvo pro multaj kaŭzoj devas esti fakte novlatina. La esperantistoj respondas, ke tia lingvo devas esti antaŭ ĉio facila, por ke ĝi estu uzebla kiel efika internacia lingvo. Pri tiu baza malkonsento la nederlanda filologo W.J.A. Manders²⁴⁶ skribas, ke “La /novlatinoidisma/ skolo postulas [...] ke la internacia lingvo devas havi la plej grandan similecon atingeblan kun la ĉefaj eŭropaj lingvoj [...] sed ankaŭ en la publikaĵoj destinitaj por inici la publikon en la helplingvan problemon Jespersen kaj De Wahl ne sufiĉe klare motivas, kial nur tia helplingvo povas sukcesi, kiu pleje similas al la ‘naturaj’ lingvoj. Povas esti ke Jespersen pravas asertante: ‘Helplingvaj projektoj ellogas precipe tiam kritikon kontraŭ detaloj, kiam tiuj estas nenaturaj, t.e. kiam ili pli ol necese devias de tio, kio troviĝas en la ekzistantaj lingvoj aŭ jam estas internaciaj, sed estas evidente, ke nur tre malmultaj personoj povas juĝi, ĉu ia elemento ne trovigas en naciaj lingvoj’. Krome - kaj ankaŭ Jespersen sciis tion - la demando ne estas ĉu oni kritikis, sed ĉu oni *prave* kritikis. Kondamni Esperanton [...] nur pro tio, ke ĝi havas elementojn, kiuj ŝokas iujn lingvistojn, ĉar ili mankas en naciaj lingvoj - jen sinteno, kiu ne decas al scienculo kia Jespersen estis [...] Ili postulis apriore, ke ĉiuj elementoj de la lingvo devas esti ‘naturaj’ [...] Zamenhof sekvis tute alian principon [...] la maksimuman lerneblecon ne nur por lingve instruitaj homoj, sed ankaŭ por tiuj, kiuj neniam lernis fremdajn lingvojn. Sed se Esperanto ne estas perfekta, tion certe ne kaŭzas la fakto ke ĝi estas ‘nenatura’; plej bona estas tiu helplingvo, kiu pleje konformas al sia celo. La celo estas ebligo de internaciaj rilatoj. La helplingvo des pli bone atingos tiun celon, ju pli facila ĝi estas.”

Kial voli trudi al la homa penso la ĉenojn de la novlatinaj lingvoj? Tiu estas la demando de la franca lingvisto P. Janton²⁴⁷: “La kriterioj de /novlatinoidismo/ neniam estis firme difinitaj, Tial oni povas demandi al si, ĉu estas vere kontraŭnature en la pensanta estulo voli paroli lingvon klaran kaj logikan”. “Fakte, li aldonas, la naturalisma morfologio reenkondukas la neregulecon en kategoriojn, kiuj tiam estas rekoneblaj nur laŭ la senco, kaj ne plu laŭ la formo”.

Ni vidis, ke la anoj de la novlatinoida skolo nomas tiun skolon mem “naturalisma”. La itala lingvisto Alessandro Bausani kritikis la uzon de la termino “natura”, “naturalismo” en tiu kunteksto²⁴⁸: “Sed: natureco por kiu? Evidente por la eŭropanoj, forgesante komplete la eventualajn postulojn de afrikanoj aŭ azianoj ŝatantaj lerni internacian helplingvon. Oni troviĝas /tiel/ en plena kolonia epoko, dum ke la sagaco de Zamenhof, per sia sistemo de lingvo nevarieble kaj regule aglutina, povis eviti la dangeron de eŭropocentreco”.

La nereguleco, por la esperantistoj, estas elemento minimume neutila en planlingvo destinita al internacia uzo. La novlatinoida skolo, kontraŭe, ĝin akceptas kiel neeviteblan elementon de novlatinoida planlingvo. Tiu-sence, kiel ni jam vidis, esprimis sin ankaŭ Antoine Meillet, laŭ kiu la

²⁴⁵ Stanley A. MULAİK, en: "Le Foro", 1963/12

²⁴⁶ W.J.A. MANDERS, "Interlingvistiko kaj Esperantologio", Purmerend, Muusses, 1950, p. 26-27

²⁴⁷ JANTON, "L'Esperanto", p. 24

²⁴⁸ Alessandro BAUSANI, "Che cos'è l'interlinguistica", en: "Fenarete", 1973/142, p. 11

reguleco de Esperanto estas troa, kaj pro tio “malpoezia”. Sveda lingvisto Valter Tauli opinias, ke tia argumento estas malfacile demonstrebla²⁴⁹: “Se /tiu tezo/ estus ĝusta, ne povus ekzisti unusola anglalingva verkisto, ĉar la angla lingvo estas neuzebla sen utiligi la substantivojn, kiuj estas plejgrandparte tute regulaj, krom *quantité négligeable* (= nekonsiderinda etkvanto) [...] Se la aserto de Meillet estus vera, ĝi signifus, ke la ĉiutage uzataj vortoj, kiel la verboj *have, go, do*, ktp. kaj la persona pronomoj, kiuj estas ĉiuj neregulaj, estas la plej poeziaj vortoj /de la angla/”.

Cetere, Tauli, konata planlingva specialisto (kiu cetere ĉefe interesiĝas pri lingva planado en naciaj lingvoj), ne estas milda en sia juĝo pri la lingvoj de la novlatinoida skolo.

“La novlatinoidaj planlingvoj, li skribas²⁵⁰, havas du ĉefajn difektojn:

1. ili estas pli ol necese redundancaj pro siaj tro longaj greka-latinaj vortoj;
2. ili estas nesistemecaj kaj neregulaj en la vortkonstruo.
3. Al tiuj du demandoj aldonigas *tria* difekto: la nekonsekvenca kaj ne-fonema ortografio.

La /novlatinoidistoj/ bazigas sian teorion sur la fakto, ke la internaciaj vortoj estas ĉie konataj, kaj ke, pro tio, ili ne postulas kromstreciĝon por ilin lerni en naturalisma planlingvo, Sed tiuj vortoj /fakte/ estas konataj nur al malgranda homproporcio en ĉiuj landoj, kie internacia lingvo estas necesa, ĉefe al tiuj, kiuj jam parolas novlatinan lingvon. La naturalismaj planlingvoj estas relative facilaj je lego al tiuj, kiuj kutimas je la grandaj eŭropaj lingvoj. Sed skribi tian lingvon estas problemo tute alispeca.

Eĉ homoj, kiuj konas eŭropajn lingvojn, ne povas eltiriĝi facile kaj per simplaj reguloj por determini la formon de vorto, utiligota en naturalisma planlingvo, Kaj ni ne parolu pri homoj, kiuj ne konas la grandajn eŭropajn lingvojn. Bazigi la uzon de internacia planlingvo sur la kono de la grandaj eŭropaj lingvoj estas neracie, ĉar la celo de internacia planlingvo estas ĝuste liberigi nin el la tasko lerni la komplikajn naciajn lingvojn. Estas do klare, ke ideale regula planlingvo devas, jes, uzi la radikojn de la internaciaj vortoj por sia vortaro ĉiufoje, kiam tio eblas, kaj tio certe pligrandigos ĝian esprimpovon kaj faciligos ĝian lernon, sed ĝi absolute ne devas kopii la derivomalregulaĵojn de la internaciaj vortoj. Aliflanke, oni ne devas timi la aŭtonomajn konstruaĵojn, kiel tio ŝajnas esti la kazo de pluraj modernaj interlingvistoj. Kiam la internaciaj aŭ naciaj lingvoelementoj estas nesufiĉaj, netaŭgaj aŭ mankantaj, oni devas uzi aŭtonomajn konstruaĵojn (*free constructions*). Oni ja povas fari tion en nacia lingvo, kaj oni ne vidas, kial tio ne estus ebla en internacia planlingvo”.

Ankaŭ la soveta lingvisto E.A. Bokarev ne aprobas la lingvistikajn fundamentojn de novlatinoidismo en planlingvistiko²⁵¹.

Li opinias, ke la argumentado de la novlatinoidistoj ne estas scienca: “La naturalistoj, priatentante unuavice similecon de la internacia lingvo al la naturaj lingvoj, similas al homoj, kiuj juĝas sistemon de aviadilo ne laŭ ĝiaj teknikaj kaj strukturaj kvalitoj, sed laŭ la grado de ĝia simileco al la ‘naturaj’ birdoj”.

Laŭ Bokarev ofte la novlatinoidistoj forgesas la bazan celon de internacia planlingvo, t.e., la enpraktikigon de la lingvo en la intergentan komunikadon. “Ofte impresas, ke adeptoj de iuj lingvo-projektoj, diskutante pri diversaj temoj de lingva teorio, tute forgesas, por kio iliaj lingvoj estis kreataj, ĉu por esti kabinetaj etimologiaj sistemoj, ĉu por esti praktikaj rimedoj de internacia

²⁴⁹ TAULI, "Introduction...", 1968, p. 183.

²⁵⁰ TAULI, samloke, p. 168-169

²⁵¹ BOKAREV, cit., en: "Memorlibro", p. 31-32.

interkompreniĝo". Laŭ li, la novlatinoidaj lingvoj prezentas, jes, interesan materialon, sed la aŭtonomaj planlingvoj estas pli oportunaj: ĉefe dank-al la integra kohero de siaj elementoj kaj al la reguleco kaj analogeco de sia funkciado morfosintaksa. Tio manifestiĝas praktike en produktiva vorto-novformado, en sintaksa diafaneco (*travidebleco*), en sufiĉe *libera vort-ordo*, kaj en *fonologia ortografio*.

Ĉio tio mankas al la novlatinoidaj lingvoprojektoj.

Laŭ Bokarev, en Interlingua "praktika vort-deriva sistemo fakte eĉ ne ekzistas, ĉar ĝia afiksaro estas nur etimologia sistemo de vortderivaj elementoj en naciaj lingvoj, ne regule kaj ne produktive uzataj en Interlingua."

Dubojn pri la termino "naturalismo" esprimas ankaŭ la germana planlingvisto Detlev Blanke²⁵². Citinte el von Wahl (1935), laŭ kiu "/la lingvo/ devas baziĝi sur la internaciaj formoj komunaj al niaj eŭropaj lingvoj en fonetiko, skribo, esprimrimedoj [...] do devas havi la aspekton de preskaŭ natura lingvo", li komentas: "*Preskaŭ natura* signifas en la naturaliste orientitaj lingvoprojektoj, *latineca*, kio evidente ne povas konsistigi validan kriterion el la lingvistika vidpunkto".

Kriterio valida aŭ ne? Sed laŭ Bokarev la problemo estas klara: "Por la multaj naturalismaj projektoj [...] /kiuj/ atentigas unuagrade la etimologian flankon de la problemo, sistemeco kaj struktureco de lingvo internacia restis afero de duagrada, iafaje eĉ de de nula, graveco". Tion agnoskas ankaŭ la kreintoj de Interlingua, Gode kaj Blair²⁵³: ili asertas, ke "en Interlingua la vortarstrukturo estas pli grava ol la morfosintakso [...] tio estas por ni iom paradoksa, kiel cetere rimarkigas ankaŭ ambaŭ aŭtoroj, ĉar en la moderna lingvistiko ĝuste la morfosintakso estas konsiderata kiel la ĉefa elemento de lingvo".

Finfine, la aŭtoroj de Interlingua, tute konscie, retrovenis el la antaŭ-Saussura koncepto de lingvo. Ni ĉiam atentigis pri la fakto, ke niaj Interlingua-amikoj multe malfruas rilate lingvistikajn tezojn.

Jen do kia estas la skolo, kiu naskis Interlinguan: ĝi malfruas en lingvistikaj problemoj, ĝi ankriĝis al cetere baldaŭ disfalonta eŭropo-centrismo, ĝi suferas pro grava malsano: vorto-feticismo. Oni ja ne miras, ke Bausani asertas: "La projektoj el la grupo de Interlingua/ Interlingue [...] fakte rezignis je fakta universaleco, kontentiĝante, eĉ se ne tro eksplicite, iĝi zona helplingvo internacia por la okcidenta kulturo"²⁵⁴.

10.6. Interlingua

Interlingua *neniel* estas malbela lingvo. En prozo, ĝi povas esti majesta: en poezio, malgraŭ ioma manko de koncizo kaj de stiltradicio, ĝi povas esti uzata kun kontentigo. La problemo estas, tamen, ke ne multaj poetoj ĝisnun utiligis ĝin: la malmultaj poemoj ĝisnun aperintaj estas aŭ liberversaj (do senrimaj), aŭ, se verkitaj laŭ klasikaj metroj, farĉitaj per adasismoj kaj kojno-vortoj. Bedaŭrinde la Interlingua-aŭtoroj nenion scias pri la Esperanta literaturo: ioma kono evitigus al ili la samajn eraĵojn, kiujn la poetoj de la unua periodo de la Esperanta literaturo faris.

Vere altnivela poeto neniam verkis en Interlingua: nur Carolo Salicto publikigis kelkajn poemojn akceptindajn. Pro tio mi prezentas ci-sube tekston el Shakespeare (*La tragedio de Hamleto*, en angla originalo, en Interlingua-traduko de Sven Collberg (1974), kaj en la du ekzistantaj Esperanto-tradukoj: de Zamenhof (laŭ la eldono de 1964) kaj de L.N.M. Newell (1964).

²⁵² BLANKE, "Die alten Sprachen...", 1973/3, p. 190-191

²⁵³ A. GODE, H.E. BLAIR, "Interlingua, a Grammar of International Language", New York, Storm, dua eld. 1955.

²⁵⁴ BAUSANI, "Le lingue inventate", 1974 (1970), p. 140.

Angla originalo (3-a akto, unua sceno)

Io be or not to be: that is the question:
whether 'tis nobler in the mind to suffer
the slings and arrows of outrageous fortune
or to take arms against a sea of troubles,
and by opposing end them? To die: to sleep;
no more; and by a sleep to say we end
the heart-ache and the thousand natural
shocks
that flesh is heir to, 'tis a consummation
devoutly to be wish'd. To die, to sleep;
to sleep: perchance to dream: ay, there's the
rub;
for in that sleep of death what dreams may
come
when we have shuffled off this mortal coil,
must give us pause: there's the respect
that makes calamity of so long life; ...

Zamenhofa .traduko (1894, laŭ eldono de 1964)

Ĉu esti aŭ ne esti, - tiel staras
nun la demando: ĉu pli noble estas
elporti ĉiujn batojn, ĉiujn sagojn
de la kolera sorto, aŭ sin armi
kontraŭ la tuta maro da mizeroj
kaj per la kontraŭstaro ilin fini?
Formorti - dormi, kaj nenio plu!
Kaj scii, ke la dormo tute finis
doloron de la koro, la mil batojn,
heredon de la korpo, - tio estas
tre dezirinda celo. Morti - dormi –
trankvile dormi! Jes sed ankaŭ sonĝi!
Jen estas la barilo! Kiaj sonĝoj
viziti povas nian mortan dormon
post la forĵeto de la teraj zorgoj, -
jen tio nin haltigas; tio faras,
ke la mizeroj teraj longe daŭras: ...

Traduko en Interlingua (Sven Collberg, Lund 1974)

Ser o non ser - la es le question,
an es plus nobile sufferer al mente
le flechas aere de un fato dur o
armar se a un mar de affligeres,
que - opponente se - on va finir.
Morir, dormir, non plus, assi finir le
dolor del corde, le tormentos mille,
que es le patrimonio del carne:
un consummation, devotemente
il es a desirar. Morir, dormir.
Dormir, forse soniar; si, ibi es
nodo, nam in le dormir del morte
qual sonios va parer, post que nos ha
jactate iste pulvere mortal,
un pausa deve dar. La le respecto
rendente misere un vita longe.

Traduko de L.N.M. Newell (1964)

Ĉu esti, aŭ ne esti: jen demando
kiu plej gravas: ĉu pli noble estas
suferi en l' anim' la kuglojn, sagojn
de l' violenta sorto, aŭ preninte
armilojn kontraŭ maro da mizero,
rezisti por ĝin fini? Morti: dormi:
jen ĉio; kredi, ke per dorm' ni finas
la kor-doloron kaj la mil afliktojn,
heredon de la karn': jen sort-plenum'
eĉ pie dezirinda. Morti, dormi;
dormi: sed eble sonĝi: ah, jen baro:
ĉar kiaj sonĝoj ĝenos mortodormon
post liberig' el ĉi tumulta korpo –
tio dubas nin. Jen penso, kiu
nin igas longe vivi sub aflikto.

Proza teksto

Un nocte in America

Un vespere, io me esseva disviate in un foresta, a pauc distantia del laco de Niagara. Bentosto io videva le die extinguer se circum me, e io gustava, in tote su solitudine, le belle vision de un nocte in le deserto del Nove Mondo. Un hora post le cubamento del sol, le luna se monstra supre le arbores, al horizonte opposite. Iste astro solitari montava pauc a pauc in le celo; ora ilio sequeva pacibilmente su cursa in le azur, ora ilio reposava super gruppos de nubes similante al alte montanias coronate de nives. Iste nubes, plicante e displicante lor velas, se disrollava in zonas diaphane de satin blanc, se dispersava in legier flocones de scuma, o formava in le celo bancos de vatta spendide, si dolce al oculos, que on haberea credito sentir lor mollessa e lor elasticitate ...

Le grandor, le stupente melancholia de iste tableau, non poterea exprimer se in le language human; le plus belle nocte in Europa non pote dar un idea de lo. In van, in nostre campos cultivate, le imagination cerca a extender se. Ilio incontra de tote partes le denoras del homines; sed in iste regiones salvage, le anima se place a figer se in un oceano de forestas, a planar super le gurgites del cataractas, a meditar al bordo del lacos e del fluvios, e prò si dicer, a se trovar sol ante Deo.

(Alphonse de Lamartine)

Nokto en Ameriko

lun vesperon, mi misvojigis en arbaro, ne fore el la Niagara lago. Baldaŭ mi vidis estingigi la tagon cirkaŭ mi, kaj mi gustumis, en kompleta solo, la belan vidon de nokto en la dezerto de la Nova Mondo. Unu horon post la sunsubiro, la luno montriĝis super la arboj, je la kontraŭa horizonto.

Tiu soleca astro superiris iom post iom la cielon; jen ĝi sekvis pace sian kuron en la lazuro, jen ĝi ripozis super nubogrupoj similantaj al altaj montoj kronataj de neĝo. Tiuj nuboj, volvante kaj malvolvante siajn vualojn, malplektiĝis al diafanaj regionoj el blanka sateno, disperdiĝis en leĝeraj neĝeroj el ŝaŭmo, aŭ formis en la ĉielo amasojn el brileganta vato, tiel milda al la okuloj, ke oni kredintus senti ties molon kaj elastecon ...

La grandor, la miriganta melankolio de tiu bildo ne povus esprimiĝi en homa lingvo; la plej belaj Eŭropaj noktoj ne povas doni al ni imagon pri tio. Senrezulte en niaj kulturitaj kampoj la imagpovo klopodas etendiĝi; ĝi renkontas nur la homajn loĝejojn ĉiuloke. Sed en tiuj sovaĝaj regionoj, la animo ĝuas enprofundiĝi en arbarajn oceanojn, ŝvebi super la gorĝojn de akvofalegoj, mediti je la bordo de lagoj kaj de riveroj, kaj, por tiel diri, troviĝi sola antaŭ Dio.

11. La novlatinoidaj lingvoj

11.1. Enkonduko

Se oni konsentas pri la sociopolitikaj tezoj eŭrocentraj de la novlatinoida skolo, estas ankaŭ logike akcepti lingvon konstruitan sur la bazo de koresponda metodologio. Se, plue, oni konsentas kun la tezoj de Alexander Gode, estas klare ke oni emos ankaŭ akcepti Interlinguan kiel lingvan konkretiĝon de tiuj tezoj (sur la bazo de la prototipisma etimologia tekniko).

En ĉi tiu ĉapitro ni volas ekzameni, el pli proksima vidpunkto, kiamaniere aspektas kaj kiamaniere funkcias novlatinoida lingvo, kaj ni aparte pritraktos Interlinguan. Nia celo tute *ne estas* “demonstri”, ke Esperanto estas pli taŭga ol Interlingua: tio, cetere, estas neebla, ĉar la celoj de ambaŭ lingvoj estas malsamaj, kaj do la konstru-metodoj estas malsamaj, kaj la rezultoj de la planada tekniko, t.e. la du lingvoj, estas esence malsamaj.

Ne miru, ke la planlingvoj novlatinoidaj estas komplikaj: en la perspektivo de la novlatinoidistoj, tiu ne estas malvaloraĵo, sed logika konsekvenco de baza postulaĵo (“la lingvo internacia devas esti novlatineca”).

Tamen ĉi tiu ĉapitro havas ankaŭ du aliajn celojn

La unua estas la jena: ni volas demonstri, ke Interlingua *ne ĉiam* respektas la Gode-metodologion: ĝia strukturo estas do tie kaj tie nekohera kaj nekongrua kun ĝiaj bazaj postulaĵoj. Interlingua do ne estas “natura” kaj “100%-e prototipa”: kontraŭe: en ĝi troviĝas multaj “artefaritaj” (arbitraj) trajtoj.

La dua celo konsistas en la prezento de “eraro-gramatiko” de Interlingua (ĉerpita el Interlingua-periodaĵoj).

11.2. Fonologio kaj ortografio

La plej gravaj planlingvoj utiligas la latinan alfabeton; la aŭtonomisma skolo (al kiu apartenas la esperantistaj interlingvistoj) uzas ĝenerale nur fonologian ortografion; la novlatinoida skolo, kontraŭe, uzas aliajn sistemojn.

Ĝis 1910, la novlatinoidistoj klopodis ellabori skribsistemojn, kiuj sukcesu kunmeti ortografion fonologian, kun aspekto “natura”. Tiamaniere, en *Idiom Neutral* (1902) oni aplikis fonologian sistemon al planlingvo, kiu kurioze similis je la franca: *eksepsion* (escepto), *nasion* (nacio), *serv* (cervo)²⁵⁵. Ni trovos pli malfrue analogan solvon en *Novial* (1928): *sesa* (cesi), *seremonie* (ceremonio), *mesene* (meceno), *sone* (zono), ktp.

Molenaar, en sia *Universal* (1903) faris la samon kun latinida materialo prononcenda laŭ germanaj kutimoj, kiel en: *seduzer* (sedukti), *komenzment* (komenciĝo), *fazer* (fari), *vinzer* (venki), *zent* (cent), *zerv* (cervo),²⁵⁶ ktp.

²⁵⁵ Louis COUTURAT, Leopold LEAU, "Les nouvelles langues internationales", Paris, Eld. de la Delegitaro, 1907, p. 1+7-58.

²⁵⁶ samloke, p. 63

Pli malfrue la novlatinoidistoj malkovris, probable pro la apero de la (cetera) aŭtonomisma lingvoprojekto *Ido* (1908), ke, por atingi la “senperan kompreneblecon”, la ortografio estas multe pli grava ol fonologio. Von Wahl skribis, ke “ellabori fonetikan /fonologian/ ortografion sur la bazo de la prononco estas tutsimple neeble, se oni ne volas, ke okazu kiel en iuj projektoj, en kiuj la ortografio estis tiel kripligita, ke multe da bone konataj vortoj iĝis nerezoneblaj [...] Se ni prenas kiel elirpunkton la skriblingvon, oni povas demonstri, ke la historia formo de la radiko estas le plej disvastiĝinta [...]”²⁵⁷. Tiuj pripensoj kondukis al ĉiam pli oftaj provoj ellabori ortografion sur la bazo de la komunaj trajtoj de la novlatinaj lingvoj.

Ekzemple, kun la duobla valoro de c ("k" kaj "c"), g ("g" kaj "ĝ"), s ("s" kaj "z"), t ("t" kaj "c"), y ("i" kaj "j" kaj "ü"), kaj la duoblaj konsonantoj cc, mm, nn, ss, ll, rr, kaj, fine, la literoj qu ("k", "kv", "kŭ) kaj x ("ks", "gz", "kz").

En iuj projektoj, ekz-e en Interlingua, oni proponis du ortografiojn: unu estas “etimologia”, kun la signo-grupoj *th*, *ch*, *ph*, *y* (ekz-e: *physiologia*), la alia estas pli “populara” (kvankam ne malpli historia), kun *t*, *c/k*, *f*, *i*, (ekz-e *fisiologia*). Hodiaŭ, en Interlingua, la ortografio plej uzata estas la “historia”, kun atento al etimologio.

Estas klare, ke la transiro de la novlatinoidista intereso el-de la fonologia lingvostrukturo al la etimologieco de la ekstera lingvo-aspekto naskis multnombrajn filologiajn kaj etimologiajn studojn pri kelkaj vortoj - sed mortigis la emon interesiĝi pri fonologio, kies studo kaj precizigo preskaŭ tute malaperis. La novlatinoidaj lingvoj, konceptitaj kiel iloj por pasiva (lega) interkompreniĝo, neniam stimulis fonologiajn studojn.

11.3. La morfosintakso

Nia celo ne povas esti la prezento de kompara gramatiko de la malsamaj projektoj, kaj ankaŭ ne la prezento de la intersistemaj malsamoj inter Esperanto kaj Interlingua. Ĉi tie, la leganto trovos nur tipajn kazojn, kiuj karakterizas la aspekton kaj la funkciadon de la malsamaj novlatinoidaj lingvoj.

Afero frapa dum la lego de Interlingua-lernolibro estas la fakto, ke la morfosintakso neniel dependas de la etimologiaj reguloj de prototipismo. La raciigo de la novlatinoida gramatiko okazis en maniero arbitra kaj artefarita. Se vere Gode volis sintezi komunan interlatinan lingvon (okcidentan pralingvon), li tion nur duone faris.

Ĝenerale, en ĉiuj novlatinoidaj lingvoj la morfologio estas tre reduktita: ĝi baziĝas sur la raciigo de la lingva strukturo de la novlatinaj lingvoj kaj de la angla, kun iom pli aŭ iom malpli da analizaj aŭ sintezaj tendencoj. La fleksia fundamento de la latino nur malofte konserviĝas (ekz-e nur en iu malnova projekto, kiel en *Linguum Islianum*, de Isly, 1901).

11.3.1. La artikolo

Ĝenerale en ĉiuj novlatinoidaj lingvoj ekzistas unusola determina artikolo *le* (kiel en Interlingua), aŭ *li* (kiel en Occidental), aŭ, pli malofte, *el* (kiel en European). Preskaŭ ĉiam ekzistas ankaŭ nedetermina artikolo (*un*).

²⁵⁷ E. DE WAHL, "Spiritu de Interlingue", Cheseaux s/Lausanne, Interlingue-Institute, dua eld. 1953, p. 8.

11.3.2. La adjektivo

Kiel en ĉiuj okcidentaj lingvoj, ekzistas du tipoj de adjektivoj: la primitivaj adjektivoj (kiel en la franca *bon* /bona/, *grand* /granda/), kaj la adjektivoj derivantaj el radikoj apartenantaj al aliaj gramatikaj kategorioj

Ekzemple: en la franca *mystérieux* /mistera/, venas de *mystère* (mistero); *national* /nacia/, venas de *nation* (nacio); *humain* (homa), venas de *homme* (homo); kaj *annuel* (jara), venas de *année* (jaro).

En Interlingua ne ekzistas karakteriza finaĵo de la adjektivoj (kiel -a en Esperanto), kiel en: *bona*, *granda*, *mistera*, *nacia*, *homa*, *jara*, ktp.

La primitivaj (aŭ, pli korekte, *radikaj*) adjektivoj derivitaj laŭ la reguloj de prototipismo devus finiĝi dumaniere.

La unua latina grupo (-*us/-a/-um*) devus transformiĝi al adjektivoj finigantaj per -*o* (se virseksaj aŭ neŭtraj) aŭ per -*a* (se inseksaj).

La dua latina grupo (-*is/-is/-e*) devus transformiĝi al adjektivoj finigantaj per -*e*. Tio tamen ne estas la kazo. Ni vidu, per ekzemploj, kiuj koncernas la latinajn adjektivojn, kiuj prezentiĝas, normale, en tri formoj: vira, ina, kaj neŭtra:

La adjektivoj	<i>bonus – bona - bonum</i>	kaj	<i>novus – nova – novum</i>
	“bona”		“nova”
havas la jenajn prototipajn formojn:			
	<i>bono - bona – bono</i>	kaj	<i>novo – nova - novo</i>

Sed en Interlingua ĉi-foje oni ne respektas la principon de prototipeco, kaj la Interlingua-formoj estas, respektive:

<i>bon</i> (bona)	kaj	<i>nove</i> (nova)
-------------------	-----	--------------------

Same

la adjektivoj	<i>brevis – brevis - breve</i>	kaj	<i>civilis – civilis - civile</i>
	“mallonga”		“civila”
havas la jenajn prototipajn formojn:			
	<i>breve – breve – breve</i>	kaj	<i>civile - civile - civile</i>

Interlingua respektas nur la unuan prototipon, kaj ne la duan:

<i>breve</i> (mallonga)	sed	<i>civil</i> (civila).
-------------------------	-----	------------------------

Tio estas arbitra, artefarita, malsistema. Kaj krome tio kontraŭas la regulojn de prototipismo.

En sekvanta ĉapitro ni pritraktos la formiĝon de la derivitaj adjektivoj.

11.3.3. La verbo-konjugacio

Unu el la karakterizaj trajtoj de preskaŭ ĉiuj novlatinoidaj lingvoj estas la fakto, ke en sia verbo-konjugacio ili ne utiligas personajn finaĵojn. Tio estas observebla ankaŭ en Interlingua, kie la konjugacio as-tensa de la verbo *amar* (ami) devus esti, prototipe, la jena:

io amo	(mi amas),	nos amamo(s)	(ni amas)
tu ama(s)	(ci amas),	vos amate (-is)	(vi amas)
ille ama	(li amas)	illes aman	(ili amas)

En la faktoj, la formo estas unueca por la tuta as-tenso: io, tu, ille, nos, vos, illes ama. Ni tamen ĉi tie rimarku, ke la formo *ama* estas prototipa nur de la 3-a persono singulara.

Ankaŭ ĉi tie Interlingua simpligis al direkto tre dista el la spirito de prototipeco, kaj, ni agnoskution, ankaŭ el la spirito de la novlatinaj lingvoj.

Grava punkto estas la indikativo. En preskaŭ ĉiuj novlatinoidaj lingvoj ekzistas nur la *as*-tenso, la *is*-tenso kaj la *os*-tenso. Ankaŭ en Interlingua, kie oni diras:

io ama (-as)
 io amava (-is)
 io amara (-os)

Amava kiel *is*-tenso? Fakte, *amava* estas prototipo nur por la unua kaj por la tria persono de la novlatina *imperfekto*, kaj ne de la *perfekto*. Tio estas kontraŭ la reguloj etimologiaj de prototipismo kaj kontraŭ - refoje - la spirito de la novlatinaj lingvoj. Tio veras je tia grado, ke la amikoj de Interlingua longe diskutis inter si, ĉu oni reenkonduku apartan formon por la perfekta tenso²⁵⁸.

La novlatinoidaj lingvoj, cetere, en la verba konjugacio, ne estas unuecaj.

Ĉiam apudekzistis du tendencoj: emo al analizeco (ekz-e en Occidental) kaj emo al sintezeco (ekz-e en Interlingua):

Esperanto	mi amas	mi amis	mi amos	mi amus
Occidental	yo ama	yo fe amar ²⁵⁹ yo amat	yo va amar	yo vell amar
Interlingua	io ama	io amava	io amara	io amarea

Cetere, *amarea* (kondicionalo, us-tenso) estas etimologie tre stranga kaj nekontentiga: la prototipa formo devus esti: **amaria, amarias, amaria, amariamus, amariatis, amarian*.

Estas klare, ke en la novlatinoidaj lingvoj la kunmetitaj tensoj estas formataj per la helpverbo *havi* (Interlingua: *haber*) plus la pasea participo. La pasivaj verboformoj formigas per la helpverbo *esti* (Interlingua: *esser*), plus la pasea participo.

En Interlingua la u-tenso havis kuriozan destinton: oni preskaŭ havas la impreson, ke oni ĝin iomete forgesis. Fakte, ĝia finaĵo estas la sama kiel tiu de la as-tenso. Tia solvo povas sufiĉi por la dua persono singulara (*ama ! = ci_amu !*), sed kiel esprimi la duan personon pluralan? Oni proponis la esprimajon *vole ben (vole ben amar = vi amu)*, sed tiu formo semantike ne esprimas bone la u-tenson. Por la unua persono plurala oni utiligas etan monstron: *vamos amar ! (ni amu!)*.

11.3.4. La personaj pronomoj

En Interlingua ili estas:

io (mi) tu (ci) ille (li) illa (ŝi) illo (ĝi)
 nos (ni) vos (vi) illes (ili) illas (ili) illos (ili)

²⁵⁸ En: "Le Foro", 1961-1962.

²⁵⁹ En pra-Occidental. Fakte, von Wahl enkondukis jam dekomence kelkajn aliigojn en la ĵuspublikigita lingvo, i.a. ankaŭ la aliigo de la is-tenso.

Ekzistas t.n. “oblikvaj” formoj, t.e. formoj uzataj post prepozicioj, kiel n-komplementoj aŭ kiel al-komplementoj:

me, te, le, la, lo, nos, vos, les, las, los.

Triobla uzo de pronomo (dativo, akuzativo, kaj prepozitivo) estas ĝena, tiom pli ke oni ne scias, ĉu en Interlingua dativo devas antaŭi akuzativon, aŭ inverse, kaj ke oni ne scias, ĉu tiuj “oblikvaj” pronomoj antaŭas aŭ postas la verbon. Tiamaniere,

Li donas ĝin al vi

Povas (teorie) tradukiĝi sendistinge per:

Ille te lo dona
Ille lo te dona
Ille lo dona te
Ille dona lo te
Ille dona te lo
Ille dona lo a te (supozeble la plej uzata formo),

kaj estas *formale* ne facile distingebla disde *Lì donas al ĝi vin*.

Probable solvo estos trovebla en la normigo (laŭ la reguloj de prototipismo) de la korespondaj sintagmoj en la novlatinaj lingvoj. Sed tiu laboro ĝisnun ne estas farita.

11.3.5. La substantivo

En la novlatinaj lingvoj oni konas du gramatikajn ĝenrojn: la *viran* kaj la *inan*. En la plejparto de la novlatinoidaj planlingvoj (escepte de *Neolatino*, prezentita en 1947 far-de André Schild), ne ekzistas gramatika ĝenro. Tio estas evidente kontraŭ la prototipismaj reguloj, almenaŭ koncerne Interlinguan.

Pro tiu ĝenro-manko, en pluraj novlatinoidaj planlingvoj la sudlatinaj substantivaj kaj adjektivaj finaĵoj -o kaj -a (prototipaj) transformiĝas al pli “neŭtrala” -e, aŭ entute malaperas. Ekz-e, en Occidental oni skribas: *lingu-e*, *comerci-e*, *detriment-e* (prototipaj formoj: **lingu-a*, **commerci-o*, **detriment-o*). La finaĵoj -o, -a estas konservataj nur en la kazo, ke ili signas sekson de vivanta estaĵo: *fili-o* (/vir-filo), *fili-a* (filino). Ne ciam: *rey* (reĝo) iĝas ne *reya*, sed *reg-ina* (reĝino).

Interlingua, kontraŭe, konservas la prototipajn -o kaj -a, kiuj do havas du funkciojn:

1. En senvivaj estaĵoj, tiuj finaĵoj estas simpla parte de la prototipo, kaj nenion povas indiki pri ĝenro: ekz-e en *lingua*, *commercio*, *detrimento*. Kaj fakte, ilia persona pronomo estas, respektive, ĉiam *illo* (ĝi), kaj neniam la prototipisme ekspektata (resp.) *illa* (ŝi), *ille* (li).
2. Ĉe vivantaj estaĵoj, la finaĵoj -o kaj -a povas indiki la “naturan” sekson de la estaĵo mem: *fili-o* (vir-filo), *fili-a* (fil-ino). Sed ne ĉiam: de *vacca* (bovino) ne venas **vacco* (virbovo), sed oni devas uzi *tauro*. *Panthera* (pantero) neniel indikas sekson (**panthero* ne ekzistas): la finaĵo -a estas nur parto de la prototipo. La komplikaj ĉi-rilataj estas multaj. Ekz-e, de *heroe* (heroo) venas *heroina* (heroino), kaj ne **heroa*, kiel de *rege* (reĝo) venas *regina* (reĝino), kaj ne **regia*. Do de *gallina* (kokino) oni ekspektas **gallo* (aŭ *galle*: koko), cetere analoga al la itala *gallo*. Sed ne: la oficiala vorto estas *gallino*, kiu estas ĉio, krom prototipisma.

Cetere ni povas ĉi tie rimarki, ke rememori la finaĵojn -o, -e, kaj -a, kiuj havas neniun signifon (kiel ĉe senvivaj estaĵoj), krom esti “etimologia atestilo pri prototipeco”, ne estas facile. Ekzemple, ni konsideru la jenajn adjektivojn:

lingu-al (lingv-a), *commerci-al* (komerc-a), *niv-al* (neĝ-a), *nation-al* (naci-a).

La respektivaj bazaj substantivoj estas:

lingu-a (lingv-o),
commerci-o (komerc-o),
niv-e (neĝ-o),
nation (naci-o).

Ni vidas, do, ke al sama adjektiva finaĵo esperanta -a, korespondas substantivoj kun senfunkciaj finaĵoj -a, -o, -e, -NUL

Cetere: ni rimarku, ke *nation* (nacio) estas prototipismo erara. La ĝusta formo devus esti **natione*.

Unu funkcion eble tamen tiuj prototipismaj finaĵoj havas: distingi radikojn, kiuj, sen ili, estus homofonaj²⁶⁰. Ekz-e:

Interlingua	Esperanto		Interlingua	Esperanto		Interlingua	Esperanto
mur-o	muro		mur-e	muso			
ov-o	ovo		ov-e	ŝafo			
calce-o	ŝuo					calce-a	ŝtrumpo
strat-o	tavolo					strat-a	strato
medi-o	rimedo		medi-e	duona		medi-a	averaĝo
pico	pego		pic-e	peĉo		pic-a	pigo
aur-o	oro		aur-e	orelo		aur-a	blovo
test-o	poto		test-e	atestanto		test-a	kapo

Tiel, se oni diras *medi-al*, oni ne scias, cu tiu vorto venas de *medio*, *media* aŭ *medie*. Kaj ĉu *calce-ari* signifos “ŝua” aŭ “ŝtrumpa”? Estos do oportune ne utiligi tiajn adjektivojn, por ne riski ĝenajn miskomprenojn. Kelkfoje, tamen, la novlatina lingvotradicio disponigas al ni solvilojn: ekzemple, en la novlatinaj lingvoj *ov-al* povas veni nur de *ovo*, dum ke *ov-in* venas nur de *ove* (ŝafo).

Iuj legantoj povus nun eksupozi, ke sufiĉas koni la genron kaj la karakterizan finaĵojn en la itala lingvo, por diveni la prototipan finaĵon en Interlingua.. Tio veras en kelkaj okazoj, kiel:

Interlingua	Esperanto	Itala	Franca
panic-o	paniko	panico vir.	panique in.
dominic-a	dimanĉo	domenica in.	dimanche vir.
masc-a	masko	maschera in.	masque vir.
guid-a	gvidanto	guida vir.	guide vir.
horde-o	hordeo	orzo vir.	orge in.
schizz-o	skizo	schizzo vir	esquisse in.

Sed tio ne funkcias ĉiam: kelkfoje la franca gramatika ĝenro indikas al ni, kiu estas la ĝusta etimologia finaĵo, dum ke la itala proponas al ni nur “falsajn amikojn”²⁶¹.

²⁶⁰ BERGER, "Historia..." dua volumo, cit., sen dato, p. 55.

Interlingua	Esperanto	Franca	Itala
albricoc ²⁶²	abrikoto	abricot vir.	albicocca in.
glande	glano	gland vir.	ghianda in.
ulcere	ulcero, vundo	ulcère vir.	ulcera in.
intriga	intrigo	intrigue in.	intrigo vir.
anecdota	anekdoto	anecdote in.	aneddoto vir.

11.3.6. Afikso-derivado en la novlatinoidaj lingvoj kaj en Esperanto

Ni konstatis, ke en Esperanto ne ekzistas vera derivado, ĉar la afiksoj estas veraj vortoj. La t.n. Esperanta “derivado” estas fakte *kunmetado*. Sed ni momente (kaj fikcie) konsentu paroli pri Esperanta *derivado*. Ekzistas du specoj de derivado.

La unua speco de derivado konsistigas la procezojn de transformiĝo de (ekz-e) substantivo al adjektivo, de verbo al substantivo, ktp. Temas, do pri gramatik-kategoria transformiĝo de radiko. Tio okazas ankaŭ en la naciaj lingvoj:

Estu la jenaj ekzemploj per la franca:

nation (naci-o)	transformiĝas al	nation-al (naci-a)
accepter (akcepti)	transformiĝas al	accept-ation (akcept-o)
malheureux (malĝoja)	transformigas al	malheureusement (malgoj-e).

Ni rimarkas, ke en la novlatinaj lingvoj tiu kategorio-transiro estas tre komplika kaj malsistema, dum ke en Esperanto, dank-al ĝiaj karakterizaj (kategori-indikaj) finaĵoj -o, -a, -e, ekzistas multe malpli da problemoj. Temas pri la relative ideala lingvosituacio, pri kiu parolas Tauli: “En ideala situacio devus esti eble derivigi iujn semantikajn kaj gramatikajn kategoriojn el iu ajn vorto, se necese. Tio koncernas ĉefe la transiron de unu vortoklaso al alia”²⁶³.

La dua speco de derivado koncernas la aldonon al la radiko de signif-unuoj (per morfem-aldo), kiuj transformas iomete ĝian signifon. Tiu sistemo ekzistas ankaŭ en la novlatinaj lingvoj.

Jen franca ekzemplo:

<i>fil</i> (=filo)	+ prefikso <i>bo</i>	<i>beau-fils</i> (=bo-filo)
<i>maison</i> (=domo)	+ sufikso <i>et</i>	<i>maisonn-ette</i> (=dom-eto)

Ankaŭ en tiu kampo Esperanto estas simpla: al ĉiu sufikso kaj prefikso korespondas (plejofte) nur unu signif-unuo, kaj, se oni deziras aldoni al radiko signif-unuon, sufiĉas aldoni unusolan afikson.

Kontraŭe, la novlatinoidaj lingvoj sekvas la latinan uzon, laŭ kiu ekzistas multaj afiksoj havantaj la samajn signifojn, kaj laŭ kiu, do, unu sola signifo povas esti esprimata en pluraj manieroj (per pluraj afiksoj), laŭ la historio de la latinidaj lingvoj.

²⁶¹ André SCHILD, citita en: Ric BERGER, "Pourquoi l'Interlingua ?", Morges, Editiones Interlingua, 1971, p. 51.

²⁶² *Albricoc*, arabdevena, ne estas latinigita. *Harengo*, ĝermana, male, estas latinigita. Kial, tamen, kun finaĵo -o, kaj ne kun finaĵo -a, kiel en la itala (*aringa*)?

²⁶³ TAULI, "Introduction", 1968, p. 109.

La novlatinoidaj lingvoj, ĉar ili estas do nenio alia ol ŝablono de la novlatinaj lingvoj, estas komplikaj kaj sensistemaj, kiel ili. Priparolante Interlinguan, Detlev Blanke asertas, ke ĝia “vortoderiva sistemo iĝas nura etimologio de la latinaj lingvoj, kaj havas nenan signifon por aktiva kaj regula vortformado”²⁶⁴. Pri tio samopinias eĉ Gode. En la *Enkonduko* al IED li asertas i.a., ke en Interlingua la vortformado estas libera. JEkzemple, el *plure* (plura) oni povas derivigi *pluralista* (pluralisma), kaj krome, ankaŭ *pluralistecitate* (pluralismo), sed “tute certe, ekzistas psikolingvistikaj inhiboj (baziĝantaj en la romanida tradicio kaj lingvouzo), kiuj malhelpas, ke la lingvouzantoj formu aliajn vortojn el la (cetera teorie ebla) grupo de *pluralista* [...]”²⁶⁵.

Ni vidu kelkajn ekzemplojn.

El *univers-itate* (kiu signifas “universitato”, sed venas de la adjektivo *universe* per aldono de la abstraktiga sufikso *-itate*) oni povas derivigi la adjektivon (per aldono de la adjektiviga sufikso *-ari*, en vorto, kie *-it-* estas la mallongigita formo de la jam menciita sufikso *-itate*). La adjektivo estas *univers-it-ari* (=universitata). Sed el la vorto *ver-itate* (konstruita ekzakte kiel *univers-itate*) oni ne povas derivigi la adjektivon *ver-it-ari* (kiu korespondus al la Esperanta *ver-eca*), ĉar tia adjektivo ne ekzistas en la novlatinaj lingvoj.

Same, en Interlingua la sufikso *-ace* korespondas al la Esperanta *-ema*. Sed la Esperanta *-ema* estas aldonebla al iu ajn radiko, kondiĉe ke la tuto havu signifon, dum ke la Interlingua-a *-ace* povas esti aldonata nur tie, kie tion faras ankaŭ la novlatinaj lingvoj²⁶⁶:

Interlingua	Itala	Esperanto
mord-er / mord-ace	mord-ere / mord-ace	mord-i / mord-ema
viv-er / viv-ace	viv-ere / viv-ace	viv-i / viv-ema
cred-er / cred-ule ne: cred-ace	cred-ere / credulo	kred-i / kred-ema
toler-ar / toler-ante ne: toler-ace	toller-are / toller-ante	toler-i / toler-ema

Ni vidu aliajn ekzemplojn.

Por transformi *i-vorton* al *o-vorto*, en Esperanto oni simple transformas la finaĵon (-i iĝas -o): *movi* → *movo*. En Interlingua oni devas utiligi plurajn sufiksojn, sed selekto inter ili dependas de la fakta uzo en novlatinaj lingvoj. Tiel, oni teorie povus diri, el *mover* (= *movi*), *movition*, aŭ *movita*. Sed oni devas diri: *movimento* (= *movo*).

Por transformi *o-vorton* al *a-vorto*, en Esperanto oni transformas la finaĵojn (-o iĝas -a): *virino* → *virina*. En Interlingua ekzistas pluraj sufiksoj, samsignifaj, sed ne uzeblaj libere. Teorie, oni povus diri, el *femina*: *feminal*, *feminic*, *feminil*, *feminesc*. Sed oni devas diri: *feminin*²⁶⁷.

Analoge, koncerne la adjektivon derivitan el *populo* (= popolo). Tiu adjektivo povus esti *populal*, *populic*, *populin*, *populesc*, *populil*, *populari*. Sed, fakte, oni devas diri *popular* (= popola).

Por indiki la bazan (verban) ideon “aktivigi”, en Esperanto oni uzas la sufikson *-igi*. En Interlingua pluraj rimedoj estas utiligendaj. Jen ekzemploj.

²⁶⁴ BLANKE, "Die alten Sprachen... ", 1973/3, p. 191.

²⁶⁵ GODE (red), "Interlingua-English...", 1951, p. xlviii-xlix.

²⁶⁶ William GILBERT, "Planlingvaj problemoj", La Laguna, Régulo, 1962, p. 31.

²⁶⁷ Fakte, en la itala oni utiligas la adjektivon *femminile* (virina). Ekzistas ankaŭ *femminino*, sed kun iom malsama kromsignifo. Problemoj de prototipismo?

el *nette* (= pura) povus veni : nett-isar, nett-ificar, a-nett-ar, ktp.
sed fakte nur *nett-ar* (= purigi) estas ĝusta.

el *carbon* (= karbo) povus veni : carbon-ificar. in-carbon-ar, a-carbon-ar.
sed fakte nur *carbon-isar* (- karbigi) estas ĝusta.

el *triste* (= malgoja) povus veni: trist-isar, trist-ificar, trist-ar.
sed nur *a-trist-ar* (= malgojigi) estas ĝusta.

Pezaj estas la katenoj, kiuj malliberigas Interlinguan. Povas ja esti, ke ĝi estas senlerne legebla al ĉiu, kiu jam konas unu-du novlatinajn lingvojn, sed la kostoj de tio estas tre altaj: esprim-rigideco, grandega redundanco, do manko de ekonomio, relative granda malfacilo okaze de aktiva uzo.

Esperanto, male, sekvas sistemecon, analogion. El-de nevarieblaj vortoj, kiel cetere ankaŭ en la ĉina, oni povas ekonomie konstrui novajn vortojn. Jen ekzemplo kiun mi prenis el Claude Piron²⁶⁸:

Lingvoj	Vortoj konstrueblaj	Vortoj konstrueblaj
Esperanto	sam-land-ano	sam-ide-ano
Ĉina	tong-guo-ren	tong-daw-ren
Interlingua	com-patri-ota	co-ide-alista
Esperanto	sam-famili-ano	sam-klas-ano
Ĉina	tong-jia-ren	tong-ban-ren
Interlingua	membro del familia	scholar del mese classe
Esperanto	sam-dom-ano	sam-trib-ano
Ĉina	tong-wou-ren	tong-zu-ren
Interlingua	habitante del mesme domo	membro del mesme tribo

Ni tuj konstatas, ke, tie, kie la ĉina uzas nur *tong* (kaj la Esperanta *sam-*), Interlingua uzas *com-*, *co-*, kaj tie, kie la ĉina regule uzas *ren* (kaj Esperanto: *-ano*), Interlingua uzas *-ota*, *-alista*. Vortoj estas netradukeblaj ekonomie en Interlingua: *sam-dom-ano* iĝas *habitante del mesme casa*, k.a. La Esperanta sistemo aspektas do *relative* facila por ĉino, dum ke la malordo de Interlingua ŝajnos al li malfacila kaj nete arbitra.

Ni tiel rimarkas, ke Esperanto povas funkcii kiel tre sinteza lingvo (kiel la germana), aŭ kiel lingvo relative analiza (kiel la franca). Interlingua, kontraŭe, povas esti nur analiza. Ekzemple, ni pritraktu la jenajn germanajn esprimadojn:

persön-lich-keit-s-be-wuss-t	E-o sinteze	personeco-konscia
	E-o analize	konscia pri propria personeco
	Interlingua	consciente de su personalitate
kraft-s-trotz-end	E-o sinteze	forto-spita
	E-o analize	spitanta la forton
	Interlingua	opponite al fortia
dies-seit-s-würd-ig	E-o sinteze	ĉi-vivo-digna
	E-o analize	digna de ĉi tiu vivo
	Interlingua	digne de esser vivente in iste mundo

²⁶⁸ PIRON, "(Lettre ouverte) ", 1975, p- 3-4.

Eĉ sufiĉe longaj kunmetaĵoj povas esti dumaniere esprimataj en Esperanto ekz-e, jen svedlingva esprimaĵo:

Civil-försvär-s-ut-bild-ning, kiu, en Esperanto, povas iĝi, sinteze, *civil-defend-o-trejn-ad-o*, aŭ, analize, *trejnado por civila defendo*.

11.3.7. Historio de la de-verba derivado en la novlatinoidaj planlingvoĵ

Kelkaj naturalismaj afiksoj (kiel la sufikso *-ero*, indikanta la profesion (ekz-e: *barba* = barbo → *barb-ero* = barbisto) estas relative facile difineblaj kaj iel bone-malbone sistemigeblaj. Sed ekzistas kelkaj el ili, kiuj estas tre malfacile difineblaj kun sufiĉa precizeco.

Temas pri la afiksoj uzendaj en la deverba derivado, t.e. en la derivado novaj vortoj el verbaj radikoj.

La demando estas, kiel ni povas reguligi la jenajn ekzemplajn vorto-familiojn:

<u>ex-pon-er</u>	(= elmontri)	<u>ex-posit-ion</u>	(= elmontro), aŭ:
<u>fac-er</u>	(= fari)	<u>fact-o</u>	(= faro)
		<u>ef-fect-o</u>	(=faritaĵo, efiko)
		<u>in-fic-er</u>	(= malfari)

Dum siaj unuaj jaroj. la novlatinoida skolo iris du vojojn. Aŭ oni akceptis *neregulajn* vortofamiliojn, kaj tiam oni neniel provis starigi deriv- kaj kaj sintez-regulojn, kaj la vortojn oni tutsimple devis serĉi en la vortaro tie, kie ili troviĝis kiel sendependaj radikoj, aŭ oni ja klopodis “reguligi” tiujn vortofamiliojn, allasante tiam ankaŭ kelkajn kripligojn (misformigojn), tiel malhelpante la celatan tujan kompreneblecon.

La unuan vojon sekvis Molenaar en sia *Universal* (1903). En tiu lingvo, la vorto *infanz* (infaneco) estas sendependa el-de la radiko *infant* (infano); la verbo *reziper* (ricevi) neniel naskas *rezeption* (ricevo); *solver* (solvi) ne donas *soluzion* (solvo); inter *szienz* (scienco) kaj *szientifik* (sciencia) ne ekzistas formala rilato; *imprimer* (presi) estas sendependa el-de *impres* (presaĵo), kaj *leger* (legi) ne povas formale naski *lektor* (leganto). Tiel, *Italia*, *Francia*, *Spania* (Hispanio) formale ne rilatas kun la adjektivoj *italian*, *franzes*, *spaniol*.

Idiom Neutral, kontraŭe, sekvis alian vojon: ĝiaj aŭtoroj provis starigi regularon kapablan sintezigi la vortojn nomatajn “internaciaj”, sed tiu regularo montriĝis ofte malsukcesa. Tial, se el *adapt-ar* (taŭgigi, adapti) venas regule *adapt-ation* (taŭgigo, adapto), *adapt-ator* (taŭgiganto, adaptilo), el *invent-ar* venis pluraj vortoj “ne-naturaj”: *invent-ation* (invento, inventaĵo), *invent-ator* (invent-into). Tio devigis la ellaborintojn de *Idiom Neutral* akcepti paralelajn vortojn “neregulajn”: *invention*, *inventor*²⁶⁹. Kaj restis ĉiuokaze grava problemo, por kiu taŭga solvo *Idiom Neutral* ne trovis: kiel reguligi la vort-familiojn *mord-* / *mors-* (mord-), *scrib-* / *script-* (skrib-), *curr-* / *curs-* (kur-), *leg-* / *lect-* (leg-), ktp. Pluraj solvoj estis proponitaj: fare de Blondel (1907), Creux (1910), Meysmans (1912), Moore (1912)²⁷⁰.

Sed la preskaŭ-definitiva solvo estis proponiza fare de von Wahì en 1922, post 13-jara esplorklaboro.

²⁶⁹ (Noto de 2018): Temas pri la t.n. "paroli mackensenik" (mackensen-aj vortoj), el la nomo de M. Mackensen, tiama akademiano de *Idiom Neutral*, tiu proponis tiun ĉi procedon.

²⁷⁰ A. CREUX, "De Auli a Occidental", Chapelle, Institute Occidental, 1932

Laŭ von Wahl oni povas formale dividi la vort-radikojn en du kategoriojn: la radikoj, kiujn li nomis “statikaj”, kaj la radikoj, kiujn li nomis “dinamika”. Tiuj nomoj estas simple distingigaj, kaj nenion povas indiki pri la semantika aspekto de tiu divido.

La “statikaj” verboj, kiel *dist-a-r* (stari), *proven-i-r* (deveni), k.a., formas siajn derivaĵojn sur la bazo de la formo de la prezenta participo (*dist-ant-*, *proven-i-ent-*). La deverbaj substantivoj estas do: *dist-ant-ie* (foro) kaj *proven-i-ent-ie* (deveno). La “dinamikaj” verboj, kontraŭe, formas siajn derivaĵojn sur la bazo de du malsamaj formoj:

(a) la *radiko mem* de la infinitivo, aŭ

(b) se temas pri aldono de la sufiksoj *-ion* (-o), *-ure* (-o), *-or* (-anto, -isto, -ulo...), *-iv* (-a), *-ori* (-a), sur la bazo de speciale formita radiko, kiun oni nomas “*supina kromradiko*”.

Por malkovri la *supinan kromradikon* oni procedas jene. Unue forprenu la finaĵon *-r* el la verba infinitivo (se la antaŭiranta vokalo estas *-a-* aŭ *-i-*). Se la antaŭiranta vokalo estas *-e-*, forprenu *-er*.

Jene:

cre-a-r	cre-a
exped-i-r	exped-i
mord-e-r	mord-

Se la restanta radikoparto finiĝas per vokalo, aldonu *-t*. Se la restanta radikoparto finiĝas per *-d* aŭ *-t*, transformu ambaŭ al *-s*. En ĉiuj ceteraj kazoj, la restanta parto de la radiko estas la *supina radiko mem*.

Ekzemple:

		<i>Supina kromradiko</i>	
cre-a-r	(krei) _	cre-a-t	> cre-a-t-ure (kreitajo)
exped-i-r	(sendi)	exped-i-t	> exped-i-t-ion (sendo)
atribu-e-r	(atribui)	atribu-t	> atribu-t-ion (atribuo)
explod-e-r	(knali)	explos-	> explos-ive (knala)
adher-e-r	(aligi)	adhe-s-	> adhes-ion (aligo)
direct-e-r	(direkti)	direct-	> direct-ion (direkto)

Pli malfrue oni aldonis kromregulon: verboj finiĝantaj per *-nyer* transformas *-y-* al *-t-*. Ekzemple:

extiny-e-r	(estingi)	extint-	>	extint-ion	(estingo)
------------	-----------	---------	---	------------	-----------

La reguloj de von Wahl, aplikitaj en Occidental, permesis kelkajn esceptojn:

Infinitivo	Esperanto	Supina kromradiko neregula
sed-e-r	(sidi)	sess-
ced-e-r	(cedi)	cess-
vert-e-r	(turni)	vers-
ven-i-r	(veni)	vent-
ten-e-r	(teni)	tent-
mov-e-r	(movi)	mot-

Tri verboj povas havi regulan kaj fakultativan malregulan supinan radikon:

Infinitivo	Esperanto	Supinaj kromradikoj	
		regulaj	neregulaj
f-a-r	(fari)	f-a-t	fact-
d-i-r	(diri)	d-i-t	dict-
Scr-i-r	(skribi)	Scr-i-t	script-

Per tiuj reguloj von Wahl sukcesis atingi preskaŭ 95 %-an regulecon en la formalaj latindevenaj vortofamilioj ²⁷¹. 5% restas malkontentigaj: fakte, oni ne povis trovi sistemon por komplete reguligi senkriplige la vorto-familion. Tiel: *act-e-r* (agi) anstataŭ la internacia **ag-e-r*, pro *act-ion* (ago, akcio). *act-iv* (agema, aktiva), *direct-e-r* (direkti) anstataŭ la pli internacia **dirig-e-r*, pro *direct-or* (direktoro).

La malkovro de la supina kromradiko ne estas tre komplika, se vi deiras de la infinitiva verboformo (i-formo). Pli komplika estas la malkovro de la infinitivo, kiam sciata estas *nur* la supino.

Fakte, ĉu *expedit-ion* venas de *exped-i-r* aŭ de *expedit-e-r*? Ĉu *mors-ure* venas de **morr-e-r*, *morde-r* aŭ **mors-er*? Nenia regulo povas nin helpi. Kiel malkovri, ke *indiction* venas de *dic-er*, kaj ne de **indict-er*? Kaj ke *cessation* venas de *ced-er*, kaj ne de **cess-ar*, kaj *deposition* venas de *deponer*, kaj ne de **deposir*?

Estas tamen dirende, ke la plejparto el la anoj de la novlatinoida kaj prototipismema skoloj ne akceptis tiujn malgraŭ ĉio tamen konvenajn regulojn. Ili opinias, ke nek latino, nek la ceteraj okcidenteŭropaj lingvoj posedas “derivregulojn” (formalajn), kaj ke pro tio oni devas rifuzi la enkondukon de regulo, kiu estas fremda al la spirito de la latinida lingvogrupo.

Estas ĝuste pro tio, ke en Interlingua la vortoj estas akceptataj kiel unuopaj radikoj, sendepende de la ekzisto de sintezigaj reguloj. Ni rimarkas tiun fakton en tiu ekzemplo: la malsamaj vortoj apartenantaj al la formala vortofamilio cirkaŭ la verbo *fac-e-r* (fari) venas el kvar malsamaj radikoj; inter si formale senrilataj:

fac-:	kiel en	fac-er	(fari)
fact-:	kiel en	fact-o	(faritaĵo, fakto)
fic-:	kiel en	ef-fic-er	(plenfari, finfari)
fect-:	kiel en	ef-fect-ive	(far-rezulta)

Sed tion ni vidos ankaŭ pli malfrue.

11.3.8. La afiksoj en 1a novlatinoidaj lingvoj

Kiel ni jam vidis, la deriv-sistemo per afiksoj en la lingvoj kiel Occidental estas sistemo nur laŭŝajne aŭtonoma: oni ja povas sintezi, sed “ĝusta” (t.e. akceptebla en la lingva normo) estas nur tio, kio havas paralelan formon en la novlatinaj lingvoj. La kriterio de ĝusta lingvouzo estas do ekstera al la sistemo mem, kaj dependas, el psikolingvistika vidpunkto, de la kono de unu aŭ pluraj novlatinaj lingvoj. Aliflanke, cetere, la sistemo de Occidental permesas, certe, la sintezigon de internaciaj vortoj, sed la signifo de la vorto mem, tiel sintezita, ne povas esti rekonstruata analizante la signifon de la unuopaj afiksoj, kiujn oni aldonis al la baza signifo de la radiko. La sistemo de Occidental do povas liveri lingvajn formojn, sed neniam signifojn.

²⁷¹ Fritz HAAS. “Grammatica de Interlingue in Interlingue”, Winterthur, 1956, p. 18-20.

Pri Interlingua la pripensaĵoj estas la samaj. Tamen io aldoniĝas: la derivosistemo de Interlingua estas multe pli malpreciza ol tiu de Occidental, kaj pro tio ĝi permesas eĉ ne la pure forman sintezigon de la internaciaj vortoj. Ĝi permesas do nur la forman analizon: ankaŭ tiu analizo, kompreneble, nenion povas ekstrapoligi koncerne la signifon de la analizita vorto.

En Esperanto ekzistas 10 prefiksoj kaj 31 sufiksoj. Oni povas aldoni ĉ. 10 kromajn afiksojn, utiligatajn ĉefe nur en la scienca prozo. Kaj per tiuj malmultaj vortetoj ni povas konstrui la tutan lingvon.

En Occidental ekzistas 14 prefiksoj kaj 68 sufiksoj, ofte sinonimaj ²⁷². Interlingua ²⁷³ havas tridekon da prefiksoj kaj sepdekon da sufiksoj. Ni ne povas analizi la funkciadon de ĉiuj: ni ekzamenos nur kelkajn. Cetere, tio, kion ni diros pri kelkaj, difinas ankaŭ la funkciadon de la ceteraj.

A

Por indiki la koncepton “igi”, Esperanto utiligas *nur unu* sufikson: -igi; Interlingua, kontraŭe, estas malŝparema, ĉar ĝi utiligas minimume dek malsamajn rimedojn. Jen kelkaj.

Malĝojigi

El *triste* (trista) venas *a-trist-ar*, aŭ ankaŭ *con-trist-ar* (tristigi), kaj ne *in-trist-ir*, *trist-is-ar*, *trist-ific-ar*, *trist-ar* (kiel *nett-ar*).

Plibonigi

El *melior* (pli-bona) venas *a-melior-ar* (plibonigi), kaj ne *melior-isar*, *melior-ific-ar* (kiel en *just-ificar*, *petr-ificar*).

Grandigi

El *grande* (granda) venas *a-grand-ir* (grandigi), kaj ne *in-grand-ir* (kiel *im-bell-ir*), *_grand-ar* (kiel *nett-ar*), *aggrandar* (kiel *a-melior-ar*), ktp.

Beligi

El *belle* (bela) venas *im-bell-ir* (beligi), kaj ne : *ab-bell-ir* (paralela al la itala *abbellire*, *im-bell-ar*, *com-bell-ar* (kiel *con-trist-ar*), *bell-isar* (kiel *real-isar*), ktp. Cetere, ekzistas ankaŭ la verbo *bell-ar*, sed ĝi venas de *bello* (milito), kaj do signifas "militi".

Realigi

El *real* (reala) venas *real-isar* (realigi), kaj ne *real-ific-ar* (kiel *just-ificar*), *irreal-ir* (kiel *im-bell-ir*), ktp.

Justigi

El *juste*, (justa) venas *just-ific-ar* (justigi), kaj ne *just-is-ar* (kiel *real-is-ar*), *a-just-ar* (kiel *a-melior-ar*), ktp.

Purigi

El *nette* (pura) venas *nett-ar* (purigi), kaj ne *a-nett-ar* (kiel *a-melior-ar*), *nett-ific-ar* (kiel *just-ific-ar*), ktp.

Ruĝigi

El *rubie* (ruĝa) venas *rub-esc-er* (ruĝigi), kaj ne *rub-ific-ar* (kiel *just-ificar*), *rub-is-ar* (kiel *real-isar*), ktp.

²⁷² HAAS, “Grammatica de Interlingue in Interlingue”, p. 31-36.

²⁷³ GODE, BLAIR, “Interlingua-English...”, 1955, p. 58.

Perfektigi

El *perfecte* (perfekta) venas *perfect-ion-ar* (perfektigi), kaj ne *ap-perfect-ar* (kiel *a-melior-ar*), aŭ *im-perfect-ir* (kiel *im-bell-ir*).

Feliĉe, io brilas en ĉi tiu kaoso; oni povas ankaŭ diri: *facer triste, facer grande, facer belle, facer real, facer juste, facer nette, facer rubie, facer perfecte*.

B

Por indiki “ulon, kiu laboras ne nur por propra plezuro, sed ankaŭ por gajni” (t.e. por la funkcio de la esperanta sufikso -isto), Interlingua havas minimume 10 sufiksojn.

Interlingua	Esperanto		Interlingua	Esperanto
commerci-o	komerco		commerci-ante	komerc-isto
mission	misio		mission-ario	misi-isto
avi-e	aviado		avi-ator	aviad-isto
art-e	arto		art-ista	art-isto
serv-icio	servo		serv-itor	serv-isto
medic	kuraca		medic-o	kurac-isto
invent-ion	livo		invent-or	knvent-isto
chimi-a	kemio		chimi-sta	kemi-isto
histori-a	historio		histori-co	histori-isto
barba	barbo		barb-ero	barb-isto

C

Esperanto havas unu solan sufikson, kiu indikas la abstraktan substantivon: -eco. Interlingua havas 7 sufiksojn samsencajn:

Interlingua	Esperanto		Interlingua	Esperanto
malad-e	malsana		malad-ia	malsan-eco ²⁷⁴
ver	vera		ver-itate	ver-eco
liber-e	libera		liber-tate	liber-eco
propri-e	propra		propri-etate	propr-eco
polit-e	afabla		polit-essa	afabl-eco
frigid-e	malvarma		frig-or	malvarm-eco
coquett-e	koketa		coquett-eria	koket-eco
alt-e	alta		alt-itude	alt-eco

11.3.9. La alterno de la radik-alomorfoj en la Interlingua-verboj

Ni jam vidis, ke la vortofamilioj en Interlingua ne kunligiĝas per la senco, sed nur per formalaj rimedoj. Se ni do konsideras la semantikan familion la Esperanta verbo “paroli”, ni malkovros, ke ĝin reprezentas en Interlingua minimume kvar radikoj. Tio signifas, ke por unu sola semantika vortofamilio oni devas utiligi formojn, kiuj derivas el-de kvar malsamaj formalaj vorto-familioj²⁷⁵:

²⁷⁴ Fakte, ne ĉiam la sufikso -ec- estas necesa. Ĝi estas nepre necesa nur en la vorto *koketeco*.

²⁷⁵ GILBERT, “Planlingvaj problemoj”, 1962, p. 31

Esperanto	Interlingua	Baza radiko	Vorto-familioj el bazaj radikoj
parol-o	parol-a	<i>parol-</i>	<i>Paroletta</i> (vorteto) <i>Parola de honor</i> (honorvorto)
parol-a	verb-al	<i>verb-</i>	Verbalisar (enparoligi)
parol-e	oral-mente	<i>oral-</i>	<i>Oralitate</i> (buŝeco) <i>Ore</i> (buŝo) <i>Orificio</i> (truo)
parol-i	parl-ar	<i>parl-</i>	<i>Parlamento</i> (parlamento) <i>Parlatorio</i> (parolejo) <i>Altoparlator</i> (laŭtparolilo)

Ni jam vidis, ke interne de la sama formala vortofamilio la bazradiko povas alterni kun sekundara (krom-) radiko. Ni parolas ĉi tie pri ne-libera alterno de la alomorfoj. Nome, tiu alterno dependas de la situo, t.e. de la cirkaŭantaj morfemoj.

Ili do troviĝas en komplementa distribuo. Ekzistas duspecaj verb-alomorfoj: la alomorfoj bazaj (kiel *fac-*), la t.n. supinaj alomorfoj (ekz-e *fact-*) kaj la kromalomorfoj (i.a. *fic-*):

Ekzemple la morfemo *ten* (de la verbo *ten-e-r* /teni/) estas trovebla en: *de-ten-e-r* (havi), *inter-ten-e-r* (vivigi), *man-ten-e-r* (manteni), *ob-ten-e-r* (petricevi), *sus-ten-e-r* (subteni), *re-ten-e-r* (reteni).

La alomorfo *tent* povas esti konsiderata “supina alomorfo”. Oni ĝin renkontras i.a. en: *de-tent-ion* (enkarcerigado), *ob-tent-ion* (petricevo), *sus-tent-ive* (subtena), *re-tent-iv-itate* (retenemo).

La alomorfo *tin* estas nomata “krom-alomorfo”. Ni ĝin retrovas en: *abs-tin-e-r* (abstini), *con-tin-e-r* (enhavi), *per-tin-e-r* (koncerni).

Ni rimarkas, ke la kromfamilio de *tin* havas ankaŭ supinan alomorfon, *tent*- kiu egalas (forme) al la supina alomorfo de la baz-alomorfo *ten*.

Ekz-e: *abst-tent-ion* (abstino), *con-tent-ive* (ŝnurliga)²⁷⁶.

Iuj alomorfoj supinaj povas naski tutan “krom-familion”. Jen ekz-e:

Bazradiko	Supina alomorfo	Krom-alomorfo	Supina krom-alomorfo
-cap- “kapt-”	-capt-	-cip-	-cept-
<i>Derivaĵoj</i>			
<i>Cap-er</i> (kapti)	<i>Capt-ar</i> (kapti)	<i>Re-cip-er</i> (ricevi)	<i>Re-cept-a</i> (recepto)
<i>Cap-ace</i> (kapabla)	<i>Capt-ura</i> (kapto)	<i>Re-cip-iente</i> (ujo)	<i>Con-cept-o</i> (koncepto)
	<i>Capt-ur-ar</i> (kapti)		

Ekzistas verboj, kiuj havas du alternativajn supinajn radikojn:

Flu-er (flui)

Tiu ĉi verbo havas du alternajn supinajn alomorfojn *fluct-* kaj *flux-* (kiel en *fluct-u-ation* /oscilo/, *flux-o* /fluo/).

²⁷⁶ GODE, “Interlingua-English...”, 1951, p. xxxv.

Prend-er (preni)

Tiu ĉi verbo havas du alternajn supinajn alomorfojn: *prens-* kaj *pris-*, kiujn ni retrovas en *prens-ion* (preno), kaj *en pris-a* (kapto, preno).

Sed ni trovas ankaŭ kromajn ekzemplojn.

Dic-e-r (diri) havas supinan radikon *dict-*, kiu naskas la verbon *dict-ar* (dikti). Granda estas la sencmalsamo inter *dic-e-r* kaj *dict-ar*. El ambaŭ venas ampleksaj vorto-familioj.

Ni konsideru nun la verbon *pasc-e-r* (paŝtigi), kiu havas supinan alomorfon *past-*, el kiu venas *past-ura* (paŝtejo), kaj eĉ la verbo *past-ur-ar* (paŝtigi). Ĉi tie, la senco-malsamo inter *pascer* kaj *pasturar* estas tre malgranda.

Oni ankaŭ sciu, ke inter *caper*, *captar* kaj *capturar* (v. supre) ne ekzistas granda senco-malsameco.

La derive-sistemo de la novlatinoidaj lingvoj (kaj aparte de Interlingua) ne povas konstrui signifojn, sed nur formojn. Kaj ni vidis, ke la sistemo de Interlingua estas pli taŭga por forme analizi vortojn, sed ne por sintezi ilin ²⁷⁷.

Tamen, ofte ili permesas nur unu-direktan (formalan) derivadon.

Ne ekzistas reguloj por forme derivi la kromalomorfojn el la bazalomorfo, Kontraŭe, ekzistas aro da reguloj por la derivado de la supinaj alomorfoj:

La verboj en *-a-r* perdas la finaĵon *-r* kaj aldonas *-t*:
am-a-r (ami) naskas *an-am-at-*;

La verboj en *-e-r* perdas la finaĵon *-r* kaj la temon *-e-*.
Anstataŭe ili aldonas *-i-t*:
hab-e-r (havi) naskas *hab-i-t-*;

La verboj en *-i-r* perdas la finaĵon *-r*. kaj aldonas *-t*:
aud-i-r (aŭdi) naskas: *aud-i -t-*.

Ekzistas centoj de neregulaj verboj (ĝenerale, apartenantaj al la kategorio de verboj finiĝantaj per la temo *-e-*). Por tiuj verboj oni ellaboris regulojn, sed ili estas tiel komplikaj kaj esceptoplenaj, ke estas pli facile ilin lerni parkere ²⁷⁸.

La “defektivaj” verboj

La verboj “defektivaj” estas tiuj i-vortoj, kiujn havas nur kelkajn konjugaciajn tensojn. Tipa estas la itallingva verbo *andare* (radiko: *and-*), kiu alternas, en la konjugacio, kun la neekzistanta verbo **vadere* (radiko: *vad-*).

Io vado (mi iras) sed alitense: *Io andavo* (mi iris)

Por analizi la internaciajn vortojn oni devas enkonduki *defektivajn* verbojn. Tial en Interlingua ekzistas pluraj baz-alomorfoj en derivaĵoj, sed neniam troviĝas kiel primitivaj verboj. Jen kelkaj ekzemploj.

Iu en Interlingua povas esti *loqu-ace* (parolema), sed la verbo **loqu-er* ne ekzistas. En Interlingua oni *con-stru-e* domon sed la verbo **stru-e-r* (konstrui), malgraŭ la alomorfo *struct-*, ne ekzistas. Verbo *defektiva*, do, povas ankaŭ havi supinan alomorfon ... kaj eĉ krom-alomorfon.

²⁷⁷ BERGER, “Historia...”, dua volumo, cit., p. 51, sen dato

²⁷⁸ GODE, BLAIR, “Interlingua. A Grammar...”, 1955, p. 85-88

Ekzemple, la defektiva **grad-er* (supinalomorfo *gress-*) naskas la krom- alomorfon *gred-* (kun supin-alomorfo *gress-*), kiujn ni retrovas en la ekzistantaj *ag-gred-e-r* (agresi), *con-gress-o* (kongreso).

Unu el la plej komplikaj defektivaj verboj korespondas al la semantika enhavo de nia verbo “koni”. Temas pri la baz-radiko defektiva *nosc.* kun la supin-alomorfo *not-*, kaj la kromalomorfo *gnos-* (kun siavice la supina kromalomorfo *gnit-*), Tiujn vortojn ni retrovas en *not-ori* (famekonata), *co-gnosc-e-r* (koni), *co-gnit-ion* (kono), ktp.

11.3.10 La arkaismoj kaj la sinonimoj

La vortaro de Interlingua enhavas plurajn sinonimojn ²⁷⁹, kiujn oni enkondukis pro pluraj kaŭzoj, sed ĉefe ĉar ili estas la legitima rezulto de la apliko de la prototipismaj reguloj al la lingvomaterialo de la nov-latinaj lingvoj. kelkaj el tiuj vortoj estas, male, “koncedoj” al jam ekzistantaj planlingvoj (i.a. ĉefe al Occidental). Tiuj duoblaĵoj ne diferenciĝas laŭ la senco: ili do ne reprezentas veran riĉigon de la lingvo. Pro tio pluraj Interlingua-istoj konsideras ilin neutilaj²⁸⁰.

Laŭ la principoj de prototipismo, laŭ kiuj, en la kazo de neakordiĝo inter la kontrollingvoj, oni devas retroveni al la latina, “aĉeti” devas esti tradukata en Interlingua per *emer* (france: *acheter*; itale: *comperare*, hispane: *comprar*, latine: *emere*, angle: *buy*), Sed en Interlingua ekzistas ankaŭ alia vorto, *comprar*, kiun oni akceptas aplikante la regulon laŭ kiu oni povas enkonduki necesan vorton, kvankam nur la sud-romanaj lingvoj posedas ĝin, Jen aliaj ekzemploj:

Prototipa formo	Signifo	Sinonimoj (“arkaismoj” kaj novlatinaĵoj)
mais (preskaŭ neuzata)	sed	<i>sed</i> : pura latinismo, uzata ĉefe en Usono <i>ma</i> : koncedo al Occidental, uzata ĉefe en Eŭropo
io	mi	<i>ego</i> : latinismo, el kiu: <i>egoismo</i> . La vera prototipa formo estas tamen <i>eu</i> . Novlatinoida formo: <i>io</i> , <i>yo</i> .
nove	naŭ	<i>novem</i> : latinaĵo, uzata pro tio ke <i>nove</i> signifas ankaŭ “nova”.
---	ĉu	<i>an</i> : latinismo <i>esque</i> : koncedo al Occidental.
alique	io	<i>alco</i> : sudromanaĵo <i>alico</i> : sudromanaĵo

11.3.11. Transiro de iu gramatika kategorio al alia

La transiro de unu al alia gramatika kategorio en Esperanto estas relative simpla: ĝenerale, sufiĉas aliigi la finaĵojn gramatikajn. Ekzemple, ni ricevas la adjektivon el substantivo transformante la finaĵon -o de la substantivo, al finaĵo -a.

En Interlingua ne ekzistas gramatik-karakterizaj finaĵoj; tiu kategorio-transiro, do, estas farata per afiksoj – aŭ kelkfoje estas eĉ tute nebla (se ekz-e en la novlatinaj lingvoj iu substantivo ne havas korespondan adjektivon). Ni vidu kelkajn ekzemplojn:

²⁷⁹ Gode, Blair, “Interlingua. A Grammar...”, 1955, p. 90.

²⁸⁰ BERGER, “Historia...” dua volumo, cit., sen dato, p. 53.

Substantivoj		Adjektivoj	
<i>Interlingua</i>	<i>Esperanto</i>	<i>Interlingua</i>	<i>Esperanto</i>
nation	naci-o	nation-al	naci-a
Franc-ia	Franci-o	franc-ese	franc-a
lun-a	lun-o	lun-ar	lun-a
hero-e	hero-o	hero-ic	hero-a
system-a	sistem-o	system-atic	sistem-a
mar	mar-o	mar-in	mar-a
legend-a	legend-o	legend-ari	legenda
gigant-e	gigant-o	gigant-esc	gigant-a
puer-o	infan-o	puer-il	infan-a
mysteri-o	mister-o	mysteri-ose	mister-a
crani-o	krani-o	crani-an	krani-a
fratr-e	frat-o	frat-erne	frat-a
interim	interim-o	interim-e	interim-a, dumtempa
compar-ation	kompar-o	compar-ative	kompar-a
prepar-ation	prepar-o	prepar-atori	prepara
introduc-tion	enkonduk-o	introduc-ori	enkonduka
corn-o	korn-o	corn-ee	korn-a
urg-ent-ia	urĝ-o	urg-ente	urĝa
terr-a	ter-o	terr-estre	ter-a
cel-o	ciel-o	cel-este	ĉiel-a
pall-or	pal-o	pall-ide	pal-a
conven-i-ent-ia	konven-o	conven-i-ente	konven-a
pac-e	pac-o	pac-ific	pac-a
intu-ition	intuici-o	intu-itive	intuici-a
decis-ion	decid-o	decis-ive	decida
energi-a	energi-o	energi-c	energi-a
sex-o	seks-o	sex-ual	seks-a
Paris	Pariz-o	paris-ian	pariz-a
Espan-ia	Hispani-o	espan-iol	hispan-a

Ni vidas do, ke en Esperanto la sola finaĵo -a korespondas al trideko da finaĵoj en Interlingua:

-al, -ese, -ar, -ic, -atic, -in, -ari, -esc, -il, -ose, -an, -erne, -e, -atic, -ative, -atori, -ori, -ee, -ente, -estro, -este, -ide, -i-ente, -ific, -itive, -ive, -c, -ual, -ian, -ol, ktp.

Ni do ne miras se deverbaj substantivoj, kiuj ĉiuj finigas per la sufikso *-ion*, povas transformigi al adjektivoj nur per malsamaj sufiksoj ²⁸¹:

compensat-ion	kompens-o	adjektiviĝas al:	compensat-ori	kompens-a
illustrat-ion	ilustr-o	adjektiviĝas al:	illustrat-ive	ilustr-a
intent-ion	intenc-o	adjektiviĝas al:	intent-ion-al	intenc-a
react-ion	reakci-o	adjektiviĝas al:	react-ion-ari	reakci-a
sedit-ion	ribel-o	adjektiviĝas al:	sedit-iose	ribel-a

Alia kategoria-transformo sufiĉe komplika estas la transiro el-de verbo al ties koresponda verba substantivo. En Esperanto, tiu procezo estas relative simpla: oni ŝangas la finaĵon -i per la finaĵo -o (kondiĉe ke la radiko apartenu al la semantika kategorio de “verbaj radikoj”). Kaze ke ne, oni

²⁸¹ WARINGHIEN, “Lingvo kaj vivo”, 1959, p. 381.

aldonas la finaĵon -ado). La mekanismo en Interlingua estas pli komplika. Simpligante iomete, ĝi aspektas tiel:

1.

Verboj, kiuj formas la deverban substantivon utiligante regulan supinan allomorfon:

-ion:	<i>consolar</i>	/ <i>consolat-ion</i>	(konsoli / konsolo)
-ura:	<i>martellar</i>	/ <i>martellat-ura</i>	(marteli / martelado)
	<i>nutrir</i>	/ <i>nutrit-ura</i>	(nutri / nutro).

2.

Verboj, kiuj utiligas la infinitivon kiel deverban substantivon, i.a.:

<i>haber</i>	/ <i>le haber</i>	(havi / havo),
<i>deber</i>	/ <i>le deber</i>	(devi / devo).

3.

-age:

<i>abbordar</i>	/ <i>abbord-age</i>	(albordiĝi / albordiĝo).
-----------------	---------------------	--------------------------

4.

-amento, -imento:

<i>arrangiar</i>	/ <i>arrangi-amento</i>	(aranĝi / aranĝo).
------------------	-------------------------	--------------------

5.

-o :

<i>ruitar</i>	/ <i>ruit-o</i>	(brui / bruo).
---------------	-----------------	----------------

6.

Nuda radiko:

<i>regrettar</i>	/ <i>regret</i>	(bedaŭri / bedaŭro).
------------------	-----------------	----------------------

7.

-or:

<i>caler</i>	/ <i>cal-or</i>	(varmi / varmo)
<i>amar</i>	/ <i>am-or</i>	(ami / amo)

8.

-ata, -ita;

<i>promenar</i>	/ <i>promenata</i>	(promeni / promeno)
<i>blanchir</i>	/ <i>blanch-ita</i>	(blankigi / blankigo)

9.

-antia, -entia, -ientia:

<i>sperar</i>	/ <i>sper-antia</i>	(esperi / espero)
<i>patir</i>	/ <i>pat-ientia</i>	(pacienci / pacienco)
<i>arder</i>	/ <i>ardentia</i>	(bruli / brulo)

10.

Verboj, kiuj formas la deverban substantivon per neregula supina alomorfo:

-ion :	<i>proponer</i>	/ <i>proposit-ion</i>	(proponi / propono)
-ura :			

<i>franger</i>	/ <i>fract-ura</i>	(rompi / rompo)
-o, -a:		
<i>efficer</i>	/ <i>effect-o</i>	(efiki / efiko)
<i>conducer</i>	/ <i>conduct-a</i>	(konduki / konduko)

En la supra ekzemplo ni rimarkas, ke la cititaj sufiksoj estas samsignifaj, ĉar ili estas utiligataj en sama funkcio. Tamen, ekzamenante aliajn ekzemplojn, ni malkovros, ke en aliaj okazoj, ili povas ankaŭ havi malsamajn funkciojn, do esti malsamsignifaj.

Tial, la sufikso *-ion* povas havi multajn signifojn:

- la *agon* (kiel en *ager / act-ion*, ago),
- la *rezulton* de la ago (kiel en *proponer / proposit-ion*, proponitaĵo),
- la *lokon* de ago (kiel en *rediger / redact-ion*, redaktejo),
- la *konkretan rezulton* de ago (kiel en *construer / construct-ion*, konstruaĵo).

Samon ni povas rimarki koncerne la sufikson *-age*, kiu povas signifi pli-malpli kunordigitan kolekton, ofte kun mis-estima nuanco (*babillage*):

foli-age	(foliaro)
plumage	(plumaro)
plantage	(arbaro)

Post verboj, ĝi signifas aktivadon, ĉefe industrian aŭ profesian, aŭ la rezulton, la lokon, la tempon, kelkfoje eĉ la kostojn (ekz-e: *rafinage* (rafinado), *abordage* (albordiĝo), *luage* (luprezto), *doanage* (doganpago), *viage* (vojaĝo: t.e. vojirejo)²⁸².

Cetere, tiuj malfacilaĵoj ne estas tipaj de Interlingua: ili trovigas en ĉiuj okcidentaj lingvoj. Ekzemple, en la franca oni diras *pâtiss-erie* (kuk-aĵejo) kaj *confis-erie* (konfit-aĵejo), sed *pâtiss-ier* (kukaĵ-isto) kaj *confis-eur* (konfitaĵ-isto).

Jen plua ekzemplo. En la itala, por traduki la sufikson Esperantan *-igi*, ekzistas pluraj formoj, kiel i.a.:

<i>ricco / ar-ricch-ire</i>	(riĉa / riĉ-igi)
<i>caldo / s-cald-are</i>	(varma / varm-igi)
<i>scuro / o-scur-are</i>	(malluma / mallum-igi).

Analoga ekzemplo el la germana: la supraj ekzemploj tradukiĝas per:

<i>reich</i>	/ <i>be-reich-ern</i>
<i>warm</i>	/ <i>er-wärm-en</i>
<i>dunkel</i>	/ <i>ver-dunkel-n</i>

Tio tamen ne signifas, ke Interlingua estas facila por germanlingvano: tiuj du lingvoj estas ja komplikaj, sed *malsame* komplikaj. Ekzemple, germano, kiu en sia lingvo uzas la adjektivon *universitär* (el *Universität*, “universitato”) kaj *regul-är* (“regula”: malpli ofta ol *regelmässig*), ne povas kompreni kiel en Interlingua oni devas diri *universit-ari* sed *regul-ar*. Sama problemo stariĝas por la jena vortserio:

<i>wichtig</i>	<i>Wichtig-keit</i>	(grava/gravo)	<i>importante</i>	<i>important-ia</i>
<i>aufmerksam</i>	<i>Aufmerksam-keit</i>	(atenta/atento)	<i>attentive</i>	<i>attent-ion</i>

²⁸² CARLEVARO, “The naturalist...”, 1971.

<i>richtig</i>	<i>Richtig-keit</i>	(ĝusta/ĝusto)	<i>juste</i>	<i>just-essa</i> ²⁸³
<i>brüderlich</i>	<i>Brüderlich-keit</i>	(frata/frateco)	<i>fraterne</i>	<i>fratern-itate</i>
<i>dankbar</i>	<i>Dankbar-keit</i>	(dankema/dankemo)	<i>grate</i>	<i>grat-itude</i>

11.4. Problemoj de semantiko

Krom la forma normigo de la novlatinaj lingvoj (kiu, en Interlingua, konkretiĝas per kolekto el ĉiuj komunaj formoj), estu utila ankaŭ la normigo de la *signifo* de tiuj formoj. Sed tio estas malfacila. Oni ja scias, i.a., ke la hispana *contestar* signifas “respondi”, kaj ne “kontesti”. Samsituacie, la hodiaŭa franca vorto *hôpital* (hospitalo) nur forme similas al la sveda *hospital*, kiu signifas “frenezulejon”. La antikva-franca vorto *hôtel-dieu* (“malsanulejo”), se laŭvorte tradukita en la italian (*ospedale di dio*), estas nekomprenebla. IED ĝenerale klopodis ja normigi la sencojn, sed en kazo de malkonkordo inter la franca kaj la angla, ambaŭ malkonkordaj sencoj estis akceptitaj.

Tial *expedition* signifas, kiel la franca *expédition*, “ekspedicio” (ekz-e al la Norda Poluso), aŭ “sendo” (ekspedo), kaj, kiel en la angla, ankaŭ “malprokrasto”. Feliĉe alia senco, laŭ la germana *Expedition* (gazet-oficejo) ne akceptiĝis.

Analoge, *convention* signifas, laŭ franca kutimo, “konvencio”, kaj, samtempe laŭ la angla *convention*, ankaŭ “kongreso” (aŭ “kunveno”). Kaj *adresse* signifas “adreso”, laŭ la franca kutimo, sed ankaŭ “alparolo” (laŭ la angla *address*).

Aliajn terminojn oni normigis prikonsiderante nur la sudromanajn lingvoj kiel *totevia* (tamen), aŭ *intertanto* (intertempe).

Ni vidis, ke la derivosistemo de Interlingua, kaj ĝenerale de ĉiuj novlatinoidaj lingvoj, liveras al ni ja formojn, *sed ne* signifojn. Tial, se ni klopodas analizi la kunmetitajn (derivitajn) vortojn, ni rimarkos, ke la etimologio de la signifoj de la unuopaj formalaj kunmet-elementoj ne donas al ni la veran signifon de la ekzamenita vorto. Por scii ties signifon, ni devas jam koni la ekvivalenton en iu romanida lingvo.

Jen kelkaj ekzemploj. Mi celas indiki, ke la signifo de la konstruita vorto ne korespondas al la sumo de la elementoj, kiuj konstruis ĝin.

dis-posit-ion,	signifus <i>dis-met-it-ado</i> ,	sed ne <i>dispono</i>
per-mitt-er	signifus <i>tra-sendi</i> (aŭ <i>plen-sendi</i>),	sed ne <i>permesi</i> .
con-clud-er	signifus <i>kun-fermi</i> ,	sed ne <i>konkludi</i> .
aud-ient-ia	signifus <i>aŭd-ant-eco</i> ,	sed ne <i>aŭdienco</i>
com-plic-at-ion	signifus <i>kun-fald-it-eco</i> ,	sed ne <i>komplikeco</i>
ex-plic-ar	signifus <i>el-fald-i</i> ,	sed ne <i>klarigi</i>

Aliflanke, la aŭtonoma uzo de la afiksoj de Interlingua, utiligitaj sur la bazo de iliaj signifoj, povus konduki al formoj, kiuj, certe, havas signifon, sed kiuj ne estas korektaj (t.e. ne apartenas al la lingva normo), ĉar analogaj formoj estas neekzistantaj en la novlatinaj “kontrol”-lingvoj.

El *militar* (milita) oni povus tiri *militariato* (militarismo).
Sed la gusta vorto estas *militarismo*.

El *affabile* (afabla) oni povus tiri *affabileria* (afableco).
Sed ĝusta estas nur *affabilitate*

²⁸³ Ekzistas ankaŭ *just-itia*, sed en la senco de la germana *Ge-rechtig-keit*, “justeco”.

El <i>sperar</i> (espero)	oni povus tiri <i>speror</i> (espero), sed nur <i>sperantia</i> estas la ĝusta esprimo.
El <i>libere</i> (libera)	oni povus tiri <i>liberia</i> (libero), sed nur <i>libertate</i> estas akceptebla.
El <i>capital</i> (kapitalo)	oni povus tiri <i>capitalario</i> (kapitalisto), sed nur <i>capitalista</i> estas ĝusta.

Tio signifas, ke en Interlingua ne ekzistas libera vortformado. Vorto derivita estas korekta nur se analoga formo ekzistas en la novlatinaj lingvoj. Alikaze, eĉ se ĝi estas plensenca, ĝi estas erara.

11.5. La “eraroj” koncernantaj Interlinguan

Laŭ la svisa Interlingua-pioniro prof. Ric Berger, “/Interlingua/ estas tiel bone farita, ke la praktiko malkovrigis en ĝi neniun korektendan eraron”²⁸⁴. Tio estas iom troa. Eĉ en IED ekzistas eraroj, kiujn oni devus korekti. La sveda filologo Ebbe Vilborg asertis, ke tiuj eraroj povus dependi de la fakto, ke la prototipa metodo funkcias koncerne la sciencajn vortojn, sed fiaskas, kiam oni devas normigi la ĉiutagajn vortojn; pro tio oni ne povas konstrui lingvon ekskluzive sur la bazo de la prototipa tekniko. Konkrete: jen.

- La ĉiutaga vortaro (centra, intima), ne havas internaciajn vortojn;
- Ekzistas en tiu vortaro tre multe da periferiaj kaj komplikaj konceptoj, kie la senco-normigo estas praktike neebla²⁸⁵.

Cetere, en Interlingua (IED) oni normigis plurajn vortojn ekster la logiko de prototipismo:

Interlingua	Esperanto	Vera prototipo
conilio	kuniklo	*cuniculo
cibolla	cepo	*cipolla
surveliar	vokti	*survigilar
rubie	ruĝa	*rubro, -a
specimen	specimeno	*specimine
vespere	vespero	*vespero
sulfure	sulfuro	*sulfuro
rivet	vinkto	?
haste	hasto	*hasta
rhinocerote	rinocero	*rhinoceronte
decorum	dekororo	*decoro

Sed ĉefe en la *morfosintakso* oni rezignis apliki la prototipajn regulojn. Tial en Interlingua ekzistas la jenaj filologiaj strangaĵoj:

Interlingua	Esperanto	Vera prototipo
-ar, -er, -ir	-i	*-are, -ere, -ire
-al	-a	* -ale
-il	-a	* -ile

²⁸⁴ BERGER, “Pourquoi l’Interlingua...”, 1971, p. 19

²⁸⁵ Ebbe VILBORG, “Interlingua sen principoj”, en: “Fokuso”, 1970/6

-e	-a	* -o, -a
-itate	-eco	* -itade
-itude	-eco	* -itudine
-a	-as	* -o, -as, -a, -amos, -atis, -an

Konkrete:

amar devus esti **amare* (ami),
haber **habere*, havi),
audir **audire*, aŭdi),
national **nationale*, nacia),
civil **civile*, civila),
nove **novo*, **nova*, nova,
veritate **veritade*, vero,
altitude **altitudine*, alto,
io / tu / ille / nos / vos / illes ama. Sed la vera prototipo de la verbaj formoj estas: **amo*, *amas*, *ama*, *amamos*, *amatis*, *aman*: (mi/ci, li, ni, vi, ili/ amas).

Ni rimarkas, ankaŭ, ke la prototipaj reguloj, el la logika vidpunkto, ne sufiĉas. Jen utila ekzemplo.

La prototipa formo de *temps-tempo-tiempo-time* estas **tempo*. Sed en Interlingua ni trovas la terminon *tempore*. La adjektiva formo de “tempo”: *temporel-temporale-temporal* havas preskaŭ korektan prototipan formon: *temporal(e)*. Pro tio, Gode transformis la prototipan formon de la adjektivo, al la pseŭdo-prototipa formo de la substantivo. Ĉi-lasto estas “pli utila”. Sed ja ne prototipa.

La samon koncernas la prototipo de la vorto “korpo” (*corps-corpo-cuerpo-body*). Ĝi devus esti **corpo*, sed fakte ni trovas la vorton *corpore*, pro la utila ekzisto de la adjektivoj *corporal-corporale*, *corporel*.

11.6. La anoj de Interlingua kaj la prototipismaj reguloj

Oni ne imagu al si, ke la apliko de la prototipismaj reguloj estas facila. En la periodaĵo *Revista de Interlingua* (ekde nun nomata Rdl), 32-a numero, jaro 1972-a, aperis listo jam publikigita en 1963 kun proksimume 800 novaj vortoj kreitaj far-de C. Jardel “laŭ la stilo de Interlingua”. En tiu listo, ĉ. 120 vortoj (parte jam troviĝantaj en IED) estas ĝustaj (*absintho*, absinto, *aconito*, akonito, *antro*, groto, *archipelago*, ĉefinsularo, ktp.).

Sed la ceteraj estas eraraj, kiel rezultas el studo de Ebbe Vilborg²⁸⁶.

Jen eltiraĵoj :

<i>abitar</i>	(rifuĝigi, franca ŝablonaĵo),
<i>accidentia</i>	(evento: * <i>accidentia</i>),
<i>acidosa</i>	(okzalo: * <i>acidula</i>),
<i>affaller</i>	(falflaksigi, franca ŝablonaĵo),
<i>agacear</i>	(agaci, * <i>agaciar</i>),
<i>alceo</i>	(alko, * <i>alce</i>),
<i>ellebore</i>	(helleboro, * <i>helleboro</i>),
<i>cudar</i>	(angule fleksi, * <i>cubitar</i> : franca ŝablonaĵo),
<i>grunno</i>	(muzelo, * <i>grunio</i> : franca ŝablonaĵo),

²⁸⁶ VILBORG, "Interlingua sen principoj", en: "Fokuso", 1970/6

inrhumar	(malvarmumi, *inrheumar: franca ŝablonajo),
marjorana	(majorano, *majorana: franca ŝablonajo),
mosto	(vinbersuko fermentanta, *musto),
scudella	(trinkujeto, *scutella),
tabes	(tabeso, *tabe),
trucculente	(minaca, *trucculente).

Kelkfoje la enlistigitaj vortoj dubigas onin pri ties signifo: *farce* (farso? farĉo?), *nappetta* (tablotu-keto? akvofonteto?), *scolopendra* (skolopendro /besto/, aŭ /botaniko/?), *uluco* - *uluca* (laŭ la listo, resp.: otuso - noktuo /strigo). Sed en Interlingua tiuj du vortoj aperas, kvazaŭ la otuso estus la maskulo de la noktuo aŭ de la strigo).

En Rdl (70/1972) aperis novaj vortoj mankantaj en IED: ilin aprobis unue lingva komisiono konsistanta el spertaj Interlingua-istoj. Kaj tamen, laŭ Vilborg²⁸⁷, iuj vortoj estas eraraj, kiel i.a. *syndromo* (sindromo, **syndroma*), *mecena* (meceno, **mecenate*), *pledar* (pledi, **placitar*), *frete* (frajto, **fret*), *stulto* (stulta, **stulte*).

Ankaŭ en la plej lastatempa tiaspeca verko, aperinta en 1974²⁸⁸, svarmas la eraroj: en ĝi ekzistas tro multe da vortoj, kiujn oni renkontas en nur tri kontrollingvoj (aŭ eĉ malpli ol en tri), aŭ ekzistas tro multe da latinismoj, kaj eĉ ioma nekohero: ekz-e: *trejecto* (vojlongo, **trajecto*), *anamnesis* (anamnezo, **anamnese*).

11.7 La eraro-gramatiko de Interlingua

Unu el la plej profundaj konantoj de Interlingua, la sveda filologo Ebbe Vilborg, atente ekzamenis revuon en Interlingua, *Revista de Interlingua* (Rdl), por starigi sisteman katalogon de la eraroj, kiujn oni tie renkontas. Tiu laboro estas tre interesa, kaj devus puŝi aliajn esploremulojn en tiun kampon²⁸⁹.

En la ortografio ni rimarkas malfacilaĵojn pro la duoblaj konsonantoj: *apercipe* (-pp-, Rdl 25), *skelettic* (-t-, Rdl 19), *symetria* (-mm-, Rdl 13), *escapava* (-pp-, Rdl 13).

Sed granda parto de tiuj eraroj koncernas la “belsonajn” finaĵojn de Interlingua:

phantasie (-a, Rdl 22), *periode* (-o, Rdl 16), *cupra* (-e, Rdl 16), *ferre* (-o, Rdl 13), *januar* (-io, Rdl 17), *jentacula* (-o, Rdl 17), *ideogramme* (-a, Currero 7), *cave* (-a, Currero 11), *chlamyda* (-e, Currero 7), *myrmecophaga* (-o, Rdl 20), *regrete* (*regret*, en: “Les écoles de Romandie et la mystique de l'Esperanto”, 1975), ktp.

Tiuj finaĵo-eraroj reflektiĝas ankaŭ en kelkaj derivitaj vortoj.

De *filia* venas *filietta* (filineto), kaj ne *filiette*, kiel en Rdl 19; devas esti *gravuretta*, ne *gravurette*, kiel en Rdl 22; de *filio*. (filo) venas nature *filietto* (fileto), sed de *turre* (turo) kaj de *arbore* (arbo) devus veni respektive *turretta* (tureto) kaj *arboretto* (arbeto), kaj ne **turette* kaj **arboette*, kiel la ekzemplo kun la vorto *filio* povus sugesti al ni.

Tio estas sufiĉe malfacila, ankaŭ se absolute prototipa.

²⁸⁷ Ebbe VILBORG, "Novaĵoj pri Interlingua", en: "Fokuso", 1973/11

²⁸⁸ E. BERGGREN, "Vocabulos supplementari pro usatores de Interlingua", Stockholm, 1974

²⁸⁹ Ebbe VILBORG, "Latinaj vortoj en Esperanto kaj Interlingua", en: "Fokuso", 1968/3

Povas okazi, ke oni atribuas verbon al iu konjugacio, kiu ne estas la ĝusta (ni ne forgesu, ke en Interlingua ekzistas 3 konjugacioj): ekz-e *exercir* (-er, ekzerci, Rdl 18 kaj 20), *avellava* (-eva, elradikigis, Rdl 17).

Ankaŭ la afiksoj estas malfacile utiligeblaj: ĉefe la distingo inter la du samsencaj adjektivigaj sufiksoj -ari anstataŭ -ar: *seculari* (Rdl 17, 22), *scholari* (Rdl 24), *populari* (Rdl 19), *auxiliari* (Rdl 13, 14), kaj ankaŭ kelkfoje -ar anstataŭ -ari: *secundar* (Rdl 19).

11.8. Konkludo

Ni resume kaj mallonge ĉirkaŭrigardis la karakterizojn (lingvajn) de Interlingua. Ni observis, ke Interlingua havas tre komplikajn sistemon por analizi la novlatinajn vortojn, kiu estas tamen, samtempe, ankaŭ tre efika. Ĝia gramatiko estas, male, arbitra kaj kontraŭa je la spirito de la novlatinaj lingvoj, sed, malgraŭ tio, ĝi estas sufiĉe taŭga interromanida modelo, simila al la Esperanta modelo. Sed estas dubo, ke la bezono pri internacia lingvo koncernas nur eŭropo-centrajn homgrupojn. Se ni konsideras ankaŭ aliajn ne necese eŭropo-centrajn grupojn, Interlingua aperas iom ekstertema. La malfacilo, kiun ĝi prezentas al ĉiuj, kiuj ne scias la francan, aŭ la hispanan, aŭ la italan, malebligas ĝian disvastigon ekster tiu eŭropa regiono, kiun oni generale nomas “Romania” (el kiu, certe, oni devas esceptigi Brition, kiu neniel estas “romanida”, malgraŭ la asertoj de niaj Interlingua-amikoj).

Aliflanke, tamen, ni povis konstati, ke Interlingua ne ĉiam estas fidela al siaj propraj principoj: en ĝi troviĝas multaj artefaritaj kaj arbitraj lingvotrajtoj. Se Interlingua vere ambicias al la rolo de latinida pralingvo, oni devos ankoraŭ ĝin longe korekti kaj amendi. Sed, supozeble, ne pro tio temas.

12. Planlingvistika fatamorgano


12.1. La iluzia “progreso” en planlingvistiko

Unu el la plej gravaj reprezentantoj de Interlingua en Svisio, prof. Ric Berger, en unu el siaj lastaj verkoj, asertas, ke “de 1880 ĝis 1950 interlingvistiko, aŭ scienco de la internacia lingvo, havis evoluon pasiigan, gravegan, kaj nerenverseblan, el artefarita konceptado (t.e. el vortoj inventitaj aŭ kripligitaj) al [naturisma konceptado, t.e.], al gramatiko kaj vortaro 100%-e naturaj”²⁹⁰.

Tion ni povas interpreti plurmaniere:

1. Laŭ Berger, la interlingvistikaj skoloj sekvis unuj la aliajn.
2. Laŭ Berger, do, la projektoj, kiuj naskiĝis en la sino de tiuj skoloj, estus “idoj” unuj de la aliaj, laŭ tempa ordo. Tial Berger havintus la bonŝancon povi “studi ĝisfunde la projektojn sinsekve enmodiĝintajn”²⁹¹.
3. Laŭ Berger, ekzistus ruĝa kondukfadeno en tiu evoluo, kiu estus tendenco ĉiam pli forta al la novlatinoideco de la planlingvo.


Prof. Berger vidas do “modon” inter la projektoj de artefarita lingvo: la “ekstermodiĝintaj” projektoj estus sinsekve forlasataj favore al aliaj pli “modernaj”. La plej “lastmoda” projekto, nuntempe, estus Interlingua, laŭ tiu skemo:



²⁹⁰ BERGER, “Les écoles...”, 1975, p. 5.

²⁹¹ BERGER, samloke, p. 2.

Kaj jen skemo, kiu evidentigas la “filigajn” tezojn de Ric Berger.



Tiu genetica teorio ne plaĉas al ĉiuj novlatinoidismaj planlingvistoj: iuj el ili ekvidis, ke tiu tezo pri “konverĝo de ĉiuj skoloj kaj do ankaŭ de la sistemoj” estas nenio alia ol la historiigo de la vivosperto de unuopaj planlingvistoj. Tial la Interlingua-isto Adolf H. Fritzsche skribas: “La simpla fakto, ke iu, estinte antaŭ kvindek jaroj esperantisto, kaj nun, estante Interlingua-adepto, ne pravigas la konkludon, ke Interlingua estas ido de Esperanto”²⁹².

Ni trovas je la unua fojo la menciitan teoriigon (samtempe genetikan kaj teleologian) de Interlingvistiko en tre interesa verketo de Ric Berger mem, aperinta en la jaro 1946²⁹³. Ekde tiam iuj interlingvistoj senkritike ripetas tiun tezon, sen konsciigi, kiel diras Bausani, ke “ĉiuj problemoj de interlingvistiko estis [...] jam starigitaj en la 19-a jarcento”²⁹⁴. Ni do ne ekvidas, ke la tri ĉefaj skoloj en planlingvistiko (la aŭtonomisma, la prototipisma kaj la modernlingva skoloj) kunekzistis jam ekde la komenciĝo de tiu scienco. Ili forgesas, ke Interlingua tute ne estas 100%-e natura lingvo (ni demonstris tion preter ĉiu ebla dubo), kaj ke la “modo-teorio” en planlingvistiko preteratentas kelkajn facile observeblajn bazajn faktojn. Se vere ekzistintus “modo” de Esperanto inter 1900 kaj 1918, hodiaŭ Esperanto estus jam delonge malaperinta. Kial do ĝuste hodiaŭ Esperanto estas proksimume milfoje pli disvastiĝinta ol Interlingua (kiu laŭteorie devus esti la plejmoda projekto)?

Fakto estas, ke neniam ekzistis “modo”. Esperanto fariĝis kaj restis la plej utiligata planlingvo. Ankaŭ la pli poste naskitaj planlingvoj (1908: Ido; 1921: Occidental; 1951 Interlingua) akiris kelkajn parolantojn, sed ankaŭ “ŝtelis” ilin de pli fruaj movadoj. Ido ricevis proksimume unu dekonon el la esperantistoj. Multajn aliĝintojn Ido perdis al Occidental, kaj fine Occidental ilin perdis al Interlingua. Esperanto, post la Ido-krizo, ne plu perdis anojn, minimume ne al aliaj planlingvoj, tial la esperantistoj daŭris arigi aliajn esperantistojn. Tial tiu ĉi planlingvo restis, malgraŭ historie konataj malfacilaĵoj, restis la plej disvastiĝinta. Ja ne temas pri “modo”.

Hodiaŭa skemo evidentigus, ke Esperanto ĉiam estis la plej disvastiĝinta, kaj ke ĝi tendencas krome al plua (hodiaŭa) disvastiĝo; ke ekzistas disvastiĝo-dekresĉendo: de Esperanto al Ido, poste de Ido al Occidental, kaj fine de Occidental al Interlingua. Plue, ni vidas, ke ĉiuj lingvoj (kun la escepto de Esperanto) havis malgrandan momenton de pleja disvastiĝo (kiu neniam superis la tiutempan

²⁹² Adolf M. FRITZSCHE, "We Need a Better Image of Interlingua", eld. de l' aŭtoro, Madrid, 1970.

²⁹³ Ric BERGER, "La question d'une langue universelle", Chapelle Paris, Occidental-Institute, 1946, p. 5.

²⁹⁴ BAUSANI, "Le lingue inventate...", 1974 (1970), p. 127.

disvastiĝon de Esperanto), sed ke ili poste preskaŭ ĉion perdis. Se oni povas paroli pri “modo”, tiam tiu modo koncernas ja Idon, Occidentalon kaj Interlinguan, sed ne Esperanton.

12.2. Ni organizu rondan tablon!

Iuj Interlingua-amikoj plendas, ke la esperantistoj, en sia informado pri Esperanto, ne parolas pri Interlingua ²⁹⁵. Ili asertas, krome, ke la esperantistoj prisilentas al la “publiko” la malsukcesojn de Esperanto ĉe la *Ligo de la Nacioj* kaj la *Internacia Normiga Organizaĵo* (ISO), kie ĝuste Interlingua sukcesis ²⁹⁶. Ekzistus do tulpova “silento-konspiro” kontraŭ Interlingua, konspiro organizita tre mistere far-de la esperantistoj ²⁹⁷.

En siaj publikaĵoj, kiuj koncernas la *planlingvistikajn demandojn* (ĉu en Esperanto, ĉu en naciaj lingvoj) la esperantistoj parolas *preskaŭ ĉiam* ankaŭ pri Interlingua. En iliaj publikaĵoj koncernantaj ekskluzive Esperanton, estas, kontraŭe, sufiĉe malofte trovi mencion pri Interlingua. La kaŭzo estas klara: se oni parolas *nur* pri Esperanto, oni ne vidas la neceson paroli pri Interlingua. Svisio estas sufiĉe granda por viviĝi du interlingvistikajn movadoj, pri kiuj oni eĉ povus imagi, ke ili povus kunlabori, ĉar ili havas analogajn celojn. Sed laŭ prof. Berger “se oni apogas sin je la publika opinio, oni devus pro justeco mencii ankaŭ [...] Interlinguan” ²⁹⁸. Ne temas pri problemo de justeco, sed pri problemo de oportuneco. La Esperanto-movado estas relative hegemonia, do estas normale, ke ĝi priskribas proprajn atingojn kaj/aŭ celojn. Male, oni povas tre bone kompreni, ke, en sia informado, la Interlingua-istoj devas trovi manieron diferencigi sin disde pli konata movado, nome disde la Esperanta movado.

De tempo al tempo, kun bedaŭrindaj iloj: okazas, ke la Interlingua-propagandemuloj ne kapablas diferencigi disde la Esperanto-movado, sen riproĉi al la esperantistoj ilian esperantistecon, sen elkovi senbazajn asertojn (kiel ekz-e: la “silento-konspiron”, la “fiaskon de Esperanto ĉe LdN”, la “malakcepton” ĉe ISO, la “evoluon” de interlingvistiko, ktp.).

Ni do proponas al la Interlingua-amikoj komunan renkontiĝon, rondan tablon, kie ni trankvile kaj science diskutos pri niaj respektivaj socio-lingvistikaj tezoj kaj pri niaj movadaj problemoj. Ni esperas, ke oni ne respondos al ni: “Ronda tablo inter specialistoj? Sed ĝi jam funkciis dum jarcento-kvarono kaj la rezulto? Ĝuste la kreo de Interlingua kaj elimino de Esperanto” ²⁹⁹.

Se niaj Interlingua-amikoj konsentas, ni estas je dispono.

²⁹⁵ BERGER, “Les Écoles...”, 1975, p. 2

²⁹⁶ Berger samloke, p. 12

²⁹⁷ Berger, samloke, p. 2

²⁹⁸ Berger, samloke, p. 3

²⁹⁹ Berger, samloke, p. 4

13. La kvar “juĝoj” pri Esperanto

13.1. La Delegacio por la alprenado de internacia lingvo

En 1900, okaze de la Universala Ekspozicio en Parizo, grupo el sciencistoj francaj kaj eksterlandaj, inter kiuj la filozofo kaj logikisto Louis Couturat, fondis Delegacion (en la tiama Esperanto: “Delegitaro por la alprenado de internacia lingvo”).

La esperantistoj aktive helpis en la kolekto de membroj kaj subtenantoj. La celo de tiu delegacio estis interesigi la *Internacian Asocion de la Akademioj* selekti internacian planlingvon. Sed en 1907 la menciita Asocio deklaris sin nekompetenta, kaj tiam la gvidantoj de la Delegacio decidis mem selekti la proponotan projekton. Tio estis danĝera: estas klare, ke la Delegacio ne havis povon, eĉ ne moralan, malgraŭ la multnombraj aliĝoj.

Malgraŭ tio, la dekdu membroj de la plenuma Komitato de la delegacio kunvenis 18-foje en Parizo inter la 15-a kaj la 24-a de oktobro 1907. Temis pri M.C. Barrios (profesoro pri medicino el Peruo), Jan Baudouin de Courtenay (lingvisto, el St. Petersburgo), E. Boirac (profesoro pri filozofio, el Dijono), Ch. Bouchard (profesoro pri medicino, el Francio), R. Eötvös (matematikisto, el Hungario; lin anstataŭis pli malfrue G. Rodos), W. Forster (astronomo, Germanio), G. Harvey (ĵurnalisto, el Usono), Otto Jespersen (profesoro pri lingvistiko, el Kopenhago), S. Lambros (historiisto, el Grekio), C. Le Paige (administristo, el Belgio), W. Ostwald (kemiisto, estonta nobelpremiulo, el Germanio), H. Schuchard (profesoro pri lingvistiko, el Aŭstrio). Oni kooptis ankoraŭ du membrojn: W.T. Stead (grava angla ĵurnalisto) kaj G. Peano (matematikisto, el Italio). Sekretarioj estis la franca matematikisto Léopold Leau kaj la franca filozofo Louis Couturat.

Dum tiuj 18 kunsidoj oni invitis la multajn aŭtorojn de planlingvoj prezenti persone iliajn projektojn. Oni aŭdis interalie ankaŭ “advokaton” de Esperanto (kiu tiutempe estis jam la planlingvo plej vaste konata): ĉar Zamenhof ne povis veturi Parizon, li mem komisiis al tiu celo Louis De Beaufront (“la duan patron de Esperanto”).

Ĉiuj estis konvinkitaj, ke la Komitato selektos Esperanton, ĉar ĝi estis la plej disvastiĝinta planlingvo, kaj ĉar la Delegacio mem ricevis flanke de la esperantistoj apogon (financan kaj moralan) vere amasan. Sed tio ne okazis.

La 24-an de oktobro 1907 la Komitato decidis adopti *principe* Esperanton, tamen je la kondiĉo, ke oni enkonduku en ĝin la reformojn prezentitajn fare de iu mistera “Ido”, pri kiu neniu estis ion ajn aŭdinta antaŭe.

La esperantistoj, en granda plimulto, malakceptis ĉi tiun verdikton. Interalie, ĉar ilin intrigis tiu mistera “Ido”. Nur en majo 1908 Louis De Beaufront (reprezentanto oficiala de Esperanto antaŭ la Komitato de la Delegacio) deklaris, ke “Ido” estas li mem. Tio ne aranĝis la situacion: male, la esperantistoj konsideris sin “perfiditaj” fare de sia propra reprezentanto.

Intertempe kreiĝis laborkomisiono, al kiu apartenis Ostwald, Couturat, Jespersen, Leau kaj Baudouin de Courtenay. Ĝi kooptis en sian sinon ankaŭ Louis De Beaufront “pro lia speciala kompetenteco”. Tiu laborkomisiono okupiĝis pri la fajlado kaj polurado de la reformita Esperanto selektita en oktobro.

Monata revuo (*Progreso*, ankoraŭ ekzistanta) ekaperis, unue redaktita en Esperanto, pli malfrue en la nova lingvo, baldaŭ nomita “Ido”, laŭ la pseŭdonomo de ĝia aŭtoro. Fondiĝis ankaŭ lingvoakademio. Tiu akademio daŭre kaj senhalte reformis Idon ĝis 1913, kiam estis deklarita “pe-

riodo de stabileco”. La unua mondmilito, kiu eksplodis en 1914, multe malutilis la Ido-movadon, interalie kaŭzante la morton de ĝia motoro mem, Louis Couturat.

Post la unua mondmilito la Ido-movado reelaniĝis, sed tre baldaŭ komenciĝis lingvaj kvereloj, kiuj kondukis la movadon al relative rapida malprogreso. Konvenas ekzameni, ke la unuaj adeptoj de Ido ne estis unuecaj. Iuj estis esperantistoj, kiuj konvinkiĝis pri la lingva supereco de la projekto de “Ido”. Aliaj, estis homoj, kiuj celis konstrui “perfektan” lingvon. Post 1920, montriĝis, ke tiuj du Idanoj ne kapablis kunvivi. La iamaj esperantistoj rifuzis daŭrigi la senhaltan reformadon de la lingvo. La eternaj perfektigistoj, suferantaj je konata “malsano”, nomata “lingva malstabilito”, preferis ĝin forlasi por novaj projektoj. Zamenhof foje nomis ilin reformistoj, perfektigistoj, novasistemistoj, unuigistoj³⁰⁰. Tial tiu movado rapide ŝrumpis.

Ĝis 1937, tamen, io restis malklara: kiu estis la vera aŭtoro de Ido? Fakte, pro diversaj kaŭzoj, oni povis nur pene kredi al la “deklaro” de de Beaufront. En 1937 Ric Berger povis demonstri, danke dokumentojn trovitajn en la arkivo de la iama delegacio (ĉe la vidvino de Couturat), ke la vera aŭtoro de Ido estis L. Couturat mem.³⁰¹

La afero restas tamen malklara, kaj la juĝo de la Delegacio ne ŝajnas travidebla. Intertempe, tamen, la materiale vidita de Berger malaperis, kaj ankaŭ la historiistoj starigas al si pli da demandoj, ol ili povas respondi.³⁰²

13.2. La juĝo de la Ligo de la Nacioj (LdN)

Iuj amikoj de Interlingua opinias, ke la LdN malaprobis Esperanton en 1922. Tion asertas i.a. Ric Berger³⁰³. Fakte la afero “Esperanto” ĉe LdN komenciĝis en 1920 kaj finiĝis en 1925: en 1922 aperis raporto *favora* al Esperanto.

Ni klopodos montri, kiamaniere la faktoj eventis, sur la bazo de la studoj de la internacijura profesoro d-ro Ivo Lapenna³⁰⁴. El tiuj studoj ekzistas ankaŭ anglalingva versio³⁰⁵.

La motoro de Esperanto ĉe LdN estis la svisa verkisto, politikisto, profesoro pri anglistiko, kaj filozofo Edmond Privat. Li iĝis honorofica jurkonsilanto de la ĉefo de la persa delegacio, la princo Arfa. Pli malfrue li fariĝis vic-delegito de Persio. Dank-al lia iniciatemo dek unu delegitoj (de Brazilo, Kolombio, Haitio, Belgio, Ĉilio, Ĉinio, Sudafriko, Italio, Hindio, Ĉeĥoslovakio kaj Persio) prezentis al la unua Ĝenerala Kunveno de LdN la 9-an de decembro 1920, projekton de rezolucio, kiu proponis interalie, ke LdN, konscia pri la problemo de la lingvodiverseco en la mondo, sekvu kun intereso la eksperimentojn koncernantajn la instruon de la internacia lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj landoj, kaj ke ĝi esperas, ke tio ĝeneraliĝos, kaj ke ĝi petas la Ĝeneralan Sekretarion pretigi por la pliposta ĝenerala kunveno raporton pri la atingitaj rezultoj.

Tion oponis la delegito de Francio: en siaj intervenoj dum la diskuto, li atentigis, ke tia rekomendo vundas la sendependon de la publika instruo en lia lando, kaj ke ĝi povus minaci la patriotan edukon de la lernantoj pro sia internaciisma enhavo. Fakte Francio tiam havis reakcian registaron, kiu, per la ministro Léon Bérard (estro de la publika instruo), malpermesis la kursojn de Esperanto en la francaj lernejoj.

³⁰⁰ Ric BERGER, "Historia del lingua international. Dua volumo" Morges, Editiones Interlingua, sen dato, p. 17

³⁰¹ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 3.

³⁰² (Rimarko de 2018): Tazio CARLEVARO, "La enigmo De Beaufront", en "Literatura Foiro", 1976, N. 37-8.

³⁰³ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 3.

³⁰⁴ LAPENNA, LINS, CARLEVARO, "Esperanto en Perspektivo", 1974, p. 748-802.

³⁰⁵ Ivo LAPENNA, "Common Language Question before International Organizations", en "La Monda Lingvoproblemo", 1970/5.

Tiu projekto de rezolucio estis ekzamenita unue ĉe la Dua Komitato de LdN. En sia raporto al la Ĝenerala Kunveno, la Komitato proklamis sian akordon kun la teksto pri la graveco de lingvo por la internacia komunikado. Aliflanke, antaŭ ol respondi definitive, ĝi proponis pretigi raporton, ekzamenonta ĉiujn disponeblajn donitaĵojn. Koncerne Esperanton, la Komitato komunikis, ke ĝi estis informita, ke tiu internacia helplingvo estis uzita kun sukceso en pluraj internaciaj kongresoj. Diplomatie, tamen, la Komitato proponis forstrecki la inviton disvastigi la instruon de Esperanto, ĉar tiu preterpasas la kompetencojn de la Komitato mem.

La fina teksto de la propono pretigita por la Kunveno parolis do nur pri la intereso koncerne la eksperimentojn en la lernejoj de kelkaj ŝtatoj membroj, kaj komisiis la Ĝeneralan Sekretarion pretigi raporton pri la atingitaj rezultoj.

Dum la diskuto ĉe la Ĝenerala Kunveno la franca delegito, Gabriel Hanotaux, proponis haltigi la diskuton, ĉar “internacia lingvo jam ekzistas, la franca, instruata ĉie el la intelektula mondo”. Konsekvence, oni voĉdonis proponon pri prokrastigo de la diskuto: tial la raporto de la Dua Komitato ne estis akceptita fare de la unua Ĝenerala Kunveno de 1920.

La 9-an de septembro 1921, okaze de la dua ĝenerala Kunveno de LdN, la propono de 1920 estis ree prezentita en la sama formo fare de Sudafriko, Rumanio, Persio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Kolombio, Ĉino, Finnlando, Albanio, Japanio, Venezuelo, Hindio, Pollando. La signatintoj demandis krome, ke la raporto de la dua Komitato estu havigita al ĉiuj delegacioj, same kiel la raporto de Nitobe Inazo, tiam sub-sekretario de LdN, pri la oficiale vizitita Universala Kongreso de Esperanto, en Prago.

La du raportoj estis disdonitaj, kaj la projekto tiel aperis en la tagordo.

La dua Kunveno de LdN, ĉi-foje, aprobis la konkludojn de la Dua Komitato de la 17-a de decembro 1920, komisiis la Ĝeneralan Sekretarion entrepreni la proponitan enketon, kaj decidis enmeti la demandon pri la instruado de Esperanto en la lernejojn en la tagordon de la 3-a Ĝenerala Kunveno (rezolucio de la 15-a de septembro 1921).

La raporto, preparita fare de la ĝenerala Sekretario de LdN, estis farita sur la bazo de enketoj ĉe la ŝtatoj membroj. Oni ĝin publikigis kun dato 28.6.1922 en angla, franca, itala, germana kaj esperanto

En la enkonduko oni trovas la historion de la demando “Esperanto” ĉe LdN. Plenumante la ricevitan komision, la sekretario povis konvinkiĝi, ke Esperanto estas nuntempe jam vivanta lingvo, ĉie kaj ĉiel uzebla.

La dua ĉapitro prezentas la situacion de la instruado de Esperanto en la lernejoj de Albanio, Bulgario, Brazilo, Belgio, Ĉinio, Finnlando, Francio, Britio, Italio, Japanio, Nederlando, Portugalio, Svisio kaj Ĉeĥoslovakio, kaj, plue, en la lernejoj de ŝtatoj ne-membroj: Germanio, Hungario, Sovetunio, kaj Usono.

La tria ĉapitro pritraktas la uzon de Esperanto en la praktiko. La konkludo emfazas, ke “la lingvo estas multpova forto, kaj ke LdN tute pravas sekvi kun speciala intereso la progresojn de Esperanto, kiu, se ĝi povos disvastiĝi, iam kondukos al grandaj rezultoj el la vidpunkto de la morala unueco de la mondo”.

³⁰⁶ “Esperanto as an International Auxiliary Language”, Adopted by the third Assembly, 1922.

Dum la 3-a Kunveno, dum aŭtuno 1922, la 5-a Komitato diskutis la raporton. Favoraj estis prof. Gilbert Murray, fama oksforda helenisto, reprezentanto de Sudafriko. Kontraŭaj estis la idisto Forchhammer (reprezentanto de Danio), kaj Rio Branco, ambasadoro de Brazilo, kiu atakis Esperanton kiel “lingvo de mizeruloj kaj de komunistoj”. La franca delegito, la senatano G. Reynald, deklaris, ke li ricevis la instrukcion de sia registaro malaprobi kiun ajn internacian lingvon, kiu ne estas la franca. Ĝuste li proponis resendi la tutan demandon al la Komisiono de Intelekta Kunlaboro (eta praformo de la hodiaŭa Unesko). La finna, persa, ĉina, bulgara kaj panama delegitoj esprimis la timon, ke la fina celo de tiu propono estis tutsimple la enterigo de la propono.

Fine de tritaga diskuto la kvina Komitato aprobis kompromisan solvon: unuflanke, aprobi kun malmulte da modifoj la raporton de la ĝenerala sekretario, aliflanke, plusendi la demandon de la instruo de esperanto al la citita *Komisiono de Intelekta Kunlaboro*.

La tria ĝenerala Kunveno de LdN aprobis la raporton de la kvina Komitato dum sia seanco de la 21-a de septembro 1922. Tiamaniere, la raporto de la Sekretario (datita je 28.6.1922) nuntempe apartenas al la oficialaj aktoj de LdN.

Siavice, la *Komisiono de Intelekta Kunlaboro* pritraktis la aferon dum tri kunvenoj, ekde la 31-a de julio 1922 ĝis la 1-a de aŭgusto 1923. Kiel pli malfrue skribos ĝia prezidanto, la Komisiono estis komisiita fare de la Ĝenerala Kunveno pritrakti la demandon de la instruo de Esperanto kaj proponi sian opinion pri la problemo de internacia helplingvo. Dum la tri kunvenoj, regis malkonkordo. Torre de Quevedo (Hispanio) konsideris la demandon grava, kaj proponis nomi subkomisionon el spertuloj por ĝin ekzameni. La ĉefa oponento estis la svisa profesoro Gonzague de Reynold, kiu iĝos konata pro siaj por-faŝistaj pozicioj en la politika vivo de Svisio. Lin subtenis iuj delegitoj, ofte pro lingvopolitikaj kaŭzoj: Luchaire (Francio) asertis, ke la ne-intelektuloj ne bezonas internacian lingvon, ĉar la popolamasoj kontaktas inter si nur tra siaj ĉefoj - aŭ tra tradukoj. Male, Lowes Dickinson (Britio) subtenis la pozicion de De Quevedo, kaj esprimis la konstaton, ke tro multe da membroj de la Komisiono estas plej senciaj pri la temo.

Dum la diskuto oni proponis naciajn lingvojn, oni konsideris antaŭjugojn kvazaŭ sciencaj veraĵoj, kaj, en tia etoso, la Komisiono decidis per ses vocadoj kontraŭ unu kaj tri sindetenoj ne studi la demandon pri la instruo de Esperanto en la lernejoj, kaj ne rekomendi internacian lingvon al la atento de LdN. Antaŭ la vocdono Nitobe Inazo intervenis en tre klarvida maniero, kaj esprimis la timon, ke post dudeko da jaroj, kiam la nombro de tiuj, kiuj parolas Esperanton estos pli impona, oni povos juĝi rezolucion kontraŭan aŭ malfavoran al Esperanto kiel signon de la nekompetenteco de tiu komisiono.

Dum la kvara Kunveno de LdN (1923) prof. Jacques Bardoux (Francio) alvenis Ĝenevon kun la celo forpuŝi definitive Esperanton utiligante la negativan respondon de la Komisiono. Li proponis do al la kvina Komitato rezolucion, kiu rekomendis la studon de la fremdaj lingvoj anstataŭ artefartajn. Sed ĉi tie la plejmulto el la delegitoj malaprobis, kaj klarigis al prof. Bardoux, ke ili ne volis insisti favore al Esperanto por ne malplaĉi al la franca registaro, sed ke ili cetere ankaŭ ne volis aprobi ion, kio estis kontraŭ Esperanto. Tial Bardoux devis rezigni je sia propono.

Ni do vidas, kiel diras ankaŭ Wüster **307**, ke la rezolucio de la Komisiono de Intelekta Kunlaboro neniam estis aprobita aŭ eĉ nur entagordigita ĉe LdN. La sola oficiala dokumento de LdN pri Esperanto estas la Sekretaria raporto de 28.6.1922, kiu estis aparte favora al Esperanto.

Gonzague de Reynold

³⁰⁷ Eugen WÜSTER, "Internationale Sprachnormung in der Technik", Bonn, tria eldono, 1970.

Niaj Interlingua-amikoj ofte mencias artikolon de Gonzague de Reynold, kiu aperis en “La Revue de Genève” dum marto kaj junio 1925³⁰⁸. En tiu artikolo ni rimarkas, ke Gonzague de Reynold, konata ideologo de la svisa intermilita dekstra ekstremismo, kiu eĉ pledis favore al la forigo de la svisa Parlamento kaj al la “Nova Eŭropo” de Mussolini, estas kontraŭ Esperanto pro pure politikaj kaŭzoj. Fakte, liaj lingvaj ekzemploj pri Esperanto estas aŭ manipulitaj, aŭ eraraj.

Li kontraŭis Esperanton, ĉar por li Esperanto signifis la liberigon de la popolamasoj el la lingva tutorado de la intelektaj elitoj, ĉar Esperanto apelis la homojn al internaciismaj kaj pozitivaj sentoj por la “fremduloj”, kaj fine ĉar Zamenhof estis judo - kaj apartenis al la slava kulturo.

Pri la eliteca, mezepokema, maltolerema kaj naciisma tendencoj de Gonzague de Reynold aperos baldaŭ en “Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista” (La Chaux-de-Fonds) artikolo de prof. Pierre Hirsch.

Sed, kiel esperantistoj, ni ne povas ne-esprimi nian miron, ke niaj Interlingua-amikoj, kiuj sendube havas niajn samajn humanismajn celojn, citas la negativan opinion de Gonzague de Reynold pri Esperanto, preteratentante tamen la ideologian kaj intelektan matricon de tiu juĝo.

Kaj, fine: Gonzague de Reynold estis kontraŭ Esperanto, ĉar Esperanto tiam estis la plej disvastiĝinta mondlingvo. Se tiam la plej disvastiĝinta mondlingvo estintus Interlingua, li nature kontraŭus Interlinguan.

13.3. The International Auxiliary Language Association

Laŭ mi tian ĉapitron devus skribi amiko de Interlingua. Malfeliĉe, neniuj ĝis nun interesiĝis pri la historio de la institucio, kiu naskis ilian lingvon. Sufiĉu atentigi la leganton, ke la arkivo de IALA malaperis: ŝajnas, ke ĝi troviĝas ie en Brazilo, sed neniuj scias ion precizan pri tio.

Al niaj Interlingua-amikoj la historio de la lingvo kaj de la movado ne interesas: ili kontentiĝas per kelkaj mitoj pri la historio de IALA. Laŭ ili temus pri asocio el lingvistoj fondita fare-de riĉega usona sinjorino, kiu cetere estis esperantista, sed kiu tamen agis por IALA kiel meceno, elspezante dum 25 jaroj 5 milion frankojn (lastatempe tiu sumo reduktigis al 3 milion frankoj). Tiuj specialistoj, post 25-jara laboro, post amplekseĝaj enketoj ĉie en la mondo, naskis finfine lingvoprojekton, ĝuste Interlingua. Tiumomente IALA, plenuminte sian taskon, malaperis por ciam.

De tempo al tempo oni eĉ legas, ke IALA malakceptintus Esperanton en 1951³⁰⁹, sen ke ni tamen estu informitaj pri la kiel kaj kialo.

13.3.1. Antaŭ la kreo de IALA

Jam en 1918-1919, konsilite fare-de multnombraj sciencistoj, i.a. fare-de D-ro Frederick G. Cottrel (de la *International Research Council*), multnombraj gravaj internaciaj sciencaj asocioj proponis aŭ Esperanton aŭ ĝenerale la alprenon de internacia lingvo³¹⁰. Nur en 1923 Cottrel siikcesas interesiĝi al siaj planoj la usonajn milionulojn Dave Hennen Morris kaj Alice Morris Vanderbildt, el Novjorko. Post longaj diskutoj inter specialistoj dm 1923, en 1924 naskiĝis IALA³¹¹.

³⁰⁸ Trovebla parte en: BERGER, “Pourquoi l’Interlingua?”, 1971, p. 21.

³⁰⁹ BERGER, “Les écoles...”, 1975, p. 3.

³¹⁰ WÜSTER, “Internationale Sprachnormung...”, 1970, p. 31+6-349.

³¹¹ GODE, “Interlingua-English...”, 1951, p. x-xi.

13.3.2. La "scienca" IALA

La celo de IALA en 1924 estis la scienca esploro de la problemo de planlingvo kaj la akcelo de la ĝeneraligita enkonduko de planlingva projekto, sed tute ne krei novan³¹². Tiel esprimiĝas la "Outline of program", en p. 9a: "IALA celas [...] iniciati ampleksan studon, diskuton kaj disvastigon de ĉiuj demandoj koncernantaj la starigon de helplingvo, kaj ankaŭ celas al esploro kaj eksperimentado, kiu povus rapidigi tian starigon en intelekto valida maniero kaj sur stabilaj fundamentoj"³¹³. Tiu laboro artikulaciigis en tri esplor-kampoj: esploroj pri la strukturo de la ekzistantaj planlingvoj, esploroj pri la instruo de tiuj lingvoj, kaj esploroj pri la praktika uzo de tiuj lingvoj³¹⁴.

La unua prezidanto de IALA estis la usona lingvisto Dean E.B. Babcock, kiun postsekvis en 1936 la direktoro de "New York Times", d-ro John H. Finley. Ekde 1940 prezidentiĝas d-ro Stephen Duggan, direktoro de "Institute of International Education".

Sinjinoro Morris estis unue honorofica sekretariino, poste direktoro de la sekcio pri lingvistika esploro. S-ro Morris estis la kasisto de IALA ĝis sia morto en 1944. Lin anstataŭis lia filo, Lawrence Morris.

Mi skribis: "la 'scienca' IALA"; fakte, sur la bazo de Esperanto, Ido, Esperanto-II, Occidental, Latino sine Flexione, la tri esplorsekcioj de IALA faris grandegan kaj gravegan laboron: kongresoj, libroj, studoj, testoj, kiuj reprezentas grandegan labor- kaj mon-sumon, kiujn neniu plu pli malfrue povis ripeti. Estas klare, ke la studoj pri Esperanto, kaj la testoj pri ĝia disvastiĝo kaj ĝia uzo en pedagogio, estas la plej mult-nombraj: tio dependas de la fakto, ke la disvastiĝo de Esperanto permesis eksperimentojn, kiuj estis neblaj kun la ceteraj projektoj.

Tial subite interlingvistiko iĝis scienco flegata ankaŭ en lingvistikaj medioj: multaj lingvistoj ekis studi la problemon kaj labori en tiu kampo. Malfeliĉe tiu florado-sezono ĉesis tre baldaŭ, kiam, en 1933, IALA decidis, ke oni devos konstrui novan projekton de lingvo. Oni havas la impreson, ke la ĉefaj respondeculoj de IALA ne atribuis grandan gravecon al tiu "nova tasko": i.a. la scienca sekretario de IALA, la esperantista lingvisto Edward Collinson (Liverpool), daŭrigis sian neŭtralan kaj fruktoportan esplorkonferencon.

En 1939 li estis devigita al demisio, ĉar, kaŭze de la milito, la tuta IALA estis centrigita en Novjorko, sub la direkto de Ezra Clark Stillman. Nur tiam komencigis la "granda silento" de IALA sur la scienca kampo, silento kiu daŭros praktike ĝis 1951 (do 11 jarojn). Kaj ĝuste en 1939 la grava neŭtrala kaj lingvistike valora esplorkonferenco estis forlasita profite al la investo de fortoj en la kreo de nova lingvo.

Ĉirkaŭ IALA, antaŭ 1939, ne mankis famaj nomoj: ilin plejparte kontaktis Dave Hennen Morris, kiu inter 1933 kaj 1937 estis usona ambasadoro en Belgio³¹⁵. El tiu floradoperiodo, jen ni citas kelkajn verkojn kiuj neniam estus povintaj aperi sen la meceneco de IALA: ili reprezentas indan monumenton al tiu institucio.

Unu el la plej gravaj verkoj de L.L. Zamenhof, la *Originala Verkaro*, neniam povintus aperi sen IALA-subvencio. La samon ni povas diri pri la verko de P.E. Stojan *Bibliografio de Internacia Lingvo*. Ambaŭ libroj aperis en 1929. De F.G. Cottrel aperis *Science in the Building of a New Language*, 1933. Multege da raportoj estis pretigitaj sub la komisiono de IALA pri la instruo de planlingvoj, i.a.: *A Preliminary Investigation of the Teaching of Auxiliary Languages in Schools*, 1927, kaj *Progress in Learning an Auxiliary Language*, 1927. Aperis krome ankaŭ du studoj de la usona

³¹² MANDERS, "Interlingvistiko kaj...", 1950.

³¹³ cit. laŭ MANDERS, 1950.

³¹⁴ WÜSTER, "Internationale Sprachnormung...", 1970, p. 346-349.

³¹⁵ GODE, "Interlingua-English...", 1951, p. xi-xii.

lingvisto Edward Sapir: *The Problem of an International Auxiliary Language*, 1925, kaj *The Function of an International Auxiliary Language* (samdata). Ni cetere ne forgesu la gravan *Can Social Engineers Improve the International Situation?* de H.N. Shenton.

Sed unu el la plej gravaj verkoj estis *Language Learning*, 1933, de E.L. Thorndyke, kiu enhavas la resumon de la eksperimentoj faritaj pri la lerno kaj la instruo de la planlingvoj (ĝenerale, temis nur pri Esperanto) inter oktobro 1925 kaj junio 1931, ĉe la *Division of Psychology of the Institute of Educational Research of Teachers' College*, ĉe la Columbia-Universitato. Tiuj studoj estis direktitaj de Thorndyke mem kaj de Helen S. Eaton ³¹⁶.

Alia grava verko estis esploro pri la lingvoj uzataj okaze de la internaciaj kunvenoj. Temas pri *Cosmopolitan Conversation*, de Herbert N. Shenton, 1934. Laŭ tiu verko, tiuepoke, okazis 250-300 internaciaj kunvenoj po jare. La lingvoj plej uzataj estis (laŭorde) la franca, la angla, la germana, la itala, la hispana, Esperanto, la dana, la latina kaj la japana.

Unu el la laste eldonitaj verkoj estis *Semantic Frequency List*, de Helen S. Eaton, 1940. Sed ankaŭ la "Advisory board for linguistic research" estis tre aktiva: ĝi aperigis monografion kun komparaj studoj pri la planlingvoj, kaj kun esploroj pri la fundamentoj lingvistikaj de la lingvoplanado ³¹⁷.

Kelkaj studoj de IALA estis publikigitaj nur postmilite, sed tiam ne plu de IALA, sed de la esperantistoj. Tio okazis al antaŭmilita esploro de P. Bovet, pri kiu ni parolos pli malfrue.

En 1925, okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, IALA invitis la esperantistajn kaj idistajn ĉefojn (Ido, fakte, tiam estis ankoraŭ relative disvastiginta) al "ekumena" kunveno, sed sen konkretaj rezultoj.

En 1930, ĉiam en Ĝenevo, IALA organizis renkontiĝon inter la reprezentantoj de la malsamaj interlingvistikaj movadoj por klopodi ilin "amalgami" per lingva sintezo. Lingvistoj ĉeestis: Jespersen (kiu prezidis la aranĝon), Collinson (membro de la Esperanta Akademio), S. Auerbach (membro de la Ido-Akademio), Ch. Bally, A. Debrunner, O. Funke, E. Hermann, S. Karcevski, A. Secheyaye.

Pro la fiasko de tia "ekumenisma" sinteno, la IALA-estroj decidis konstrui mem propran projekton: ili konstatis, ke lingva kunfandiĝo estas malebla. Tial la *Advisory Board for Linguistic Research* iĝis la plej grava IALA-institucio. Unuamomente, ĝiaj membroj estis Jespersen, Sapir kaj Collinson, pli malfrue, post la morto de Sapir en 1939 kaj de Jespersen en 1943, ĝiaj membroj estis Collinson, A. Sommerfelt kaj A. Debrunner; al ĝi oni kooptis cetere ankaŭ Helen S. Eaton kiel "Linguistic Research Associate".

Aliflanke, post la koncentriĝo de IALA en Usono en la jaro 1939-a, tiu *Advisory Board* iĝis tut-simpla fasado; malantaŭ ĝi agis la tutpova direktoro de IALA (unue Collinson, post 1939 Stillman, pli malfrue Gode, poste Martinet, poste ankoraŭ Gode).

Tre grava montrigis la iompostioma prezento de la laboroj de IALA antaŭ pluraj internaciaj kaj naciaj lingvistikaj kongresoj. Ni rememoras pri la prezento antaŭ la monda kongreso de lingvistoj (Ĝenevo 1931). Tiam 27 lingvistoj esprimis sian simpatian al la IALA-laboroj, i.a.: M. Cohen (Parizo), A. Meillet, J. Wackernagel, van Ginneken, Schrijnen, N. van Wijk, J. Vendryes. Aliaj faris la samon dum la lingvista kongreso de 1933 en Romo: i.a. B. Collinder.

³¹⁶ Henry JACOB, "On the Choice of a Common Language", London, Pitman, 1946, p. 38.

³¹⁷ JACOB, samloke, p. 39.

13.3.3. La konstruo de Interlingua

Ni vidis, ke la direktoro de IALA, la angla lingvisto Collinson, ne tro multe puŝis al la direkto de la kreo de nova lingvo, kies celo estis akordigi inter si ĉiujn planlingvanojn. Ĝis 1935 la laboroj ne estis tre antaŭenaj.

La komenca decido de 1933 (la decido, laŭ kiu IALA mem entreprenos la ellaboron de lingvo) estis plenumita per la kreo de komisiono (kies prezidanto estis la berna lingvisto A. Debrunner), kiu pretigis laborplanon. Laŭ tiu plano, la naskota projekto devus konstruiĝi sur la bazo de la etnaj kaj de la planitaj lingvoj ĝis tiam konataj, kaj do havi internacian vortaron, kaj simplan kaj regulan strukturon.

Vi mem vidis, kiamaniere Interlingua fakte similas al tiu “lingvo simpla kaj regula”, kiun revis Debrunner.

Ne pli frue ol en 1937 aperis, fare de la sama komisiono, grava teksto: “Some Criteria for an International Language, and Commentary” (Kelkaj kriterioj pri internacia lingvo, kun komentario). Dek unu kriterioj koncernas la strukturon de la estonta planlingvo. Estas interese konstati ĉi tie, ke tiujn kriteriojn oni nenie kaj neniam pravigis. Jen ili.

1. La radik-elementoj estos aposterioraj (vera por Esperanto kaj por Interlingua).
2. La strukturaj trajtoj povas esti aprioraj (vera por Esperanto).
3. La strukturo de la lingvo devas esti altgrade analiza, kun minimumo el sintezaj fornoj, eble nur en la konjugacio (vera por Esperanto kaj por Interlingua).
4. La strukturo devas esti logika, regula kaj sendependa el-de la apartaĵoj de la naciaj lingvoj (vera nur por Esperanto).
5. Oni celu al belsoneco (vera kaj por Esperanto kaj por Interlingua).
6. Oni devas klopodi atingi la plej altan gradon de taŭgeco en presa, tajpa, stenografiaj uzoj (vera por Interlingua, nur parte vera por Esperanto).
7. Oni devas utiligi la latinan abocon sen supersignoj (vera por Interlingua, sed nur parte vera por Esperanto).
8. La ortografio devas esti simpla, klara kaj fonetika (vera por Esperanto, sed ne por Interlingua).
9. La vortaro devas baziĝi principe sur la okcidenteŭropaj lingvoj kun prefero por la radikoj, kiujn oni retrovas ne nur en la latinidaj lingvoj, sed ankaŭ en la ĝermanaj lingvoj. La prototipoj estas preferindaj je siaj modernaj derivaĵoj (vera /parte/ por Interlingua, kaj vera /parte/ por Esperanto).
10. La principo, laŭ kiu al vorto devas korespondi nur unu koncepto, kaj al koncepto devas korespondi nur unu vorto, estas sekvenda kiel eble pleje (vera por Esperanto, sed ne por Interlingua).
11. Verb-persono, numero kaj genro ne esprimiĝu en la verbaj formoj [...] (vera kaj por Esperanto kaj por Interlingua).

Ni do klare vidas: en 1937 IALA proponis kriteriojn, kiuj plejmulte similas al tiuj, kiujn defendas la aŭtonomisma skolo: fonologia ortografio, “logika” (= analogia) derivado, kiu do estu regula kaj aŭtonoma, ebleco de aprioraj trajtoj en la baza lingvostrukturo.

Evidente la tiamaj novlatinoidistoj ege protestis kontraŭ tiuj kriterioj. Interlingua, ni tion vidas, ĉiuokaze ne estis kreita aplikante tiujn kriteriojn.

13.3.4. IALA en Novjorko

En 1939 la lingvistika centro de IALA migris de Liverpool al Novjorko. Inter 1939 kaj 1942 oficis kiel direktoro (anstataŭanta la lingviston Collinson) la usona filologo kaj esperantista poeto Ezra Clark Stillman. Vic-direktoro ĝis 1948 estis Alexander Gode.

Laŭ Gode, la unua, kiu klopodis ellabori metodologion por ekstrakti la internacian vortaron en formo de prototipa vortaro, estis ĝuste Stillman³¹⁸), sed nur Gode plene ellaboris ĝin, kaj ĝin defendis kontraŭ proponoj de “lingva kompromiso”.

Gode eliris el apriora pozicio, serĉante platonan pralingvon (tiun esploron li tamen limigis al la kampo de la vortaro, kaj ne ampleksigis al la kampo de la morfosintakso). Pro tio kelkaj Interlingua-amikoj opinias, ke ilia lingvo inspiriĝas ĉe neniu antaŭa lingvoprojekto³¹⁹.

Tiu estas evidente erara vidpunkto.

En 1945 aperis “General Report” (Ĝenerala Raporto), kie oni povas trovi tri eksperimentajn lingvojn, konstruitajn laŭ la principo de la plej granda senpera konprenebleco. Unu lingvo estas perfekte novlatina (tre simila al la hodiaŭa Interlingua); alia estas pli “modernlingva”-aspekta; la tria estas parte aŭtonomisma. En 1946 IALA entreprenis enketon inter la interlingvistoj.

Sed nur en 1947 IALA dissendas 3.000 test-broŝurojn al homoj tute eksteraj je la interlingvistika movado. En tiu broŝuro oni prezentis 4 eksperimentajn lingvovariantojn (P, M, C, K), el kiuj nur du estis jam prezentitaj en la antaŭa “General Report” de 1945³²⁰. En 1948 aperis la rezultoj de tiu enketo.

Ĉiu broŝuro enhavis tekston en la kvar projektoj, kaj oni devis tuj (unuavide) decidi, kiu estas la plej altira. Poste sekvis pluraj ekspliko-paĝoj pri iliaj trajtoj, kaj je la fino de tiu teksto oni ree petis juĝon pri la kvar projektoj.

Oni sendis la 3.000 broŝurojn al Usono, Britio, Francio, Danio, Ĉeĥoslovakio kaj Ĉilio.

1. La varianto P (prototipisma sistemo analoga al Interlingua), tre neregula, ricevis la 26,6%-on da preferoj.
2. La varianto M (sistemo pli “modernlingva”, inter Interlingua kaj Occidental, sed ankaŭ iom neregula) ricevis la 37,5%-on de la preferoj.
3. La varianto C (“modernlingva” sistemo, tre simila al Occidental) ricevis la 20%-on de la preferoj.
4. La varianto K (lingvo preskaŭ-aŭtonomisma, sed malpli perfekta ol ekz-e Ido) ricevis nur la 15%-on de la preferoj.

Do la naturalismaj sistemoj en ekstrema pozicio (P kaj M) ricevis la 64%-on de la preferoj, dum ke la modernlingvaj planlingvoj (M kaj C) ricevis nur la 57%-on.

Probable pro tio Gode sentis sin rajtigita daŭrigi sian “prototipisman” esploron.

Koncerne la geografian originon de la preferoj, ni rimarkas la jenon:

³¹⁸ Citaĵo el GODE trovebla en: BERGER, “Historia...”, unua volumo, cit., sen dato, p. 14.

³¹⁹ BERGER, “Historia...”, unua volumo, cit., sen dato, p. 19.

³²⁰ MONNEROT-DUMAINE, “Précis...”, 1960, p. 134.

En la unua (“unuavida”) respondo:

Favoraj al M kaj C estis ĉefe francoj kaj usonanoj; favoraj al P estis ĉefe la britoj kaj la ĉeĥoslovakoj; favoraj al P kaj M estis ĉefe la danoj.

En la dua (“post-informa”) respondo:

Favoraj al P kaj M estis la britoj, la ĉeĥoslovakoj kaj la danoj; favoraj al C estis la francoj; favoraj al K la usonanoj.

Tiuj informoj estas interesaj, sed kiom da respondoj atingis returne IALAn?

Ni scias tion: al la 3.000 broŝurtestoj respondis la 11,9% de la adresuloj, t.e. IALAn atingis 350 respondoj. El tiuj 350 respondintoj, 18% estis teknikistoj aŭ inĝenieroj, dum ke nur 6% apartenis al la kamparana aŭ laborista medioj.

Kurioze: oni riprocas al Esperanto, ellaborita far-de unusola homo, ke ĝi estis fiksita per voĉdonaĉo, al kiu partoprenis nur 264 homoj. Kaj tion riproĉas ĝuste Interlingua-amikoj, kiuj ne konscias, ke Interlingua, sintezigita far-de unusola homo (Alexander Gode), estis ellaborita surbaze de principoj aprobitaj de nur 350 intervjuitoj.

13.3.5. La polemiko Gode-Martinet

Inter 1946 kaj 1948 oficis kiel IALA-direktoro d-ro A. Martinet, kiu pli malfrue iĝos mondfama lingvisto. Inter Martinet kaj Gode (kiu longtempe esperis iĝi mem IALA-direktoro) la konflikto eksplodis tre baldaŭ. Gode akuzis Martinet ĉerpi la “prototipajn” formojn [...] rekte el la *Occidental Radicarium*, kaj ne havi intereson al sia teorio pri prototipismo³²¹. Tio estas ebla: Martinet, malgraŭ tio, ke li amikas kelkajn parizajn occidentalistojn, ne kredas je la eblo de internacia lingvo³²²: tio tiel veras, ke li neniam parolas pri ĝi en siaj verkoj pri lingvistiko. Sed la kaŭzo de la konflikto estas plejparte psikologia³²³. Tiuj du homoj havis preskaŭ nenion komunan: Martinet estis pragmatika, brila, kaj ne povis kompreni Gode, lerninto de Stillman, platonema Goethe-isto, serĉanta pralingvon. Eblas tamen, ke ekzistis inter ambaŭ malkonsentoj prilingvaj. Ŝajnas, interalie, ke Martinet preferis la projektojn M kaj C de la testado-broŝuro, dum ke Gode preferis la projekton P. Sed temas pri nuancecaj malkonsentoj: la “Martinet-lingvo”, t.e. la projekto, en kiu Martinet mem skribis kelkajn specimenojn en 1947³²⁴ havas fakte verbo-konjugacion, kiu tre similas je tiu de la nuna Interlingua (i.a. kun alomorfeco de la radikoj), prototipismajn substantivo-finaĵojn, kaj nur kelkajn trajtojn similajn al Occidental (kiel la pasea participo *surpriset* /surprizita/, kiu en la nuna Interlingua estas *surprendite*).

Martinet forlasis sian direktoran postenon en 1948. Gode, iĝinte mem direktoro de IALA, havis tiam liberajn manojn. Sed la interlingvistika publiko nun ne plu tre kredis al IALA: ĝi jam delonge ĉesis ĝian scian aktivon, kaj eĉ ne sukcesis akuŝi lingvon. Laŭ kelkaj, temas pri “kronika laboro”, nomata “IALA-ito”.

13.3.6. La naskiĝo de Interlingua

Interlingua, kiel tia, ekformiĝis nur en 1948: en specimena pago de IED, kiu aperis kelkan tempon

³²¹ Cit. el: Ric BERGER, “Historia”, duavolumo, sen dato, p. 67-69.

³²² BERGER, samloke, p. 30-31.

³²³ BERGER, “Historia...” unua volumo, sen dato, p. 159.

³²⁴ cit. en: BERGER, “Historia...” dua volume, sen dato, p. 25.

antaŭ la oficiala apero de IED mem, oni rimarkas, ke la embrio ne jam tute similas al la naskota infano ³²⁵.

Vilborg pretigis kontrastigan analizon ³²⁶.

1. En la specimena paĝo mankas, ĉe la substantivoj, la prototipismaj “belsonigaj” finaĵoj: oni do legas, i.a.: *acompanimente* (anst. -o: akompano), *acetate* (anst. -o: acetato), *acrobat* (-a: akrobato), *acte* (anst. -o: ago, akto), *accentu* (anst. -o: akcento).
2. La pasea participo estas kiel en Occidental: *absorbet* (anst. *absorbite*, “absorbite” en Esperanto).
3. Multaj radikoj estas occidentalidaj: *abstracter* (abstraktigi, anst.: *abstraher*), *adopter* (adopti, anst.: *adoptar*).
4. Vortoj, kiuj aperos pli poste en IED, mankas. I.a.: *abstruse* (konfuze malklara), *abuccar* (renkontiĝi), *abusar* (trouzi), *accisia* (?), *acclamar* (aklami), *accollar* (atribui), *acerbe* (malmatura), *acetona* (acetono), *aciero* (ŝtalo), *aco* (nadlo), *admiscer* (almiksi), *adolescente* (adoleskanto).
5. En la specimenaj paĝoj troviĝas vortoj, kiuj ne aperos en IED: *accalorar*, *accensoria*, *acclarir*, *accustomar*, *acecar*, *aconite*, *acrifolio*, *addulciar*, *addurir*.
6. Sufiksoj aliigis: *Act-ora* iĝos *act-rice* (aktor-ino), *acut-itate* iĝos *acutessa* (akr-eco).

Ni do vidas, ke en mallonga tempo hezitis la vortaro (punktoj 4-a kaj 5-a), la afiksoj variis (punkto 6-a), la principoj ŝanĝiĝis (punktoj 1-a, 2-a kaj 3-a).

Oni havas la impresone ke oni publikigis IED en momento, kiam ĝi ne estis piene preta. Tio povus esti vera. Ĉar s-no Morris Vanderbildt mortis en 1950, kaj en sia testamento ŝi postlasis nenion al IALA. Estis do necese, ke la IALA-kunlaborantoj montru, ke ili tamen ion faris dum tiom multe da jaroj.

Kiu decidis pri la ago-programo dum 1948-1951, kaj en la lastaj monatoj, ĝuste antaŭ la apero de IED? Alexander Gode mem: “Dr-o Gode akceptis la plenan direkton de la verko. En sia fina formo tiu vortaro estas lia konceptaĵo sub lia respondeco” ³²⁷. La aŭtoro de IED, kaj do de Interlingua, estas sekve. Alexander Gode mem, eĉ se tio kontraŭas la mitologion de niaj Interlingua-amikoj.

13.4. La *International Standardising Organization* (Internacia Normiga Organizaĵo - ISO)

En lastatempe aperinta teksto, kies aŭtoro estas la reprezenta Interlingua-amiko prof. Ric Berger, oni trovas surprizajn asertojn. Oni tie prezentas “dokumentaron”, konsistantan el artikolo de esperantista specialisto (P. Neergaard) ³²⁸, laŭ kiu ISO flankenmetis Esperanton en 1967 ³²⁹ kaj akceptis Interlinguan ³³⁰. En tiu teksto oni miksas la agadon kaj la verkojn de la specialisto pri planlingvistiko el Vieno, prof. d-ro Eugen Wüster, kies prefero por Esperanto estas konata (eĉ li, laŭ prof. Berger, nun estus ano de Interlingua), kun ISO, kaj Interlinguan, kun la terminologiaj kodoj. Unue ni rimarku, ke la artikolo estas simpla recenzo far-de Neergaard pri la dua eldono de grava verko de Wüster, pri kiu oni parolos ankoraŭ, kaj ke tiu artikolo, se oni volas ĝin legi iom atente,

³²⁵ Ebbe VILBORG, "Interlingua, lingvo de hazardo", en: "Fokuso", 1968/3.

³²⁶ Ebbe VILBORG, "Novaĵoj pri Interlingua", en: "Fokuso", 1973/11.

³²⁷ GODE, "Interlingua-English...", 1951, p. xiv.

³²⁸ Paul NEERGAARD, "Internacia lingvonormigo". Artikolo aperinta en: "Heroldo de Esperanto", 1966, nun legebla en: BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 13.

³²⁹ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 3.

³³⁰ BERGER, samloke, p. 3

nenion diras tian. Sed ne temas pri tio. La salado el ISO, Wüster, Interlingua, Esperanto, terminologia kodo, estas tiel nesuperrigardebla, ke ni ne povas rezisti al la tento prezenti al la leganto, kio vere okazis.

13,4,1, La ĉefverko de Eugen Wüster

En, 1931 aperis impona verko de la granda esperantologo kaj terminologia planlingvisto aŭstria Eugen Wüster. La gravecon de tiu verko substrekas la fakto, ke ĝi naskis multegajn plipostajn studojn pri terminologia planlingvistiko en la tuta mondo, kaj ke oni ĝin reeldonis ankoraŭ en 1966 kaj en 1970.

Mi utiligis ĝuste la eldonon de 1970³³¹. En tiu libro la aŭtoro proponas normigon de la scienca terminologio (kun speciala konsidero pri elektrotekniko), kiu devas starigi al si mem la jenajn celojn:

1. Normigo de la terminoj en unu sama lingvo rilate enhavon kaj formon de la konceptoj, kaj:
2. Normigo de la terminoj je internacia nivelo rilate iliajn formojn (grafia kaj sona aspektoj) kaj ilian signifon.

Wüster prezentas longan kaj detalan priskribon de la provoj faritaj ĝis 1931. Li mem, por faciligi tiun normigan laboron, proponas la utiligon de Esperanto. En 1931, Wüster ne vidis la eblon utiligi latinidan lingvon kiel skemon por la ellaboro de internacia forma normigo de termino kaj de termin-derivaĵoj³³².

Mi skribis, ke tiu genia verko malfermis la vojon al *tuta* sciencobranĉo. Oni ĝin tradukis en la rusan (1935), kaj la soveta komitato por terminologia normigo proponis al la *International Standardising Association* (ISA: iama ISO) starigi specialigitan komitaton cele la ellaboron de internacia terminologio sur la bazo de formala kodo simila al Esperanto.

La saman proponon faris la japana komisiono³³³. En grava verko de H. Jacob (anglalingva) oni trovos amason da detaloj pri la soveta projekto³³⁴.

Sekve de tio, la Terminologia Komitato de ISA decidis, ke oni devas starigi unuformajn regulojn por la enregistriĝo de kod-vortoj [...]. Tiuj reguloj do jam reprezentas iaspecan “terminologian ŝlosilon” por la internacia faknomaro, kiu jam ekzistas (decido de la 18-a de junio 1938)³³⁵.

Same decidis ankaŭ *International Electrotechnic Committee* IEC (Internacia Elektroteknika Komitato): ĝi aperigis unue en 1935, poste en 1938 grandan plurlingvan difin-vortaron, kie Esperanto ludis la rolon de ŝlosilo (“International Electrotechnical Vocabulary”).

Wüster baldaŭ iĝis tre konata: ekde 1936 li estis la daŭra reprezentanto de la Aŭstria Normiga Komitato en la 37-a teknika komisiono “Terminologio” de ISA, kaj de la terminologia komisiono de la Internacia Elektroteknika Komisiono (IEC).

³³¹ WÜSTER, “Internationale Sprachnormung...”, 1970.

³³² w.f., “Le clave terminologic e le lingua terminologic de Dr. Eugen Wüster”, en: “Novas de Interlingua”, 1967/2.

³³³ Eugen WÜSTER, “Konturoj de lingvonormigo en la tekniko”, Aabyhöj, dua eldono, 1975.

³³⁴ Henry JACOB, “A planned auxiliary language”, London, Pitman, 1940, p. 125 kaj 131.

³³⁵ w.f., “Le clave terminologic e le lingua terminologic de Dr. Eugen Wüster”, en: “Novas de Interlingua”, 1967/2.

13.4.2. *International Standardising Organisation (ISO)*

Dum la milito, perforte silentigita, Wüster reellaboris siajn proponojn pri terminologia ŝlosilo, kaj li konsciiĝis, ke tia ŝlosilo sur latina bazo estas fakte ebla: evidente povas temi nur pri skribsistemo, al kiu oni povus aldoni variantojn regionajn. Tion li skribas en la dua eldono de sia libro (1966), kie li klarigas, ke la fakto, ke IEC en la postmilita eldono de sia vortaro ne plu utiligas Esperanton, dependas de tio, ke Esperanto, aŭtonoma lingvo, ne povas naski novlatinoidajn derivaĵojn en la vortofamilioj. Tiuj novlatinoidaj vortofamilioj, laŭ Wüster, estas, male, necesaj en terminologia ŝlosilo, kiu estas ellaborita ĉefe surbaze de novlatina lingvomaterialo - kaj por novlatinaj kaj okcidentaj lingvoj.

Tial Wüster ellaboris inter 1947 kaj 1951 terminologian ŝlosilon el 500 radikoj plej oftaj. Tiu studaĵo, en kajero 40-paĝa, estis adoptita fare de la aŭstria Komisiono por la terminologia normigo en 1951³³⁶.

En 1952, ISAn anstataŭis ISO: Wüster aldonas al la senŝanĝa represo de sia libro el la jaro 1966 novan ĉapitron: “35 jarojn pli malfrue” (en paĝoj 413-434). En ĝi, li resumas ĉion, kio okazis intertempe, kaj li klarigas, kie kaj kial li ŝanĝis siajn opiniojn. Li plendas pri la fakto, ke ISO ne multon faris ĝis nun en la direkto de la ellaboro de terminologia ŝlosilo. En la pago 425 li priskribas sian terminologian ŝlosilon, kies ideo, cetere, estis jam akceptita far-de ISO en 1952.

Temas pri ŝlosilo, kiu permesas starigi la ĉefajn regulojn por la internacia normigo de nocioj kaj de fakterminoj. La postulatoj akceptitaj far-de ISO estas la jenaj³³⁷:

1. La ŝlosilo konsistas el du partoj: unu parto enhavas la radikojn, kaj la alia la afiksojn.
2. Ambaŭ partoj organiziĝas unuanivele laŭ nocioj, kaj duanivele laŭ aboca ordo.
3. En la unua parto la ofteco de la vorto devas esti indikata, por ke oni povu evalui la sinonimojn ekzistantajn.
4. La vortoj estos skribitaj kiel hodiaŭ en la latina, aŭ laŭ la ortografiaj kutimoj de Francio kaj de la anglalingvaj landoj.
5. La sufiksoj kaj la finaĵoj de la vortoj estos skribitaj en normigita formo, kiu demonstru nenium regionan apartaĵon. Taŭga. estus la formo nomata “prototipa”.
6. La internacia nomaro internaciigita konsistas el radikoj de la terminologia ŝlosilo kaj el derivitaj kunmetaĵoj [...].

Post tiu pritrakto, Wüster proponas transformi la terminologian ŝlosilon al terminologia lingvo kun elparolo-reguloj (tion ĝisnun ISO neniam akceptis).

Wüster informas nin, ke tiu ŝlosilo (aŭ, laŭ onta projekto, tiu terminologia lingvo) similas iomete al Interlingua, sed ne temas pri ĝi. Interlingua. Laŭ Wüster, en la ŝlosilo mem oni povas trovi nur krudan materialon. Fakte la vortaro devus esti kunmetita kaj ordigita laŭ nocioj, kaj oni devus proponi evaluon de la sinonimoj laŭ ilia ofteco, por ilin distingi formale.

“Fakte, skribas Wüster, la rigida apliko de prototipismo liveras al ni tro grandan kvanton da homonimoj samsignifaj kaj da sinonimoj superflujaj. La kvanto el sinonimoj devas esti malgrandigita per laŭofteca selekto, t.e. funkcie de la konkordanco...”

³³⁶ w.f., "Le clave terminologie e le lingua terminologie de Dr. Eugen Wüster", en: "Novas de Interlingua", 1967/2.

³³⁷ Eugen WÜSTER, "Konturoj de lingvonormigo en la tekniko", Aabyhöj, dua eldono, 1975.

Laŭ Wüster, en 1931 la alternativo en la terminologia planado estis: ĉu la angla aŭ ĉu Esperanto? En 1966 la alternativo estas jam alia: ĉu utiligi la terminologian ŝlosilon kiel celon en si mem, aŭ ĉu transformi ĝin al internacia lingvo?

Cetere, tiu alternativo ne estas absoluta: terminologia lingvo (kies neellaborita formo estus - aŭ povus esti - Interlingua) estus certe tre utila ankaŭ por la planado de la scienca terminaro en internacia lingvo de la Esperanto-tipo, kiel ĝi estas en la kazo de la angla.

Wüster ne ŝanĝis sian opinion koncerne Esperanton (p. 432-4). Laŭ li, Esperanto estas ĉiam elstara aŭtonoma kaj facila lingvo. Ĝia malavantaĝo estas, ke oni devas lerni ĝin [...] eĉ se oni volas ĝin uzi por pasivaj celoj (lego). Do ĝia agado-kampo (efikeco-radio) estas reduktita, se ĝia disvastiĝo ne esence grandiĝos (ekz-e dank-al vasta enlerneja instruado). Tiam, tiu malavantaĝo malaperos. Esperanto hodiaŭ ne anstataŭas la scion de la angla, nek la scion de la terminologia lingvo, sed Wüster varme rekomendas ĝian utiligon en difinitaj kazoj.

Laŭ Wüster, Interlingua estas lingvo malfacila kaj komplika, sed ĝi havas la avantaĝon esti komprenebla unuavide. Pro tio ĝia efiko-radio estas multe pli granda, kvankam nur pasiv-cela.

Cetere, temas ja pri la privata opinio de Wüster, kiu ne koncernas la oficialan sintenon de ISO, kiu, siarilate, nenion decidis pri terminologia lingvo, kiel cetere ankaŭ estis legeble en grava kaj konata verko³³⁸.

³³⁸ Henry JACOB, "A planned auxiliary language", London, Pitman, 1940, p. 125 kaj 131.

14. Esperanto kaj pedagogio

14.1. Kiamaniere oni ne argumentu

Grupo el romandaj pedagogoj prezentis al la publika opinio projekton, kiu celas efektiviĝi, en la svisaj lernejoj, eksperimentojn pri la valoro de Esperanto kiel lerneja fako. Estas klare, ke oni povas kontraŭi ĉi tiujn proponojn per argumentoj koncernantaj pedagogion kaj sociologion. Pri la valoro de tiuj argumentoj oni ne povas juĝi bloke: oni devus ekzameni ilin unu post la alia. Nature la samon oni devus fari rilate la proponojn de la esperantistaj pedagogoj.

Evidente, diskuto pri faktoj povus esti nur bonfara por ĉiuj koncernatoj kaj interesatoj. Eĉ ĉi tiu eseo estis pensita kiel kontribuado al tiu diskuto.

Same evidente, el tiu diskuto oni ne povas ekskludi niajn Interlingua-amikojn. Kontraŭe. Estas nur io bedaŭrinda: iuj el ili, certe pro nescio, preferis eviti sobran diskuton, kaj tial adoptis negativan sintenon.

Laŭ tiuj (malmultaj) Interlingua-istoj, la esperantistaj pedagogoj estas stultaj: “Gonzague de Reynold, nia granda svisa aŭtoro [...] denunciis plurfoje la mistikismon de la esperantistoj kiu ĉe ni daŭre nebuligas la kapablojn de la adeptoj juĝi senpartie” Tiuj kompatindaj svisaj pedagogoj estas krome tiel sensciaj, ke ili volas “trudi la maskaĵon /= Esperanton/ anstataŭ /akcepti/ la aŭtentan grekan-latinan heredajon /= Interlingua/”. Laŭ la artikolfarinto, tio ne estas eĉ pensebla³³⁹.

Sed la kompatindaj svisaj pedagogoj estas ne nur mistikaj fanatikuloj kaj religiaj sektanoj, sed ili estas ankaŭ politike suspektindaj: “Esperanto, naskiĝinta en 1887, fiksiĝis duonvoje sen iu ajn espero pri plibonigo. Ŝajnas misgvide trudi ĝin al la hodiaŭa junularo, malpermesante montri al ĝi ion pli taŭgan. Kvazaŭ temas pri ideologio trudita per kerngrupo enŝteliĝinta en la direktantajn mediojn, kiel en totalitarisma landoj. Diskutinda restas la fakto, ĉu oni akceptos ĉi tiun procedon strangan en nia lando”. Entrudiĝema ŝtatrenverso, do, kiu metas antaŭ la publikan opinion la plenumitajn faktojn: “Post la devigita enkonduko de Esperanto en la romandajn lernejojn fare de anonima grupo el tiulingvaj komencantoj (france: *néophytes*) sen ke eblu ajna kontraŭparolo, restas nur unu vojo: diskutigi la aferon antaŭ la publika opinio kaj la lernejaj aŭtoritatoj”³⁴⁰.

Ni povas tre bone kompreni la negativecon de niaj amikoj, kiam ili rimarkas, ke neniu romanda pedagogo parolas favore al Interlingua. Sed laŭ nia opinio, tiun frazojn iras tro malproksimen.

Ni proponas Esperanton kiel studfakon en la romandajn lernejojn, ĉar ni konvinkiĝis, ke tio reprezentus progreson por la lernantoj, kaj tion ni povas pruvi.

Evidente, la esperantistaj pedagogoj ne kontraŭas eksperimentojn kun Interlingua: ĝi estas elstara, kiel ekzemplo de la funkciado de la novlatinaj lingvoj. Sed ĝi multe malpli bone funkcias kiel lingvo de internaciaj komunikoj.

Cetere, la enkonduko de Interlingua kostus tre multe, ĉar oni devus ellabori la tutan didaktikan materialon, kiu en Esperanto jam ekzistas - kaj kiu en Interlingua mankas komplete. Sed verŝajne la problemo ne kuŝas ĉi tie.

³³⁹ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 5.

³⁴⁰ BERGER, samloke, p. 3.

14.2. Esperanto en la lerneja instruado

“La valoro de iu studobjekto en la sistemo de studobjektoj estas malfacile difinebla kaj mezurebla. Tamen, se la instruado de iu studobjekto, skribas la lingvisto prof, d-ro I. Szerdahelyi, jam potencie estas senrezulta, tiu fakto psike influas en negativan direkton la tutan instru- kaj lerno-procezon, troŝarĝas superflue la pedagogojn kaj la lernantaron, forrabas superflue valoran tempon kaj energion de la aliaj studobjektoj. Kontraŭe - la instruado de studobjekto, kiu horon post horo alportas sukceson kaj praktikan efekton instigas ĝenerale la lernemon de la lernantoj, liberigas tempon kaj energion, kiun poste oni povas investi en la lernadon de aliaj objektoj”³⁴¹.

La baza valoro de Esperanto en la lernejo estas la facileco (do la *rapido*) per kiu oni lernas ĝin. Tion ni ŝuldas al la internacieco kaj travidebleco de la lingvo mem.

a) Studoj pri la lernofacileco de Esperanto:

Skribas prof. d-ro I. Szerdahelyi: “laŭ miaj mezuradoj la sukces-koeficiento atingita en hungaraj lernejoj en la instruado de diversaj lingvoj proporcie montras la suban skalon:

rusa lingvo	30 %
germana lingvo	40 %
angla lingvo	60 %
Esperanto	130 %

Tiuj indikoj perfekte pravas la unuajn konstatojn [...] de prof. d-ro Barczy (fama hungara lingvisto): laŭ li, inter la cirkonstancoj de lerneja lingvo-instruado Esperanto estas la sola fremda lingvo, kies instru-celo estas efektivebla” (Szerdahelyi).

Laŭ tute malsama metodologie la GFR-profesoro Helmar Frank (kiu instruas cibernetikan pedagogion ĉe la Universitato Paderborn), atingas similajn rezultojn, kiujn ni resumas en la suba tabelo³⁴²:

	Lingvo	Horoj
Oni povas lerni la jenajn lingvojn ĝis matureco-nivelo, t.e. bakalaŭro, averaĝe en la indikita horo-nombro	Germana lingvo	1293
	Angla lingvo	1135
	Franca lingvo	1256
	Nederlanda lingvo	1472
	Dana lingvo	1521
	Irlanda lingvo	1996
	Esperanto	167

b) Plue, Esperanto estas utila instrumento en la ne-prilingva lerneja programo.

La nuna disvastiĝo de Esperanto permesas ampleksan aplikon eksterlingvistikan de tiu lingvo je internacia nivelo: ĉiuj partoprenantaj lernantoj troviĝas egalŝance kaj samnivele en sia interlerneja korespondado, vojaĝoj, internaciaj grupoj, internaciaj revuoj por lernantoj, libroj, radio-aŭskultado,

³⁴¹ Istvan SZERDAHELYI, "La didaktika loko de la internacia lingvo en la sistemo de lernejoj studobjektoj", en: "Internacia pedagogia Revuo", januaro 1970.

³⁴² Artikolo aparinta en "Esperanto in Schule und Universität", Paderborn, junio 1974.

ktp.³⁴³ Evidente, tiurilate Interlingua estas neniel interesa, ĉar ĝia disvastiĝo estas minimuma.

c) Sed estas pruvite, ke Esperanto ekzercas profundan influon sur la lerno de la familia (kaj kultura) lingvo, kaj sur la lerno de fremdaj lingvoj. Du eksperimentoj pri la pozitiva efiko de Esperanto tiurilate estas al mi konataj: unu okazis en Britio³⁴⁴, la alia en Finnlando³⁴⁵.

d) Cetere la instruado de Esperanto ekzercas pozitivan influon ankaŭ sur aliaj fakoj ne speciale prilingvaj. Esperanto taŭgas elstare kiel peranto inter diverslingvaj instruistoj pri fakaj kaj personaj problemoj: Esperanto do estas *vere fakta* internacia komunikilo³⁴⁶.

14.3. Eksperimento komisiita [...] far-de IALA

Cetere oni faras eksperimentojn kun Esperanto jam de longa tempo. Unu eksperimento meritas apartan konsideron, ĉar ĝin organizis la ĝeneva Instituto J.J. Rousseau (sub la direkto de prof. d-ro Pierre Bovet), ĉirkaŭ la tridekaj jaroj, sub komisiono de IALA mem (tiam ĝuste en plena "scienca aktivo")³⁴⁷.

"La celo de la enketo, skribis Bovet, estas esplori, ĉu helplingvo estas sufiĉe taŭga por esti rekomendata kiel sola helplingvo por la tuta homaro" (p. 29).

Bedaŭrinde Bovet ne povis ampleksigi sian enketon ankaŭ al la prilaboro de la rezultoj de la instruado pri aliaj planlingvoj, "ĉar laŭ nia nuna scio, Esperanto estas la sola planlingvo instruata en lernejoj al lernantoj 8- ĝis 18-jaraĝaj, kaj pere de kiu vasta korespondado inter lernejoj-infanoj estas ebla" (p. 3).

Bovet intencis ekzameni la jenajn punktojn:

1. Kiu planlingvo estas utiligata en la lernejoj?
2. Ellabori la fundamentojn de testoj (ekz-e ofteco-listojn de vortoj, ktp.).
3. Pretigi la testojn.
4. Kontroli la testojn.
5. Kompari: aĝon, landon, familian lingvon, scion pri alia lingvo, instru-gradon, nombron da lernantoj po klasejo, instruiston, instru-metodon.
6. Fine, konkludi (p. 1-2).

La teknikaj konkludoj de tiu eksperimento ne estas mirigaj por tiuj, kiuj konas Esperanton: laŭ prof. Bovet "post unu kurso (3 monatoj, aŭ 15 - 25 lecionoj je 1 horo po leciono), [...] la lernantoj konas, en Esperanto, la vortojn plej ofte uzatajn en ĉiuj eŭropaj lingvoj kaj kapablas ilin uzi en korespondado. Esperanto estas pli-malpli facila (ekz-e estas pli facila por anglo ol por norvego), sed ofte sur bazo de nelingvaj faktoroj. Esperanto [...] montris facilecon ankaŭ ĉe ne-hindeŭropanoj (hungaroj kaj finnoj)" (p. 29).

³⁴³ Unu el la plej signifaj organizaĵoj por interlemeja korespondado per Esperanto estis fondita far-de la svisa instruisto Marcel ERBETTA: temas pri "Grajnoj en Vento".

³⁴⁴ J. H. HALLORAN, "A four year experiment in Esperanto as an introduction to French", en: "British Journal of Educational Psychology", 1952/22.

³⁴⁵ O. SAMPOLA, lerneja raporto aperinta en: "Esperanta Finnlando", 1963/7.

³⁴⁶ Pli detale en: Raif MARKARIAN, "La eduka valoro de la instruado de Esperanto en la lernejoj", Londono, CED, 1964, p. 10-18.

³⁴⁷ Pierre BOVET, "Enketo pri internacia helplingvo", Stockholm, Sveda Esperanto-Federacio, 1948.

Tiu enketo limiĝis je la teknika aspekto, sed Bovet tiris konkludojn ankaŭ je la psikologia nivelo: “inter la rezultoj de la instruado de lingvo internacia troviĝas, li skribas, la kreado de internacia spirito de bonvolo, la aspiro al ĉio, kio kunligas la popolojn kaj ilin igas malami la militon” (p. 24).

14.4. Esperanto en la lernejoj

Esperanto estas jam nun instruata en multaj ŝtataj kaj ŝtate agnoskitaj lernejoj. Tiu instruado ŝajne iĝas ĉiam pli vasta dank-al la rezultoj atingitaj. Jen tabelo:

Lerneja jaro	N-ro da lernejoj	Landoj	N-ro da lernantoj
1959/60	356	27	13'137 ³⁴⁸
1968/69	543	31	16'505 ³⁴⁹

Esperanto, plue, enkondukiĝas iom post iom ankaŭ en la universitatojn kaj en la altlernejojn: en 1969/70 ekzistis unu katedro de Esperanto kaj 29 lektoratoj en 16 landoj³⁵⁰. Laŭ prof. d-ro Wood, temas pri evalu-nombroj tro malaltaj³⁵¹.

Tre interesa eksperimento, kium gvidas en internaciskala nivelo ILEI sub la scienca konsulenco de prof. d-ro Istvan Szerdahelyi, instruisto pri Esperantaj lingvo, literaturo kaj pedagogie ĉe la Teknika Universitato Eötvös Lorand en Budapeŝto, nomiĝas “Pedagogia Didaktika Eksperimento”.

Ekde 3 jaroj oni eksperimente instruas Esperanton en 4 slovenaj, 4 kroataj, kaj serbaj, 5 italaj, 10 hungaraj, 2 bulgaraj kaj 5 aŭstria lernejoj. Oni volas testi la facilecon de Esperanto, la intereson de la lernanto por ĝi, la fakton, ĉu vere ekzistas pozitiva influo de Esperanto je la lerno de aliaj lingvoj, kaj la psikologian rezulton en la lernanta psiko.

Malgraŭ la fakto, ke la finiĝo de tiu eksperimento estas ankoraŭ fora, oni rimarkas, ke 77%-oj de la lernantoj lernis Esperanton kun interesiĝo, kaj ke 74%-oj volas daŭrigi ties lernon; 94%-oj deklaris, ke Esperanto estas interesa lingvo, 60%-oj diras, ke ĝi estas facila, kaj 71,5%-oj asertas, ke la studo de Esperanto faciligis al ili la lernon de alia fremdlingvo. Tiuj nature estas nur iuj subjektivaj rezultoj de la komenciĝinta eksperimento: forpasos ankoraŭ iom da tempo antaŭ ol havi definitivajn, objektivajn respondojn³⁵².

14.5. La vidpunkto de la psikologo

Geneva psikologo, Claude Piron, instruisto ĉe la lernejo pri studoj pri psikologio kaj edukscienco (EPSE) starigas al si demandon: “Kial diable instrui Esperanton al la lernantoj, antaŭ ol komplete reformi la lernejon?”. Kaj li klopodas tamen trovi respondon: “La fakto estas, ke Esperanto 'rompas' la rigidajn kadrojn de la hodiaŭa okcidenta mentaleco. Okcidento eĉ ne supozas tion, sed ĝia penso enfermiĝis en vera korseto”.

“Ĝi havas plu neniun kapablon krei nociojn kreante vortojn, nek esprimi sian penson aŭ siajn

³⁴⁸ MARKARIAN, “La eduka valoro...”, 1964, p. 1.

³⁴⁹ LAPENNA, LINS, CARLEVARO, cit., 1974, p. 102.

³⁵⁰ samloke, p. 103.

³⁵¹ Richard E. WOOD, "Proceedings of the symposium on the teaching of Esperanto at United States universities and colleges", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/12.

³⁵² Peter ZLATNAR, "La internacia lingvo por internaciista eduko", en: "Esperanto", 1975/7-8.

sentojn en maniero, kiu plej oportune taŭgas al ĝia spontaneco plej profunda, sen malhelpi la komunikon”.

“En Esperanto, kontraste kun la franca, la korekteco ne estas problemo de aŭtoritato, sed de sociigo. En la franca, se mi diras: “je vois le” (= mi vidas lin), aŭ “je vois lui” (=mi vidas lin), mi pekas (kia terura vorto, kiu bone korespondas al tuta lingva kutimo sur aŭtoritateca bazo), ne kontraŭ la socia komunikado, ĉar ĉiu povas min tre bone kompreni, sed kontraŭ la tradicio, la gramatiko, aŭ io simila. Psikanalize: kontraŭ la patro, aŭ la patrino, imagataj kiel ĉiopovaj. La maniero, laŭ kiu la instruisto aŭ la gepatroj (aŭ la lernejkamaradoj) traktos min, ŝajnos al mi, kvazaŭ mi perfortintus ion sanktan, aŭ ke mi krimintus en alia same nepardonebla maniero: ne konformigi al la kultura normo”.

“En Esperanto, la infano malkovras, ke li povas diri “Mi vidas lin”, “Mi lin vidas”, “Lin mi vidas”, “Lin vidas mi”, “Vidas mi lin”, ktp.; la du unuaj formoj estas absolute samsignifaj, la aliaj prezentas kelkajn afektivajn nuancojn [...] La infano sentas sin do piene libera. Se li diras: “Li vidas mi”, li ne faras pekon kontraŭ sankta normo, sed simple, la aliaj ne scios, kion li intencis diri: la sola korekteco-kriterio estas sociiga kriterio [...] En Esperanto la akso estas horizontala (la socia egaleco), en la franca ĝi estas vertikala (la aŭtoritato)”³⁵³.

“Strange: la situacio de Interlingua estas precize la sama kiel tiu de la franca lingvo. Kvankam *capitalario* aŭ *pauperificar* estas eblaj pro intern-lingvaj kaŭzoj (ĉar ilin permesas la derivoreguloj), ili tamen estas eraraj, ĉar la aŭtoritato de la novlatinaj lingvoj ilin malpermesas. Oni povas demandi sin, ĉu tiu preskaŭ-fetiĉisma tabuado, kiun ni retrovas ce la novlatinoidistoj, havas psikoanalizan signifon”.

Jen do kial Claude Piron proponas Esperanton: “Laŭ mi, tiuj, kiuj lernas Esperanton kiel infanoj, en la aĝo, kiam la skemoj kaj la mentaleco estas ankoraŭ elastaj, avantaĝiĝas je la psikologia kaj sociologia vidpunkto, en tiu grado, kiun la averaĝa civitano ne povas imagi”. Tio eblas, ĉar “Esperanto situigas la arbitrecon je ĝia vera loko, kaj komplete aliigas la artikulacion inter la signifanto kaj la signifato. Temas pri profunda sperto, kiu meritis pro si mem esti proponata al la infanoj, sendepende de la eksterordinara malfermo kiun ĝi reprezentas rilate la ne-eŭropajn kulturojn”³⁵⁴.

14.6. Konkludoj

Ni piene konsentas kun Ric Berger, ke “Interlingua, samgrade kiel Esperanto, estas prezentinda al la instruistoj kiel valora solvo, ĉar ĝin ellaboris specialistoj kaj profesiaj lingvistoj”³⁵⁵, krom nature pri la origino-pretendoj de Interlingua, pri kiuj ni parolis en ĵuslegita ĉapitro. Interlingua, kiel provo de artefarita novlatina lingvo, estas fakte tre interesa. Sed ni havas dubojn pri ĝia efikeco kiel internacia lingvo.

En Svedio, kie oni anstataŭis la studon de la klasikaj lingvoj (latina, helena) per la studo de la internacia vortaro, Interlingua ne aperas en la lernoprogramoj [...], kiuj limiĝas al prezento de Esperanto, kaj de internacia vortaro. tre malsama disde tiu de Interlingua³⁵⁶. Tio, malgraŭ asertoj kontraŭaj de kelkaj Interlingua-amikoj³⁵⁷.

³⁵³ PIRON, "(Lettre ouverte)", 1975, p. 6.

³⁵⁴ PIRON, samloke, p. 7.

³⁵⁵ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 3.

³⁵⁶ Ebbe VILBORG, "Latinaj vortoj en Esperanto kaj Interlingua", en: "Fokuso", 1968/3.

³⁵⁷ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 5.

Post ĉi tiu malgranda ĉapitro pri planlingvo kaj pedagogio, kaj post la iom pli longaj kaj ampleksaj ĉapitroj pri Interlingua, niaj legantoj povas decidi kun pli granda kompetenteco, al gravaj demandoj pri la efikeco, la uzo kaj la strukturo de Esperanto, kompare kun Interlingua. "Ekzistas minimume unu argumento, menciita favore al [Esperanto en pedagogia medio], kiu ne povus esti aplikata ankaŭ al novlatinoida lingvo, kiel Interlingua"³⁵⁸.

La demando, tiel prezentata, ne estas facile respondebla. Ĉar la vera respondo devas prikonsideri la faktorojn diskutotaj ne tiom jes-nee, sed kiom ili respondas al kiu celo. La demando, do postulas unuamomente la starigon de objektivo. Kaj, duamomente, kiomgrade la faktoroj unuopaj rimedoj proponitaj korespondas al la demandoj starigitaj³⁵⁹.

³⁵⁸ BERGER, "Les écoles...", 1975, p.5

³⁵⁹ La hodiaŭa disvastiĝo internacia de la angla lingvo ŝajne pravas, ke la vera respondo kuŝas en faktoroj sociologiaj kaj ne en faktoroj lingvistikaj aŭ psikologiaj.

15. La disvastiĝo de Esperanto

Esperanto estas proksimume 1000-foje pli disvastiĝinta ol Interlingua. Tio signifas, ke Esperanto havas milfoje pli da adeptoj. Sed Esperanto permesas multe pli ol 1000-foje pli da internaciaj kontaktoj: ni scias, ja, ke se grupo havas nur tri membrojn, la tie funkciantaj komuniko-vojoj estos nur tri (kun 2 direktoj po vojo), sed se la anoj estas kvar, la vojoj estos 6 (kun 2 direktoj po vojo, do entute 12 vojoj). Se la anoj estos ses, la vojoj estos 11 (kaj la direktoj eblaj estos do entute 22), ktp. La socia (komunika) efiko de Esperanto estas do certe multe pli ol milfoje pli trafa ol tiu de Interlingua (en aktiva uzo).

15.1. La organizita Esperanto-movado

Esperanton disvastigas landaj organizajoj en la jenaj lokoj ³⁶⁰.

Landaj societoj aliĝintaj al UEA: Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danio, Finnlando, Francio, Germana Federacia Respubliko, Grekio, Hispanio, Hungario, Irlando, Israelo, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Koreo (suda), Madagaskaro, Monako, Nederlando, Norvegio, Novzelando, Pollando, Sudafriko, Svedio, Svisio, Urugvajo, Usono, Zairo.

Landaj societoj nealiĝintaj al UEA: Ĉinio, Germana Demokratia Respubliko, Gvatemalo, Hindio, Islando, Kolombio, Koreo (norda), Libano, Luksemburgo, Malto, Meksiko, Mongolio, Portugalio, Rumanio, Senegalio, Sovetunio, Tanzanio, Venezuelo, Nordvjietnamo, Kubo, Peruo.

Landaj asocioj por la disvastigo de Interlingua ekzistas en Svedio, Usono, Francio, Britio kaj Danio.

La Esperanto movado organizigas ankaŭ laŭ specialigitaj asocioj, kiel tiu de gejunuloj (p. 534 - 547), mankanta por Interlingua, tiu de laboristoj (p. 635 - 663), nur embria ĉe Interlingua, kaj kiel multaj aliaj (p. 508-533): fervojistoj, juristoj, sciencistoj, arkitektoj, aŭtomobilistoj, bibliistoj, kaj orientalistoj, blinduloj, filologoj, filatelistoj, foto-kino-magnetofon-amikoj, geografoj, instruistoj, invaliduloj, jurnalistoj, kuracistoj, MENSA-anoj, ROTARY-anoj, muzikistoj, pupteatristoj, skoltoj, ornitologoj, studentoj, ŝakludemuloj, turistoj, veteranoj, katolikoj, protestantoj, kvakeroj, JEAN-movadanoj, poŝtistoj, pacistoj, federalistoj, kontraŭmilitistoj, budhistoj, Oomotanoj, Martinus-anoj, Unitaristoj, ktp.

Nenio analoga ekzistas por Interlingua.

15.2. La "oficiala" uzo de Esperanto

El Usono venas la informo, ke la Agrokultura Ministerio eldonos baldaŭ libron pri fitopatologio, dediĉitan al la neevoluintaj landoj, kun priskribo en Interlingua pri 300 malsanoj (do ne kun 500 ĉapitroj, kiel oni jam skribis ³⁶¹). Mi estas iom skeptika: mi ne komprenas, kiamaniere teknikisto el Niĝerio, kies familia lingvo estas la joruba, kun baza scio pri la angla, povas legi kaj kompreni korekte Interlinguan. Probable li ne komprenos multe pli ol se la verko estintus en Esperanto. Kaj tio

³⁶⁰ Miajn informojn mi ĉerpis el la verko de LAPENNA, LINS, CARLEVARO, 1974, en paĝoj 448-507.

³⁶¹ BERGER, "Les écoles...", 1975, p. 3.

pro la evidenta (La-Palice-a) vero, ke, por kompreni lingvon, oni ja devas esti lerninta ĝin. Sed, se tiu estas la volo de la citita Ministerio, *fiat experimentum* (= oni faru la sperton).

Sed nature tio ne signifas, ke Usono oficialigis Interlinguan. Fakte, la uzo de lingvo fare-de ŝtato aŭ fare de oficialaj ŝtat-organoj ne signifas, ke tiu lingvo “oficialiĝis”: tio signifas nur, ke la koncerna institucio agnoskas la gravon de teksto en tiu lingvo rilate la celojn de tiu institucio mem. Se estus aliel, Esperanto jam de longe estus la oficiala lingvo por internaciaj rilatoj en multaj ŝtatoj.

Ekzemple, ekzistas poŝtmarkoj kun teksto kaj-aŭ temo en-pri Esperanto el Aŭstrio, Bavario, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario (ses), Jugoslavio, Pollando, Usono ³⁶², tio estas, sume, 53 *malsamaj* poŝtmarkoj aperintaj inter 1911 kaj 1969. Kaj ni ne parolos pri nekalkuleblaj unuataĝaj kovertoj kaj ŝtampaĵoj.

La Fervojaj entreprenoj de pluraj ŝtatoj (i.a. Hungario, Norvegio, k.a.) eldonas siajn horarojn ankaŭ kun teksto en Esperanto.

Multaj filmoj estis sinkronigitaj en Esperanto far-de oficialaj turismaj instancoj: tiaj filmoj venas de Aŭstralio, Novzelando, Norvegio, Germana Demokratia Respubliko, Sovetunio, ktp. Plue, nenombrelaj estas ankaŭ la miloj kaj miloj da turismaj prospektoj pri urboj, regionoj kaj ŝtatoj, aperintaj en Esperanto.

Revuoj aperas en Esperanto preskaŭ ĉie: eĉ en la socialismaj landoj, kie, evidente, tio signifas, ke ili ĝuas la apogon de la ŝtato: Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Germana Demokratia Respubliko, Bulgario, Ĉinio, Nordvjetnamio.

Multnombraj mallongondaj radio-dissendstacioj prezentas programojn en Esperanto:

Jaro	N-ro stacioj	N-ro landoj	N-ro programoj	Totalo horoj
1972	17	14	2'354	875
1973	22	12	3'259	1110

(Stacioj dissendintaj dum 1972: Varsovio, Romo, Berno, Vieno, Sofio, Muritiba-Brazilo, Sorocaba-Brazilo, Bratislava, Pekino, Clermont-Ferrand, Sabadell-Hispanio, Valencia-Hispanio, Zagreb, Tannarive, Gdansk-Polio, Tallinn-Sovetunio, Columbus-Usono).

Tio signifas, ke, ĉe la oficialaj instancoj, la uzo de Esperanto estas ŝatata pro la kapilara disvastiĝinteco de la lingvo. Nenio tiurilata ekzistas koncerne Interlinguan.

15.3. Esperanto kiel scienca lingvo

Oni aŭdas ofte la opinion, ke Interlingua estas lingvo uzata ĉefe en la sciencaj medioj, dum ke Esperanto estas lingvo uzata ĉefe en la praktiko. Tio estas erara.

Oni diras, ke Interlingua estas uzata en dudeko da internaciaj sciencaj periodaĵoj kiel lingvo en kiu aperas la artikolo-resumoj. Komplete mankas tamen ĉi-koncerna bibliografio. Deko da medicinaj kongresoj laŭsajne utiligis ĝin kiel resum-lingvon kaj kiel traduk-lingvon.

Pri Esperanto niaj scioj estas pli precizaj. Dum la lastaj 21 jaroj 86 internaciaj sciencaj periodaĵoj

³⁶² Kompleta katalogo troviĝas en la dua parto de la UEA-jarlibro de 1974 kaj de 1975.

havis resumojn en Esperanto: 49 venis de Japanio, 12 de Nederlando, 5 de Jugoslavio, ktp. Temis pri 12 revuoj pri botaniko kaj zoologio, 11 kuracistaj revuoj, 6 pri geofiziko, geologio kaj sismologio, ktp.

En Interlingua ekzistas preskaŭ neniuj provoj pri scienca terminologio. En Esperanto ekzistas fakvortaroj por la jenaj sciencoj:

Ĝenerala scienco, aernavigo, aktuaristiko, alpinismo, arkitekturo, armeo, astronomio, aŭtomobilismo, botaniko, brulŝirmado, elektrotekniko, ekonomiko, etimologio, fervojaj aferoj, filatelismo, filozofio, fiziko, fotografio kaj optiko, gastronomio, geografio, geologio, grundoscienco, infanludoj, juro, kemio kaj farmacio, komerco, komunikoj, kongresoj, kudro- kaj triko-aktivo, iluminadoscienco, maraj aferoj, matematiko, medicino, metalologio, meteologio, mikroskopio, muziko, pacifismo, pedagogio, psikologio, radio, religio kaj teologio, Rotary-aferoj, Ruĝa Kruco, skoltismo kaj tendumado, sporto, statistiko, ŝu-industrio, taŭro-ludado, turismo, zoologio.

15.4. La libroj en Esperanto

Esperanto aperis en 1887. En 1888, unu jaron pli malfrue, ekzistis jam 29 libroj. En 1895, ok jarojn pli malfrue, jam ekzistis 75 verkoj: 47 lerno-libroj kaj vortaroj, 8 informbrosuroj kaj 12 literaturaj verkoj (tradukaĵoj el Shakespeare, Sienkiewicz, Lermontov, Romanov, Puŝkin, Ezopo, ktp.). En 1912, kiam Esperanto aĝis 35 jarojn, ekzistis 1989 titoloj.

Hodiaŭ la aperado de libroj daŭras en vivema sinsekvo: inter 1961 kaj 1969 aperis 416 verkoj (el kiuj 75 en 1969): 109 estis originale verkitaj en Esperanto, kun entute 38.518 paĝoj.

Interesa estas la jena informo pri Shakespeare-ologio en Esperanto. Pri kaj de tiu verkisto aperis entute 217 titoloj, far-de 65 aŭtoroj, 35 verkoj aperis enrevue, la cetero en libroj. La komedioj kaj tragedioj ĝisnun tradukitaj estas 17: la unua, *Hamleto*, aperis la unuan fojon en 1891 (8-a eldono en 1964); la lasta, *La tempesto*, aperis en 1971.

15.5. Libroj en Interlingua

Interlingua, naskita en 1951, aĝas 24 jarojn en 1975. Laŭ *Bibliographia de Interlingua* (1975) oni povas aĉeti la jenajn verkojn:

- 30 lernolibroj kaj vortaroj,
- 3 amuzaj libroj,
- 6 informo-libretoj,
- 4 malgrandaj sciencaj verkoj,
- 7 literaturaj verkoj: noveloj de Andersen, tradukaĵo (tuta poemo) el Harry Martinson, la tuta Hamleto, unu libreto kun originalaj poemoj de Jonas Negalha, alia libreto samspeca de Carolo Salicto, du mallongaj kaj senpretendaj poemetoj de Waterman.

Certe, ne temas pri la tuta bibliografio de Interlingua. Tamen pli precizaj indikoj mankas. Oni povas supozi, ke inter 1951 kaj 1975 en Interlingua aŭ pri Interlingua aperis kvindekaj kaj da libroj kaj broŝuroj, do malpli ol dum la unuaj ok jaroj de Esperanto.

La samo koncernas la periodaĵojn: cento aperas pli-malpli regule en Esperanto, dum ke en Interlingua ekzistas nur sep (venantaj respektive el Usono, Svisio, du el Danio, Britio, alia /scienc/ el Usono).

15.6. La internacia lingvo

Ne estas vere, ke “Esperanto per sia ekzisto malavantaĝigas la ekziston de la ideo mem - kiu tamen estas tiel bela - de lingvo helpa por ĉiuj popoloj”. Nek Interlingua malavantaĝigas ion ajn. La demando estas, kion ni celas, kaj kio estas grava kaj utila, por atingi la celon. Bedaŭrinde, jam delonge, interlingvistikaj esploroj maloftiĝis, favore al asertoj ofte senbazaj. Tio rilatas, certe, Esperanton, sed ankaŭ Interlinguan.

Bedaŭrinde, ankaŭ la nivelo de la esploroj pri Interlingua ne statas pli bone. Ĝenerale, tiu parto de la lingvistika kaj sociologia scienco ne plu produktas la iaman tre valoran materialon.

Ni povas tamen aserti, ke Esperanto reprezentas florantan ekzemplon de artefarita lingvo, kiu enradikiĝis: ĝi povis konvinke demonstri, ke tia lingvo povas vivi.

16. Postparolo

Ankaŭ Charles Bally, kiu sekvis Ferdinand de Saussure sur la katedro pri ĝenerala lingvistiko en la Universitato de Ĝenevo, havis propran opinion pri planlingvo. Jen letero de tiu lingvisto, kiu aperis en la lingvoprojekto *Latino sine Flexione*: mi esperantigas ĝin el la periodalo “Schola et vita”, 1931, p. 211. La franca originalo tute certe perdiĝis.

Estas necese distingi la kondiĉojn, kiuj faciligas la komprenon de fremda idiomo el tiuj, kiuj ebligas la komfortan utiligon de lingvo por la persona penso. Ŝajnas, ke la interlingvistoj ĉiam pli konsideras nur la unuan kondiĉon: tial la unuavida komprenebleco sen antaŭa preparo estas konsiderata regulo piene sufiĉa.

Tiu tendenco ligiĝis al alia, kiu ankaŭ manifestiĝas iom post iom: oni volas imiti kiel eble pleje la naturajn lingvojn. Sed, lingvo natura estas - pro sia natureco mem - neregula, kaj el tio rezultiĝas pli granda komplikeco en la konstruo de la artefarita lingvo kaj ĉefe pli granda malfacilo por tiuj, kiuj havas familian lingvon, kiu diverĝas de la lingvo prenita kiel bazo.

Ĉiuj nuntempaj sistemoj fondiĝas sur la “eŭropa” tipo, sed neniu demonstris, ke tiu tipo estas ideala por ne-eŭropanoj.

Kompromiso inter la du cititaj kondiĉoj estas absolute necesa: ne nur la simpleco de la gramatiko devas esti absoluta, sed estas necese eviti ĉian troan ŝarĝon de la memorkapablo pro la konstru-metodo de la derivitaj vortoj; estas neracie, ke oni devu arbitre selekti inter pluraj sufiksoj por konstrui vortojn de la sama kategorio, ekz-e por ad- aŭ ec- substantivoj.

Resume, oni limigu la fortostreĉiĝon de la memoro al la radikoj, kaj oni malgrandigu al la strikta minimumo la fortostreĉiĝon dediĉendan al la kunmeto (gramatika kaj leksika).

Estas klare, ke la reguleco de la skribsistemo devus esti absoluta. La deziro doni al vortoj “naturan” aspekton kondukas al la kreo de granda nombro da ne-memeksplikaj malregulaĵoj. Ni ne enkonduku la ortografian fantomon en lingvojn, kiuj havas la bonŝancon ne obei tradicion.

17. Terminareto

Afektiva (psikologia termino)

Adjektivo koncernanta la tuton de la sentimentoj kaj emocioj konsciaj kaj nekonsciaj, rilatantaj jes aŭ ne objekton.

Aferenta (neŭrofiziologia termino)

Adjektivo koncernanta nervajn vojojn kondukantajn de la periferiaj sent-organoj al la centraj (cerbaj) informo-prilaborocentroj, Antonimo: *eferenta*. Populara termino: *alkonduka*.

Akuzativo

Frazo-parto de verbala sintagmo. Temas pri la rekta komplemento, regata de transitiva verbo.

Alomorfo

Morfemo povas aktualigi en la parolo diversforme. Ĉiu unuopa formo (kies ensemblo nomiĝas *arkimorfemo*) nomigas *alomorfo*. Ekzistas alomorfoj kuntekst-ligitaj (t.e. en komplementa distribuo) kaj alomorfoj "liberaj". En Interlingua, la koncepto "far" (iusence, ĝi estas arkimorfemo), havas plurajn alomorfojn: fac (facer), fic (efficiente), fact (facto), fect (infecte).

Amalgamo

Ankaŭ nomata *mantelporta morfemo*. Temas pri morfemo havanta samtempe du aŭ pliajn funkciojn (aŭ: valorojn). En Interlingua, vi trovas i.a. "porta", kiu signifas kaj "pordon", kaj la as-tenson de la verbo "porti".

Amendi

Senerarigi (ekz-e tekston).

Antonimo

Malvorto, vorto esprimanta la kontraŭon rilate alian. Bona / malbona; eble ankaŭ norda / suda. Temas pri termino utila ne nur en lingvo (aŭ logiko), sed ankaŭ en kulturo.

Artikulacio (fonetika termino)

Esprimo de la parolĉeno per hierarkie organizitaj movoj de lango, uvulo, buso, gloto, pulmoj, ktp. (gramatika termino): hierarkie organizita reciproka rilato inter maisamaj enunĉajo-segmentoj.

Duobla artikulacio (termino laŭ MARTINET)

La homa lingvo "funkcias" sur du malsamaj niveloj. La unua nivelo estas la nivelo de la morfemoj, t.e. de la gramatik-elementoj. La dua nivelo estas la nivelo (segmentigebla) de la fonemoj ("son"-unuoj). Ambaŭ niveloj formas "sistemon".

Averaĝa

Mezvalora, kalkulata el pluraj similaj valoroj, por konstrui mezan valoron, laŭ kiu orientiĝi.

Dativo

"Al"-komplemento post transitiva verbo kun akuzativo, indikanta, al kiu la ago direktiĝas.

Diakronia

Adjektivo koncernanta la lingvohistorion.

Eferenta (termino neŭrofiziologia)
antonimo de *aferenta*. Populare: *elkonduka*.

Enhavo

La valoro de signo. La ekstera aspekto, perceptebla per niaj sentoj, nomigas *formo*. La enhavo estas la senco. Enhavoj kaj formoj ne ekzistas unuj sen la aliaj. La enhavoj formas *strukturojn*, kaj reprezentas la lingvon.

Enunci

Esprimi sin per artikulaciita kaj segmentigebla son(sin-sekv)o. La rezulto de enunco estas *enuncaĵo*.

Epistemologio (filozofia termino)

Esploro pri la evoluo kaj pri la strukturo de la scienco kaj de la kon-teorio.

Etologio (naturescienca termino)

Scienco pri la best-konduto (best-psikologio) en la natura medio de la pristudata besto-specio mem.

Evalui

Taksi la valoron de io.

Falsifiki

Ni supozu, ke ni volas efektiviĝi eksperimenton por pruvi aŭ malpruvi teorion aŭ hipotezon. Se dank-al la eksperimento, ni malkovras, ke la teorio aŭ hipotezo estas erara, ni diras, ke ni *falsifikis* ĝin. Antonimo: *verifiki*. Populare: *pruvi teorion erara*.

Filono (naturescienca termino, el la greka *phylon*, latine: *phylum*)

Granda grupo el genetike parencaj bestaj specioj (ekz-e: la protozoa filono, la artikula filono, ktp.).

Fitopatologio

Planto-malsano-scienco.

Formo

Elementa manifestiĝa unuo de signo. La valoro de formo nomiĝas *enhavo*.

Formala

Havanta formon.

Frazeologio

Studo pri la dirmanieroj en difinita lingvo.

Futuro

En Esperanto: -os-tenso.

Glosematiko

Ekstreme formalisma tendenco en la moderna strukturalisma lingvistiko. Ĝin fondis la dana lingvisto Louis HJEMSLEV.

Grafio

Skribsistemo. Ekzistas *fonetika grafio* (kiu celas skribi la sonojn de lingvo), *fonologia grafio* (kiu celas fiksi skribe la fonologiajn valorojn de lingvo, t.e. la funkci-havajn son-imagojn), *historia gra-*

fio (kiu surpaperigas parollingvon sur la bazo de historie-tradiciaj litergrupoj).

Helena

Adjektivo indikanta la apartenon al la antikva-greka kulturo.

Heŭristika

Adjektivo indikanta ion, kio faciligas aŭ rekte permesas trovon.

Homo-

Scienca prefikso indikanta: "sam-". **homofona:** sam-sona. **homografia:** sam-skriba. **homonimo:** sam-vorto.

Ideografio

Skribsistemo, laŭ kiu al ĉiu ideo (aŭ semantemo, aŭ morfemo) devus teorie korespondi unu sola signo, kaj inverse.

Imperfektivo

Latina kaj novlatina "-is"-tenso kun. la senco "is-ago, tamen ne plenumita".

(amerik-) indiana

Adjektivo, koncernanta la usonajn praloĝantojn.

Interlingvistiko

Scienco pri la internaciaj planlingvoj kaj pri la internacia uzo de naciaj (etnaj) lingvoj.

Internala

Mekanismo internigita en la homo, psike kaj kondute, tiel profunde, ke tiu mekanismo aspektas deorigine interni, eĉ se ĝin la individuo lernis.

Irenismo (termino de religi-filozofio)

Medito pri la valoro de la paco kaj pri la rimedoj, efektiviĝi ĝin.

Izomorfa

Du strukturoj origine malsamaj, tamen funkcias en maniero tre simila, kaj do iel aspektas "similaj", estas nomataj "izomorfaĵ".

Kapilaro (termino de fiziko)

Ege mallarga kavaĵo de tubeto, kie trafluo de likvaĵo ne okazas laŭ la ordinaraj fizikaj leĝoj, sed laŭ specialaj adhero-kromreguloj.

Kategorio

Konstanta funkcia simileco de diversaj signoj interne de strukturo. Ekzistas pluraj specoj de kategorioj: gramatikaj (ekz-e substantivo, adjektivo...), kognitivaj (ekz-e objekto, tempo, spaco...), semantikaj (ekz-e signiferoj kaj kunordigaj operacioj), sintaksaj (ekz-e subjekto, objekto, komplementoj...).

Kibernetiko (aŭ: Cibernetico, pli bona ol la unua)

Scienco de la aŭtomataj memreguliĝantaj sistemoj.

Kognitiva

Adjektivo koncernanta la kono-kategoriojn kaj la kono-operaciojn de la homa psiko.

Komportemento (psikologia termino)

La tuto el la kondutoj de vivulo.

Komportementismo

Uson-origina psikologia teorio (WATSON). Komportamentisto asertas, ke la psikon oni povas nur malbone koni. Ni povas esplori la homan konduton nur tra la studo de la komportemento. Tiu estas la normala maniero studi besto-konduton.

Kreola lingvo

Piĝina lingvo iĝinta familia heredaĵo.

Leksiko

Tuto el la vortoj de lingvo.

Leksikono

Libro kun difino de la signifo de la vortoj en difinita lingvo.

Lingvistiko

Scienco pri la homaj lingvoj.

Lingvo (generale)

Idiomo. (lingvistike): la strukturo, kiu, aktualiĝante en la konkreto tra la unuopaj homoj, nomiĝas “parolo”. Rimarko: en la ĝenerala (populara) senco de la vorto, oni distingas izolajn, aglutinajn kaj fleksiajn lingvojn.

Memeksplika (motivita) vorto

Vorto, kies rilato inter formo kaj enhavo ne estas arbitra, sed iel travidebla. Ekz-e, la vorto *malami* estas memeksplika, ĉar ĝi konsistas el *mal* + *ami*. Male, *hati* estas nememeksplika vorto. Same, *ki+el* estas mem-eksplika vorto (ĉar ĝi konsistas el du signifohavaj elementoj), dum ke Interlingua *como* (= kiel) estas ne-memeksplika.

Memorkapablo (artefarita)

Mezepoka kaj renesanca scienco, kiu celis ellabori rimedojn por ampleksigi la naturan homan memorkapablon.

Mentaleco (france: *mentalité*)

Tuto el la kutimaj raciaj kaj pseŭdoraciaj (mitaj) rezonadoj de individuo au socia grupo, kun la celo ekspliki konstateblajn okazaĵojn.

Monomorfa

Kun formo unueca, kun unusola formo, unusola aspekto. Monomorfa morfemo ne havas alomorfojn.

Morfemo

Baza elemento de la unua nivelo de la artikulacio de la lingvo. Temas pri konstanta grupo el fonemoj kun certa konstanta valoro (= funkcio, signifo, enhavo).

Morfosintakso

La tuto el la reguloj pri gramatiko kaj pri sintakso de difinita lingvo.

Negi

Nei, aserti ke io ne estis, aŭ ne okazis.

Neotenienco

En natursciencoj oni parolas pri neotenienco, kiam la idoj de difinita specio naskiĝas en preskaŭembria stato. La vartado far-de la gepatroj, do, estas relative longa, kaj tial la lerno-periodo estas ankaŭ relative longa. Tio signifas, ke la koncerna specio estas relative malmulte specialiginta. Tipa ekzemplo estas la homo.

Normo lingva

Uzoreguloj limigantaj la faktan aplikon de lingvosistemo (sur sociohistoriaj fundamentoj).

Novgramatikistoj

Historia kaj pozitivista lingvistika skolo, kiu okupiĝis cetere ĉefe pri hindeŭropa kompara lingvistiko. Ĝi baziĝis sur lingvo-atomisma vidpunkto, kaj kredis, ke ekzistas lingvaj leĝoj, kiuj funkcias, kvazaŭ fizikaj leĝoj.

Novlatina (latinida) lingvo

Koncernanta etnajn lingvojn, idojn de la latina.

Novlatinoida

Koncernanta lingvojn artefaritajn, konstruitajn sur la bazo de la latinidaj lingvoj. Pli malbone oni parolas ankaŭ pri *naturalisma lingvo*.

Obsoleta

Adjektivo, indikanta eksmodecon.

Paradigmo

Morfem-kategorio aŭ morfemgrupo-kategorio, kies membroj povas anstataŭi unuj la aliajn en sama kunteksto (kies membroj do havas la saman distribuon).

Paronimo

Vortoj similaj laŭ formo, sed ne laŭ enhavo. "afekta" ne estas "efekta", sed ambaŭ estas paronimoj.

Paseo

Esperanta "-is"-tenso.

Perfektivo

Latina kaj latinida is-tenso, kun kromsenco pri "ago plenumita".

Piĝina lingvo

Lingvo simpligita, minimuma, sed ĉionesprima, dua kaj helpa por ĉiuj ties parolantoj, en regiono, kie multlingveco regas.

Polisemio

Plursenceco.

Pongidoj (termino zoologia)

specio de grandaj homsimilaj simioj.

Posibla

Ebla, havanta sancon okazi.

Prezenco

“-as”-tenso en Esperanto.

Psik(o)analizo

Scienco pri kono kaj terapio de psikaj mekanismoj kaj psikaj perturboj (konsciaj kaj nekonsciaj). Samtempe, psik(o)analizo komprenis sin mem kiel ĝenerala psikologia scienco de la evoluo kaj de la funkciado de la homa psiko. Ĝi havis granda sukceson siatempe.

Psikolingvistiko

Scienco pri la rilatoj inter aktiva kaj pasiva lingvo-uzo, kaj psikaj kaj neŭrofiziologiaj mekanismoj.

Redundanco

Pliigo de la sama informo en mesago. Tiel la mesaĝo ne riĉigas - sed ĝi iĝas pli facile elkodigebla.

Referi

Evidentigi la rilaton inter du eventoj aŭ objektoj. Eksterlingva referanto (aŭ plibone: *referato*). objekto en la ekstera mondo, koncernata de lingve esprimebla koncepto.

Sabira lingvo

Minimuma helplingvo, nenies familia, por regiona uzo, nesufiĉa por ĉion esprimi.

Segmento

Enhierarkie troviĝanta morfemo aŭ morfemgrupo.

Segmentigi : Dividi laŭ segmentoj (hierarkie strukturitaj) unu enuncajon.

Semantiko

Scienco pri la signifoj.

Semiologio

Generala scienco pri la signosistemoj.

Signo

Duflanka komuniko-unuo: unu aspekto estas la formo, la alia aspekto estas la signifo (la enhavo). La rilato inter ambaŭ estas arbitra. La rilato inter la formo (aŭ: signifanto) kaj la enhavo (aŭ: signifato) nomiĝas "signifado". La rilato inter la signo kaj la eksterlingva referato (aŭ: referaĵo) nomiĝas "montrado" (france: *désignation*).

Simboliga kapablo (psikologia termino)

Temas pri la kapablo abstraktigi konceptojn el la perceptata (ekstera) realo, kaj per ili efektivigi operaciojn. Ĝi evoluas iom post iom ĉe la infano surbaze de genetika eblo kaj de praktika ekzercado.

Simuli (scienteoria termino)

Efektivigi eksperimenton, en kiu oni ŝajnigas ekzistantajn kondicojn enlaboratorie (por kontroli la variantojn): La rezulto estas pruvo aŭ malpruvo de hipotezo, eventuale ankaŭ verifiko aŭ falsifiko de teorio.

Sinkronia lingvistiko

Branĉo de lingvistiko, kiu okupiĝas pri la ekzameno de difinit-epoka lingvostadio, senkonsidere pri la historia disvolviĝo, kiu kondukis al tiu stadio mem. Antonimo: *diakronia* lingvistiko.

Sinonimo

Temas pri du aŭ pluaj vortoj havantaj saman signifon, sed malsaman formon. Esperanto havas malmultajn sinonimojn. *Hundobleki* (mem-eksplika vorto) estas sinonimo de la verbo *boji*.

Sintagmo

Enuncaĵo, aŭ parto de enuncaĵo, formanta koheran (funkcian), forman kaj enhavan tuton.

Sintagmatiko

Scienco pri la strukturo de la sintagmoj en difinita lingvo.

Specio (biologia termino)

Grupo el best-familioj ne tre malsamaj, havantaj komunajn apartaĵojn (formalajn kaj komportementajn). Oni ofte supozas, ke temas pri familioj venantaj el sama pra-besto. Tamen, ofte oni rimarkas diverĝojn kaj konverĝojn genetike sendependajn.

Strukturo

Aro da elementoj kaj da ties reciprokaj rilatoj, formanta tuton koheran kaj kongruan.

Supino

Speciale formo en la latina verbo-konjugacio.

Tagmemo

Konstanta kaj signifanta (funkcio-havanta) pozici-rilato inter morfemoj de enuncaĵo.

Taŭtologio

Per taŭtologio oni esprimas per aliaj (lingvaj) formoj ĉiam precize saman signifon.

Tenso

En la Esperanta verbo: deviga enprepozicia esprimo de la finaĵoj -as, -is, -os, -us, -u, -i.

Ugro-finna lingvistiko

Lingvistiko kiu pritraktas la ugro-finnajn lingvojn (i.a., la hungaran, finnan, estonan, ktp.).

Uralo-altajaj lingvoj

Lingvoj de turka familio, ugro-finna familio, mongolaj familioj, eble ankaŭ japana familio.

Verifiki

Antonimo de **falsifiki**. Populare oni diru: *pruvi ion vera* (aŭ: ĝusta).

18. Listo de mallongigoj

adj«	adjektivo
akuz.	akuzativo
anst.	Anstataŭ
CED	Centro de Esploro kaj Dokumentado
cit.	Citita
c.	Cirkaŭ
ekz-e	ekzemple
eld.	Eldono
fut.	futuro'
i.a.	interalie
IALA	The International Auxiliary Language Association
IED	Interlingua-English Dictionary (1951)
I.L.	internacia lingvo
ind.	Indikativo
inf.	Infinitivo
k.a.	kaj aliaj
KCE	Kultutra Centro Esperantista
ktp.	kaj tiel plu
LdN	Ligo de Nacioj
min.	minimume
orig.	Originalo
p.	paĝo
pas.	paseo
plur.	pluralo
proks.	proksimume
RdI	Revista de Interlingua
subst.	substantivo

19. Bibliografio de konsultitaj verkoj

- A Preliminary Investigation of the Teaching of Auxiliary Languages in Schools*, 1927.
- AULD W., *La Internacia lingvo kiel belarta tradukilo*, en: "Memorlibro", 1960.
- AULD W., *L'Esperanto langue littéraire*, Londres, CED, 1962 (originalo en Esperanto, samjara).
- AULD W., *Pri la traduko de poezio*, London, CED, 1965.
- BAKONYI S. artikolo citita en MONNEROT-DUMAINE, (vidu), 1960, p.155.
- BAKONYI S., *Problems of International Languages in the Light of Psychology*, en: "The International Language Review", 1956/3 kaj 4.
- BATTEGAY, RAUCHFLEISCH, *Medizinische Psychologie*, Bern, Huber, 1974.
- BAUSANI A., *Che cos'è l'interlinguistica*, en: "Fenarete", 1973/142.
- BAUSANI A., *Le lingue inventate*, Roma, Ubaldini, 1974 (ekzistas germanlingva traduko: *Geheim- und Universal- Sprachen*, êe Kohlhammer, Stuttgart, 1970)
- BERGER R., *Esperanto o Interlingua*, Morges, Editiones Interlingua, 1972.
- BERGER R., *Historia del lingua intemational*. Unua volumo, Morges, Editiones Interlingua, sen dato (a).
- BERGER R., *Historia del lingua international*, Dua volumo, Morges, Editiones Interlingua, sen dato. (b).
- BERGER R., *La construction d'une langue internationale moderne*, Morges, êe la aŭtoro, 1967.
- BERGER R., *La question d'une langue universelle*, Paris-Chapelle s/Lausanne, Occidental-Union, 1946.
- BERGER R., *Le problema de un lingua international*, Morges, Editiones Interlingua, sen dato.
- BERGER R., *Les écoles de Romandie et la mystique de l'Esperanto /Morges/*, êe la aŭtoro, 1975.
- BERGER R., *Pourquoi l'Interlingua?*, Morges, Editiones Interlingua, 1971.
- BERGGREN E., *Vocabulos supplementari pro usatores de Interlingua*, Stockholm, 1974.
- BLAAS L., *Listo de 50.000 tekstvortoj*, en: "Esperantologio" 1950/2.
- BLANKE D., *Die alten Sprachen und das Problem einer internationalen Welthilfssprache*, en: "Das Altertum", 1973/3.
- BLANKE D., *Pri la historio de internaciaj planlingvoj*, en: "Paco", 1975/7-8.
- BOKAREV E.A., *Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof*, en: "Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro" (red. Ivo LAPENNA), Londono, Universala Esperanto-Asocio - C.E.D., 1960.
- BOULTON M., *Zamenhof*, La Laguna, Régulo, 1962.
- BOVET P., *Enketo pri internacia helplingvo*, Stockholm, Sveda Esperanto-Federacio, 1948.
- BURNEY P., *Les langues internationales*, Paris, Presses Universitaires de France, 1962.
- CALVET J.L., *Linguistique et colonialisme. Petit traité de glottologie*, Paris, Payot, 1974.
- CAPELL A., *The limits of Second Language Learning*, en: "La Monda Lingvoproblemo", 1969/1.
- CARLEVARO T., *Ĉu Esperanto postvivis la jaron 2045?* Bellinzona 1999: Hans Dubois.
- CARLEVARO T., *The naturalist school in interlinguistics*, Braunschweig, Linguistische Berichte (Vieweg), 1971. (reaperis en Hauptenthal H., Plansprachen, 1976).
- CARRERAS Y ARTAU J., *De Ramon Lull a los modernos ensayos de formación de una lengua universal*, Barcelona, Consejo superior de investigaciones científicas, 1946.
- CAUBEL A., *La raison contre Babel*, Paris, Union Rationaliste, 1961.
- CECCATO S., *La terza cibernetica*, Milano, Feltrinelli 1974.
- CHAO Yuen Ren, *Langage et systèmes symboliques*, Paris, Payot, 1970 (originalo usona: 1968).
- COLLINSON W.E., *Klasado de lingvoj laŭ strukturo kaj la loko de Esperanto inter ili*, en "Elektitaj prelegoj", Purmerend, Muusses, 1955.
- COTTREL F.G., *Science in the Building of a New Language*, 1933.

- COURTINAT L., *Historio de Esperanto*, unua volumo: 1887-1913, Bellerive-sur-Allier, eld. de l' aŭtoro, 1964, p. 49-76.
- COUTURAT L., Leopold LEAU, *Les nouvelles langues internationales*, Paris, Eld. de la Delegitaro, 1907.
- CREUX A., *De Auli a Occidental*, Chapelle, Institute Occidental, 1932.
- DRESSLER W., *Zur plansprachlichen Redundanz*, en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/10.
- DREZEN E.K., *Historio de la mondlingvo*, Oosaka, Pirato, 1967 (4-a eld.).
- EATON H.S., *Semantic Frequency List*, 1940.
- EMMART B.D., *Attitudes Towards the World Language Problem as Shown in Public Opinion Polls*", en: "La Monda Lingvoproblemo", 1971/7.
- EMMART B.D., *Attitudes Towards the World Language Problem as Shown by Q-Methodology*, en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/11.
- FALKENHAHN V., *Zur Frage einer Welthilfssprache: Ein Vergleich der Lerneinheiten im Deutschen und im Esperanto*, en: "Der Esperantist", 1973/59-60.
- FORMIGARI L., *Linguistica ed empirismo nel seicento inglese*, Bari, Laterza, 1970.
- FORSTER P.G., *Esperanto as a Social and Linguistic Movement*, en: "Pensiero e linguaggio in operazioni", 1971/7-8 (samnumere: ekzistas ankaŭ itallingva traduko).
- FRITZSCHE A.M., *We Need a Better Image of Interlingua*, eld. de l'aŭtoro, Madrid, 1970.
- FUNKE O., *Zum Weltsprachenproblem in England im 17. Jahrhundert*, Heidelberg, Carl Winter, 1929.
- GACOND C., *Okdek jaroj de Esperanta vivo 1887-1967*, En: "Sennaciulo" (artikolserio aperinta de 1967/4 ĝis 1968/8-9).
- GACOND G., *Du Volapük à l'Esperanto*, en: "La pensée bahà'ie", 1973/43.
- GILBERT W., *Planlingvaj problemo*", La Laguna, Régulo, 1962.
- GIPPER H., *Gibt es ein sprachliches Relativitätsprinzip?*, Frankfurt (Main), Fischer, 1972.
- GODE A. (red.), *Interlingua-English, a Dictionary of the International Language*, New York, Storm, 1951.
- GODE A., *Fundamento de Interlingua*, Morges, eld. Berger, sen dato.
- GODE A., H.E. BLAIR, *Interlingua, a Grammar of International Language*, New York, Storm, dua eld. 1955.
- GODE A., *Manifesto de Interlingua*, en: "Novas de Interlingua", 1959/3-4.
- GREGOR D.B., *La fontoj de Esperanto*, en: "Scienca Revuo", 1958/9.
- GREGOR D.B., *La funkcio de la derivita adverbo en Esperanto*, en: "Esperantologio", 1961/2.
- GREGOR D.B., *La kultura valoro de Esperanto*, Londono, CED, 1967.
- GRIGORIEV V.P., *Alcuni problemi d'interlinguistica*, en: "Pensiero e linguaggio in operazioni", 1971/5 (kun apuda anglalingva traduko).
- GUTMANS T., *Some Ideas about Idioms in Esperanto*, en: "La Monda Lingvoproblemo", 1971/6.
- HAAS F., *Grammatica de Interlingue in Interlingue*, Winterthur, 1956, p. 18-20.
- HAGLER M., *The Esperanto Language as a Literary Medium*, Ann Arbor, University Microfilms (Xerox), 1970.
- HALLORAN J.H., *A four year experiment in Esperanto as an introduction to French*, en: "British Journal of Educational Psychology", 1952/22.
- HAUPENTHAL R. (Red.): *Plansprachen*. Darmstadt, Wissenschaftliche Buchgesellschaft, 1976.
- HINDE R.A., *La comunicazione non-verbale*, Bari, Laterza, 1974 (originalo usona, 1972).
- HOLZHAUS A., *Wilhelm Heinrich Trompeter*, Essen, Schroter, dua eld. 1973.
- JACOB H., *A planned auxiliary language*, London, Pitman, 1940.
- JACOB H., *On the Choice of a Common Language*, London, Pitman, 1946.
- JANTON P., *L'Esperanto*, Paris, Presses Universitaires de France, 1973.
- JESPERSEN O., *Eine internationale Sprache*, Heidelberg, Winter, 1928.
- KALOCSAY K., G. WARINGHIEN, *Plena Gramatiko*, 3-a eld., Milano, 1958-1964.

- KALOCSAY K., Henri VATRE, en: *Gvidlibro por supera ekzameno, dua parto*, red. A. PECHAN, Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1966.
- KÜNZLI A., *Universalaj lingvoj en Svislando*, La Chaux-de-Fonds, 2006.
- Language Learning, Summary of a Report to the IALA in the US*, Incorporated by Division of Psychology Institute of Educational Research Teachers College", Columbia University, New York, 1933.
- LAPENNA I., *Common Language Question before International Organizations*, en "La Monda Lingvoproblemo", 1970/5.
- LAPENNA I., Ulrich LINS, Tazio CARLEVARO, *Esperanto en Perspektivo*, London-Rotterdam, Universala Esperanto-Asocio, 1974.
- LENNEBERG E.H., *Fondamenti biologici del linguaggio*, Torino, Boringhieri, 1971 (originalo usona, 1967).
- LIEBERMAN, J., *Esperanto, Interlingua, and Emperor's New Clothes*, en The International LanguageReporter, 1962/29.
- LINTON K.G., *Kanako el Kanakam*, Rickmansworth, The Esperanto Publishing Co., 1960.
- LORENZ K., *Trois essais sur le comportement animal et humain*, Paris, du Seuil, 1970 (germanaj originalaĵoj el la jaroj 1937, 1950, 1954).
- MAAS H.D., *Kvanta karakterizo de vortara riĉeco de tekstoj*, en: "Scienca Revuo", 1973/2-3.
- MANDERS W.J.A., *Vijf kunsttalen*, Purmerend, Muusses, 1947.
- MANDERS W.J.A., *Interlingvistiko kaj Esperantologio*, Purmerend, Muusses, 1950.
- MARKARIAN R., *La eduka valoro de la instruado de Esperanto en la lernejoj*, Londono, CED, 1964.
- MARTINET A., *Grundzüge der allgemeinen Sprachwissenschaft*, Stuttgart, Kohlhammer, 1963 (franca originalo: 1960).
- MAYRHOFER M., *Zur Problematik der Plansprachen*, en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/10.
- McDIARMID H., *In memoriam James Joyce*, 1955.
- McNEILL D., *L'acquisizione del linguaggio*, Roma, Ubaldini-Astrolabio, 1973 (orig. usona, 1970).
- MEILLET A., *Les Langues dans l'Europe nouvelle*, 1918.
- MINNAJA C., G. SILFER, *Historio de la esperanta literaturo*, LF-Koop, La Chaux-de-Fonds 2015, 748 paĝoj.
- MONNEROT-DUMAINE M., *Précis d'interlinguistique générale et spéciale*, Paris, Maloine, 1960.
- MULAIK S.A., *Interlanguages Need Rigorous Testing*, en *The International Language Reporter*, 1062/30.
- MULAJK S.A., *Naturalismo, cultura e le ipotesi de Whorf*, en: "The International Language Review", 1957/8.
- NEERGAARD P., Internacia lingvonormigo. Artikolo aperinta en: "Heroldo de Esperanto", 1966. Nun legebla en BERGER, cit., 1975, p. 13.
- NOGUEIRA P., *Características estruturais do esperanto*, en: "La Monda Lingvoproblemo", 1970/4.
- PEI M., *Cercasi una lingua mondiale*, en: "L'Esperanto", 1972/178, p. 5 (angla originalo: 1969).
- PEI M.A., *One language for the world*, New York, Biblo and Tannen, 1968 (repesaĵo el 1958).
- PETERSON D.J., *The Art of Language Invention*. New York, Penguin Books, 2015.
- PIGAL E., *Vorwort*, en "Occidental die Weltsprache", cit.
- PIRON C., (*Lettre ouverte*), Mont-Soleil, Campagne 'L'Esperanto à l'école', 1975.
- PROROK J. (pseŭdonomo de E. VON WAHL), *Kultureller und erzieherischer Wert des Occidentals*, en: "Occidental die Weltsprache" (red. PIGAL), Stuttgart, Franckhe, tria eldono 1930.
- RAGNARSSON B., *La du kodoj de Esperanto*, en: "Internacia pedagogia revuo", novembro 1973.
- RAMSTEDT A.Z., *Li psicologic e sociologic caractere del lingues*, nuntempe legebla en: "Tra li interlinguistica", Cheseaux s/Lausanne, Interlingue-Institute, 1964, p. 3-12.
- REGULO-PEREZ J., *Lando de libereco, egaleco kaj frateco*, en: "Memorlibro", cit., p. 70.
- Ric BERGER, *Edgar de Wahl, autor de Occidental*, en: "Cosmoglotta", 1956/130, p. 28.

- ROSENFELDER M., *The Language Construction Kit*. Chicago, Yonagu Books, 2000.
- ROSIELLO L., *Linguistica illuminista*, Bologna, Il Mulino, 1967.
- ROSSI P., *Clavis universalis: Arti mnemoniche e logica combinatoria da Lullo a Leibniz*, Milano-Napoli, Ricciardi, 1960.
- ROSSI P., *Francesco Bacone*, Torino, dua eld. 1974; (ekzistas usona traduko: Novjorko 1967).
- SAMPOLA O., Lernejraporto aperinta en: "Esperanta Finnlando", 1963/7
- SAPIR E., *Cultura, linguaggio e personalità*, Torino, Einaudi, 1972 (usona originalo 1957).
- SAPIR E., *Le langage*, Paris, Payot, 1967 (originalo usona: 1921).
- SAPIR E., *The Problem of an International Auxiliary Language*, 1925.
- SAUSSURE F. de, *Cours de linguistique générale*, Paris-Lausanne, Payot, 1916.
- SAUVAGEOT A., *Lettre à J. Roux*, en: "Cosmoglotta", januaro 1950.
- SAUVAGEOT A., *Une langue universelle et laquelle*, en: "Vie et langages", oktobro 1954.
- SCHILD A., citita en: Ric BERGER, *Pourquoi l'Interlingua?*, Morges, Editiones Interlingua, 1971.
- SCHUCHARDT, H. *Weltsprache und Weltsprachen: An Gustav Meyer*, Strassburg, Trübner, 1894.
- SETÄLÄ E., *La question de la langue universelle*, en: "Journal de la société finno-ougrienne", 1932/43, p.114.
- SETÄLÄ V., *La genio de Zamenhof: efekta lingvo*, en: LAPENNA, "Memorlibro", cit., p. 43.
- SHENTON H.N., *Can Social Engineers Improve the International Situation?* Cambridge, R.I. Severs, 1930.
- SHENTON H.N., *Cosmopolitan Conversation*, 1934.
- SLOBIN D.I., *Einführung in die Psycholinguistik*, Kronberg/Ts., Scriptor, 1974 (orig. usona).
- SPITZBART H., *Weltsprachen und Welthilfssprachen*, en: "Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung", 1973/6.
- STOJAN P.E., *Bibliografio de Internacia Lingvo*, 1929.
- SZERDAHELYI I., *La didaktika loko de la internacia lingvo en la sistemo de lernejoj studobjektoj*, en: "Internacia pedagogia Revuo", januaro 1970
- TAULI V., *Introduction to a Theory of Language Planning*, Uppsala, Almqvist & Wiksell, 1968.
- TELL L., *Estiço de la tero kaj de la homo*, La Laguna, Régulo, 1969.
- TESNIÈRE L., "Elements de syntaxe structurale", Paris, Klincksiek, 2-a eld. 1969.
- THORNDYKE E.L., *Language Learning*, 1933.
- VAITILAVICIUS A., *Riĉeco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj*, en: "Der esperantist", en la jenaj numeroj: 1972/53, /54, /55-56, 1973/57-58.
- VERLOREN VAN THEMAAT W.A., *Is science bound to the Western languages?*, en: "La monda lingvoproblemo", 1969/3.
- VERLOREN VAN THEMAAT W.A., *Literature in a Constructed Language*, en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/12.
- VERLOREN VAN THEMAAT W.A., *Whorf-a lingvistika relativismo kaj planlingvoj*, Londono, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvoproblemo, sen dato.
- VILBORG E., *Novaĵoj pri Interlingua*, en: "Fokuso", 1973/11
- VILBORG E., *Esperanto serioze*, en: "Fokuso", 1974/12.
- VILBORG E., *Interlingua sen principoj*, en: "Fokuso", 1970/6
- VILBORG E., *Interlingua, lingvo de hazardo*, en: "Fokuso", 1968/3
- VILBORG E., *Latinaj vortoj en Esperanto kaj Interlingua*, en: "Fokuso", 1968/3
- VILBORG E., *Nesuperebla mensogo?*, en: "Fokuso", 1973/11
- w.f., *Le clave terminologie e le lingua terminologie de Dr. Eugen Wüster*, en: "Novas de Interlingua", 1967/2
- WAHL E. de, *Spiritu de Interlingue*, Cheseaux s/Lausanne, Interlingue-Institute, dua eld. 1953.
- WARINGHIEN G., *Lingvo kaj vivo*, La Laguna, Régulo, 1959.
- WARINGHIEN G., *Zamenhof*, en: "Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro" (red. LAPENNA), 1960, p. 23-26.

- WEINREICH U., *Lingue in contatto*, Torino, Boringhieri, 1974. (originalo anglalingva 1963); enkonduko de G.R. CARDONA.
- WENDT H.F. (red.), *Sprachen*, München, Fischer, 1961.
- WHORF B.L., *Sprache Denken Wirklichkeit*, Reinbek, Rowohlt, 1963 (originalo: usona).
- WOOD R.E., *Proceedings of the symposium on the teaching of Esperanto at United States universities and colleges*, en: "La Monda Lingvoproblemo", 1972/12
- WÜSTER E., *Internationale Sprachnormung in der Technik*, Bonn, tria eldono, 1970.
- WÜSTER E., *Konturoj de lingvonormigo en la tekniko*, Aabyhöj, dua eldono, 1975
- XENOPHON, *Erinnerungen an Sokrates*, München, Heimeran, 1962, p. 54 (dulingva eldono).
- ZAMENHOF L.L., *Fundamenta Krestomatio*, Londono, The Esperanto Publishing Co., 17~a eld.
- ZAMENHOF L.L., *Fundamento de Esperanto*, red. ALBAULT, Marmande, Esperantaj-Francaj Eldonoj, 9~a eld. 1963.
- ZAMENHOF L.L., *Letero al Borovko*, en: "Originala Verkaro", Leipzig, Hirt, 1929.
- ZAMENHOF L.L., *Originala Verkaro*, Leipzig, Hirt, 1929.
- ZLATNAR P., *La internacia lingvo por internaciista eduko*, en: "Esperanto", 1975/7-8.

20. Listo de nomoj

- Adamo: 22
Alfandari A.: 12
Arfa (princo): 111
Auerbach S.: 116
Auld W.: 58, 59, 60, 61, 143
Babcock D.E.B.: 115
Bacon F.: 22, 146
Bakonyi S.: 64, 69, 74, 143
Bally Ch.: 116, 134
Barczy G.: 125
Bardoux J.: 113
Barrios M.C.: 110
Battégay: 11, 143
Baudouin de Courtenay J.: 17, 110
Bausani A.: 15, 18, 19, 68, 77, 79, 108, 143
Beaufront, L. de: 27, 110, 111
Bérard L.: 111
Berger R.: 7, 8, 9, 16, 17, 29, 45, 51, 52, 103, 107, 108, 109, 111, 120, 128, 143, 145, 146
Bernasconi E.: 2
Blaas L.: 52, 143
Blanke D.: 14, 23, 69, 79, 89, 143
Blair H.E.: 79, 94, 97, 98, 144
Blondel: 91
Boas F.: 72
Boirac E.: 110
Bokarev E.A.: 15, 78, 79, 143
Bouchard Ch.: 110
Boulton M.: 18, 27, 143
Bovet P.: 116, 126, 127, 143
Brugmann: 17
Bruno G.: 22
Burney P.: 64, 67, 143
Capell A.: 73, 143
Cardona G.R.: 18, 147
Carlevaro T.: 2, 5, 9, 12, 19, 20, 59, 60, 76, 101, 111, 127, 130, 143, 145
Caubel A.: 9, 53, 57, 146
Ceccato S.: 21, 25, 26, 143
Chao, Yuen Ren: 55, 143
Chomsky N.: 24
Cohen M.: 116
Collberg S.: 79, 80
Collinder B.: 116
Collinson W.E.: 36, 115, 116, 117, 118, 143
Cottrel F.G.: 114, 115, 143
Courtonne: 33
Couturat L.: 31, 82, 110, 111, 144
Creux A.: 91, 144
Debrunner A.: 116, 117
Descartes (Kartezio): 23
Diels: 17
Dressler W.: 55, 144
Duggan S.: 115
Eaton H.S.: 116, 144
Einstein A.: 18
Emmart B.D.: 10, 11, 144
Eötvös L.: 110, 127
Epstein I.: 18
Ezopo: 132
Falkenhahn V.: 40, 41, 60, 144
Finley J.H.: 115
Forchhammer: 113
Forster P.G.: 19, 144
Forster W.: 110
Frank H.: 125
Fritzsche A.M.: 74, 108, 144
Funke O.: 22, 116, 144
Gacond C.: 4, 15, 32, 34, 144
Gadda C.E.: 64
Ginneken, van: 116
Gipper H.: 73, 144
Gode A.: 12, 29, 43, 51, 67, 70, 71, 72, 73, 74, 75, 76, 79, 82, 83, 89, 94, 97, 98, 104, 114, 115, 116, 118, 119, 120, 144
Goethe J.W.: 71, 119
Gregor D.B.: 52, 60, 62, 144
Grigoriev V.P.: 44, 146
Gutmans Th.: 61, 144
Haas F.: 93, 94, 144
Hagler M.: 59, 60, 144
Hanotaux G.: 112
Harvey G.: 110
Hermann E.: 116
Hirsch P.: 4, 114
Hitler A.: 16
Humboldt, von: 73
Isly: 83
Jacob H.: 116, 121, 123, 144
Janton P.: 15, 20, 30, 38, 39, 61, 77, 144
Jardel C.: 104
Jespersen O.: 12, 66, 77, 110, 116, 144
Kalocsay K.: 38, 59, 144, 145
Karcevski S.: 116
Komensky J.A. (Komenio): 22
Ksenofonto: 45
Künzli A.: 5, 145
Kurzens N.: 62
Lamartine: 81
Lambros S.: 110
Lapenna I.: 9, 12, 15, 19, 29, 111, 127, 130, 143, 145, 146
Lauda E.: 67
Leau L.: 31, 82, 110, 144
Leibniz G.W.: 21, 22, 23, 146
Lermontov: 132
Leskien: 17
Leutert E.: 4
Lidzbarski M.: 18
Lieberman E.J.: 66, 145
Linné: 22
Liptay: 67
Llull (Lullus) R.: 22
Loewenthal M.: 64
Lorenz K.: 24, 145
Lott J.: 67
Lowe Dickinson: 113
Luchaire: 113
Maas H.D.: 39, 145
Manders W.J.A.: 10, 36, 57, 77, 115, 145
Martinet A.: 24, 116, 119, 135, 145
Martinson H.: 132
Matejka A.: 68
Mayrhofer M.: 55, 145
McDiarmid H.: 59, 64, 65, 145
Meillet A.: 17, 55, 77, 78, 116, 145
Mersenne M.: 23
Meyer G.: 7, 8, 17, 146
Meysmans J.: 69, 91
Migliorini B.: 18
Minnaja C.: 59, 145
Molenaar: 82, 91
Moore: 91
Morris D.H.: 114, 115
Morris L.: 115
Morris Vanderbildt A.: 114, 115, 120
Moser U.: 4
Mulaik S.A.: 66, 67, 74, 75, 76, 77, 145
Müller M.: 17
Murray G.: 113

Neergaard P.: 120, 145
 Negalha J.: 132
 Newell L.N.M.: 79, 80
 Nitobe I.: 112, 113
 Nogueira R.P.: 38, 390, 145
 Ostwald W.: 110
 Paige, C. le: 110
 Paul H.: 17
 Peano G.: 12, 67, 72, 110
 Pei M.A.: 9, 10, 17, 37, 38, 39, 69, 73, 145
 Peterson, D.J.: 6, 145
 Piaget J.: 25
 Piron C.: 4, 34, 37, 51, 52, 90, 120, 127, 130, 145
 Platono: 71
 Pope: 64
 Privat E.: 18, 111
 Puškin: 132
 Ramstedt A.Z.: 17, 69, 145
 Ramstedt G.J.: 17
 Régulo-Perez J.: 58, 145
 Reynald G.: 113
 Reynold, G. de: 7, 29, 64, 113, 114, 124
 Rio Branco: 113
 Rodos G.: 110
 Romains J.: 64
 Romanov: 132
 Rosenfelder M.: 6, 146
 Rossi P.: 21, 22, 146
 Salicto C.: 79, 132
 Sapir E.: 72, 73, 116, 146
 Saussure, F.de: 17, 20, 48, 134, 146
 Sauvageot A.: 31, 32, 146
 Schild A.: 54, 89, 90, 145, 148
 Schleicher A.: 17
 Schleyer J.M.: 12, 32
 Schrijnen: 116
 Schuchardt H.: 7, 8, 9, 10, 17, 110, 146
 Schwartz R.: 64
 Sechehaye A.: 116
 Seldam C.A. ten: 54
 Setälä. E.: 9, 146
 Setälä V.: 40, 146
 Shakespeare W.: 79, 132
 Shenton H.N.: 116, 146
 Sienkiewicz: 132
 Silber G.: 59, 145
 Spitzbart H.: 10, 13, 14, 21, 42, 146
 Stalin J.V.: 16
 Stead W.T.: 110
 Stillman E.C.: 115, 116, 118, 119
 Stojan P.E.: 115, 146
 Szerdahelyi I.: 38, 125, 127, 146
 Tauli V.: 9, 13, 78, 88, 146
 Tesnière L.: 48, 146
 Thorndyke E.L.: 116, 146
 Torre de Quevedo: 113
 Trompeter W.H.: 27, 28, 144
 Tzaut O.: 4
 Vaitilavicius A.: 60, 61, 146
 Vatré H.: 59
 Vendryes J.: 116
 Verloren van Themaat W.A.: 13, 36, 37, 58, 73, 74, 146
 Vilborg E.: 14, 52, 103, 104, 105, 120, 128, 146
 Wackernagel J.: 116
 Wahl, E von (de): 12, 17, 66, 69, 72, 77, 79, 83, 85, 92, 93, 145, 146
 Waringhien G.: 29, 34, 38, 48, 56, 99, 144, 146
 Waterman: 132
 Weinreich U.: 18, 147
 Whorf B.L.: 13, 25, 36, 37, 71, 72, 73, 74, 147
 Wijk, N. van: 116
 Wood R. E.: 127, 147
 Wüster E.: 113, 114, 115, 120, 121, 122, 123, 147
 Zamenhof L.L.: 12, 15, 17, 18, 19, 27, 28, 29, 30, 32, 33, 34, 38, 39, 40, 43, 44, 50, 51, 55, 70, 77, 79, 80, 110, 114, 115, 143, 146, 147
 Zamenhof M.: 27
 Ziolkowska M.: 18